

Milošo Cernansko
(Милош Црњански)

TRANSLOĜIĜOJ



Serbia Esperanto-Ligo
Удружење есперантиста Србије



Удружење научних и стручних преводилаца Србије
Representativno удружење u kulturi

Milošo Cernansko
(Милош Црњански)
TRANSLOĜIĜOJ

SERIO de serba literaturo

Tradukis

Jovano Zarkoviĉo

Ĵivanko Novakovo

Наслов ориџинала

СЕОБЕ

Издавач

Удружење научних и стручних преводаца Србије

За издавача

Драгић Вукићевић

Уредник

др Милош Д. Ђурић

Дизајн и ѿрелом

ЈП „Службени гласник“

Тираж

300

ISBN

ISBN-978-86-917873-7-0

Година издања

2025

Milošo Cernansko
(Милош Црњански)

TRANSLOĜIĜOJ

Beogrado, 2025

ANTAŬPAROLO

„*Transloĝiĝoj*“ de Miloš Crnjanski – *Vagadoj tra Historio kaj Animo*

La romano „**Transloĝiĝoj**“ (serbe: *Seobe*), ĉefverko de **Miloš Crnjanski**, estas unu el la plej gravaj verkoj de la serba moderna literaturo. Ĝi konsistas el du partoj: la unua estis publikigita en 1929, kaj la dua en 1962. La verko rakontas pri la sorto de serbaj soldatoj en la 18-a jarcento, kiuj, servante en la aŭstra armeo, migras tra Mezeŭropo, for de sia patrujo.

Temo kaj enhavo

La ĉefaj protagonistoj, **Vuk Isakoviĉ** kaj lia frato Arandĉel, estas serbaj oficiroj kiuj, kun siaj subuloj, partoprenas en la militoj de la Habsburga Imperio. La romano ne temas nur pri geografiaj migradoj, sed ankaŭ pri **internaj, ekzistad-rilataj migradoj**, pri la sento de senradikiĝo, senutileco, kaj eterna serĉado de senco.

Crnjanski ne prezentas heroojn laŭ la tradicia maniero. Lia ĉefa rolulo, Vuk, estas **melankolia, laca, kaj konstante tornita de duboj**. La soldatoj ne marŝas kun fiero, sed kun pezo – ilia vivo estas markita de malcerto kaj nostalgio. Tiu profunda homa dimensio donas al la romano apartan psikologian profundon.

Stilo de Crnjanski

La stilo de Miloš Crnjanski – liriko de migranta animo

La stilo de **Miloš Crnjanski** en la romano „*Transloĝiĝoj*“ estas tute aparta en la panoramo de serba (kaj pli ĝenerale, eŭropa) prozo. Ĝi estas **nek konvencie epika, nek klare psikologia**, sed io intere: **poezia prozo**, kiu per sia sonoro, flueco kaj fragmentiĝo **spegulas la animstaton de la roluloj** – precipe la internan kaoson kaj maltrankvilon de homo fortranĉita de radikoj.

Lirika prozo kun muzika strukturo

Crnjanski verkas per **frazoj kiuj memoras ondojn, aŭspirojn aŭ eĥojn**. Li uzas **ripetojn**, parte por emfazi la internecon de la sperto, parte por **enkonduki ritmon** – ofte proksiman al poezia verso. Ekzemple, li ripetas nomojn, vortojn, aŭ mallongajn frazojn kun etaj variadoj, tiel ke la teksto ricevas **muzikecon** kiu kondukas la leganton ne laŭ argumento, sed laŭ sento.

Tiuj ripetoj ne celas klarigi, sed **ekesti senton, atmosferon, etoson**. Tiel, Crnjanski ne konstruas rakonton en klasika senco, sed **tekstaĵon el bildoj, momentoj kaj emocioj**, kiuj interplektiĝas kaj revenas en ĉiam novaj formoj.

Fragmenta rakonto anstataŭ logika kronologio

Anstataŭ lineara rakonto, **Crnjanski prezentas realon kiel fragmentiĝintan**, kvazaŭ reflektitan en rompiĝinta spegulo. Tiu **fragmenteco** ne estas konfuzo, sed **konscia arta elekto**, kiu respegulas la disrompiĝon de la mondo de liaj roluloj. Temas pri **konscifluo**, pri teksto kiu sekvas la internan vivon de homo pli ol eksterajn eventojn.

La lingvaĵo estas **riĉa je metaforoj**, ofte surprizaj, kun **bildoj kiuj aperas kaj malaperas** kvazaŭ en sonĝo. Ekzemple: arbaroj ne estas simple „arbaroj“, sed vivantaj estaĵoj; milito ne estas nur fakto, sed ombro kiu glitas sur animoj.

La „sumatra principo“ – filozofia centro de lia verkado

La t.n. „**sumatra principo**“ (*sumatrizam*), kiun Crnjanski unue priskribis en siaj eseoj kaj aludis ankaŭ en aliaj verkoj, estas **kosmologia kaj homa ideo**: ke ĉio en la mondo estas konektita – homoj, historioj, eĉ diversaj tempoj kaj lokoj.

En „*Transloĝiĝoj*“, ĉi tiu principo manifestiĝas tra la **paralela ekzisto de forgesitaj soldatoj, perditaj pejzaĝoj, kaj senĉesa serĉado de senco**. La fakto ke la protagonistoj konstante migras, fizike kaj spirite, reflektas la ideon ke la mondo ne estas firme strukturita, sed **fluanta tutaĵo**, kie ĉio povas resonanci kun ĉio.

La „sumatra principo“ igas la romanon **preskaŭ metafizika vojaĝo** – malantaŭ la konkretaj eventoj kaŝiĝas la sento ke ni ĉiuj portas en ni eĥojn de aliaj vivetapoj, aliaj homoj, aliaj lokoj. Tiel, la romano fariĝas **ne nur historia**, sed **universala**.

Lingvo kaj ritmo

Crnjanski konscie forlasas la tradicion de klaraj, **logike strukturitaj prikskriboj**, kiuj karakterizas klasikajn rakontojn. Anstataŭe, li uzas **mallongajn, foje interrompitajn aŭ nekompletajn frazojn**, kiuj funkcias pli kiel

pulsaĵoj de sento ol kiel veturiloj de informo. La vortoj venas en ondoj, ofte ripetataj, sen rigida gramatika simetrio. Tiu ripetado ne estas rezulto de stilista neglekto, sed preciza poezia decido: **per ripeto li akcentas internajn ŝtormojn, obsedojn, melankolion.**

La prozo tiel akiras **muzikan ritmon**, kvazaŭ ĝi estus komponita pli ol verkita. La leganto ne simple „sekvas intrigon“, sed estas **engluita en fluo de sensoj** – sentoj de hejmeco, fremdiĝo, sopiro, senradikiĝo. Tiu fluado de la frazoj ne kondukas laŭ rekta linio, sed **spiralas**, revenas al samaj bildoj, pensoj, sentoj – kvazaŭ la menso de la protagonisto mem diktaĵus la rakonton.

Tiu maniero de skribo estas karakteriza ne nur por „*Transloĝiĝoj*“, sed por la tuta verko de Crnjanski. Lia prozo **ne apelacias al la intelekto, sed al la nervoj**, ĝi **ne demandas fakton, sed konscion**. Pro tio, lia teksto postulas aktivan leganton – iun, kiu ne nur interpretas, sed **samsente kunvivas** kun la ritma, preskaŭ hipnota langaĵoj de la stilo.

Konkludo

„*Transloĝiĝoj*“ ne estas historia romano en la klasika senco, sed **ekzistenciala epepeo** pri serboj sen hejmo, pri homoj sen celo, pri soldatoj kiuj pli batalas kontraŭ propra melankolio ol kontraŭ la malamikoj. La verko estas **reflekto pri identeco, perdo, amo, morto kaj la foresto de senco.**

La stilo de Crnjanski – profunda, sentema, kaj tre individua – faras „*Transloĝiĝojn*“ ne nur grava romano en la serba literaturo, sed **universala verko pri la homa kondiĉo.**

Zlatoje Martinov

Milošo Cernansko
1. TRANSLOĜIĜOJ

ENHAVO

I. SENFINA BLUA CIRKLO. EN ĜI, STELO.....	13
II. ILI IRIS FOR, KAJ POST ILI RESTIS NENIO. NENIO	23
III. TAGO KAJ NOKTO, TRAFLUADIS LARGA, MUCIDA RIVERO, KAJ EN ĜI, ĜIA OMBRO	41
IV. FORIRIS VUKO ISAKOVIĈO, SED POST LI FORIRIS ANKAŬ FRUŜKA GORO	55
V. LA FORIROJ KAJ MIGRADOJ FARIS ILIN MALKLARAJ KAJ PASEMAJ, FUMSIMILE, POST BATALOJ	73
VI. PASINTECO ESTAS HORORA, MALKLARA SENFUNDEJO; KIO EN TIUN VESPERKREPUSKON FORIRIS, NE PLU EKZISTAS KAJ NENIAM EKZISTIS	89
VII. ILI PASUMIS, EMBARASE; MANĜIS, DRINKIS, DORMIS, POR FINFINE KURPASCE PEREI, EKPAŜINTE EN VAKUONLAŬ FREMDA VOLO KAJ POR FREMDA KONTO	107
VIII. MALĜOJĜINTE, SUPER MALPLENAĴO DE AKUŜO, ŜI EKKONSCIIS KE DE ŜIA ANIMO, EĈ EN ŜIAJ INFANOJ, NE RESTOS IA AJN SPURO KAJ ŜI FORPISIS, BEDAŬRANTE KE SCI MNE POVAS SATIGI ALMENAŬ LA KORPON, ĜOJSENTA PER ĜUOJ	131
IX. UNU EL ILI, LA PLEJ MIZERA, KONSERVIS EĈ POST LA MORTO, LA BRILON DE SIA ESTAĴO, TIAL KE LI POVIS REVENI KAJ APERI, ĈE LA ENIREJO EN LA VILAĜON, SUR ŜOSEO, SUR LA SAMA LOKO, KIE DISFLORINTA APERADIS, EN PRINTEMPO, LA UNUA AKACIO	155
X. SENFINA BLUA CIRKLO. EN ĜI, STELO.....	169



I.

SENFINA, BLUA CIRKLO. EN ĜI, STELO

Nebulaj salikejoj vaporas jam de la pasinta tago, nuboj kirliĝas, ĉiam pli mal-supren. La profundo, kiun trafluas rivero, estas malklara kaj netrapasebla. La tero estas malhela, nevidebla kaj pluva.

Susuras kaj siblas marĉego malantaŭ mallumo. Lunlumo desur ĝi ekbri-las, aperas super la malhelo, forpasas kaj malaperas en nokto, kiu malseka eniras kaj foriras, eniras kaj foriras, senĉese ĉirkaŭante kaj malsekigante liajn grandegan bruston kaj ventron, varman kaj ŝvelforman, envolvitan en ŝafajn felojn, kies lano abundis je ŝvito. Gutas tra kanoj, gutas, kaj, kvankam la ob-skuro densas, li vidas ranon saltanta, ĉiam pli proksimen.

Malkontinuas bojado de hundoj, malkontinuas blekado de virkokoĵ, jam de noktomezo, el malproksimo. Obtuzo hufobato, tamen, kvazaŭ sub tero, aŭdiĝas konstante, en proksimo, je dormo. Ofta vekiĝo, volvanta lin, pasas kiel lulo en la obskuro penetranta sub liajn ŝultrojn kaj frostotremajn ripojn. Li ne distingas la obskuron ĉirkaŭ si disde la obskuro en si; per la okuloj, larĝe malfermitaj, en mallumo, li vidas nenion. Saltadon de rano, ĉe la kapo, li sendube orelperceptis, tamen, tuj poste lin obtuzis dormurĝo, kaj denove ĉio sinkis en la pezan fiordon de la ŝafa felo, sur kiu kuŝis lia supra korp parto, apud la kapo de la edzino.

Hufobatita super la genuo, antaŭ kelkaj tagoj, kiam li komencis kolekti partojn de regimento, prodolore ankoraŭ vekiĝas nokte, sed la doloro pasas rapide, same kiel tiuj terura trolaco kaj senforteco, en la ostoj, pro ripozman-ko. Tiele, multfoje vekiĝante, li ekĝemas kaj tujposte reendormiĝas, grincante per la dentoj.

Kaj, dum tiu tempero, antaŭ ol denove endormiĝi, li duondorme, ekvi-dis multon! Riveron, susurantan ĉe borde, plenigintan la tutan nokton. Sur disfluantaj akvoj, en tertruoj kaj ravinoj – lunlumerojn. Kanaron fenestran kaj tegmentan, desur kiu gutas sennombraj gutetoj, guto post guto. Nubojn, kirliĝantajn pli kaj pli suben. Senlimajn salikejpintojn, arbustoriĉajn.

Kaj kiam li lulsinkas, denove, en dormon, bruligita kaj flamoplena – li renversiĝadas tra buntejo, en senliman foron, en senfinan alton kaj senfundan profundon, ĝis kiam la pluvo, tra likanta kanaro, vekas lin. Tiam, kun misfunkcia konscio, li unue aŭdas bojadon de hundoj, kaj blekadon de virkoko; tuj poste, plenlarĝe, en mallumo, li estas malfermita la okulojn kaj vidas nenion, sed al li ekŝajnas ke li vidas, en alto, senfinan, bluan cirklon. Kaj, en ĝi, stelon.

Foje li haltis dum la lulado, kaj la ululado en lia kapo ĉesis, tiele li sentis, ke li maldormas. Li kuŝis en mallumo kun larĝe malfermitaj okuloj, mirfrapita kaj frostotremanta. Ne plu li songis. Blekadon de virkoko kaj bojadon de hundoj – li aŭdis. La edzino, endormiĝinta sur lia brako, spiris sur lian bruston. Ankaŭ la bruon, estigitan, pro koletendo – li aŭdis, ĉar tioma, ankoraŭ ĉiam, silento estis antaŭ la domo. Tra fendo en abiligno, jen li rimarkis maldikan penetrantan lumon, kaj plene rekonsciĝis. Venis tempo, ke ili iru.

Tio estis fajroflamo de tiuj, kiuj kuŝiĝis hieraŭ vespere, iuj solaj, iuj kun edzinoj kaj infanoj, sub alero de brutejo, samflanke de la paŝtloko, kie troviĝis liaj staloj. Kaj tiu, la unua, klara mensmemoro kvazaŭ estis neaŭdebla krivoko; al li ekŝajnis, ke ili alkuras, unu post la alia, per siaj teruraj kuraj paŝoj, kun peltoĉapoj, kun siaj longaj pafiloj, kaj ponardegoj inter la dentoj, kiel dum militekzerco. Ĉiun ilian figuron li vidis, ĉiun li rekonis, pri ĉiu li rememoris, kie tiu kuŝiĝis.

Samtiel ĉio alia, kio estis tie, ekstere, en pluvo, aperadis en liaj larĝe malfermitaj okuloj, en mallumo: montodeklivo, kaj sub ĝi Danubo, kun ŝalupoj, en kiuj ili debordiĝos. Senlimaj salikejoj kaj marĉlokoj, bluaj novaloj kaj ruĝa vepraro.

Tiam ekknaris gruo, kaj sammomente oni ekfrapis sur la pordon.

Kaj kvazaŭ rekonsciĝus ne nur li, sed ankaŭ ĉio vivanta en la mallumo, kio ĝis tiam estis kaj nevidebla kaj neaŭdebla; eksonis hufobruo, ekbojis raŭke hundoj, tute proksime.

Granda korva aro sendube preterflugis de ie, ĉar ĝia grakado plenigis la nokton, komencante leviĝi alten.

Li, abrupte vekiĝinta, duondorma, en mallumo provis liberiĝi de litotukoj, en kiujn li implikiĝis, kaj eltiriĝis elsub feloj, ŝvita kaj nuda, ĉar li ĉiam dormis nuda, sed ŝi tuj vekiĝis, kaj preskaŭ timfreneza, palptrovis fajrejon, ekblovis en cindron, kaj trovis braĝon. Ŝi bruligis lampeton, kiu prilumis kaj ŝin, tutan, kaj lian grandegan ombron sur muro. Nur tiam, ekvidinte lin, ŝi ekŝrikis kaj komencis vekrii, falinte sur lin, brakumante lin, kisante liajn bruston, ŝultron, kolon kaj orelon.

Jam preskaŭ du septagojn, postkiam estis ricevita la ordono de marki-zo Askanio Gvadano, la Oseka urboestro, ke li ekipu tricent distingindajn

soldatojn, kiuj iros militi kontraŭ Francujo – ŝi senintermite vekriis. Kun ŝvelintaj pro ploro okuloj, tute kaĥeksia pro teruro, graveda de tri monatoj, ŝi iĝis nedisigebla disde li. La fama belulino eĉ pli beliĝis dum la unua jaro post la edziniĝo. Haŭto ŝia kaj ostoj, rido kaj spiro, same kiel ŝia rigardo, havis glatan brilon, kiu lumis en ŝi, dum ŝi portis idon en la ventro. Peza kaj malmagra, freneze gaja dum la gravedeco, ŝi post la akuŝo malgrasiĝis kaj malbeliĝis, fariĝis malpli laŭta, tamen kruela rilate al la geservistoj. Antaŭ du semajnoj ŝi, plorante, sekvante lin, alvenis sur la bordon de Danubo, por pasigi kun li tiun lastan nokton, antaŭ lia foriro. Lasinte du siajn filinetojn en vilaĝo, ŝi venis por vivi la lastajn du tagojn en kankovrita kabaneto, ĉe brutejo, sur akvo, nur por povi tranokti apud li. Kuŝante dum horoj sur lia brusto, ŝi, frustrante ion senprudentan kaj nekompreneblan, kisadis liajn ripojn, gorgon, okulojn, buŝon kaj orelojn.

Kurbakrura kaj peza, li dum tiuj lastaj tagoj estis ekipanta siajn homojn, pasiganta tutajn tagojn sur ĉevalo. Li insultis ŝiajn brakumojn kaj kisojn. Jam teda ŝi iĝis por li.

Lacega tage kverelo dum elektado de homoj kiuj alvenadis nearmitaj kaj ebriaj, vesperojn li devis pasigi kun skribistoj, farantaj listojn de Slavonia-Danubregiona regimento. Nokte, lin alfrontis infero. Ŝia brakumo, ŝiaj malraciaj atakoj, ŝiaj longaj, senlacaj fingroj. Ŝia beleco, apud la fajro, transcenda, ŝia rigardo, kaj ŝia ploro. Kun grandega brusto, kaj grandega ventro, fortomanka, zorgoplana pro la infanoj, li pri ŝia frenezeco samtempe kaj surpriziĝis kaj mirigis, kaj eĉ plengorĝe ridis.

Vidante ŝin en febla lumo de lampeto nun, postdorme konfuzitan, li komprenis, ke ĉi-matena foriro, pro ŝi, estos malfacilega. Ŝiaj kisoj, impetaj kaj senprudentaj, falantaj sur lian vizaĝon, kaj sub lian gorgon, estis malsekaj proplore. Ekstarinte por pli bone ĉirkaŭpreni lin, ĉar li bruske defendis sin, piedpremante kusenon, felojn kaj tapiŝojn, kovrantajn la teron, ŝi per nuda piedo surtretis ranon, kaj monstre ekŝriakis. Kolerega pro ŝia ina frenezumo, li forpuŝis ŝin, preskaŭdezirante ĵetaĉi ŝin sur la grundon. Renversinte lignan pelveton kun sankta akvo kaj bazilio, kiun ŝi estis pretiginta hieraŭ vespere por lin matene, post vekigo, surŝpruci, li ŝancelpaŝe, kvazaŭ levanta kaj portanta malplanan barelon, alvenis la pordon, kaj ŝirtire malfermis ĝin.

Ete pluvigis kaj, li, en momento frumatena, vidis hundojn ekkurintaj al li, ĉevalojn kaj servistojn sub morusujoj, kaj en la kontraŭa flanko de la paŝtloko, ĉe brutejo, la homamason, kiu, hieraŭ vespere, tie, dislokiĝis. Fajroj en la mallumo ankoraŭ retigis grandajn ombrojn kaj ŝajnaĵojn, sed kiam aŭdiĝis la unua pafilpafo – ĉiuj kvazaŭ saltis desur la tero kaj ekviglegis. Iuj ekkantis, ekhurlis, alkuris la grupon kaj trogojn, por lavi sin; aliaj – portante infanojn en la brakoj, volvadis ilin en tukojn, kaj ekiris suben, al boatoj.

Ho, kiel virinoj frapadis siajn brustojn, kiel ili veploris, kiel svingis siajn blankajn tolaĵojn, ligaĵojn, piedvindojn! Malantaŭ la brutejo, super deklivo, li vere vidis senlimajn salikejojn kaj ŝlimegejojn, en grandega, malklara, pluva mateniĝo – sed ne vidis la senfinan, bluan cirklon. Nek stelon en ĝi, kiel en la songo.

Homoj estis kolektiĝantaj, krivokantaj unu la alian, kurante apud ĉevaloj kaj larmvizaĝaj virinoj, al kiuj ne estis permesite iri suben, al la boatoj. Iuj, postrestintaj, larmvizaĝaj, faradis adiaŭojn, krucosignante. Unu el ili alpaŝis lin, kun malgranda infano en feltoĉapelo, serĉante domon kun fajro, por trovi sekuran lokon, por la jam violiĝinta infano. Hundoj, arigiĝantaj sur montorando, ĉirkaŭ virinoj kaj maljunuloj, saltante, ŝprucigante flakojn kaj koton, bojis post tiuj, kiuj estis forirantaj montosubten, sur akvon.

Nudpieda, sur malvarma kaj malseka tero, kun surŝultra palto, ĵus ellitiĝinta, kun granda, nigra bulĉapelo kun arĝentaj ornamaĵoj kaj pufoj, kiun li surkapigis ĉe la unua salto post elsonĝiĝo, li konsternis la servistojn. Ili alkuris, kisante lian manon, kaj alkondukante lian ĉevalon, baŭmantan.

Tiam, terninte brue kelkajn fojojn, dance skuigante la teron, li revenis en la malluman varmejon ĉe la fajrujo, kie lia edzino, ankoraŭ ĉiam plorante, aliris lin. Vestante lin rapide, ŝi kisadis liajn drapaĵojn, rimenojn kaj arĝentaĵojn. Kiam li lavis sin, ŝi per sia hararo viŝis lian vizaĝon, vangokisante lin. Kompantante ŝin, li ekkareis ŝian dorson, kaj grumblante, sed ŝi abrupte ekploregis.

Sed kiam li, vestita, aperis ĉe la pordo, kiam servistoj alkondukis lian ĉevalon, komenciĝis tia saltaĉado, vekrioj kaj bruado, sur la paŝtejo, alkurado al lia mano, ĝemado kaj ojado de virinoj, ke li kolerege ekhurlis kontraŭ ili.

Dum servistoj unuflanke estis enseligantaj lin, sur la ĉevalon, kiu timoplene turniĝadis pro la bunteco, du servistoj aliflanke estis streĉantaj la selrimenojn, por ke li, surĉevaliĝante kaj ĝemante, ne forŝiru la piedingojn per siaj grandaj lanugaj manoj. La ĉevalo skuiĝis sub li, kvazaŭ sub barelo.

Kotumante arbojn, herbojn kaj hundojn ĉirkaŭ si, li pelis la ĉevalon montosubten, al Danubo. De la vekrioj kaj bruado li eskapis, kaj tratotis arban kaj branĉan malsekon. La pluvo estis ĉesanta, kaj la tero eriĝadis sub la ĉevalo. kiam ili komencis descendi.

En senfina malseko de nuboj kaj ŝlimejoj, de marĉoj kaj kanaro, jam tagiĝiĝis. Tio kvazaŭ estus alia mondo, tie nenio estis okazanta. Ĉi tie, super li, grakis korvoj, dum sube, sub li, glimis larĝaj akvaj obskuroj kaj lumoj. Ligigitaj al maljunaj salikoj kaj enkotaj fostoj, boatoj nigris el malproksime, apud fajro. Levinte la kapon, li vidis plenan silenton en griza ĉielo, kaj korvojn en malproksimo, neaŭdeblajn. Per sia rigardo li povis atingi malproksimejon, laŭlonge de la Danubaj bordoj, el kiuj unu estis flava kaj alta, subĉiela, la alia inunde kaj herbaĉe disflua, enprofunda.

Li elrajdis el la arbustaro, enirante en ŝlimejojn kaj pezan koton, ĉeval-ventre profunde, antaŭ fajrojn, desur kiuj oni demetadis rostitajn ŝafidojn. Lokiĝinte en larĝajn pluvmalsekajn boatojn, sur pajlo kaj sur flavaj sekaj folioj, homoj estis kuŝiĝintaj, sed leviĝadis por purigi armilojn, aŭ por ponard-kapti alĵetitajn dispecigitajn ŝafidaĵojn. Ili kantis kriante.

Kiam li alvenis, tute surŝprucita, al la fajro, inter salikoj, lin alpaŝis du oficiroj kaj popo, kiu alvenis kune kun lia frato, el malproksime, el la arĝentoriĉa Zemuno, por elakompani la filon, kaj per beni ilin ĉiujn. Intencante ilin ju pli frue irigi, li trotigis la ĉevalon al la ŝnuroj, kaj donis al la ŝalupistoj ordonon ekiri.

En boatoj komenciĝis ioma tumulto, homoj eksaltis por ankoraŭfoje vidi la familianojn. Dum la ŝalupistoj malnodadis ŝnurojn, kaj piedante en akvo ĝistalie, kriante, debordigadis boatojn, kelkaj frostiĝantaj nenihavuloj, dungi-taj por haŭli kontraŭflue boatojn tutan tagon, tutan nokton kaj ankoraŭ unu tagon, jam komencis tiradi la ŝnurojn kaj vadi en la koto. Inter ili, du preskaŭ tute nudaj ciganoj, kun ŝnuraro sur la brustoj, penis ĉirkaŭronĝi kelkajn kvaronbruligitajn ŝafpiedojn, kiujn neniu volis kunporti.

Dum maljunuloj, frostiĝantaj kaj malsekaj, staris movosene sur la kota monteto, virinoj kun infanoj kaj hundoj kuris laŭlonge de deklivaj bordaj krutaĵoj, veante kaj plorante, ĝis kiam ambaŭ boatoj iĝis nevideblaj en densaj salikejoj, el kiuj poste aŭdiĝis raŭka kantado. Sed ankaŭ tiu kantado, tuj kiam malaperis tiuj, pro kiuj oni leviĝis por ilin vidi, malrapide iĝis pli mallaŭta kaj pli malvigla, kaj fine tute ĉesis. La vekriado, tamen, sur la malvalo, ankoraŭ longe resonis.

Kiam ili startis, li tuj trotigis la ĉevalon laŭlonge de la bordo, kaj irigis ĝin montosupren, pro kio la besto furioze nazbruis, ellasante vaporon. Li revenis, por ekipi ankaŭ sin.

Ĉirkaŭ la staloj kaj brutejoj estis kolektiĝinta homamaso, por vidi ankaŭ lian ekiron, sed ankoraŭ pli por vidi la kaleŝon, ĉevalojn kaj servistojn de lia frato, Aranĝelo Isakoviĉo, negocisto, pro sia riĉeco konata en la tuta Danubejo kaj Tisejo.

Lia frato, laŭ ilia interkonsento, pasigis la nokton en la vilaĝo, kun la infanoj, por aŭrore fruleviĝi, veni kaj laŭbezone helpi lin dum la disiĝo de la edzino, kies impetan karakteron ili ambaŭ timis. Kaj vere, tuj kiam li revenis post foriro de la soldatoj, rajdinte malfacile montosupren, aliflanke, videbliĝis, granda, plurkolora ĉaro, kiun servistoj tuj ĉirkaŭis.

Jam tute lumiĝis. La pluvo jam ĉesis.

Enirinte la domon, sur la sojlo frapinte per la kapo la kanan tegmenton, li ekvidis la edzinon vestita, silka, lavita, belega. Laca pro rajdado kaj hasto, li nun ekvidis ŝin alimaniere kaj, alpaŝinte, komencis kisadi ŝin tra siaj hirtaj

lipharoj. Hastanta, li ankoraŭfoje, spiregante sub ŝiaj kisoj, ripetis sence kaj senorde ĉion, kion li jam hieraŭ vespere kaj tutnokte ripetadis: konsilojn transloĝigi en la domon de lia frato, en Zemunon, konsilojn pri banado de la pli juna infano, de la pli malgranda filineto, kiu havis haŭtan malsanon, informojn pri sia vojaĝo tra Stiriujo kaj Bavarujo, pri mallonga milito dum kiu bataloj apenaŭ okazos, kaj finfine, pri sia fideleco, kaj pri sia reveno. Ŝi tamen, tremegante kiel freneza, deŝiradis de si arĝentajn plektaĵojn, butonojn, silkajn surkudritajn florojn kaj punktojn, kriante kaj ripetante, tra ploro, ĉiam la samajn vortojn, ĉiam la samajn petegojn. Sin ŝirante el ŝiaj brakoj, tirante senintence ŝian hararon per siaj surĉapelaj brodaĵoj, kiuj implikiĝis ankaŭ en ŝian veston, li, konstante, kisante ŝin, jam adiaŭe, en la buŝon, ripetadis dolĉajn vortojn, al kiuj ŝi kutimiĝis dum la unua jaro de sia edzineco. Kun timo, kiu similis frenezon, ŝi pendis sur lia kolo, aspergante lin, nur dio scias kiomfoje, per sankta akvo, kaj petante lin ne edziĝi tie, kiel tion faras aliaj, ne bravi tie, ankaŭ ŝin poste venigi tien, kaj ne pereji tie. Kisante lin per la proplore malseka buŝo, kiu jam ne povis fermiĝi kisocele, estante malfermita kaj malsteĉita pro tremado, ŝi rigardis lin per la transturnitaj okuloj, en kiuj videblis nur okulblanko, sen ŝiaj bluaj irisoj, kaj sen grandaj pupiloj. Duone senkoncia, senstreĉa, ŝi spasme ripetadis: „Mi mortos, mi mortos“. Dume lia frato eliris el la ĉaro, seka, flava, en longa palto el lufelo, kun suktenaj rozarioj, similaj al grandaj, maturaj vinberoj, en la manoj. Li ordonis, ke oni forturnu la ĉaron, afable dispelis la homamason, farante donacojn preskaŭ al ĉiu, kiu proksimiĝis al lia mano. Dirinte ankoraŭ kelkajn vortojn al servistoj, sinjoro Aranĝelo gaje mansvingis al knabineto, al la pli aĝa filineto, kiun li venigis por elakompani la patron, kaj kiun servisto tenis levitan.

La fratoj estis interkonsentintaj trompi la virinon dum la adiaŭo, ĉar la pli aĝa ne volis vidi tion, kion ŝi povus fari, en tiu, lasta momento. Pro tio la pli juna frato, kun la infano, devis alveni, en ĉaro, antaŭ la dometon, ĉe brutejo. Tie troviĝis la lasta tranoktejo de la homoj, antaŭ ilia eniro en boatojn, el kiuj ili ne estis elirontaj ĝis Varadino. Tien ankaŭ ŝi alvenis por pasigi la lastan nokton kun la edzo. En la dometo, en kiu ordinare, vintre, loĝis paŝtistoj. Servisto ricevis instrukcion, vipi la ĉevalojn, tuj kiam la pli aĝa frato, elirinte el la domo, ensaltos la ĉaron.

Tiamaniere, ĉio okazis dum momento. Dum ŝi, duonmorta, estis ordiganta la robon, por eliri antaŭ la homamason kun la edzo, li, aŭdinte vipoknalojn, kaŝe kruccsigninte, deŝiriĝis, elkuris tra la pordo, kaj aperis antaŭ la frato. Ili rapide interkisis, post kio la pli aĝa frato ensaltis la ĉaron, disŝutinte rozariojn de la malpli aĝa frato, en koton.

Aŭdinte tumulton ĉevalan, kriadon homan, ŝi, ĝis tiam nenion konjektanta, ekkuris al la pordo, kaj vidis ĉaron malaperanta en arbustaro,

malantaŭ morusujoj, jam sur la alia flanko de la paŝtloko. Ŝi renversiĝis sur la brakojn de la malpli aĝa frato, kvazaŭ ebria, svena.

En la granda kaj bunta ĉaro, kiu skuiĝis, kun larmvizaĝa infano sur la brako, li leviĝetis, sed povis nur vidi ŝin falinta. Klininte la kapon super sia filineto, li silentis en tiu hida kotŝprucado kaj desaltado pro branĉoj, ŝtipoj kaj malebenaĵoj, ĝis la momento kiam, malaperinte ĉe akacia maldensa bosketo, la servisto, starante sur la piedoj apogitaj sur la elstarantajn ferajn ornamaĵojn de la ĉaro, sukcesis bridi ĉiujn tri ĉevalojn, timigitajn kaj tremantajn.

Tiam, ekkriinte al la servistoj, premante la infanon sur la bruston, li pri-palpis la armilon, kovrilojn kaj botojn sur la fundo de la ĉaro, novegajn jungilojn, kun arĝentumaĵoj, kaj dukatojn, kaj ponardon, kaj horloĝon, rondan kiel ovo, ĉe talio. Li estis nenion forgesinta.

Karesante la filineton, li ordonis veturigi la ĉaron malrapide, kaj kiel urso maljuniĝinta, troornamita, li komencis en la ĉaro antaŭ la infano saltadi, ursbleki, danci. La infano komencis karesi lin per la manoj, kaptante liajn arĝentajn pufojn sur la bulĉapelo, ridante, dum ploro.

Kiam super ŝlimegejoj kaj salikejoj komenciĝis heliĝo, apud la ĉaro eksonis la unuaj alaŭdoj. La videjo, plena da korvaroj, estis heliĝanta pro nemezureblaj, ebenaj inundejoj kaj ŝlimejoj. Survoje, ĉe borde, sur montoj, kiuj denove descendis kaj malleviĝis en malsekajn herbaĉojn, la ĉaro rapide atingis tri grandajn nigrajn boatojn, kiuj sube, sur la rivero, estis malrapide foriĝantaj.

Ĉirkaŭprenita per varmaj infanaj brakoj, li daŭre kvazaŭdormis. La trotadon de hufoj, knaradon de radoj, infanan voĉon en kiun estis dronantaj kaj trilo de alaŭdoj, kaj grakado de korvoj, li aŭskultis kvazaŭ tra dormo, kiu miksis ĝin kun pluvoportaj nuboj, kiuj pli kaj pli vaporiĝis, ĉar malantaŭ ili troviĝis, ie, nemezureble malproksima, sed grandega, Suno.

La infano, kiu ne estis ricevanta respondon al ĉiu sia demando, ripetadis ilin, lackonsumita, cent fojojn, pinĉante liajn orelojn, ornamaĵojn, lipharojn. Dormomanka kaj febla, la infano iom post iom mallaŭtiĝis. Li komencis mallaŭte kanteti kaj luli ŝin, kaj la filineto kuŝiĝis sur lian bruston kaj ekdormis.

Komenciĝis varma, printempa tago, postpluva. En marĉegoj kaj salikejoj, sur la alia flanko, leviĝis kaj densiĝis nebulo, lakteca kaj peza, baldaŭ fumsimile plenigonta la kompletan profundejon super Danubo. La kanto de boatanoj, tra la nemezurebla silento, tie sube, atingis lin, apenaŭ aŭdeble, kvazaŭ elsub tero.

Tamen, super la montoj kaj arbaroj, violkolora aperintaj, maldekstre, li jam povis antaŭvidi lumon de la suna kaj hela mateno. Tial li haltigis la ĉaron apud vico de altaj piramidaloj. Longe kisinte la dormantan infanon, li lasis ĝin en la ĉaro, post kio servistoj denove surĉevaligis lin. Enrajdinte malal-tan arbustaron, li kviete atendis ke oni transŝarĝu aĵojn el ĉaro sur ĉevalojn,

delokiĝis, por ke ili povu turni la ĉaron kaj, forliberiginte la servistojn de la frato, longe tiel staris kaj postrigardis la ĉaron, revenantan tra densa herbaĉo el kiu antaŭ la ĉevaloj elflugadis alaŭdoj.

Demetinte la bulĉapelon, li donis ĝin al servistoj, kaj ekrajdis antaŭ ili, denove vibrante kiel barelo.

Li ĉion estis finfarinta. Tuj kiam li surĉevaliĝis kaj redonis sian filineton, la tuta laco, akumuligiĝinta dum la lastaj noktoj, sendormaj pro pretiĝado kaj rajdado, ariĝis kaj premis lin. Malsekaodoro de arbustaro, sufoka varmo de malaltaj kaj sunumitaj nuboj, la nebulo el profundejoj, densa kiel fumo – ĉio ĉi estis lin sufokanta kaj dormiganta. La malfeliĉo ŝajnis restinta malantaŭ li, antaŭ li troviĝis nur tiu malproksimo, kiun invadis densa herbaĉo, langvoriga. Li trankvilis. Ekiris li frue, esperante antaŭ mallumiĝo atingi Varadion, kie al li estis aliĝontaj la aliaj partoj de la regimento. La regimentanoj kolektiĝis el diversaj Slavoniaj kaj Sremaj vilaĝoj, por ekiri de li gvidataj en la urbon Peĉaon, kie ili devis esti medicine esploritaj kaj irigotaj al la kampadejoj de Karlo la Lotaringa, kiu siajn avangardojn antaŭenigis ĝis Rejno kaj Ŝtokŝtato, sub la komando de la generalo – ĉefmarŝalo barono Johano Leopoldo Berenklaŭo.

Kun melankolio, kiu estis transformiĝanta en silenton, des pli persiste, ju pli aĝa li estis, ankaŭ li, samkiel lia patro, kviete iris militi. La translikiĝoj jam tedis lin, kaj la maltrankvilo, kiu en li, en ĉiuj liaj homoj, kiujn li gvidis, ne kalmiĝis. Kun sia familio li, laŭlonge de Danubo, kaj laŭlonge de Tiso, trapasis preskaŭ ĉiujn nemalgrandajn loĝlokojn, komercante kune kun la frato, ĝis kiam li edziĝis kaj resoldatiĝis. Ĉar en la armeo li estis tre respektata, oni ofte komisiis al li plenumi gravajn taskojn inter la popolanoj. Multfoje oni lin irigis kvietigis homamasojn, kiuj multfoje transloĝiĝis.

Li sciis ke lin, tuj post esploro, oni sendos al batalkampo. Kvietaj kaj memfida, li antaŭsciis la tutan vojon, ĉiujn okazontaĵojn, ĉiujn homojn, kiamaniere la homoj tenos sin. Li timis nur, ke parto de lia regimento, kiu estis venanta kun la kapitano Pisĉeviĉo, el Ŝido, venos malfrue al la kolektiĝejo, ĉe Varadino.

Dormivola kaj peza, li rajdis kun la kapo klinita, tra herbaĉo. Ju pli varmis kaj klaris la ĉielo, des pli premsenta li estis. La ĉevalo lin egalritme lulis, kaj tio lin komplete malfortigis. Tio, kion li lasis, kvazaŭ ne plu ekzistus, kaj la ploro de la edzino, kaj la rigardo de la frato, kaj la varmo de la malgranda infano, fandiĝis kun la nebulo. Servistoj malantaŭ li iomete postrestis, kaj li sentis sin komplete soleca.

Rajdante plue, meditante pri dislokiĝo de la estroj kaj soldatoj, kiujn li konis persone, li plene endormiĝis. Jen, pensis li, sufiĉas transloĝiĝi el iu loko, kaj ĉio forlasata kvazaŭ neniam ekzistus. Tiam li fiksrigardis forajn montojn,

malantaŭ kiuj nun estis aperanta Suno. Kiam la arĝento sur li ekbrilis, li sentis sin elana kaj facila, kvazaŭ senkorpa. Sunumita, tralumita, li sentis sin varma, ne peza, kvazaŭ tute ne estus rajdanta, kvazaŭ tute ne estus ekzistanta, en tiu nevidebla vento, kiu lin salutis alvizaĝe.

Tuj poste li trotigis la ĉevalon tra malpleno.

Tiel, printempe, en la 1744-a jaro, Vuko Isakoviĉo ekiris en militon.



II.

ILI IRIS FOR, KAJ POST ILI RESTIS NENIO. NENIO

Peĉaon ili eniris tiel taŭzaj, nelavitaj, malsekaj kaj furiozaj, ke infanoj ekplore, kaj virinoj, kiuj estis elkurintaj, antaŭ la domojn, por vidi ilin, diskuris ŝrikante, en najbarejon. Ili kantis kriante, ili paŝis, lacaj, kaj malsategaj, per paŝoj tiel hastaj, ke ili, ĉirkaŭitaj de arĝente ornamitaj oficiroj, similis al malsata hundaro, katenata per ĉeno, kaj irigata ĉasi batue.

Per kolboj ili batadis barilojn, draŝis hundojn, levadis arbajn trunkojn antaŭ domoj, kaj forĵetadis ilin, en apudajn kortojn. Grandan herdon el virbovoj, kiun ili, malantaŭ angulo, renkontis, ili fuĝigis, hurle kaj petole.

Irante montosupren, ili ŝtopis mallarĝajn vojetojn en la suba urbo, poste disŝutiĝis kaj postrestis, en kriadado de kvartirmajstroj kiuj estis alrajdintaj por renkonti kaj loĝigi ilin. Muzikistoj, kiuj estis arigintaj ĉirkaŭ granda flago, portata de Varadino, post kiu rajdis oficiroj, sur timoplenaj kaj ŝaŭmkovritaj ĉevaloj, ne kapablis superbrui la kantantojn, kiuj kriaĉis, per konstante sama voĉo, hej... hej... Tio poste vastiĝis, kiel plorkanto kaj lamento, tra la tuta homamaso, ĝis la postrestintoj, ĝis la lastaj homoj, kiuj vadis tra ĝisgenua koto, kiuj interbatiĝis ĉirkaŭ la unuaj putoj kiujn ili vidis. Kurante poste tra homomankaj stratoj, al la voĉĥaoso de la regimento, kiu estis malproksimiĝanta, tra la urbo.

Komisaro, vidinta ilin jam ĉe la unuaj vinberujoj, apud la ĝardenoj de episkopejo, decidis bivakigi ilin ekster la urbo, apud tombejo.

Li aranĝis, ke ilin allogu fajro, ĉe kiu oni rostis virŝafojn, apud kiu senĉeso muzikis trumpetistoj, kaj batis tamburistoj. Tra komenciĝanta krepusko, Isakoviĉo ilin elirigis sur kampon, sub hurdojn malantaŭ kiuj kvaronvideblis turkaj tomboŝtonoj, kvazaŭ ŝtupoj, postrestintaj en herbo, kun surpikitaj, ŝtonaj turbanoj. Cetere, tuj kiam oni ilin elirigis sur la paŝtlokon, ilin ĉirkaŭis germanaj kanonistoj, kiuj poste estis videblaj, starantaj, apud siaj kanonoj, en mallumo, kun bruligitaj meĉoj en la manoj.

Ĉio, tamen, finiĝis bone, tuj kiam ili haltis kaj deĵetis la portaĵojn kaj armilojn.

La kantado ĉesis, eksonis voĉhaoso, kaj ĉiuj rapide kolektiĝis. Ili kvietiĝis, kiam la oficiroj deĉevaliĝis kaj intermiksiĝis kun ili. Jam dum ricevado de tendoj, apud fajro, denove distingeblis diversaj partoj de la regimento, kaj dum disdivido de pajlo kaj vino, ili jam laŭte respondadis al kavaleriestroj.

Bruliginte malgrandajn fajretojn, ili baldaŭ dividis la kampadejon, kvazaŭ longan vilaĝon, per rektaj krucformaj linioj, markitaj per flamflagrado de fajroj, fumoplenaj pro malseka, juna herbo. Ili estis fosantaj kavojn por kuŝiĝi, same kiel ili tion kutime faris hejme. Post tio, dum senĉesa batado de tamburistoj, komenciĝis, malpli brue, starigado de tendoj.

Plej multaj estis junaj, unuafoje elektitaj por militi, sed inter ili troviĝis ankaŭ tiuj, kiuj dum la lastaj jaroj, militis diversloke. Estis ankaŭ tiuj, kiuj sangverŝis apud Beogrado kaj Grocko, eĉ tiuj, kiuj, antaŭ preskaŭ tridek jaroj, sabris turkojn, apud Varadino kaj Temeŝvaro, sub la flago de la princo Eŭgeno Savoja.

Krepuskis super ili, ankaŭ tie, sub krutaj, malnovaj vojetoj Peĉaaj, sub herbokovrita tombejo, sur paŝtejo, same rapide kiel krepuskis hejme, en tiu griza, nebulabunda vespero, kiu pluve sinkas en ŝlimegejojn, sed ĉi tie la printempa vespero degeligiĝis ilin en senfinan bluan. Super vespera nebulo aperis lazuraj deklivoj de montoj kaj arbaroj, sekaj kaj maldensaj, pro kio sur ilia fundo ankoraŭ ruĝis tago. Super tiuj arbaroj, kiuj videblas de ĉiuj flankoj, ekvibris steloj, kaj ekĉirpis sennombraj griloj. Grilojn ili saltigis sur la unuaj montoj, sur kiujn ili ascendis el ebenejo, ekscitante ilin.

Tamen, kvankam komence preskaŭ ĉiuj kuŝiĝis, en tendoj, en kavoj, sur pajlo, unu post la alia ili levadis la kapojn.

Krepuskiĝis en la kampadejo.

Ili trestingiĝis la fajrojn, sed silento, la dormiga silento, forestis. Stranga kaj fremda sono de sonorilo longe estis alfluanta, el la urbo, al ili. El la lastaj stratoj de la urbo, kiuj flagris sub monteto, ilin alsturmis ne nur bojado, sed ankaŭ muzikado obtuza, kaj brumurmuro. Tiam malmultenombraj gardistoj, ĉirkaŭ la kampadejo kaj ĉe kanonoj, komencis a

intervokadon. Krome, ili sentegis, kiel desur la monto estis penetrantaodoro de fruktaroj; nenie en ilia hejmejo estis tiom multe da ili en unu loko.

Ju pli multaj kvietiĝis kaj trankviliĝis en la kampadejo, des pli malmultaj deziris ekdormi.

Kvankam ili sentis lacegon kaj doloron en la tuta korpo, pro sestaga paŝado, portante armilojn kaj ŝarĝaĵojn, ekdormis nur tiuj, kiuj jam delonge kutimiĝis al tio, kaj al kiuj nenio plu ŝajnis stranga. Nek tiuj noktoj sub la sennuba kaj malhela ĉielejo, nek tiuj fruktarbejoj, kiuj sentebilis en la mallumo, kiuj odoras ie proksime, nek tiu bojado de hundoj, kiu ĉie estas sama,

nek tiuj fajroj, pro kiuj larmiĝas la okuloj, fulgiĝas la vizaĝo kaj varmiĝas unu korpoflanko, dum la alia flanko frostiĝas.

Tiuj, kiuj iris unuafoje, komencis leviĝi sur la genuojn, interflustri, voki unu la alian, per dampitaj voĉoj, kaj kolektiĝi malantaŭ tendoj, kiel ombroj.

Poste, kiam aperis Luno, unu terflanko iĝis tute hela, kaj sub la malluma monteto, iĝis videbla la tuta infinita kampo. Ili vidis arbojn, kiuj al ili ĝis tiam ŝajnis malplena obskuro, kaj tegmentojn en la urbo, kiuj ĝis tiam ŝajnis dronintaj en teron. Al ili ŝajnis, ke tute proksime, malantaŭ hurdoj de la lastaj etstratoj, vagas sennombraj, diverskoloraj ombroj.

La pura, blua volbo, kiun kelkloke surŝutis nuboj, kiuj videblis nur kiam estis rapide trapasantaj stelarojn, estis ilin kvazaŭ kloŝanta. Herboj senfinaj, kiuj tiunokte kreskis sur montoj kaj deklivoj, ĝis la fundo de la horizonto, inundis la kampadejon per bruo, kiu estis neaŭdebla, sed ekzistanta ĉie, ĉirkaŭ ĉiuj tendoj, ĉirkaŭ kiuj samtiel, neaŭdeble kaj nerimarkite, ĝermis nenombrebla multo da tera grajnaro, elfosita de nevideblaj talpoj. Fluŝtante mallaŭte, en la silento, ĉiam pli multaj, rampante kvarpiede, kun ombroj de tendoj sur la dorsoj, ili sukcesis elmoviĝi el la kampadejo kaj droni sub apudajn hurdojn, en herbon, en mallumon, en fosaĵoj, en arbustaro. Alvokante unu la alian per mallaŭta fajfo, ili, rampante kaj kurante kurbakorpe kaj rapide, kiel zizeloj, de altaĵeto al altaĵeto, de arbo al arbo, ŝovigis tra ĉeno de gardistoj, kiuj sentante ke ĉirkaŭ ili io okazas, sed ne sciante kio, streĉis la okulojn por distingi ion en lunlumo, kaj fojfoje pafis en la mallumegon.

Preskaŭ duono da ili, ne povante ekdormi, diskuris tiel, en la mallumo, ien al la urbo. Satiĝinte, dum la lastaj tagoj, antaŭ la foriro, en la ĉioma plorado kaj lamentado de siaj edzinoj, en tiu tumulto kaj turmento laŭvole ilin kisante kaj batante, ili nun ne iris serĉi virinojn. Kun varmaj membroj, kaj kun koloj brulumaj pro paŝado kaj ŝarĝo, ili ekiris en nokton, ravitaj kaj fascinitaj pro proksimeco de la urbo, granda kaj stranga, kiu estis rapide malaperinta antaŭ okuloj iliaj, en sunsubiro, kiam ili estis alvenantaj. Tre sciante, ke ili povas nek kunporti aĵojn el vitro, aŭ el oro, nek kunirigi bovinon aŭ bovidon, ili tamen vidis sennombrajn brilaĵojn, kiuj trembrilis en la nokto, admirindajn kaj malordinarajn. Kvankam ili sciis, ke ilin kelkloke atendas nur ŝrumpiĝinta maljunulino, ajlokrono, gvidrimeno aŭ ĝia arĝenta buko, ili gajhumore ekiris en nokton, ŝtelocele.

Atendante unu la alian, sur fundo, en ravinoj, sub la kampadejo, ili kolektiĝadis trioje kaj kvarope, demandadis unu la alian rapide: kiu estas el kiu vilaĝo, kiu oficiro ilin estras, kaj poste, saltante tra arbustaro, ili estis serĉantaj vojon, sekvante tiun, kiu la unua ekiris. Plejparto de ili neniam antaŭe estis en ĉi tiu regiono.

Tiel ili spertis grandajn miraĵojn dum la nokto. Ĉiuj kiuj trairis arbustaron ĉirkaŭ la kampadejo, trairis ankaŭ ĝardenojn kaj muregojn ĉirkaŭ la urbo. Ili invadis la urbon, kiel lupoj, tra krutaj koridoroj, mallarĝaj kaj malsekaj, kiel pluvtuboj. Kvankam etstratoj estis komplete dezertaj, ili, en la mallumo, kvazaŭsentis tion, kion serĉis. Ne tuŝante kokidojn sur branĉoj, ĉirkaŭirante anserojn, ili satŝtelis molajn kolombojn. Per sangaj fingroj, al kiuj gluiĝis plumoj, ili, najlitaj per lunlumo al muroj, ŝiradis bluajn kapetojn, sentante kiel malgrandaj, varmaj korpoj konvulsias kelkajn momentojn, en la mano. Kvarpiede, sub lunlumo, ili per siaj saltoj kaj ombroj timigis hundojn, restadis longe tie, kie ankoraŭ brilis lumilo, fiksrigardante, tra fendoj inter tabuloj, nekonatajn vizaĝojn, daŭrigonte, lacaj post starado, sian vagon.

Ili iris for, kaj post ili restis nenio. Nenio.

Tamen kelkaj el ili penetris ankaŭ en domojn. Aperinte en enrompita pordo, ili gaje hurlis ion, kion neniu povis kompreni. Per grandegaj paŝoj ili proksimiĝadis al kvazaŭsvenintaj pro timo dommastroj, karesadis ilin, kvietigadis kaj revenigadis ilin per siaj larĝaj manoj, kvazaŭ per ŝoveliloj, el anguloj al la fajrejo. Ne sciante ilian lingvon, ili parolis murmurante, jelpante, blekante kaj henante, per kalemburoj, konsistantaj el ĉiaspecaj voĉoj, kiujn ilin tage kaj nokte aŭdis en siaj domoj. Ili ripetadis fajfon de vento, troton de ĉevalo, kaj, precipe, blekadon de virkokoj. Nur dio scias kiel ili poste interparolis kaj interrilitis kun la domanoj, tamen, ili konversaciis, ariginte la domanaron ĉirkaŭ fajro, kaj, kvankam la domanoj eĉ ne unu vorton ilian komprenis, ĉiuj aprobe kapjesadis. Tiamaniere, vekinte ĉiujn, ili neniun lasis dormi.

Ili iris de domo al domo, tra mallumo. Kaj senintence, kvankam ili tion ne planis, ili renkontadis ankaŭ virinojn. Post malintensa ŝriko kaj rompo-bruo, ili malaperadis en tenebro, kaj disiĝadis tenere, ame, sub hurdoj surkreskitaj de dornaĵoj, sub kiuj lirlis akvo, montosuben. Kelkiuj virinoj akompanis ilin, vojmeze, sub lunlumo, eĉ pli longe, ĝis la kampoj. Kelkiuj mallumaj domoj, el kiuj ili eliris, restis malantaŭ ili, en tenebro, kun lumo penetranta el la pordo kiu restis larĝe malfermita.

Tamen, ne ĉie tio finiĝis bone. Iuj estis ankaŭ fiagemaj – en du lokoj, simple, senkiale, ŝtelirante tra mallumo, ili flamigis tegmentojn.

Lunlumo, klara, blanka prujne, estis surfalinta, precipe, fruktarbojn, kiuj estis des pli videblaj, ju pli la nokto estis obskura. Super larĝaj deklivoj de la monto, laŭlonge de kiuj, en ravinoj, inter domoj, pasumis kavalerianoj kun lanternoj, kaptante perdoĝintojn, ĉielenis preĝejo sur kiu batis grandega horloĝo. Ĉe ĝi, laŭlonge de muro, en mallumo estis kuŝiĝintaj kelkaj el ili, fuĝante de persekutantoj, kaj alveninte tien, sur la ĉefan placon, tute heligitan per lunlumo, malplenan kaj senhoman.

La horloĝo, grandega, kun feraj montriloj, kiu senĉese knaris, en kiu inter ŝnuraro io estis senĉese ŝiriĝanta, haltigis ilin, ravitajn de nekompreneblaj, grandaj ciferoj, farbitaj en blanka cirklo, sur la preĝeja muro. Kaŝitaj en tenebro, ili estis kuŝiĝintaj laŭlonge de muro por vidi kiel ĝi batas, tirante du ferajn kuglojn, balanciĝantajn, super iliaj kapoj. Fiksaŭskultante, ili silentis post la obtuza sonado de sonorilo. La lunlumo estis priluminta grandajn domojn antaŭ la preĝejo, tegmentojn kaj murojn, la suban parton de la urbo, eĉ arbarojn kaj montojn en malproksimo, antaŭ blinkanta, profunda ĉielo.

La nokton estis penetranta blanka lumo, kiu ŝutiĝis kiel etaj pluveroj. Malĝojaj, kontuzitaj, lacaj tiom, ke ili devis multfoje sidiĝi, ili komencis malrapide revenadi, ŝancelpaŝaj, duondormaj.

Kaŝirante tra homomankaj stratoj, tra kiuj krozis kirasulaj patroloj kun lanternoj en la manoj, preskaŭ ĉiuj sukcesis reveni. Kaptitaj, en la urbo, estis nur du homoj, ambaŭ dum interbatiĝo.

Nur matene, kiam tagiĝis, estis kaptitaj multaj, malsobraj, kuŝiĝintaj en domoj kaj en staloj apud ĉevaloj, kiam ili, vekiginte el ebriula dormo, komencis postkuri bestojn kaj homojn, kun ponardoj en la manoj.

La lastan el ili, Arkadion, serviston de Isakoviĉo, oni kaptis nur kiam plene tagiĝis, jam proksime de la kampadejo. Li komencis peli porkinon, liginte ĝin je la kruro. Kviete, tenervorte kaj kantante tra la nazo, singultante brue sur la tuta vojo. Li bezonis longan tempon por trapasi la vojon, de drinkejo en la suba urbo, kie li estis ŝtelinta la bruton, ĝis la lastaj domoj proksime de la kampadejo.

Li ŝajnis malebria kaj kvieta, tial homoj, kiuj tiun nokton longe maldormis malantaŭ riglofermitaj pordoj, preterlasis lin, hezitante. Li restis plene senzorga, eĉ kiam gardistoj komencis ĉirkaŭi lin. Li nek kriis, nek retrorigardis. Malvigla, tiom malvigla, ke la porkino lin tiris kaj trenis, li ambliis post la porko dum pluraj horoj, tenervorte karesante ĝin, sed finfine komplete eksilentis. Tiel silente, kun la kapo klinita, li iris preskaŭ duonhoron, malantaŭ la porkino, la tutan vojon de la granda fonto, apud la urba pordego, ĝis la ligna kruco, antaŭ tombejo. Homoj iris post li, ne aŭdacante haltigi lin.

Tiam, subite, kiam la porkino haltis, li falegis sur ĝin kaj renversiĝis. Ne plu li estis ebria, sed ekdormis pro malviglo, paŝante.

Li estis la sola kiu ĝisatendis, ke komplete tagiĝu, kaj ke la suno prilumu lin.

La sekvan tagon estis okazonta inspektado de la regimento.

Jam frumatene ilin vekis trumpetistoj kaj tamburistoj. Kavaleriestroj, batante per piedo tiujn, kiuj havis profundan dormon, ofte eĉ renversadis tendojn. Ili disdividis sebon por purigo de pafiloj, pistoloj kaj ponardoj.

Jam bruliĝis kelkcent pipoj kaj grasiĝis kelkcent lipharoj.

Roso ĉiujn ilin malsekigis, en la hirtaj hararoj ili ekportis el la tendoj pajlerojn. Unuarigarde, je terura konsterno de la oficiroj, ili similis ciganojn

kaj ciganajn tendaĉojn. Tuj kiam komenciĝis ŝmirado de pafiloj, pulvujoj, feraj ŝargiloj, klakiloj, pingloj, enverŝiloj, tubetoj kaj ĉiuj aliaj ĝenegaj, rustaj aĵetoj, kiujn ili donadis unu al la alia, kun hororaj blasfemoj, denove kante-muloj eklamentis hej... hej, kaj tiu sono poste disfluis tra la tuta kampadejo, kiel vekriado kaj plorveado.

Ŝmirante rimenojn, ili dismetadis peltkitojn sur la teron, manskrapante koton desur ili, gratante poste feltoĉapojn kiel nigrajn ŝafojn. Ne rimarkinte montopintojn en nebulo, nek arbaran burĝonriĉon, nek matenan odoron de herbo, ili ne vidis kiel la unuaj lumŝprucoj, en Oriento, klopodegas priverŝi nebulplenajn valojn. Kun irlezitaj, pufiĝintaj piedoj, kun sufokitaj volo kaj konscio, tutplene forgesinte siajn samdomanojn, senparole kaj senride, ili komencis saltadi, viciĝante unu post la alia, sur la vojo kiun trarajdis oficiroj, kun bastono en la mano. Meze de kampadejo furioziĝis la ĉevalo de la kaptano Antonoviĉo, kaj ega homamaso alsvarmis por bridi ĝin. Sed tiam, apud la lastaj domoj Peĉaaj, montriĝis ĉaro, plena da plumoj kaj blankaj falsharaĵoj de oficirojn de la Komisararo.

Ektondris tamburoj kaj komenciĝis vera tumulto inter la vicoj de ankoraŭ fumiĝantaj amasetoj da cindro kaj braĝo. Ili rektiĝis brustoŝvele. Al ili oni alportris tri flagojn. Inter ili unu tre grandan, caran, troornamitan, same kiel troornamitaj estis la kirasuloj kun skarpoj, silkaj subligaĵoj, balteoj kaj puftufoj.

Antaŭ la kampadejo, sur longan tablon, oni metis grandajn ligaĵojn kun listoj, el kiuj oni tralegis ne nur iliajn nomojn, sed ankaŭ la nomojn de iliaj patroj, edzinoj, infanoj, kio ilin, tamen, ĉiufoje denove mirigis kaj admirigis kaj tristigis.

Dume, en la domo de la Komisararo, kie dormis la estro de la regimento, oni eksciis pri ĉio, kion ĉi-nokte en Peĉao estis farintaj „ĝendarmoj“. La pavimita korto estis plena da servistoj, pretigantaj ĉevalojn kaj grandan festoĉaron. Da negocistoj kaj metiistoj, venintaj por sciigi pri ŝteloj, kaj ankaŭ kompletaj familioj el la suburbo, alkurintaj por plendi. Virinoj kunprenis larmmiena infanojn, viroj – siajn maljunulojn, por ke tiuj parolu. En la tuta domo oni jam sciis pri la ŝteloj, bruligoj, interbatiĝoj kaj unu seksperforto.

Ankoraŭ nevestita, la Komisararo, malferminte fenestron sur la dua etaĝo, aperis, kriante. En la alia fenestro de la malnova konstruaĵo vidiĝis Vuko Isakoviĉo, en ĉemizo, kun soldato, priverŝanta lin per akvo kaj lavanta lian kapon.

La honesta Isakoviĉo vekigis, miranta pro la pentraĵoj super la kapo, pro la horloĝo kiu, malgraŭ lia blasfemo, finludis menueton, pro sennombraj, sveltakruraj tabletoj kaj silkaj kovriloj, sur kiuj dormis du blankaj katoj.

Elektita anstataŭi la kolonelon, li sciis ke oni lin ĉi tie igos subkolonelo de la regimento, tial li zorgis ke la tago pasu bone. Des pli ĉar, hieraŭ vespere, la

Komisaro ne menciis lian rangaltiĝon, sed, male, ĝis profunda nokto, parolis pri stultaĵoj, kiujn, dumvoje, faris la subkolonelo Arsenio Vuiĉo, kaj pri ĥaoso kiun estigis la marbordaj limsoldatoj, kiujn gvidis militi Ivano Horvato. La Komisaro, cetere, dum la tuta vespermanĝo estis enuiga.

Kun lavitaj korpo kaj vizaĝo, observante kio en la korto okazas, Isakoviĉo staris longe antaŭ granda spegulo, rigardante larĝan postvundon, sur la dekstra ŝultro, same atente, kiel la dikajn, lozajn vangojn. Kvankam li volis kaj devis rapidi, li estis faranta sencelajn movojn, interrompante la vestiĝon per longa observado de sia bildo en spegulo, kian hejme li neniam vidis. Grandaj partoj de liaj brusto kaj kruroj, liaj pufiĝintaj okuloj, flavecaj, plenaj da punktetoj, kaj precipe lia ventro, ŝajnis en la spegulo kaj ridindaj kaj fremdaj. Dum li estis survestanta ruĝajn drapaĵojn, al li ŝajnis, ke vestiĝas iu alia, ne li, ke el la ĉambro nun eliros iu alia, troornamita, ne li.

Antaŭ mateniĝo, li songis la edzinon, kaj pensis pri ŝi ankaŭ nun, observante tra nebuligita vitro sian ĉevalon, kies krurojn kaj maldikajn maleolojn lavadis servistoj. Sed, rememorinte la infanojn, li komencis plorsingulti duonlaŭte, en ĉeesto de soldato kiu estis vestanta lin. La skribordonon iri en militon, neatendita, komplikigis ĉiuj liajn decidojn. Konflikta kun la frato, kiu estis loĝiginta en Zemuno, kaj decidinta aĉeti grandan domon en la Budao-urbo, li deziris havigi sepcent dukatojn kaj transloĝiĝi en Rusujon. Rusujo ŝajnis al li granda, infinita, verda kampo, tra kiu li rajdos.

Infanoj liaj estis malsanemaj – la pli juna havis abscesojn – kaj li, ĝuste tia, ŝvelforma, peza barele, ricevinte la skribordonon, tuj iĝis malpeza kiel plumeto. Ankaŭ antaŭe li umis ĉe Rejno; li preskaŭ restis sen kapo dum sabrobatalo, ĉe unu el la alfluantoj de Danubaj; poste oni sendis lin en Italujon, kvankam la frato edzigis lin, kvankam li havis infanojn, kvankam li nek deziris, nek petis foriri. Li provis forlasi la armeon, sed post tio li same devis foriri pro grena negocado! Loĝiĝis li en Galco, veturigis siajn barĝojn ĝis Vieno, sed tamen ĉion perdis. La tero kaj lia brutaro, malsano infana, ploro, ĉio estis vana. Li devis oftfoje iri tien, kien li iri ne volis.

Tiel estis ankaŭ kiam li estis transloĝiganta kun la tuta domhavaĵo. Kelkloke, ĉe akvo, ilin ĝuigis sensona, varma somero, maturaj fruktoj, bonaj homoj, sed tuj kiam la vintro finiĝis, ili denove iris for. Kiam lia patro forpasis, li volis stabiliĝis. Strangamaniere lin traflagris la rilato kun la morta patro; kvieto, trankvilo, dum ĉio kio estis ekster li, en la mondo, estis bunta, freneza, malprudenta kaj sensenca.

La vivuloj, pri kiuj li zorgis, la virino, kaj ankoraŭ pli la infanoj kiujn li amis, transloĝigadis oftfoje, el printempo, en aŭtunon, el somero, en vintron, el gajeco, en ploron, el tago, en nokton. Li povis nek savgardi ilin, nek helpi ilin, nek restigi ilin. Kiam li unuafoje estis forlasanta ilin, ili troviĝis sur alta

bordo de Danubo, inter nigraj poploj, en grandega flava, turka domo, ĉirkaŭ kiu, sube, sur akvo, ripozis barkoj de kaŝkomercistoj. Kiam li duafoje estis forlasanta ilin, ili restis en malalta, germana gastejo, ĉe Vieno. Kiam li triafoje estis forlasanta ilin, antaŭ du jaroj – ankaŭ la pli malgranda jam estis naskita – li vidis ilin dum la disiĝo en domo de iu greko en Slavonia Brodo, kie ili restis dumvintre, ĝis kiam revenis lia frato, kiu laborcele foriris en Venecion. Tiun domon, kiun li vidis nur kelkajn momentojn, nokte, li tute ne povis rememori. En lia memoro restis nur dentomanka oldulino, kiu skuiĝis pro ploro, dum li estis adiaŭanta la edzinon. Nun li pense vidis ilin en la domo de la frato, en la granda konstruaĵo el lignaj traboj, ŝtopitaj de tero, sur la bordo de Zemuno, antaŭ kiu barkoj pintis el akvo, diverskoloraj, farbitaj, kvazaŭ lignaj cigoj, kun fleksitaj gorĝoj kaj larĝaj ventroj. Li ne sciis, kiel ili fartos. Li eĉ ne sciis, ĉu li iam ajn revidos ilin.

Elĉerpita pro subgenua doloro, kiun li ne priatentis, li sidis, tiel, fortomanka, ankoraŭ longe, sen forto por finvestiĝi kaj zoni armilojn.

Fakte, ankaŭ multajn aliajn aferojn li rememoris, subite. La situacio de liaj plejkaruloj, estis sama kiel la situacio de la regimento, kaj de preĝejoj, kaj de la tuta homamaso, kiu sciis nek kien iri, nek kion fari. Lokaj kvereloj kun pastraro, tiuvintre intesegaj, kaj konstruado de preĝejo meze de vilaĝo, kiun li komencigis, kaj senarbigoj sur la insulo, kie ŝtupoj restis en la tero, gigantaj kiel rokoj, ĉio ĉi estis okazanta, nek laŭ lia deziro, nek laŭ lia volo. Ĝuste antaŭ ol li ricevis la ordonon iri en militon, oni irigis lin en Vienon, al la imperiestra kortego, kun monaĥoj, sed ankaŭ tie li vidis konfuzegon kaj malnoblecon.

Nur la granda ŝtono sur monteto, sur kiu li konstruis tegmenton, kie lia patro kuŝis entombe, staris senmova kaj videbla, super herbaĉo kaj greno, kiu dum la lastaj jaroj ĝermis kaj maturiĝis eĉ en la valetoj. Tri poploj tremvibris tie sub vento, li ilin klare vidis, sendepende de la distanco. Saĝo kaj trankvilo, la kvieto kiu travibrigis lian animon, estis venantaj de tie, atingante lin, kvazaŭ li, rajdante ien ajn, estus kun siaj leporhundoj vizitanta la grenejojn, el kiuj, sur monteto, la tombo estis tiel bone videbla. Dum ĉio alia turniĝis ĉirkaŭ li, senorde, kaj sensece, kaj senregule, tiuj liaj memoroj pri la patro invadis lin sur montodeklivoj, antaŭ klaraj, printempaj spacoj, same kiel ĉi tie, super urbaj tegmentoj, ĉion ordigante, aranĝante, kvietigante.

Dume, buntkolora kaj ŝvelaĉa, kun plumoj, kiel meleagro, ruĝa vizaĝe, verda nuke, Komisararo, kriante kontraŭ amaso da siaj oficiroj, en ĉambroj, sur ŝtuparoj, en korto, savadis tion, kio estis savebla. La katenitojn li liberigis; la ebriaĵojn, laŭ lia ordono, oni puŝis, kaposuben, en barelojn kun akvo, eĉ se ili sufokiĝos; li pritaksis, supertaksis, duonigis kaj malpliigis la pagendajn kompensojn, sed kun virinoj kaj maljunuloj li eĉ interparoli ne volis. Li diris

al ili: iru kaj plendu al Dio. Koncerne la ununuran kazon de seksperforto, li ne volis kredi, ke ĝi okazis, ĉar li konjektis ke estos multe pli da tiaj okazaĵoj.

Rapide li elpurigis la hederitan korton, sub grandaj fenestroj de brunkolora baroka masonaĵoj. Li alsaltis feste ekipitan ĉaron, kaj kriante demandis, jam la trian fojon, kie estas la regimentestro, Isakoviĉo? Li elsaltadis denove el la ĉaro kaj braksvingaĉis, al la fenestro, super kiu sidis nudaj inaj figuroj, kaj kirasitaj duondioj, envolvitaj en girlandoj, faritaj el bakita argilo, plenaj, plenplenaj da paseroj.

Dum tiu tuta tempo gardostaranto, antaŭ la pordo, kun pafilo antaŭ la busto, kun la antaŭenigita brusto, timoplena, staris rigida kaj senmova, tamen lante luliĝanta sur la kalkanoj.

Ĉar li senĉese pensis pri la parolo, kiun li estis deklamonta, li konstante prenadis el la poŝo grandan pakajon kun instrukcioj pri disirigo de la armeo, kiun, tute kovritan per grandaj, ruĝaj sigeloj, sendis al li la arma militinspektoro, kavaleria generalo grafo Serbelono, sur kiun li, por ne forgesi, skribis la unuan frazon de sia parolo, kiu, interalie, estis la sola, kiun li memoris. „Vi, serboj, plej volonte elektas la soldatan panon, kaj tial...“

Maltrankvila, ĉar la pluan parton de ĉi tiu parolo li plene forgesis, li ripetadis ĉi tiun frazon, germanlingve, kompreneble, al ĉiu, kiun liaj okuloj tiun matenon vidis. Sed la alian parton memorfiksi li ne povis.

Ĉar serblingve li sciis nur blasfemi, li blasfemojn elkriadis ankaŭ antaŭ oficiroj, donante ordonojn, sed la lastnuktajn eventojn li pridiskutis germanlingve. Tamen, forgesema, li eĉ post serbaj blasfemoj, aldonadis, jam laŭkutime, al sia adjutanto, kiu akompanis ĉiun lian paŝon, kaj dekstren kaj maldekstren, kaj antaŭen kaj malantaŭen: „Auerspergo, diru tion al ili serbe...“

Isakoviĉo alkuris, komplete spiromanka, post kio ili sidiĝis en la ĉaron, ambaŭ hontigitaj kaj koleregaj, ĉirkaŭitaj per kolono de rajdantaj oficiroj.

Sur la tuta vojo ili interŝanĝis nur kelkajn vortoj, nur Komisararo foje elbuŝigis la frazon el sia parolo, konsterniĝante ke la alian parton li eĉ nun ne povis rememori. Isakoviĉo estis kolera, ĉar li sentis timon antaŭ tiu buntkolora insimila maljunulaĉo en soldata vesto, kaj Komisararo, pro tio, ke li sidis oblikve, ĉar Isakoviĉo superpeze klinigis la ĉaron maldekstren...

Oni salutis ilin per pafado, svingado de flagoj, hurlante komandojn, salutojn, raportojn...

La suno ne povis trabori la nubojn. Estis malklara, tamen varma antaŭtagmezo. Saltinte el la ĉaro, Komisararo ĉirkaŭrigardis por vidi ĉu pluvos, kaj haltis antaŭ ili. Ili timtremis, ankaŭ li timtremis, ekkriinte: „Vi, serboj, plej volonte elektas la soldatan panon, kaj tial...“ Daŭrigi li ne povis.

Li ĉion vualis, rapide, traleginte la dekreton de la komandanto de la urbo Oseko – markizo Gvadano. Post tio, per grandaj paŝoj, li alkuris tablon, kaj komencis kontroladon.

Ĉirkaŭita de amaso da siaj germanaj oficiroj, kirasuloj, li ŝvitis kaj propramane kontrolis la pafilojn, unu post la alia, homojn, unu post la alia, pistolojn, unu post la alia, enigante la etfingron en iliajn tubojn, penante palprovi polvon, kaj formovante de si pafiltubojn, direktitajn al lia brusto. Li kontrolis ĉiun enlibrigon, ĉiujn hararojn, ĉiujn krurojn, ĉiujn ponardojn. Malzoninte sabron, turnita al siaj oficiroj, li ripetadis oftege, ĉiam pli bonhumora: „Kiaj homoj, kiaj multharaj homoj...“

Tiamaniere li centojn da homoj kontrolis, pripalpis, pridemandis; tra liaj manoj pasis miloj da rimenoj, pistoloj, bukoj, li irigis iujn soldatojn al forĝisto, aliajn al fusilriparisto, triajn al rimenistoj, restigante apud si tiujn, kiujn li volis honorigi. Li estis kontenta, ĉar li trovis pli ol cent homojn, kiuj kapablis bele elparoli: „Maria Teresia...“ kaj aldiri: „vivat“. Krom tio, li trovis multajn, kiuj scipovis preteriri, kaj marŝante saluti, sen halto. Li konstatis, ke la regimento estas bonega, krome, ricevinte instrukciojn esti malsevera, li forsilentis la ĉinoktajn eventojn.

Lia obsedo estis punado per raportoj. La preferis la regimenton ne restigi ĉi tie, sed sendi post ĝi plendraporton, skribitan per klaraj kaj akraj literoj, pintaj pingle, por ke la soldatojn puntorturu aliaj homoj. Tamen, por estingi sian koleron, li turniĝis, flamruĝa kaj ŝvita, sub blanka falsharaĵo, al la oficiroj, pendiginte unu el siaj grandaj gantoj al la zonrimeno, kaj rigardmezurinte ĉiujn, senescepte, rigidajn, nudkapajn, senmovajn. Li elmurmuris tra la dentoj, kun rigardo afabla, malgajeta, perdita ie, super la urbo, super la preĝejaj turoj, ĉirkaŭ kiuj kirliĝis kolombo: „Sinjoro Isakoviĉo, mi gratulas, precipe pro la armiloj – nu, ankaŭ la furaĝo estas bona. Ĉiuj punoj estas pardonitaj, por la ĉinoktaj agoj... tamen... tiun soldaton, pro seksperforto, oni vergpunu, tra la tuta regimento.“

Tiamaniere, jen, estis decidite ke la Slavonia-Danubregiona batalionaro vidu sangon, jam antaŭ ol veni al Rejno, homan sangon, ĝuste ĝian sangon.

Post mallonga, konfuza silento, kiu timtreme saturis la tutan regimenton, aŭdiĝis novaj komandoj, post kio la regimento forlasis la armilojn kaj estis irigita flanken, malantaŭ la kampadejon, por plenumi la punon, por malforgesigi tiun nokton, plenan da ŝteloj, malobeemo, diboĉado kaj volupto.

Longforma, kvazaŭ por solenado, en du vicoj, la regimento ricevis tricent durajn vergojn, malsekajn kaj bluajn, siblantajn tra aero.

Kun la kapoj klinitaj, ili premis per siaj pezaj kruroj la teron, kaj viciĝis, silente, unu apud la alia.

Kiam, subokule, ili ekrigardis dekstren aŭ maldekstren, ili vidis, kvazaŭ ĉe mondfino, du vicojn de grandegaj dukruroj, firme premantaj la grundon.

La kondamnito, dume, ligita super la artikoj kaj kubutoj, estis alportita kaj ĵetita antaŭ la enirejon de tiu stranga homaleo, kiun li devis trakuri

senspire, en kiu anstataŭ trunkoj staris senmove liaj samlandanoj, el kiuj elkreskis vergoj. Kun la manoj kaj piedoj ligitaj, kun la buŝo ŝtopita, spiregante, li atendis, ke oni lin ekportu, nur skuiĝante tempaltempe, kiel la virŝafoj kiuj kuŝis tie, buĉotaj.

Dum super li, oni legis la pundeklaron, desur papero sub kiu pendis grandaj, ruĝaj sigeloj, sub flago, dum tamburoj frapbruis, la kondamnito, kun kuntiriĝintaj genuoj, kuŝis sur la tero, kun la vizaĝo malhela kiel la tero.

Oficiroj surkapigis bulĉapelojn, kaj surĉevaliĝis.

Isakoviĉo, plene ŝvelinta pro senpova kolerego, ordoninte venigi sanigistojn, alveturigi ĉaron, sur kiun oni lin poste, kiel kadavraĵon, ĵetos, rekonis sian soldaton, ĉar li ĉiujn konis persone.

Korpremita pro la penso ke tiu kompatindulo, post kelkaj momentoj eble estos blinda kaj paralizita, li alpelis la ĉevalon pli proksimen. Kliniĝinte sur la selo, preskaŭ faliginte la ĉevalon, li vidis, ke la malfeliĉulo estas ekssakristiano el lia vilaĝo, kaj ke ploras. Tiam Isakoviĉo diris al li mallaŭte, *внутренним неким душе своје побуждением „Mihin pardonu, Secula, in miham Mensconphuzom, mihi malsciamas cuyon pharir! Comprenu tu, mihi helpbezonom estams! Ne wershu Larmoy! Mihi ed Regimentom mihiam trowoims ityun Woyon Awrorod pli phelichad? Ed mihia Wiwo longam passit ityel rapide, cuyel unn Wiwetom. Ed cuyen irams... mihi widams unn Amaron Mortes...“*

Ĝistalie nudan, ili ekportis la homon, poste, ĝis tiuj du, vivaj, rektaj, bordoj de la mallarĝa rivero, sur kiu lia korpo estis fordrivonta ĝis malproksima, alia flanko de la kampo, super kiun kliniĝis vergaro, kiel branĉoj de salikoj...

Kiam oni senŝnurigis liajn krurojn, malligis lian buŝon, kiam oni lin rektigis, li ekveis, jam antaŭsentante vipobatojn, sed tio lin neniom helpis, ĉar en la sama momento li estis puŝita, deposte, inter la du vicojn de la soldatoj. La unua soldato vergis lian kapon mallerte. La vergo en lia hararo disŝiris la haŭton, sed tre mallonge, pro kio sur lia frunto aperis nur maldika sangofluo. Tamburistoj komencis bati.

Dum momento li haltis, kun larĝe malfermitaj okuloj, sed tiam alia soldato vergis la mezon de lia vizaĝo, pro kio liaj lipoj fendiĝis, sango elŝprucis. Nur tiam li komencis kuri sub la pluvo, kiu vipis lin mallerte, sur la kapon, kolon, bruston kaj dorson.

Hurlante pro doloro, sed kun la manoj ligitaj, sanganta, li kuris malfacile, tordiĝante, kliniĝante kaj luliĝante tiel, ke el malproksimo, el la ĉaro, de kie Komisararo lin rigardis kun siaj kirasuloj, li aspektis kiel granda floro, jen blanka, jen purpureta, fleksiĝanta, sub vento.

Kiam li falis la unuan fojon, oni verŝis akvon sur lin, kaj puŝis lin antaŭen. Dum momento, la akvo, kiu plaŭdbrue trafis lian vizaĝon, lian kapon kaj bruston, redonis al li la vidkapablon kaj povon, post kio li, kiel

freneza, puŝita, denove ekkuris. Ambaŭ oreloj liaj jam pendis, sangaj kaj ruĝaj kiel blankoj fiŝaj.

Sangokovrita, li ankoraŭfoje falis, malstreĉinte la ligitajn manoj inter kru-rojn de soldatoj. Ankaŭ liaj naztruoj jam estis krevintaj, la manoj kaj fingroj disrompitaĵoj kaj ŝiritaj, pendantaj ĉifone desur la maniko.

Svingante la ligitajn brakojn, premante ilin al la okuloj, kiuj jam ne estis vidipovaj, li ne plu kuris, sed faladis, ŝanceliĝadis kaj stumbladis, plena da mallarĝaj sangaj rojoj kaj fontoj.

Vomsente, penante bati kiel eble plej rapide, la du vicoj da soldatoj vipadis unu la alian, kreante volvaĵon super li, kiam li falis.

Kun disŝirita haŭto sur la nuko kaj ŝultroj, kie elpendiĝis sanga karno, en la formo de malgrandaj pecetoj, similaj al glutbuloj, kun la kapo klinita, li antaŭ la fino, perdis la konscion pro doloro. Reakirinte la konscion kelkajn fojojn, li saltadis surherbe pro teruraj doloroj.

Ĉio ĉi finiĝis dum kelkaj momentoj, kaj sanigisto lin svenintan estis lavanta kaj bandaĝanta, trovante liajn nek nazon, nek buŝon, nek okulojn, nek orelojn.

Eĉ lia propra patrino, se ŝi prenis lin en la sinon, ne plu povus rekoni lin.

Post plenumo de la puno, la regimento revenis en la kampadejon. La gardistaro estis pligrandigita, ne nur ĉirkaŭ la kampadejo, sed ankaŭ en la kampadejo.

Kiam en la urbo oni eksciis kiamaniere la regimento estis punita, la urbanaro freneze ekstremis. Tiun vesperon ĉiuj endomiĝis frue, riglofermante la pordojn, ankoraŭ pli firme ol ordinare. Kiam Luno aperis sur la strato, la tuta urbanaro hirtiĝis pro timo. Tamen, la vespero estis pasanta kviete, la regimento tutnokte nur hojlis kaj ululis, sub la urbo, kiel draŝita hundo.

Ĝi prepariĝis por daŭrigi la vojon post aŭroriĝo. La sekva kampadejo estis la urbo Radkersburgo.

La oficiroj tiun vesperon estis gastoj en la kastelo de la Peĉaa episkopo, kiu konis la lingvon de la regimento, ĉar en la ĉirkaŭaĵo li havis milojn da siaj fidelaj slavoĵoj, katolikoj.

Ĉar Isakoviĉo la tutan tagon pasigis en la domo de Komisararo, la ordonrajton transprenis la plej aĝa kapitano, Piŝĉeviĉo, el la urbo Ŝido. Ili atendis, tiel, antaŭ nigra konstruaĵo, en la fundo de granda parko, antaŭ pordo, super kiu anĝeloj portis la blazonon de Episkopejo.

De ie estis penetrantaodoro de siringo, kaj lunsimila lanterlumo. Super iliaj kapoj estis malleviĝanta, desur iu el la anĝeloj, enorma araneo, pendantsur sur granda araneaĵo, sed ili, sub siaj nigraj pimpaj bulĉapeloj, ne rimarkis ĝin.

Kiam alvenis la momento, ili eniris la kortegon, kie ilin atendis servistoj, kaj ili devis stari ĝis la fino de solena meso, kiun en la kortega Episkopeja kapelo oni faris por „longa vivo kaj venko de armiloj“ de Maria Terezo.

Belstaturaj, ruĝaj, en siaj drapaj kostumoj, multharaj, arĝentoplenaj, krucsignante per tri fingroj, hezitante, fiksrigardante unu la alian dum la episkopa benado kaj tranaza kantado de „dominus vobiscum“, ili ĉeestis la meson, ebrietaj, kvazaŭ pro hiskiamo, pro la ĉielaj kantoj de orgeno kaj ĥoruso, pro laodoro de incenso, pro galimatio de latinaj vortoj, kaj pro la anĝelamieno de belaj knaboj, helpantaj la episkopon dum diservo.

Sidante en gigantaj benkoj, tintante dum ĉiu movo per sabroj, kurbiĝintaj, heligitaj per bunta, malklara lumo de fenestro, ili mense subiĝadis antaŭ tiu torento de agrableco kiu travibrigis ilin. Ili observis moderajn movojn de la pastro, oftan fleksiĝon de genuoj antaŭ ora kaliko, blondharajn knabecajn vizaĝojn kaj impresajn fenestrojn, tra kiuj alfluadis taga lumo, kiel koloro ĉiela.

Rememorinte siajn strangajn kaj lignajn preĝejojn, en kiuj oni amase kantis kaj laŭte kraĉis, kaj siajn sovaĝaspektajn kaj senbridajn popolojn, ili, kaŝante tion unu de la alia, ĉiam pli senfortiĝis, kaj ĉagreniĝintaj, kaj ravitaj, ili enspiradis altajn kaj helajn katolikajn kantilenojn, muzikadon violonan, pompan, roman dancadon de popoloj, sub karvalora baldakeno, ĉirkaŭ la episkopo.

Antaŭ la fino de la diservo ili estis plene lacaj, senĝojaj kaj kvazaŭ ensorĉitaj. Ili silentis, interŝanĝante eĉ ne unu vorton. Trairis ili kiel reaperantoj la parkon ĝis lumigita ŝtuparo de la kastelo, kaj tiam ili, unu post la alia, kisis la manon de la episkopo.

Apud solena salono, en kiu estis aranĝita manĝotablo, en ĉambro kun balkono, komplete kovrita de ruĝa silko, oni atendas Isakoviĉon, kiu longe ne estis aperinta.

Finfine, kiam li eniris, ĉiuj konsterniĝis. Lia vizaĝo estis malhela kaj griza kiel cindro.

Troornamita kaj tutkovrita de bluaj silkaj bendoj kaj skarpoj, ankaŭ li, sub bulĉapelo, garnita per blanka plumo kaj arĝentaj puftufoj, aspektis kiel per pajlo plenigita monstro.

Lia pantalono estis streĉita kiam li sidis, sed ĝi estis tajlita tiel, ke ĝi pendis kiel sako, kiam li staris. Sub la ekipaĵo lia haŭto estis tute ĉifita. Lia grizeta, flaveta hararo, akra kiel keto, kaj liaj hirtaj lipaj haroj, ankoraŭ tremetis. Liaj okuloj estis rultitaj, gapantaj, ili rigardis flanken. Kiu scias kien li volis foriri, por ion diri per la dolore tordita buŝo? Sur lia tuta, ŝvelinta vizaĝo, sur kiu ankoraŭ tremegis kolerego kaj malespero, kvieta kaj senmova restis nur lia plata, granda nazo, kaj sur ĝi – du grandaj larmoj.

Vane oni lin alkuris, provis kvietigi, vane oni kuŝigis lin, kiel ŝtipon, sur apudmuran fotelon kun kapapogilo kaj skabelo. Li senĉese malfacile, furioze spiregis.

Sciante ke li suferas je astmo kaj stomakdoloro, oni, demetinte kelkajn liajn rimenojn, nudigis lian bruston, kie inter punktoj de la ĉemizo aperis herbosimilaj, densaj viloj, kiujn superŝutis grandaj ŝviteroj. Spasme tenante sian ventron, li, levita, kvazaŭ senkonscia, balanciĝis.

Kiam servistoj, dismalferminte la pordon de la manĝejo, montris sidejojn ĉe abunda tablo, Isakoviĉo, rekonsciiginte, stariĝis kun ursa forto. Liaj palpebroj estis tute bluiĝintaj. Li per mano montris, ke ili eniru, kaj diris mallaŭte: „Ekiru kaj glutu nutraĵojn, kaj ne atentu malfortecon mian. Menso via ne bezonas vanajn vortojn. Faru honoron al la Imperiestrino reganta. Ne malpli, tenu nedifektita kaj neŝanĝita en animo via nian kaŝardan esperon: la delicon de ortodoksecon, agrable impresantan la koron“. Kaj vidinte kiel ili mire lin rigardas, li, denove montrinte per la mano ke ili eniru, ripetis ankoraŭ pli mallaŭte: „la ortodoksecon, agrable impresantan la koron“.

Ĉar la nobeldevena majoro kaj estro de Slavonia-Danubregiona regimento, Vuko Isakoviĉo, travivis en Peĉao antaŭ la foriro al batalkampo, tiun tagon, malfacile kaj malbone, sed tion la aliaj ne sciis. Premita inter grandega bovlo el fajenco, kaj vitraĵoj Veneciaj de la Peĉaa episkopo, kiujn li devis gardi, por ke ili ne rompiĝu, kaj inter Komisaro, jam sufiĉe laca kaj drinkinta, kiun troornamis ankoraŭ pli ol li, skarpoj kaj silkaj bendoj kaj plumoj, kiujn oni devis gardi, por side ne difekti ilin, li devis diskuti pri paradizaĵoj kaj inferaĵoj, pri anĝeloj kaj ĉefanĝeloj, ĉar oni, jen, metis en siajn kapojn la ideon katolikigi lin.

Komisaro manie penis havi skribajn sukcesojn. Li metis en sian kapon la ideon, ke post la foriro de la elita taĉmento de Slavonia-Danubregiona regimento al batalkampo, informi, per siaj maldikaj, akraj literoj, ke la estro de la regimento, Vuko Isakoviĉo, unu el la plej bonaj oficiroj en lia regiono, kiun influis la belegaj vortoj de la episkopo Peĉaa, sin klinis por kisi la pantoflon de Sankta Patro, kaj tiamaniere ekiri, kiel fidela, fakte kiel fidelega heroo el „lia armea regiono“, en militon, al Rejno.

Menciinte nenion pri la altigo al la rango de subklonelo, li, de la hieraŭa vespero, ripetadis ĉiam la samajn vortojn pri Impriestrino, pri Kortego, pri Vieno, kiuj devis al Isakoviĉo atesti tion, kio estas klare klara: ke li devas esti katoliko.

Antaŭ la flava muro de la ĉambro, inter du kandelingoj, en kiuj brulis ses kandeloj, sub la bildo de Sankta Katarina Siena, stigmatizita kaj fiksrigardanta la ĉielon, Komisaro finfine ĉesis kriegi. Li, jam sufiĉe multe kriinta la tutan tagon, pensis, ke venis la momento, kiam li devas cedi tiun taskon al la episkopo. Laca pro vino kaj peza falsharaĵo, li malstreĉis la malsupran lipon, paliĝinta, kiel maljunulino, sentanta naŭzon. Mense, li jam estis skribanta raporton pri sia malsukceso, per la same akraj, klaraj literoj. Li volis samtempe detale priskribi la ortodoksecon en „sia armea regiono“. Li trovis, kun

malklara pensofluo, eĉ la komencan frazon: „La serboj elektas plej volonte la oficon armean, kaj tial“... Al li iĝis tede pensi, kaj Isakoviĉo, tute violiĝinta, al li malrapide iĝis kvazaŭbildo.

La komisaro iĝis preskaŭ senmova. Sub la falsharaĵo li palpebrumis per ambaŭ okuloj. Hejme nun estas vespero. Ambaŭ katoj dormas. Karesante per montrofigingro sian aglan nazon, li atendis vidi kion povos la episkopo. La sekvan tagon oni devos skribi du dokumentojn por la generalo, grafo Serbelono. Ĉivespere li ricevos puran dormoĉemizon. Tio estas tre agrable.

La ĉambro estis flave tapetita. Krom Katarina Siena, sur la muro estis ankaŭ Sankta Tereza. Krom tio, en angulo estis Maria, kun nuda, bela kruro, staranta sur serpento kaj sur Luno.

Egaj vejnoj estas sur la manoj. Malbona vino. – Li estis alkrionta la adjutanton: „Auerspergo“, sed la adjutanto forestis. – El la manĝejo aŭdiĝis muziko. Tra la malfermita pordo sentebliisodoro de siringo. Ĉivespere li ricevos puran dormoĉemizon.

Li komencis kalkuli kandelojn. Li elnombris dek unu, sed plu ne povis.

La episkopo, tamen, malkruda kaj ridetanta, fidis je la volo de Dio.

Li ordonis, ke por la triopo oni pretigu ĉambron, super kapelo, en suda angulo de la kastelo, kiun li ordinare pretigadis por dormado de lia fratino kaj onklino, kiam ili alvenis gaste.

Tiu ĉambro ensorbis specialan odoron, en ĝi estis tre multe da anĝeloj, sur la tegmento. Ĝiaj fenestroj donis belegan, printempan, vidon al la ĉirkaŭaj montoj.

For de la manĝejo, li venigis Isakoviĉon vespermanĝi tie, garnante ĉion, abunde, per bonkvalita vino, kiu havis preskaŭ tiom da jaroj, kiom havis knaboj el lia kortega ĥoruso.

Li lasis ilin laciĝi pro disputo, kiun li komencigis jam hieraŭ vespere, atendente, ke al ili iĝu teda la diskuto pri ekleziaj ritoj, patriarko, komuniiĝo, bapto, ĉieliro, pri kio ili ambaŭ, kune, diris neniun saĝan vorton. Multegajn stultaĵojn ili parolis pri la romuja pastraro!

La episkopo, larĝe malferminte la pordon, tra kiu povis aliĝi al ili, el ĝardeno, kaj siringotufoj, kaj akacioj, kaj kaŝtanoj, kaj proksimiĝi bluj montaj kaj blinkantaj steloj, aŭskultante muzikadon, kun maldekstren iomete klinita kapo, argumentadis, antaŭ ĉio: ke la katolika eklezio estas milda, malkruda kaj tolerema. Ne menciante klare kion ili per tio ricevus, li konvinkadis lin pripensi, kune kun siaj oficiroj, kiel multajn malagrablaĵojn spertos infanoj iliaj pro malbonaj homoj, kiuj malamas ortodoksajn skismulojn, ĉar li tiajn malbonajn homojn vidis eĉ en Kortego. Tempaltempe li metadis sian blankan, molan manon, sur kiu brilis ringo kun granda, nigra ŝtono, sur la manon de Isakoviĉo, kiu estis jam pli ol iom drinkinta.

En triangulo de la malnova konstruaĵo, tiel, en la fundo de malluma parko, kun grandaj lumigitaj fenestroj, en kiuj nigris ŝproskrucoj kaj ombroj sur la muro, ili batalis longe, inter kandeloj en arĝentaj ingoj.

Ĉirkaŭitaj de tri flavaj muroj, klinitaj super la tablo, plena da manĝaĵoj kaj vino, lacaj kaj malviglaj, ili estis sinkantaj ĉiam pli profunden, per siaj vortoj, frustrado, ekkrioj, en la nokton, tra la blanka pordo, tra kiu oni povis atingi arbarojn, montojn, lumetadojn super la urbo, la senfinan, stelgrave-dan ĉielon.

– Li devas esti katoliko. Ĉu li povas ne esti tio, se katolikino estas ankaŭ la imperiestrino? La bela Imperiestrino. La imperiestrino, kiu unuigis en si la du belegajn nomojn, Maria kaj Teresia. La nomon Maria! Maria senpeka, Maria pura, skatolo ebura, stelo matena. Maria belega, Maria naskintino. Ĉu respektas iu ajn, ĉu konas iu ajn el la liaj, la sanktan Teresian? La nomon Teresia! Ardo, Suna disko kiu zonumas la korpon. Flamo, en kiu oni forbrulas, pro deziro havi pli malproksiman, pli belan kaj pli dolĉan ekziston. Teresia. Per glavo traborita, blanka, de mano vira netuŝita brusto! Poste brilo. Sian popolon ili devas venigi en brilon. La brilo estas katolikismo. Kiam Suno en Okcidento subiras, tiam en Oriento ĝi eliras. En katolikismo. Kiaj soldatoj ili volas esti, se ili estas skismuloj en la okuloj de imperiestro sia? Ĉu ili deziras ŝarĝi sin per sufero, kiu neniam finiĝos, ĉu ili deziras transloĝiĝon de animoj siaj, ne nur de infanoj siaj, ŝanĝon eternan, kiu kiel kalko en la tombo ĝis eterno rodos karnon sur iliaj ostoj, ĝis kiam ili estos en ĉi tiu tero, el kiu oni al ili eliri neniam plu permesos?

Maria Teresia. M – la unua litero de ŝia nomo havas mistikan signifon, ĉar ĝi signifas: mil. M – kiel Madono. A – kiel Anĝelo. R – kiel Rivelistino. I – kiel Inspirantino. A – kiel duobla Anĝelo.

Teresia estas. T – kiel Teistino. E – kiel Evangelia. R – kiel duobla Rivelistino. E – kiel Ekstaza. S – kiel Sankta. I – kiel Ilumina.. A – kiel Apostola...

Isakoviĉo, kiu, post vespermanĝo, sentis jam regulajn dolorojn en la stomako, senespere terurigiĝis pro la parolemo de la episkopo. Timante ke li tion ne povos eviti, ke jam ĉi tie, en Peĉao oni lin rebaptos, arde malĝoja li petis, mense, mallaŭte, helpon de sia patronsanktulo, Sanktan Martenon.

Sankta Marteno helpis lin, memorigante lin, inter la multa vino, glasoj kaj brulantaj kandeloj, pri lia frato Aranĝelo, kiu kutimis, farante negocajn interkonsentojn en Valaĥujo, Turkujo kaj Hungarujo, ebriigi homojn. Rememorinte tion, la honorinda Isakoviĉo decidis, laŭ la maniero de la frato, ebriigi sin.

Li rezonis – eĉ se oni trudbaptos lin, ke ili ne gajnu lin malebria.

Pro tio li komencis drinki per unu tiro, post kio la episkopo eksilentis, mirante.

Ĉiam pli blua je la nuko, Isakoviĉo tiam ekvortis, per la lasta konscio, montrante, ke li ne longe bezonas la helpon de la Sankta Marteno, ĉar li komencis paroli ĉi tiel: – Vivis, mia ortodokseco dolĉa, multajn jarojn en la patrino mia, tial porĉiame ĝi vivos ankaŭ en ĉiuj miaj posteuloj . Dolĉa estas ankaŭ nia Rusujo. *Dion, ityun Creinton, petams, que mihi trowu Woyon mihian ed que Russujod eciru mihi.* La nomo de Rusujo! R – kiel Revelacio. U – kiel Universo... S – kiel Slava. U – kiel Universa. J – kiel Jesuo. O – kiel...

Li ne finis, ĉar kvankam li estis peza kiel barelo, pro vino, al li ekŝajnis, ke li parolas tion, kion li ne devas paroli. Timigita kaj ĉagreniĝinta, li senfortiĝis, kaj provis forsilenti ĉion, neante ĉion... ĉar vana estas ĉio, la polvo, morto, vanta vanto... frazaj frazoj... sed mortante oni mortas kiel hundo kaj ĉevalo. Samtempe li provis leviĝi kaj ekiri. La animo ne ekzistas... samkiel Dio ne ekzistas... ni vivas vane... polvo... morto... frazaj frazoj.

Tiam la episkopo forturnis desur li siajn malvarmajn okulojn, kaj frostotreme ekrigardis en nokton. La noktomezo estis delonge pasinta.

„Tamen, se oni alrigardas ĉi tiel en la nokton? Kiam oni staras, jen ĉi tie, en la mallumo, ĉe la pordo? Kiam oni rigardas ĉiujn kampojn en lunlumo? Ĉiuj montoj en malproksimo... urbo, tegmentoj... tieaj nuboj... stelaroj... la ĉielo plena da lumo? Kiam oni eksilentas antaŭ ĉio ĉi? Ĉu ankaŭ tiam ni kvazaŭ pasas malprudente... sence... ĉu eblas, ke ĉio ĉi estas senfunda malpleno?“

Tiam la honorinda Isakoviĉo komencis veki Komisaron kaj, jam tute ebria, ekgapis en la nokton, plenan da steloj, trapasinte per la rigardo ĉiujn lunlume heligitajn kampojn... ĉiujn arbarojn en malproksimo... montojn... kaj nubojn... kaj, tro proksimiĝinte al la vizaĝo de la episkopo, li elflustris... „*ityae eciru mihi...*“ kaj ekploris.



III.

TAGE KAJ NOKTE TRAFLUADIS LARĜA, MUCIDA RIVERO. KAJ EN ĜI, ŜIA OMBRO

La domo de Aranĝelo Isakoviĉo, granda konstruaĵo, sur akvo, ĉe la rando de la arĝentoriĉa Zemuno, estis en la printempo 1744 denove refasadumita. Farbita blue kaj flave, leviĝante super la ĉirkaŭaj, pajlaj tegmentoj, sub cindrejoj kaj tranĉeoj, en kiuj nestiĝis cikonioj, ĝi estis videbla el malproksimo, desur akvo, inter salikoj, pro kio ĝin konis ĉiuj fiŝistoj kaj ŝipistoj.

Sub monteto, kiun disfosis printempo, per la unuaj plantoj kaj talpoj, tiu domo enpikiĝis en la bordon de Danubo, inter multaj lignaj, buntaj cignoj, ŝalupoj kun fleksitaj koloj. Ĝia tegmento el traboj, kiuj estis forprenitaj desur granda grenejo, kun ramita argilo, altiĝis super ĉiuj brutejoj kaj gregejoj en ĉirkaŭaĵo, pro kio ĝi similis al antaŭdiluva ŝipo. El ĝi aŭdiĝis obtuza rorado de virbovoj kaj bovinoj, klakbruo de ĉevaloj kaj kameloj, voĉoj de virkaproj kaj virŝafoj, beado de ŝafoj kaj ŝafidoj.

Malantaŭ hurdoj de tiu domo, kie tra profunda koto oni ŝarĝadis barojn, de mateno ĝis mallumo, kaŝis Aranĝelo Isakoviĉo la lastan restaĵon de brutoj, kiuj estis alpelitaj desur violkoloraj deklivoj de la monto Ŝaro kaj paŝtejoj apud la rivero Bistrico.

De unu flanko la vidaĵo estis plena da akvo kaj malsekaj insuloj, super kiuj blankis minaretoj kaj defendmuroj de Beogrado, en paleblua ĉielo. De la alia flanko akvo estis disfluanta en maron da koto, kiu vastiĝis senfine, kun malhele blua ĉielo super si, ĝis la fundo de la mondo.

La domo estis ĉirkaŭita per profundaj fosaĵoj, gregejoj kaj fojnostakoj, kiesodoro, en antaŭvespera sunbano, degelis kaj estis pasanta ne nur tra brila aero, sed ankaŭ tra varmega, aermanka umaĵo. En senĉesa brukurado kaj tumulto de paŝtistoj kaj ŝipistoj, en ĉiutaga rumoro de brutoj kaj bovistoj, la domo tamen restis sensona. Fermita de ĉiuj flankoj, surgluita, ĝi havis nur unu enirejon, malaltan kaj plenan da kolomboj, sub traboj desur

kiuj pendis feloj. Antaŭ nokto, kiam ĉirkaŭ ĝi ekmoviĝis boatoj kaj ekbrulis multaj fajroj, ĝi vere similis al barko, granda kaj gluiĝinta en koto.

En tiun domon de la frato evakuis Vuko Isakoviĉo la edzinon kaj du siajn knabineton, kiujn oni alveturigis en ĉaro, plena da kamizoloj, peltmanteloj, tapiŝoj, arĝentfadenaĵoj, perlaĵ pingloj kaj arĝentaj butonoj, tra plorado de amasego da virinoj kaj kadukiĝintaj servistoj.

Pli juna ol la frato, Aranĝelo Isakoviĉo kondukis al la pli aĝa frato kiel oni kondukas al malpli aĝa. Starante apud la frato, li rigardis la fraton kompateme, kaj sidante apud la frato, li cedadis al la frato bonvoleme la lokon, kvankam li estis maldika kiel vergo, dum la frato estis peza kiel barelo. Kiam al li la frato parolis ion, li ne rigardis en ties okulojn, sed, ridetante, rigardis super ties ŝultrojn. Li neniam respondis tuj.

Ankoraŭ dum lia frato servis la princon Aleksandron Virtembergan, en Beogrado, li kutimiĝis savadi la fraton de ŝuldoj, de malliberejo post batkvereloj, de vundoj kaj de malsanoj post militoj. Vagante kun la patro, kiu sekvis armeon, ĝis Konstantinopolo kaj Vieno, komercante per greno, brutoj, tabako kaj ĉiam pli ofte per arĝento, li komencis pruntedonadi monon absolute al ĉiuj, tiel ke post du-tri jaroj, murmurante dormeme, antaŭ ol ekdormi, li neniam sukcesis elkalkuli ĉion, kion oni ŝuldis al li. Lia frato ne tre zorgis pri ĉio ĉi. Survoje, li fojfoje rememoris la fraton kiel iun neatenditan ŝuldanton, strangan, sub soldata bulĉapelo, inter la homamaso vestita per longamanikaj vestoj, kun fezoj kaj rozarioj, kontraŭ kiuj Aranĝelo Isakoviĉo luktis, en Valaĥio kaj Turkujo, kaj tio estis ĉio.

Li provis malrekomendi al la frato armeservon, instrui al la frato komercarton, sed la frato baldaŭ eksopiris siajn ĉevalojn kaj sabrojn. Post la morto de la patro, kiam ili ne mallonge estis kune, li gvidis la fraton kun si, kvankam tio suferigis lin. Vuko iĝis kaj ebriulo kaj malĉastulo kaj luktamulo terura, barele peziĝinta.

Tiam li edzigis la fraton, trudpetante por li ĉiujn komandantojn ĝis Vieno, subaĉetinte preskaŭ la tutan Osekan urbon, el kiu li penplene irigis la fraton al la edziĝfestoj. La knabinon por la frato li trovis hazarde, dum laboro, en Triesto, en la domo de Hristoduloj, al kiuj li ŝuldis ok mil arĝentmonerojn. Ili rapide interkonsentis. Al li ekplaĉis la knabino, ĉar ŝi estis juna, alta, sana kaj ĉar persiste silentis per siaj grandaj, lazuraj okuloj.

Li geedzigis ilin, survoje, en Brodo, rapidante laborcele, en la domo de sia amiko, greko. Li veturigadis ilin poste, pagante ĉiujn kostojn, sur Danubo, tien-reen, same kiel siajn herdojn. Nur aŭdinte, ke la bofratino estas naskonta, fiera pri siaj Vukoviĉoj kaj Isakoviĉoj, samkiel liaj antaŭuloj, li ekiris viziti ilin, elĉerpita, pro vojaĝo, negocado kaj friponadoj, al kio li jam

kutimiĝis. Tiam, kiam li unuafoje ekvidis ŝin graveda, Aranĝelo Isakoviĉo komprenis, kiun li alkondukis al sia frato.

Rekta kaj forta, anĝelsimila, kun altaj genuoj, kun sino kaj brusto, kiuj, ĉe ĉiu paŝo, tremis, ŝi preteriris lin, elirante el barko, kvazaŭ volante montri al li, ke ŝi, kvankam malmola kiel ŝtono, tamen facile serpentumas kaj luliĝas. Al li ekŝajnis, ke virinon tian li neniam vidis.

Li forveturis el la domo de la frato, post kelkaj tagoj, urĝe. Kaj ne volonte li revenadis. Li fuĝadis de ili, kiel diablo de kruco, sendante poste donacojn, arĝenton, silkon, perlokolierojn. Kiam li devis alveni, li venadis malvolonte, kaj foriradis subfleksiĝinta. Vivante malproksime de ili, Aranĝelo Isakoviĉo iĝis homo tro frue sekstatura, flaveska, genutrema. Plej volonte li komercis surakve. Li deziris ĉion traveturi per ŝipoj, senmova kaj enpenŝiĝinta. Dum kelkaj jaroj, lia dorso kurbiĝis, la fingroj iĝis trememaj.

Li songiŝis ŝin, suferante, preskaŭ ĉiun nokton.

Li vidis ŝin en ĉiu mallumo, negrave kie li estis. Al li ŝajnis, ke lin vualas ŝia hararo, kun pezaodoro de nuksoj, delikata kiel silko. Ŝi tuŝis lin per la hararo, plurfoje, kisocele proksimiĝante al lia mano. Ankaŭ li plurfoje tuŝis ŝian hararon. Post tio li rapide enpikadis siaj ungojn en tabakon, kiun li estis sekiganta sub sunradioj kaj apud fajro.

Eĉ kiam ŝi ne ĉeestis, li sidis ofte enpenŝiĝinta, fiksrigardanta ŝian altan frunton kaj brovojn, kiujn, kaj la fratojn kaj ŝiajn parencojn, nomadis hirudojn. Kiam ŝi ĉeestis, li sinforgese, fiksrigardis ŝin, ĉiam palan, kun la lipoj iom kurbaj, kaj kun longaj okulharoj, sub kiuj estis mallumo. Li kapablis atendi plurajn horojn, sub kia ajn preteksto, por vidi ŝin ekiranta dormi, laca pro fumo kaj kafo. Tiam ŝi rektiĝis, streĉinta la talion, kun altaj, rektaj ŝultroj, por preni du masivajn perlojn de la oreloboj. Dum tiu ŝia movo li tute tremis.

Eĉ kiam li fermis la okulojn, li vidis ŝian palan haŭton kaj ŝian bruston kaj la okulojn grandajn kaj bluajn, havantaj la koloron de vintra, pura, vespera ĉielo, okulojn kiuj lin neniam rigardis malklare.

Fuĝante la unuan jaron de ŝi, li fuĝis kiel oni fuĝis de tento, murmurante kolere: for, malfeliĉo! Samkiel li evitadis furiozajn ĉevalojn, pezajn vinojn, samkiel li foje kaŝe fuĝis el tranoktejo, en Bruso, timiĝinte, tiel li forlasis ankaŭ la domon de la frato. Forpreni la edzinon de la frato – tio sendube ne povis okazi. Al li ŝajnis jam, subite, ke tiun virinon ne li veniĝis. La eksterordinaraj, fortaj gamboj, la luliĝo, la rido. En la unua momento, li ektimis pri la frato. Li komprenis, ke en la domon de la frato li veniĝis diablon. La tremado sur la brusto, la altaj genuoj dum la irado, la profunda sinsekvo de spiroj dum fumado. Rimarkinte ŝian brustomolon, la

ondiĝon sub ŝia silkaĵo, dum ŝi kuŝis, li kun konsterno komparis ŝin, en la memoro, kun ĉiuj valaĥinoj, italinoj kaj armeninoj, kiuj estis en liaj manoj, en la mondo, dum li negocis. Li ektimis, ke ŝi konsentos peki ie ajn, en la domo, nokte, apud lia frato, pro la donacoj, falsperloj, jesperloj, kiujn li komencis alporti. Li ektimis, ke li surprizos ŝin kun servisto, ŝipisto, kun iu ajn, tial li fuĝis.

Sed kiam li duafoje revenis, kaj vidis ŝin kun malgranda infano, li preskaŭ ekploris. Tiom estis serena, ĉiela ŝia rigardo, puraj manoj kaj gorĝo. Kompatante sin, li al ŝi ŝerce, senkonscie, rakontis, kiel ŝi vivus, se ŝi estus lia. Li rakontis, kiel li gardus ŝin, kiel li ŝin ĉien kun si venigus, kiel li vestus ŝin. Al li ŝajnis, ke la homa vivo estas bela, ke kun ŝi, kaj kun ŝia infano, ĝi estus gaja, negrave kien ili veturus. Dum li kisis ŝian infanon, en memoro lia komencis saltetadi sur lia kapo centoj kaj centoj da malgrandaj valaĥidoj, germanidoj, hungaridoj, kies patrojn li troekspluatis. Turmentante ĝis tiam la homojn, kun delico, li decidis ekde nun ilin nulĝeni, sentinte, ke ankaŭ ili nun ĉi tiel sidas kun siaj edzinoj kaj infanoj. Tiam, unuafoje, li aŭdacis eĉ tuŝi ŝin. Kaŝe li ekkonis ŝian hararon, ankaŭ malplektitan; foje li kisis ŝian vangon, fiksrigardante ŝin longe; li premadis ŝiajn malmolajn ŝultrojn, senkonscie, helpante ŝin foje butonumi sin, kvankam ŝi ne petis lian helpon. Plurajn horojn li sidis kun ŝi, ludante kun la infano, aŭ kun hundoj, sed perokule manĝegante ŝin. Eĉ ne unu momenton en lian kapon venis ideo, ke li povas ekdeziri la edzinon de sia frato. Male, la frato al li ŝajnis feliĉa homo, same lia amo al tiu virino – io nekomprenebla al la aliaj, kvankam al li mem tio estis tute klara. Li vivis por ili, neglektante sian negocon, penante finfine loĝigi ilin daŭre sur konstantan lokon.

Li jam komprenis ke la feliĉo de lia frato estas tute hazarda, sed ke tiel devas esti. Ankaŭ li povis, hazarde, trovi tiun virinon, sed se tio ne okazis, tio signifas, ke ŝi ne estas destinita al li. Sen amarsento kaj malespero li restis tiel apud ili longe, ĝis la unuaj tagoj de printempo. Li veturis sur ĉaro sur inundita tero, kontrolis masonadon de la preĝejo, kiun lia frato komencis starigi, en la vilaĝo, kiun ilia patro loĝigis. Li vojaĝis por plenumi ekleziajn taskojn, en kiujn lia frato lin enmiksis, revenante ĉiam, kun kiso, al tiu virino kaj infano, kvazau ili estus liaj. Tute kontenta, li vizitadis grenon, kiu komencis ankaŭ en valfundo, en koto, kreski, kaj pensante pri ŝi, pri ŝi tuta, li observis flugadon de birdoj, sunbanante sin sur la ŝipo, dum oftaj veturoj en Budaon.

'Tamen, post tiuj kvietaj tagoj, sub blankaj nuboj de akacioj, kvankam li tion ne rimarkis, li komencis fari, en la domo de la frato, malbonon. Ĉiam pli ofte li tuŝadis ŝiajn manojn, hararon, ŝultrojn, eĉ talion. Ĉiam pli

ofte li proksimiĝadis por enspiri la odoron el ŝiaj punktoj sub la gorĝo, aŭ por helpi ŝin, kvankam ŝi havis multajn servistinojn, dum dormigado de la infano vespere, aŭ dum ties vestigado, matene. Lia frato, forirante ofte sub Varadinon, por trejni siajn homojn dum pretigo de fosaĵoj, tranĉeoj por sieĝo de urboj, aŭ, sur ĉevalo, malproksimen, en Mitrovicon, en armilfarejon, rimarkis nenion. Kion ŝi rimarkis, kion ŝi pensis, tio estis videbla nek sur ŝia vizaĝo, nek en ŝiaj okuloj. Tamen, kiam iun vesperon, dum Palmodimanĉo, li alvenis, kiam ŝi estis bananta sin, en ĉambreto kun granda argila forno, en kiu oni ordinare bakis panon, li, ekdezirinte eniri tien, komencis tremi, sentante kion deziras kaj kion atendas. Tiam li foriris, ne adiaŭinte ilin, kaj longe, malgraŭ multaj petoj de la frato, li nek revenis, nek sendis informon pri si.

Nur kiam ankaŭ la dua filineto naskiĝis, kiam la infano komencis abscesi, li kontaktis la fraton, kiu kun soldatoj ekiris en Italujon. Li vizitis ilin en Vieno, kie ili lokiĝis en malalta malgranda gastejo, malantaŭ fruktarbejo. Lia frato estis grandega kaj ankoraŭ bela, kvankam iĝis peza kaj komplete grizethara. Ŝi ja amis lin kun ardo, kiu al li ŝajnis besteca kaj repuŝa. Ili interkisis ankaŭ antaŭ li, ili interpremris kaj interkaresis oftofte. Tutnokte li aŭdis ilian fuŝradon kaj rukuladon, dum la malsana infano oftofte vekigadis kaj ploris. Kvankam ŝi nun estis ankoraŭ pli bela, la bofratino jam ne ebriigadis lin per siaj paŝado, fleksiĝado kaj la brusto, kiel antaŭe. Tiel al li almenaŭ, unuamomente, ekŝajnis. Antaŭ la disiĝo de la edzo, ŝi estis tute ŝveliĝinta pro senĉesaj amoraj noktoj, sendormaj kaj senkvietaj. Larmokovrita kaj timanta, ke li ne revenos al ŝi, ŝi kisadis la edzon, senhonte kaj senlace. Ĵaluzo absorbis ŝin. Ŝi suspektis, ke li amkontaktos ĉiujn friulaninojn kaj venecianinojn. Ŝi penis tiel dolĉigi la disiĝon, ke li ĉiutage deziru reveni.

Tion ŝi provadis ĉiel. Ŝi surmetadis siajn triestajn kaj veneciajn robojn, plenajn da travideblaj punktoj, streĉadis siajn silkajn ŝtrumpojn kaj volvaĵojn sur la brusto, kaj poste denove demetadis ilin. Kvankam ŝi ne sentis kante-mon, kvankam ŝi estis larmvualita, ŝi drinkis kaj kantis. Ŝi kaŝiĝadis kun la edzo, kisadis liajn kolon, bruston, buŝon, orelojn.

Arangelo Isakoviĉo, sekiĝinta kaj flava, travivis tiujn kelkajn semajnojn kvazaŭ en infero. La granda, imperiestra urbo ŝajnis al li vera frenezulejo, tra kiu kuras soldatoj, ĉevaloj, maljunaĉaj kavaliroj kaj duonnudaj virinoj, kortegaj oficiroj kaj metiistoj, nur dio scias kial, kaj kien. Gajninte proksimume mil talerojn, vendante arĝenton, al sia amiko, greko, Dimitrio Kopŝo, li ne estis tre malkontenta, sed li sentis neesprimeblan enuon. Lia frato Vuko, kiun li senfine amis dum tiu estis infano, ĉar tiu estis pli forta,

kaj ĉar tiu sciis la ciganan lingvon, estis al li kara ankaŭ poste, kiel peto de la patro, kaj kiel freneza, vera soldatego, kiu timis nur lin. Forpreninte de li la tutan bonhaston, trompe, post la morto de la patro, dum heredproceso, li poste ekkompatis la fraton, kaj komencis helpadi lin, ĉiutage ĉiam pli riĉa, fervore kaj fratece. Nun, unuafoje, la frato ekŝajnis al li homo tute fremda.

Forirante ĉiun tagon en Komandegojn, en Kortegon, lia frato vestis kulton kaj surkapigis falsharajon, foriginte ankaŭ la lipharojn, ornamaĉis sin per ordenoj kaj bluaj bendoj, larĝaj kiel mano, kaj kun spado, maldika kiel fingro. Portante la leteron de la patriarko Ŝakabento en Kortegon, kune kun la grafo Gaisruko farante liston de soldataj vilaĝoj Slavoniaj, li iĝis zorgema kaj silentema, sed ankaŭ aroganta. Sendube, al Aranĝelo Isakoviĉo ĉio ĉi estis enuiga. Nenion fratecan li sentis, li eĉ ne komprenis, kial li fakte devus senti, ion fratecan, rilate al tiu nazo, al tiuj sangoruĝaj okuloj, flavecaj, plenaj da punktetoj, al tiu vera bubaĉo, vestita kiel timigilo. Fumante ĉiam pli, nombrante, senfine kaj senkonscie, rozariojn, Aranĝelo Isakoviĉo travivis tiujn kelkajn semajnojn tute vane. Li nek bedaŭris ke la frato denove foriras, kadukiĝinta, plurfoje vundita, trasuferinta, eble por morti, nek bedaŭris, ke post proksimume unu semajno li eble jam estos sola, sen patro kaj sen frato, sen iu ajn en la mondo. Samtiel preterirados homoj, preterveturados barkoj, li samtiel komercos, manĝos, kalkulos rozarierojn. Tiu frato lin tute ne interesis. Nek ties nazo, nek ties ventro je kiu tiu malsaniĝadis, nek ties laboroj kun monaĥoj, pri kiuj la frato oftote parolis. Lin fakte tute ne interesas ankaŭ tiuj infanoj, per kiuj la frato deziris trudŝarĝi lin. Tion li eĉ diris al la frato.

Koncerne la bofratinon, ankaŭ ŝi nun tedis Aranĝelon Isakoviĉon. Tio ne estas tiu belega virino kun malgranda infano, kiun li estis kisinta tremegante pro peka pasio, ravita kaj malĝoja. Ĉi tiu virino ŝajnis al li simple sengusta. Matene li vidis ŝin kuŝanta, varmega, kun la okuloj dismalfermitaj pro amora fortostreĉo. Vespere li aŭdis ŝin, tra muro, parolanta, vortkaresanta la edzon, tirante lin frue en la kuŝejon. Tuttage li vidis ŝin, senĉese, larmsingultan kaj vekriantan, brakumantan kaj vestiĝantan, kroĉiĝantan al la kolo de la edzo. Verdire, ŝi nun estis precipe bela, seksarda, samtempe obeza, malpudora, sed ĉu samtiaj ne estis ankaŭ la aliaj inoj kun kiuj li umis? Sed ĉu tiuj infanoj, malsanaj kaj larmvualitaj, ĉu tiu virino, vespere iomete eĉ drinkinta, devas esti objekto de lia envio, same kiel tiuj vundaj cikatroj, ordenoj, gloro? Li rompu la kolon ĉevalrajde en malproksimejo, en Italujo, sed li ne pensu, ke tio Aranĝelon, kiel fraton, eĉ iomete koncernos. Tion li diris al la frato.

Kiam la frato poste denove revenis, Aranĝelo Isakoviĉo prokrastis lin viziti, portante en si, malgraŭ ĉio, la malfeliĉiga deziregon je la korpo de sia bofratino.

Nur kiam Vuko Isakoviĉo devis ankaŭ la kvaran fojon ekiri en militon, li konsentis alveni kaj adiaŭi lin.

Veturante tien, li ekiris unue en Zemunon por vidi la domon, kiun li aĉetis, por pli facile komerci kun la turkoj. Post tio, ne antaŭvidante malbonon, li alvenis al la frato tia, kia foriĝis, malbonhumora, malica kaj flaveca. Ankaŭ la frato renkontis lin senvole – maljuniĝinta, ŝanĝiĝinta.

Sed ekvidinte la bofratinon, li haltis konfuzegita.

Tio estis nek la frue edziniĝinta, alta knabino, nek la belega novedzino kun la kapo de sia filineto sur la mammo, nek la plenkarna, grandbrusta virino, kiun li aŭdis tra muro tutnokte ŝmackisanta kaj murmuranta. Tio estis virino, kian li neniam vidis ie ajn.

Ŝia palo estis kompleta, kadrita de hararo, kiu nun estis ankoraŭ pli malhela, same kiel ŝiaj brovoj. Super la frunto kaj nazo ŝi portis brilon, pro blinkanta lumo, kiu fojfoje al li ŝajnis blanka, silka, Venecia maskovualo. Nur en la nazruoj ŝi havis ruĝon kaj malhelon, dum ŝia buŝo estis malpli granda, diferenca de la antaŭa, pli pala kaj complete sensona, sub senĉesa, mirinda rideto, kiu ne perdiĝis eĉ kiam ŝi lin malgaje alrigardis. Ŝi ja ofte alrigardis lin per larĝe malfermitaj okuloj, ke al li ekŝajnis: li alvenis sur la bordon de profunda, lazura maro.

Ŝajnis, ke ŝi lin tute ne konas, ĉar ŝi demandadis lin pri tio, pri kio ŝi neniam antaŭe lin demandis. Ho, se nun lia frato pereos dum la milito – ekpensis li, kaj teruriĝis, pro kio li eksentis bezonon kruĉsigni. Ŝi ne plu iris tiel pasie, ŝi nur volonte, alta, rekta, staris antaŭ li. Peza kaj ĉarmega, ne sciante, eble, ke li tremas. Ŝi estis pli bela ol iam ajn antaŭe. Sensonema kaj alieca, ŝi ofte mantuŝis lin, kaj foje, vespere, kiam la pordo estis malfermita, tiel ke li povis rigardi, ŝi vestis sian novan, Venecian robon.

Ŝi mensogis. Li komprenis, ke ŝi mensogas jam dum la unuaj tagoj, kvietaj kaj bela, malgraŭ tio. Ŝi mensogis, antaŭ la edzo, kun brila, blanka rideto. Mastris ŝi kaj en la domo, kaj sur la kampoj, kiujn ili tiun jaron, jam ankaŭ en la valetoj, apud la akvo, komencis plugi, eĉ ĉe brutaroj, la servistojn kaj paŝtistojn, la tutan setlejon. Oni ŝin malamamis, kaj sentis timon antaŭ ŝi. Antaŭ ŝia rideto.

La infanojn ŝi transdonis al la servistinoj; nur antaŭ la edzo ŝi tenis ilin sur la sino. Kun rideto. Foje, matene, ŝi demandis la bofraton, ĉu al li ne ŝajnas, ke lia frato abrupte maljuniĝis? Tiun tagon, Aranĝelo Isakoviĉo proponis al la frato sian domon en Zemuno, kaj rekomendis, ke tiu la edzinon kaj la infanojn evakuu tien.

La sinjorino Dafina estis transloĝiĝinta en la domon de sia bofrato. Ŝi devis tie vivi, kun siaj filinetoj, kelkajn monatojn, eble eĉ kelkajn jarojn,

ĝis kiam ŝia edzo revenos el la milito. Ŝi devis tie atendi ankaŭ sian trian akuŝon, ĉar ŝi estis de tri monatoj graveda, kion ŝi konfesis al la edzo nur antaŭ lia foriro.

Kun du ĉaroj, plenaj da roboj, ŝi venis en la domon preskaŭ nerimar-kita de ĉiuj zemunanoj, kiuj en bluaj longmanikaj vestoj, nigraj feltoĉapoj kaj botoj, ŝvabaj oficiraj ĉapeloj, flavaj silkaĵoj kaj ornambendoj, kuntiritaj jupoj, ariĝis ĉirkaŭ la domo de Aranĝelo Isakoviĉo, por vidi ŝin.

Lokinte la infanojn, kun siaj servistinoj, en triangulan parteton de la domo, sub plafonon, plenan da musoj, kiu fleksiĝis sub la pezo de faruno, ŝi por si elektis, tuj, grandan kaj malaltan ejon, plenan da tapiŝoj, planku-mitan kaj kun apogtraboj, en kiu estis starigita ankaŭ granda, argila forno. Enirinte tien, ŝi unue kontrolis ambaŭ elirejojn, kaj poste ordonis fari novan aranĝon en la domo. Longatempe ŝi staris ĉe granda, alrivera, fenestro kun krado. Tiun lokon ŝi elektis dum la unuaj tagoj, por tie satplori. Tage kaj nokte tie preterfluadis larĝa, mucida rivero. Kaj, en ĝi, ŝia ombro.

Tamen, kvankam ĉiun tagon havanta sian plortempon, ŝi dum kelkaj tagoj sukcesis akcepti, en tiu ejo, duonon da zemunanoj. Edzinojn de ofi-ciroj, germaninoj, filinojn de komercistoj, multe pli junaj ol ŝi, grekinojn, poste ĉiujn edzinojn de amikoj de ŝia bofrato kaj de la edzo, kaj ĉiujn iliajn filinojn; dikan turkinon kun pendantaj palpebroj, kiu post konkero de Be-ogrado transfuĝis, eĉ du valaĥinojn, fratinojn, pri kiuj oni sciis, nek kies ili estas, nek kio ili estas.

Proponante al ili kafon, mielvinon kaj nargileon, ŝi de ili eksciis, kion scias Zemuno, dum Zemuno de ili eksciis, kion ŝi scias. Baldaŭ ŝi jam sciis, ke la domoj en Zemuno estas flavaj, bluaj, altaj kaj nealtaj, kaj ankaŭ al kiu apartenas ĉiu domo. Poste, kiu mortis en la domo ĉe angulo, kiu suferas vommalsanon, en la domo kun granda morusujo. Kiuj negocistoj deziras edzigi sian filon, kaj kiu deziras edzinigi sian filinon. Kies filon al kies fili-non, kaj kies filinon al kies filo. Kiam oni parolis pri akuŝo, ŝi aŭdis kiom da ili akuŝos en ĉi tiu monato, kaj kiom en la sekva. Ankaŭ, ke iu virino mortis, trinkinte kuiritan cindron kun vinagro, por ne plu naski, ĉar ŝi jam havis ses infanojn. Ankaŭ, ke ŝi nun aperas nokte, flugante sur blanka littuko. Ankaŭ, ke Dimĉo Diamanto, krom la unuan, oficialan edzinon, venigis ankaŭ alian, kaj ke nun ili vivas triope. Post tio, ke onidire ŝia edzo, ĉefkapitano Vuko Isakoviĉo, estas foririgita el Peĉao, ligita, en Temiŝoaran fortikaĵon. Tie lin la barono Engelŝofeno iun tagon trovis, kisis, liberigis, li baldaŭ revenos kaj ne-niam plu iros militi. Ke kun li revenos ankaŭ la sepopo, kiu foriris el Zemuno. Kaj finfine, ke la filino de Nikolao Panajoto alportis el Vieno ĉemizojn, longajn nur ĝis la genuoj. Kaj ke ŝi estas lama je la maldekstra piedo.

Zemunanoj eksciis de ŝi ankaŭ: ke kontraŭ galvomado bonega kuracilo estas oleo kun boligita sukero, kaj ke en Beogrado, transrivere, ekzistas akuŝistino, turkino, pretiganta brandon, kiun oni trinkas en varmega banejo, unu fojon monate, post kio oni eĉ pensi ne devas pri nasko. Ankaŭ ke milito en Germanujo jam delonge komenciĝis, kaj ke ŝia edzo kun la soldataro tute ne estas en Peĉao, ke li tion mesaĝis al la frato, pasintsemajne, el iu urbo, kiu nomiĝas Radkersburgo. Kaj ankaŭ, ke ŝi vidis en Venecio ne nur ĉemizojn, kiuj longas nur ĝis la genuoj, kiajn onidire el Vieno alportis la filino de Nikolao Panajoto, sed ankaŭ robojn, fakte nur deantaŭe, dum dedorse ili longas ĝis la tero, kaj eĉ treniĝas sur ĝi.

Post tio Zemunanoj eksciis ankaŭ tion, ke ŝi estis orfino, kiam oni ŝin edzinigis al Isakoviĉo, ke ŝi pensis, ke li unu jaron por ŝi estos kiel patro, ĝis kiam naskiĝos la unua infano, kaj ke li nur tiam iĝos ŝia edzo. Krom tion, ke ŝi preskaŭ ĉiam estis tute sola, ke ŝi multe ploradis. Zemunanoj poste eksciis ankaŭ, ke Isakoviĉo havis multajn virinojn, malbonajn kaj malicajn, valaĥinojn, hungarinojn kaj germaninojn, samkiel, interalie, ankaŭ lia frato Aranĝelo, en kies domo ŝi trovis protekton, sed pri kiu ŝi scias, ke ankaŭ li havis multajn grekinojn, armeninojn kaj venecianojn, kies lingvon li scias. Poste ankaŭ, ke ŝian edzon amis la edzino de la princo Virtembergo, kiu loĝis, jen, en la granda konstruaĵo, en Beogrado, kie nun vivas Paŝao. Kaj ankaŭ, ke ŝi ploras nun, ĉiunokte, ĉar ŝi havas demonajn sonĝojn, kaj ke sonĝas, ke ŝia edzo aperas, kiel mortinto, en la terura formo de ranoj, rabobestoj kaj ratoj. Kaj koncerne onibabilojn, ke ŝi estas lama je la maldestra piedo, ŝi montris al ili ambaŭ piedojn, deantaŭe kaj demalantaŭe, ke ili mem vidu.

Tiel la sinjorino Dafina Isakoviĉo konatiĝis kun Zemunanoj, kaj Zemunanoj kun ŝi. Ŝi nenien eliradis, kaj tre ploris.

Kvankam ŝia rilato al la mondo estis tiel simpla kaj ordinara, reala, ŝia rilato al la bofrato, same kiel al la edzo, estis nek tiel ordinara, nek tiel simpla, sed iel ĉielsfera. Ŝi kun la bofrato fakte ne parolis. Ĉion ĉi ŝi ne diris al li. Antaŭ li ŝi tute ne estis tia.

Antaŭ li, ŝi plej ofte, silentis, plorinta, kun mistera rideto. Kiam ŝi parolis kun li, ŝi parolis pri tute aliaj aferoj. Ŝi parolis al li pri nokto, kiun ŝi timas, pri mallumo, en kiu ŝin obsedas timo kaj reaperantoj. Pri sia junaĝo, kiu forpasis. Pri la vivo, kiu por ŝi estas tiel peza. Kaj, kun la larmoplenaj okuloj, pri la edzo kiu ŝin, ŝajne, jam ne amas, kiu eble, ŝin neniam amis.

Antaŭ Aranĝelo Isakoviĉo la sinjorino Dafina ofte staris, kun la brusto kaj manoj levitaj, malespere, super la kapo, kunigitaj. Antaŭ Aranĝelo Isakoviĉo la sinjorino Dafina nek kriis, nek maldiligentis, kuŝante sur tapiŝo

sternita sur planko, nek antaŭ li sidis inter tiuj virinoj. La tago estis por ili, la vespero estis por li. Por li estis nek la ridsonoro, nek la babiletado, nek ĉio ĉi. Por li ŝi kaj ankaŭ alian voĉon, kaj alian rigardon, tutan alian sinmontriĝon. Ne nur ŝi, sed ankaŭ ŝiaj servistinoj, sen speciala ordono, ŝanĝiĝadis, kiam li venis. La domo tiam kvietiĝis, meĉojn kovris vitro, antaŭ li ĉio iĝis agrabla.

Ne opiniante, kiel Aranĝelo Isakoviĉo, ke ŝi estas plejbelulino, ŝi tamen sciis sian valoron. Pri siaj piedoj, kiuj al li ŝajnis kiel piedoj de forta anĝelo, ŝi absolute ne estis kontenta. Ŝi kaŝadis ilin sub silkan sian veston, vidigante nur la pinton de siaj fajnaj pantofloj. Koncerne tibiojn kaj genuojn, ŝi fieris pri ili, pensante pri ili same kion pensis li, kaj vidigadis ilin, krucigante la gambojn, ĉiufoje kiam ŝi tion povis. Ŝi ĉirkaŭiradis lin per paŝoj siaj energiaj, per paŝado rekta, kiun direktis ŝiaj koksoj. Al manoj siaj, kiujn ŝi ankoraŭ neniam mallevis sur lian kolon, ŝi permesadis ĉe lia kolo ŝoviĝi, gliti, fleksiĝi kiel serpentoj. Bruston sian ŝi proksimigadis al li tiel, kiel oni ame proksimigas la vangojn. Tamen, plej multon ŝi atendis de siaj okuloj. Lin ŝi rigardis malgaje.

Aranĝelo Isakoviĉo, kiel bona negocisto, vidis pri kio temas. Li komprenis, ke tiu virino, kiel knabino, estis povra, timema, kutimiĝinta al soleco kaj neplenumitaj deziroj. Ankaŭ, ke ŝi jam ne estas tia. Li komprenis, ke tiu virino dume iĝis granda kaj fortika besto, kiu kun la urso kuregis tra mallumo, kiel furioza. Tamen, kio kun ŝi okazas nun, tion li jam ne povis kompreni.

Li ne emis atendi. Sentante abomenon, pro tio, kion li volis fari, Aranĝelo hastis. Li ne volis pensi pri tio, kio poste okazos. Decidinte geumi kun la bofratino, li ne volis pensi pri la frato. Tiu frato, grandega, peza, en ĉaro, tutkovrita per blua arĝento, kun blanka plumo, tamen konstante estis antaŭ liaj okuloj. Lacega pro sendormo kaj konscienciproĉo, eĉ ne unu vorton dirante al iu ajn, atentante ne malkaŝiĝi per iu ajn rigardo, movo, spiro, li tamen esperis, ke tio okazos sen ies ajn scio, kaŝe, kiel en sonĝo. Kaj, precipe, sen ia ajn malfeliĉo. Sekiĝinta pro dezirego, sonĝante ĉiunokte, en obscenaj sonĝoj, tiun virinon, li tamen ne deziris ŝin por longa tempo. Li emis nek forpreni ŝin, nek vivi, poste, kun ŝi, ankoraŭ kelkajn jaroj. Kun la kapo klinita dum tutaj tagoj, li eĉ havis frenezajn ideojn, samtempe, informi poste la fraton, por ke ili forpelu ŝin, kaj interpaciĝu, pardonu, ili ja estas fratoj.

Dezirante kiel eble plej rapide ricevi ŝian konsenton, li superŝutis ŝin per donacoj, provante per dusencaj vortoj, kaj per afableco, ricevi de ŝi iun signon. Tamen, tiun signon li ne ricevis.

Ŝi rigardis lin per siaj belaj okuloj, kiuj lazuris kiel pura, vintra, vespera ĉielo, kviete, kvazaŭ super ili brilis steloj. Insidajn liajn vortojn ŝi igis afablaj, missencajn liajn flatadojn – ordinaraj. Parolanta la tutan tagon stultaĵojn, ŝi iĝadis vespere prudenta kaj komprenkapabla, antaŭ la bofrato.

Klopodante pri ŝi, flaviĝinta, pro espero kaj atendado, tute mizera en sia longa, blua kaftano, Aranĝelo Isakoviĉo decidis entrepreni tuŝadon. Li kaptadis ŝian manon, karesadis ŝian hararon, ĉiam pli ofte. Levante ŝin foje, larmaran, desur la kuŝejo de malsana filineto, li kaptis ŝin subaksele, kaj kisis, tremante per la tuta korpo.

Tamen, ankaŭ tion, kio estis klara, ŝi igis neklara kaj kvazaŭparenca. Samtiel ankaŭ liajn proponojn, pervortajn, ŝi misinterpretis kiel zorgon parencon. Leĝerajn liajn manojn ŝi demetadis desur si kviete, ne rimarkante lian volupton. Ŝi ankaŭ tiam rigardis lin per siaj lazuraj okuloj, senemociaj kaj belegaj, en kiuj estis eĉ ne unu ereto de ardo. Malgraŭ tio, Aranĝelo Isakoviĉo frenezis ankoraŭ pli, ĉar li ankaŭ tiam, en tiu malvarma rigardo, konjektis ŝian volon: ke ĉio ĉi devas tiel esti.

Kvazaŭ per arĝento komercante, li penis mezuri ŝian konsenton, sed ŝi ne permesis al li fari tiun mezuradon. Eĉ ne unu nuran malgrandan vorton, eĉ ne unu nuran malgrandan signon ŝi konjektigis. Ŝi estis kvazaŭ netuŝita, kvazaŭ animforesta, kvazaŭ frostiĝinta. Ŝajnis, ke ŝi neniam en ĉi tiu mondo havigos sin al li. Ŝi volis, simple, ke li ŝin trudposedu.

La sinjorino Dafina, infano de tuta barko plena da negocistoj kaj arĝentamantoj, sciis ja tre bone pri kio temas. Ŝi ne hastis. Ŝi nek volis havigi sin al tiu juna, seka kaj flava bofrato, kiu memorigis ŝin pri ŝiaj domo kaj fratoj, nek ŝatis liajn manojn kun flavaj ungoj, nek liajn monaĥajn li-pharojn kaj barbon, nigrajn kaj maldensajn, nek liajn palajn, flavajn okulojn, platan, maldikan nazon, kaj ankoraŭ malpli liajn flaviĝintajn dentojn, ĉiam gluecajn pro dolĉaĵoj. Li kvazaŭ estus sekiĝinta portreto de ŝia edzo, kun preskaŭ neaŭdebla iro kaj paŝoj. Se iam ajn, dum tiu problemo kun la bofrato, ŝi sentis volupton, tio estis volupto al ŝia edzo. Al edzo ŝia, giganta kaj peza, kiun la sinjorino Dafina amis iam senfine, sed kiu nun estis tre kadukiĝinta, maljuniĝinta, kvankam fojfoje li ankoraŭ efikis impreso, surĉevale, forta kiel urso.

Kun bola sango, kaj voluptama tiom, ke ŝi ofte suferis kapdoloron, ŝi restis komplete malvarma en ĉi tiu domo, kie la edzo lasis ŝin atendi lin, trompinte ŝin dum la disiĝo, hontiginta ŝin antaŭ la tuta mondo, timanta ŝiajn larmojn, ŝrikadon kaj senkonsciigon, kio, dum la disiĝo, sendube devas ja okazi. Neniam ĝis nun ŝi estis elmetita al seksimpulso, ĉar neniu, krom ŝia edzo, troviĝis ĉe ŝi, tiel proksime. Se ĉi tio al ŝi estus okazinta dum

la dua aŭ tria jaro, ŝi estus mortinta pro honto kaj pudoro, ŝi estus saltinta sendube en la flavan, disfluitan, mucidan riveron, kiu fluas sub ŝia fenestro. Sed se tio estus okazinta al ŝi pasintjare, ŝi per sia ploro, petoj, kisoj, estus sukcesinta Aranĝelon kvietigi, rekonsciigi lin, deadmoni lin, ke li ne faru tion, por ne kuntiri ŝin en la inferon.

Sed, nun, nun ŝi kviete sentis lian spiron sur si, vidis apud si lian ombron, antaŭvespere, en duonobskuro, kiam ŝajnis, ke li parolas ion bagatelan. Tiel ŝi rigardis ankaŭ sian ombron, apud la fenestro, en ŝlimo, kiu tagnokte preterfluadis.

Ŝi sentis, ke estas sola. Mankis ajna certeco, ke ŝia edzo revenos. Kun siaj sovaĝaj homoj, ĉevaloj kaj hundoj, kun sia granda ventro, li foriris malproksimen, tre malproksimen. Timtremo ŝin trais, tuj kiam ŝi rememoris, kiom li nun, sendube, zorgas pri siaj filinetoj.

Ŝi deziris vidi, kion ŝia bofrato faros, kiam li iun tagon komplete frenezigos. Ŝi deziris, ke tio okazu, simple, pro enuo, pro malpleno, senfunda, en kiu, ŝi fojfoje kvazaŭ pendus kaposuben. Kaj same kiel ŝi tordiĝis spasme, deziregante la edzon, kisante lian bruston, kolon kaj orelojn, senprudente kaj obeeme, ŝi nun deziris vidi kiel ŝin kisados lia frato, kliniĝante super ŝiaj manoj, genuoj kaj sino. Ŝi sentis kiom timoplena kaj ŝanceliĝema li estas, sed ankaŭ, ke nur unu bagatelaĵo estas sufiĉa, por ke ili de tiu ŝajne kvietaj supraĵo renversiĝu en tiun malklaran riveron, hurle kaj energie.

Ridetante, terurplene, sen dezirego, ŝi sentis abomenon, komprenante ke tiu tago proksimiĝas. Jam tri semajnojn ŝi estis en tiu domo.

Alvenis la tago, samkiel tio ofte okazas en tiu lando, la printempan varmon kaj ekflorintajn fruktarkojn atakis frosto kaj glacia pluvego. Sub vento, kiu kurbigas la pluvon, sur riveroj, la ŝipo de Aranĝelo Isakoviĉo, plena da ĉevaloj, kiu estis veturanta, transen, al la turkejo, estis kaptita de akvo, kaj renversita. Lin oni penplene elakvigis, jam rigidan.

Kiam oni lin alportis hejmen, komenciĝis tia ŝrikado kaj vekriado en la domo, ke neniu eĉ miretis, ke ŝi mallaŭte, per la lipoj violiĝintaj, ordonis transporti lin en ŝian ejon, sur la grandan fornon, apud kiu estis metita larĝa, Venecia kuŝejo. Ŝi ŝrikis pro timo, ke li forpasos kaj lasos ŝin, sen protekto, kun malgrandaj infanoj, tie, inter tiu lia servistaro cigana, simila al rabistoj.

Tiun tagon Vuko Isakoviĉo estis transiranta kun la regimento, dum la tuta antaŭtagmezo, mallarĝan trabon, apud la urbo Kremmsminstero, en Aŭstrujo. Inter al la soldatoj komenciĝis mikskonfuzo.

Leporo transkuris lian vojon.

– Ho, gravas nur, ke la ponto ne renversiĝu – mense diris li, timante, ke liaj pakajoj enriveriĝos. Post tio, fiksinte la rigardon al la malseka ĉielo, kiu nubigis, li bridis, zorgema, la ĉevalon, kaj demandis la kapitanon Piŝĉeviĉon, kiu rajdis apud li: „*Cuyon signiphat ĉhez ityu Sunsubezirom Issignom, ho Pischewichom? Nos adweniims sanay ed in Trancwilom. Sobrez ityu Woyom Polwom disblowizzit Wentes, cūazes ĥeyam Curtenom. Corpom mihes etes Phillinnes, unnenascites, in Ismomentom malsanizzir powut.*“

En lian kapon eĉ ne venis la ideo, ke lia edzino, hejme, kornuligas lin.



IV.

FORIRIS VUKO ISAKOVIĈO, SED POST LI FORIRIS ANKAŬ FRUŜKA MONTA

Aranĝelo Isakoviĉo komencis droni, en la malvarma akvo, kune kun ĉevalo, kiu per la antaŭaj hufoj ŝprucigis supren ŝlimon, malklarigante per la malantaŭaj la kompletan akvon ĉirkaŭe, per flava sablo.

Kiam la barko renversiĝis, la muregoj de la Beograda urbo, super la akvo, transturniĝis kaj, dum momento, en liaj okuloj restis nur la ĉielo. Post tio, dum momento, sub liaj okuloj fluadis la rivero, sed nekredeble larĝa, kian li neniam vidis desur ŝipoj, kun la bordoj, kiuj ekŝajnis proksimaj preskaŭ du-tri horojn da irado. Tuj poste li mergiĝis kaposuben en senfundejon flavan, verdan, malhelan, poste plene malluman kaj malvarmegan, kiu kunmetiĝis super li.

Kiam li denove aperis, en la lumo super la akvo, inter ĉevaloj furioziĝintaj pro timo, li ne povis kribi, ĉar liaj gorĝo kaj buŝo estis plenaj de sablo kaj akvo. La profundo sub li, tamen, iĝis glita kaj senfunda, tial li sentis ke li trafalos tra ĝi, unue per la piedoj, post tio ankaŭ per la manoj kaj per la kapo, kvazaŭ tra la malplenejo, tra kiu li, vane, provis grimpi, vadi, rampi kvarpiede. Kun la fingroj kaj ungoj plenaj de ĉevalharoj, kiuj plenigis ankaŭ lian buŝon, li kaptis kanon, poste ŝtipon, sur kiun oni lin eltiris, tute gluitan de koto, kiu gutflui desur liaj okuloj, el la oreloj, el la nazo.

Tremanta kvazaŭ en deliro, dum oni portis lin hejmen, li sentis, triumfe, ke en la tumultaj ĉevalaj postaĵo, kruroj kaj muzeloj, aperis, super la akvo, ankaŭ lia kapo. Tamen ankoraŭ plurfoje, tiun tagon, al li ŝajnis, ke li denove braksvingas, ke li denove puŝiĝas, dronante, en la terura tumulto de ĉevala karno, haroj kaj malvarmegaj ondoj. Al li ŝajnis, ke li sinkas, vane klopodante haltigi la kaposuban faladon, kvarpiede, rampante, ruliĝante denove, tra la mallumo.

Nudigita, tutskrapita per sablo, poste envolvita en ŝafajn felojn, Aranĝelo Isakoviĉo estis alportita antaŭ sian domon kiel mortinto, sed kun la

okuloj tute malfermitaj. Tute blua, li tremis, sed estis lergersenta pro malvarmaj kvazaŭbirdoj, kiuj volis elflugi el lia korpo. Al li, sternita sur tapiŝo, ŝajnis, ke li ne devas moviĝi, ĉar laŭ li ankoraŭ fluas ambaŭ bordoj, kanejoj, ĉielo kaj lia domo, kiu kvazaŭ estus disfluanta.

Dum oni portis lin tra veado kaj ploroj kaj flirtado de kolomboj, kurrante kun li tra koto kaj sur rondlignoj, li subite sentis frenezan deziron, ke oni enportu lin en ŝian ejon. Kvazaŭ negocante, li konjektis, ke nun estas oportuna momento por aĉetaki ŝin.

Tiamaniere, sur la argila forno, apud ŝia kuŝejo, li sentis kvazaŭ li leviĝus en la ĉielon. Eĉ ne unu momenton li rememoris la fraton, eĉ ne unu momenton antaŭ liaj okuloj aperis ŝiaj infanoj. Li estis sola, en agrabla, alta sensunejo. Li neniom intermiksas sin kaj la fraton. Memstare, li devis havigi al si tiun virinon, sen ajna rolo de iu ajn alia. Al li, frotita per brando, savita de akvo kaj ŝlimo, ŝajnis, ke li ŝvebas super brulego en tiu larĝa, argila forno. Kun la plafono super la kapo kaj blanka kuŝejo de sia bofratino sub si, fermita inter kvar flavaj muroj, li sentis sin komplete izolita de la mondo. Estus aliel, se li estus ie ekstere, en Zemuno. Ĉi tie, interne, en sia domo, ŝajnis al li, ke li estas plene sekursenta. Neniu tion ekscios. Li estis certa, ke ankaŭ ŝi silentos. Kaj ĉio okazos kvazaŭ ensonĝe. Ambaŭ, inter tiuj kvar muroj, povas senĝene fari tion, kion volas. Same kiel iliaj nigraj ombroj, kiuj videblas sur la muro, ankaŭ ili inter ĉi tiuj muroj estis liberaj kaj nevideblaj. Interne estis varme. La fajro brulbruis. Ekstere ululis vento.

Trovarmiĝinta de flamego, li kuŝis sur la forno, plene konsciante tion, kion li estas pretiganta. Li ordonis, ke oni ankoraŭfoje demetu liajn vestojn, kaj revestu lin. Ŝi, pro honto, foriris ĝis fenestro, ne aŭdacante rigardi servistojn en la okulojn, sed ne eliris. Nek tiam, kiam oni lin kuŝigis sur ŝian kuŝejon.

Li, kiel suprenlevita, sentis, ke li ŝvebas je siaj de tempo al tempo rigidaj membroj. Sin, kaj neniun alian krom ŝin, li sentis proksime, en la varma duonlumo de la fajro. Estus aliel, se la ĉambron trapasus iu ajn, deekstere, el Zemuno. Do, li klare konjektis, ke por li ĉi tiu vespero ne vanos.

La flamo de meĉo sur la forno lumigis la grandan ĉambron, kvazaŭ desur monteto. La ombroj de la objektoj tial estis grandegaj. Sur la blanka kuŝejo, en mallumo, Aranĝelo Isakoviĉo, kvankam li estis komplete konscia, banita, lavita, jam tute ekster danĝero, ŝajnis flava kaj violiĝinta, kvazaŭ agonianta. Grandaj ombroj de la kuŝejo, tablo kaj nigra vestokesto, estis falantaj sur varman muron, kiel somere falas arbaj ombroj. En plena silento kaj duonlumo, la sinjorino Dafina proksimiĝis al la fenestrokrado, sub kiu senĉese preterpasadis bruo de akvo, kiu estis forfluanta.

Kuŝante, kun la palpebroj tiom kunpremitaj, ke li sentis, ke liaj supraĵoj okulharoj malleviĝas sur la subajn, Arangĝelo Isakoviĉo fiksaŭskultis senbruiĝon de la domo. Timante peti ion ajn, por ke oni ne alvoku servistojn, li preskaŭ ne moviĝis, sur la ruĝa matraco, el kies ondoj, kiuj al li ŝajnis nun senfinaj kiel maro, li apenaŭ videblis. La koro batis lin, kvazaŭ per martelo interne, kapen. Preskaŭ senmova, kun rigida kaj kaŝita rigardo, li atendis, ke finbrulu la meĉo, ke iĝu mallumo.

La sinjorino Dafina, sur alta seĝo, sub kiu videblis ŝiaj fortaj gamboj, en oranĝaj ŝtrumpoj kaj oraj pantofloj, sidis apogita al fenestro. En blanka robo, kudrita komplete el pecoj de silko, pro kio ĝi similis al floroj de akacio, kun mola, ronda ondo de ventro, kun la kapo ŝrumpofalinta, ridetanta en duonlumo, kaj supreniĝantaj lipoj.

Ŝi estis kvazaŭ ŝtoniĝinta, vidinte ke ŝia bofrato pasigos nokton en ŝia kuŝejo, sed la servistinojn ŝi tamen foririgis. Volvante lian kapon per viŝtuko, kiu estis vinagrumita, ŝi sur lian bruston, sub ĉemizon, metis malgrandan ikonon de Sankta Mrato, tiklante lin senintence, neelteneble, samtempe, per siaj longaj fingroj.

Arangĝelo Isakoviĉo kuraĝigis sin, jam la centan fojon, per pensoj, ke tion neniu ekscios. Li estis certa, ke ankaŭ ŝi silentos kaj, ĉar li dum jaroj lekis, en sonĝoj, ŝiajn manojn, humile kiel hundido, li brulis pro dezirego, mense, ŝin disfrakasi, dismordi, disŝiri rapide. Li eĉ ne pensis, ke ĉi tiel subite, post tiel longa marĉandado, li decidiĝos fari tion. Samtempe, antaŭe ĉiam timema, nun li estis plene memfida. Inter ĉi tiuj kvar flavaj muroj, ĉio kion li ekstere timis, tute ne ekzistis. Inter ĉi tiu kvar flavaj muroj, li povis fari kion volas. Al li ŝajnis plene ridige, ke ŝi estas edzino de lia frato, kiam lia frato ne estas ĉi tie, kaj ankoraŭ pli ridige, ke ŝi ne povas esti ankaŭ lia edzino. Al li ŝajnis tute strange, ke iu povas enmiksiĝi en ĉi tiun lian intencon, kaj demandi ion ajn. Li iĝis anserhaŭteca, mense komprenante: li ekŝrikus, se ilin iu ajn vidus, kiam ili kune ekdormos ĉi tie, sed sentis, ke senbrua estas la duonlumo ĉirkaŭ ili, ke ilin neniu vidas, inter ĉi tiuj kvar muroj.

Ekstere ululis vento, plena da hunda bojado, kaj murmuris akvo, kiun ankaŭ li aŭdis, senĉese, sub la fenestro. Interne estis varme kaj tiel malbrue, sub la ombroj surmuraj, ke aŭdiĝis kuretantaj musoj.

Beograda urbo, kaj bunta, turka placo, ĉevaloj dronantaj en akvo, granda kaj blua lia domo, koto kaj retoj, barkoj kaj varmega, kalkumita forno, kirliĝis plurfoje ĉirkaŭ lia kapo, sed ĉiun fojon malaperis en plena silento de la varma ĉambro, kaj en duonlumo, en kiu ŝi videblis klare, apud la fenestro. Li estis sufokiĝanta pro peno elparoli ion, kio venigus ŝin al la kuŝejo.

Li jam sentis ŝin alpaŝanta. La frato, tiu frato, kiu al li jam tri semajnojn ŝajnis kiel amaso el uniformoj, plektaĵoj, drapoj kaj plumoj, en malproksimo, kvazaŭ li ne plu estus vivanta. Li mense vidis la fraton, li volis mense vidi lin apud ĉi tiu virino, sed vane; la frato ne estis tie. Ankaŭ la infanoj, pri kiuj li sciis, ke ili estas tie, apude, malantaŭ la muro, kiuj ploras kaj kriaĉas, vekigās en la mallumo kaj alvokas la patrinon, kvazaŭ ne ekzistus. Kvazaŭ ne estus videblaj.

Tiun virinon ĉe la fenestrokrado li estis gajninta. Li estis absolute certa pri tio. Kuŝante kun li, ŝi kisos lin, eldirados lian nomon, tenervorte. Ne-grave ĉu ŝi volupte deziregas aŭ ne deziregas lian fraton, havi lian fraton ŝi ne povas. Ĉi tien lia frato ne povas veni, samkiel ne povas alflui tiu akvo, kiu senĉese murmuris sub la fenestro, samkiel ne povas alflugi ĉi tiu vento. Ĉi tien lia frato ne povas eniri, samkiel eniri ne povas ankaŭ lia servisto, la maljunaĉa Ananio, kiu ĉiam dormas sur lia sojlo. Lia frato estas malproksime kaj, samkiel la edzo, malproksime estas ankaŭ ŝia duonpatro, la senbarbulo Kristodulo, kiu al li ankoraŭ ŝuldas monon por tabako. Nek la popo, nek lia kunnegocano Dimĉo Diamanto, povos ĝeni lin, per siaj konsiloj kaj galimatiado. Ĉio, kio estas ekstere, restos ekstere, sed ŝi, ĉi tie, restos ĉi tie, ĉe li. Neniu tion ekscios. Li kredegis, ke ankaŭ ŝi silentos prie.

Ebriiga ia ĝojo aperis en li. Akvo, kanejo, sablo, ĉielo, ĉio ĉi estis fora. Ja ankaŭ tiuj Zemunanoj, dezirantaj ĉion ekscii, kaj ŝia edzo, kiu eble eĉ ne revenos.

Ŝi estas tie, malfore. En la domo ĉiuj kuŝiĝis. Ekdormis. Nenio nun aŭdiĝis, krom vento kaj bojado de hundoj. Kaj seninterrompa bruoj de akvo, kiu estis forfluanta.

Li levis la manon kaj granda nigra ombro estiĝis sur la muro. Li volis mallaŭte alvoki ŝin, allogi ŝin sur la kuŝejon. Ke ŝi demetu la vestojn. Por ne laciĝi, sidante tiel silente, vestita. Li volis proponi al ŝi, ke li kuŝiĝu sur la plankon, kaj ŝi, tiel vestita, sur la kuŝejon, ke ŝi ne timu. Aŭ li estingu la meĉon, dum ŝi senvestiĝas, kaj li kuŝiĝu apud ŝi, nur kiam ŝi ekdormos. Ke ŝi ne timu.

Sed ĝuste kiam li volis ekparoli, ŝi falegis sur seĝon, ekŝrikinte horore. Ŝi ŝvingigis la manojn, kun vizaĝo pala kiel kalko, kun dispalpebraj okuloj, kaj faŭkanta buŝo, el kiu tamen ne povis elflugi vortoj.

Al ŝi, senenergia pro maldormo, laca kaj povra, timoplena kaj enpenŝiĝinta, ekŝajnis ke ekdormis, ĝuste kiam ŝi ekvidis, sub la fenestro ke sur akvo alvenas ŝia edzo, tute kovrita de sango, kaj malseka; nevestita kaj nekombita Vuko Isakoviĉo, tenanta en la mano grandegan bastonon, ĝisplafone longan.

Ŝi vekigis, kiam ŝia bofrato senbrue malfermetis la pordon. Dum momento ŝi lin vidis, kvazaŭ li ekpaŝus supren, en la pordo, kiu iĝis videbla. Blua kaftano, flava vizaĝo, kun plata nazo, barbeto, maldensa hararo, dum tiu tempero staris, kvazaŭ daŭrigo de tiu sonĝo, en lumo de mateniĝo, en la pordo. Dum momento, ŝi vidis, palan, matenan ĉielon ekstere, parton de tegmento kaj branĉon, post kio mallarĝa lumo de la malfermetita pordo, surmura, denove mallarĝiĝis kaj fermiĝis en mallumo.

Ŝvita kaj kvaronnuda, pro tiu subita leviĝo de la korpo desur la kuŝejo, ŝi preskaŭ ekkrietis. Formovinte la hararon, kiu disŝutiĝis sur ŝian vizaĝon, ŝi vidis, en plena mallumo, blankecon de la forno kaj kovrita fenestro, post tio nigran formon de granda kesto kun ŝiaj roboj, kaj aŭdis senĉesan bruon de akvo, sub la domo. Ŝi ekkonsciis kio okazis, kunpremite la genuojn kaj enpuŝinte la manojn en la implikitan hararon.

Ŝi pasigis la nokton kun la bofrato.

En la unua momento ŝi decidis tion al si mem ne kredi. Nenion el ĉio, kio aperis en ŝia memoro, ŝi sentis; ŝi ne estis laca, ne estis dormema, eĉ ne estis kontenta. Ŝi ja dormis kiel ordinare, kaj, en la unua momento, al ŝi ekŝajnis ke ŝi vere estas sola. Disetendiĝinte, ŝi sentis sur la korpo spurojn de la lasta amora nokto, kaj eksentis naŭzon. Subite, kun malamo, kvankam estis mallumo, ŝi ekvidis apud si, sur kuŝejo, kaj la manojn kaj la dentojn de sia bofrato, kaj lian maldensan barbon, aŭdis lian ridon, kaj ĉirkaŭprenis per la manoj timoplenaj lian maldikan kolon.

Preskaŭ saltinte sur la kuŝejo, ŝi pro teruro kovris per la manplatoj la vizaĝon, vidinte tra siaj fingroj, kaj tra mallumo, en la memoro, ĉion kion li faris kun ŝi, ĉiujn abomenaĵojn, teruraĵojn kaj miraĵojn. Al ŝi ŝajnis, ke ŝi resentas, kiel li lekas ŝiajn brakojn kaj genuojn, kaj ŝi timoplene kovris sin per matraco, kvazaŭ sur ŝian kuŝejon estis saltinta hundo. Frapinte per la kapo la argilan fornon, apud la kuŝejo, ŝi ekemis krii, pro timo, al tiu muro, kompreninte kion ŝi faris. Des pli, ĉar Aranĝelo tiun nokton estis tiel neesprimeble abomena, malforta kaj ridinda.

Ŝi ekploris, ekploris tiel forte, ke al ŝi preskaŭ ekŝajnis, ke ŝi ploras kun ĝuo. Se estus alveninta ŝia edzo, ŝi estus dirinta al li, kial ŝi tion faris. Ŝi dirus al li, ke ŝi tion faris, ĉar li tiel hontigis ŝin antaŭ la homoj, dum la disiĝo, ne adiaŭinte ŝin laŭmore. Ŝi dirus al li, ke ŝi tion faris, ankaŭ ĉar li ĉiam lasas ŝin sola, ĉar li foriras, kaj oftofte migras ciganeske. Kaj tial, ĉar ŝi volis saviĝi de la permanentaĉa ŝlimejoj, insuloj, kotkampoj.

Plorante sur la kuseno ŝi sentis, ke tagiĝas, ke diversaj objektoj jam pli klare konturiĝas el mallumo. Elsub la pordo estis penetranta lumo, dum fenestro en la malluma ĉambro lumis jam kiel malfermita, sed kurtenita pordo, sub kradoj.

Ĵetiĝinte sur la ŝultrojn, ŝi lasis larmojn flui laŭ ŝiaj vangoj, kaj malĝo-
jiĝis ankoraŭ pli. Ne aŭdante sennombrajn bestajn voĉojn, en la koto, ĉirkaŭ
la domo, kiuj ŝin ordinare turmentas aŭrore, ŝi ne rimarkis ankaŭ, ke la
forno jam malvarmiĝis.

Ŝi ploris pri si mem, samkiel tion, cetere, jam certan tempon, postkiam
ŝia edzo abrupte kadukiĝis, ŝi ofte faris. Sin ŝi kompatis senfine. Ŝia junulina
vivo ekŝajnis al ŝi mizerega, kiel la vivo de servistino. Krome, ankaŭ la edzo,
kiu nun estis forlasinta ŝin, kaj la vivo kun li, ŝajnis al ŝi profunda malfeliĉo,
el kiu ŝi vane penis ien foriri.

Plorante ankoraŭ pli laŭte, ŝi rememoris la figuron de la edzo kaj, malle-
vinte la kapon sur la kusenon, komencis en siaj pensoj, kisi lin. Bela ja estis
Vuko Isakoviĉo kiam li edziĝis kun ŝi, kun malvarma kaj glata haŭto, kiu por
ŝi estis la plej profunda fonto de ĝuo, ĉar ĝi estis neordinare pura kaj agrabla.
Rigardo lia flava, kun punktetoj nigraj, tiam ankoraŭ ne estis senarda, ŝi
ankoraŭ memoris la brilon sub liaj longaj, je la fino larĝaj okulharoj, samkiel
oni ne forgesas oran pluvon de vespera sunbanado, vidita ie, ĉe la rando de
juna arbaro. Ankaŭ la hararon molan kaj silkan, kiu komencis griziĝi, ŝi ne
povis forgesi, nek la flamruĝan supran lipon lian, kiu tremis, dum lia ride-
to. De aliaj ŝi aŭskultis, ke li batas homojn kaj ĉevalojn per la pugno sur la
kapon, ke li transsaltas tablojn kiam ebriiĝas, kaj ĉiujn aliajn abomenaĵojn
pri liaj valahinoj kaj hungarinoj. Ŝi lin konis tute alia. Kun ŝi li vivis sian
sekretan vivon, de la komenco. Postkiam oni geedzigis ilin, tute subite kaj
sen amo, li, preskaŭ du jarojn, kondutis al ŝi kiel fremdulo, ĝentile, kisante
ŝin tenere kaj atente, kvazaŭ timus rompi kaj frakasi ŝin, la altan, belan kaj
malfortan. Transsaltante, tage, kun siaj junaj oficiroj fosaĵojn, kaj instruan-
te novajn soldatojn ĵetadi kompletajn malgrandajn barelojn da pulvo en
tranĉeojn, ŝvita kaj hirta, li venadis nur antaŭ vespero por iri kun la edzino
ien ajn, rajdante kun ŝi, fojfoje tutan nokton, tra kampoj, boskoj, altaĵoj kaj
steloj. Ne povante, dum la unuaj monatoj, eĉ paroli kun la edzino, ĉar ŝi ne
sciis la germanan lingvon, dum li sciis nek la grekan nek la venecian, li ko-
munikis per kantoj, dancoj, rigardoj kaj kisoj. Ĉar li ne tre ofte povis venigi
ŝin al baloj en Brodo kaj Oseka urbo, li oftege irigadis la edzinon al ĉasado,
de vulpoj. Tio, cetere, estis lia sola laboro, dum monatoj.

Kune kun moleco de malseka tero kaj herbo, kun veprejo, kiu en aprilo
komencis burĝoni kaj odori, kun verdaj montodeklivoj kaj hela printempa
ĉielo, snufis tiam la juna virino, unuafoje, sian edzon, kvazaŭ venenita. Ne
ekzistis riĉaĵoj en ĉi tiu mondo, ne ekzistis vipoj kaj serpentoj, kiuj ŝin igus
forlasi tiun homon kaj lian strangan rideton, kiun ŝi vidis neniam antaŭe,
sur la vizaĝo de sia duonpatro, aŭ de la fratoj, aŭ de siaj grekoj.

Apogitan al ia trunko sur la supro de monto, kuŝantan surdorse en alta herbo, lacan pro amorado sub densaj branĉoj, ŝi memorfiksis lian puran figuron, kvankam lin estis elĉerpinta la vivo, kiun ŝi ne komprenis, ne sciis, ĝis kiam Aranĝelo Isakoviĉo ĝin prirakontis kaj klarigis. Tial estis sufiĉe, ke la sinjorino Dafina ekpensu pri la unuaj jaroj de sia edzineco, por ke antaŭ ŝi leviĝu montoj, branĉoj burĝonantaj, larĝaj Slavoniaj valoj kaj super ili nubodanco. Noktoj plenaj da herbo, mallumoj en arbaro, arbustaro kun sovaĝa, ruĝa frukto, lirlo de akvoj, sed precipe lumo de la ĉielo, steloj kaj stelaroj, pasadis super ŝi, kiam ŝi memoris la unuajn jarojn post sia edziniĝo. Kaj tiel ŝi, tra ploro, ŝajnvidis Vukon Isakoviĉon kaj lian haŭton kaj liajn okulojn, buŝon, kiel plantojn kaj stelarojn, kiujn ŝi ne povis forgesi ĝis kiam, en ŝiaj pensoj, li aperis tia, kia nun estas: kurbakrura, pufvizaĝa kaj peza, kiel barelo.

Ŝi ĉesis plori, tutkorpe ektemis, rememorinte kiel rapide pasis tiuj belaj jaroj, tuj kiam li unuafoje foriris militi, kaj kiam ŝi naskis unuafoje. El la milito li revenis grasiĝinta kaj kaprica. Ili ne plu iris en la fortikaĵon por dancamuziĝi, li ne plu tie ofte rajdis kun ŝi. Unu tutan vilaĝon li loĝigis, sub la urbon Varadinon, kun la patro, kaj la tutan printempon li paŝadis nudpieda, en koto ĝis la genuoj, gvidante siajn novajn homojn en kotejon, por plugi. Dum senfina enuo, tiujara, mamnutrante la infanon, ŝi unuafoje sentis, ke li rigardas ŝin, kiel iun objekton en la domo, kiel kuŝejon, fornon, ŝian keston kun roboj, per siaj flavaj, helaj okuloj. Pri ĉio estis kulpa lia patro. Tiu lin kondukis kun si ĉien.

Kiam li forlasis la armeon, malsanpretekste, kaj komencis negoci, ŝia vivo iĝis plene vana. Li ĉie ŝin lasadis sola, sur akvo, de Galaco ĝis Vieno, plej ofte sen mono; en mizero; li neniam faris demandojn, reveninte. Kiam li denove iĝis armeano, ili nelonge vivis tre gaje, sed li poste ŝin lasis, forirante jam la duan fojon. Tiutempe li jam komencis amiki kun monaĥoj, kaj ankoraŭ pli ŝanĝiĝis. Li revenis silentema, plene fremda kaj dika.

Kiam li la trian fojon estis foriranta, ŝi eĉ ne provis sincere haltigi lin. Malsincera kaj mensogema, ŝi ŝajnigis, ke ŝi lin pasie kisas, sed la ploro, per kiu ŝi aspergis siajn kisojn ne plu estis maldolĉa. Samkiel liaj okuloj ne plu estis helaj.

Malgraŭ tio, ĵaluza kaj freŝkarna, ŝi penis satkisi lin kiel eble pli, satĝui lin, fermante la okulojn antaŭ la realo. Ŝi havis en si profundan antaŭsenton, ke li ŝin ne plu amas, ke li ne revenos viva. Sed kiam li revenis, li estis plene ŝanĝiĝinta, kadukiĝinta abrupte, kaj stranga. Li konstruigis preĝejon meze de la vilaĝo. Kaj laŭ la aspekto, kaj laŭ la aĝo, li povis esti ne ŝia edzo, sed ŝia patro.

Malgraŭ tio, eĉ tiutempe, daŭris inter ili ia mistera delicrilato, kiu estis nevidebla kaj nekomprenebla. Stranga kaj malĝoja, li havis por ŝi rigardon, per kiu li rigardis neniun alian estaĵon. Ĝuego kun li, malgraŭ ĉiuj malagrablaĵoj, estis por ŝi ankoraŭ ĉiam nekomparebla kaj belega. Lia figuro, voĉo, nomo, penso pri li, intertuŝo, sparkadis ankoraŭ ĉiam, en ŝi, kiel fajro. Malantaŭ ili, ĉio estis nur infinita, senfina, malpura neĝebeno.

Tiel pensis pri sia edzo la sinjorino Dafina, senenergia pro ploro, preskaŭ ekdormonta denove.

Ŝi skuiĝis nur pro malvarmego, kiu ŝoviĝis en ŝian kuŝejon. Kiam, finfine, ŝi malfermis la larmoplenajn okulojn, ŝi vidis ke tagiĝis, ke ekstere sendube estas malvarma, pluva, sensuna tago.

En la vivo de la sinjorino Dafina Isakoviĉo estis nemalmultaj malfeliĉaj kaj malgajaj tagoj, samkiel, cetere, en la vivo de ĉiuj virinoj, sed neniuj estis tiel malĝojaj kaj premimpresaj, kiel tiu unua tago post ŝia adulto, la tago malseka, malvarma, kun la griza ĉielo.

La sinjorino Dafina sentis ankaŭ antaŭe, kelkajn fojojn, kiom la virino estas mizera estaĵo, ludilo, objekto en la domo, tial ŝi kredis sian vivon tute vaka, sed al ŝi neniam ŝajnis ĉio, kion Dio kun la homoj faras, tiel terura, kiel en la domo de ŝia bofrato, tiutage. La domo de la patro, tavoloj da tabako, drapaĵoj kaj aliaj varoj, la ĉambro de onklino, plena da ikonoj kaj lucernoj, en kiu oni ŝin svatis, kaj ĉiuj aliaj domoj kaj ejoj, en kiuj ŝi vivis kun la edzo, traflugis ŝian memoron, malĝojaj kaj malplenaj, sen ia ajn senco. Tamen ili estis agrablaj, iagrade, sed ĉi tiuj kvar flavaj muroj, bruo de la rivero, ombroj de la kuŝejo kaj forno, estis teruraj en sia senĉeso, senmovo kaj ŝtoniĝo.

Sen pento, cetere, kial ja penti, ŝi komprenis, kion ŝi faris. Ŝi ne tre pensis kiel tion kaŝi. Al ŝi estis negrave, ĉu tion, iamaniere, ekscios eĉ ŝia edzo, tie, ie, malproksime, en la mondo. Ŝi ekploris nur kiam rememoris, ke ŝi denove naskos.

Finfine, tiu edzo ĝuste tion volis. Tio ne estas la unua fojo, ke li foriris ke li lasis ŝin, same kiel siajn ĉevalojn kaj servistinojn. Sen tenero, sen speciala malĝojo, sen senco. Li foriradis en militon, en ion komplete nekompreneblan kaj teruran por la cerbo de sinjorino Dafina, kiu, ĉe la nura rememoro pri lia terura cikatro pro sabrotranĉo, ĉiufoje preskaŭsvenis. Cetere, kian sencon havis la fakto, ke ŝi edzinis je li? Ĉu li ne zorgis pli pri siaj preĝejoj, soldatoj kaj ĉevaloj, ol pri ŝi? Ankaŭ tiujn, siajn infanojn, li amis, ne miksante ŝin kun ili. Krom tio, kiom, ho, da virinoj li havis, krom ŝin?

Tiele, meditante, ŝi sentis faciliĝon. Ĉi tiu alia al ŝi ekŝajnis, tamen, pro tio pli bona, ĉar ŝi sciis, ke ŝi vivos riĉe, sinjorece, sen migradoj. La edzo, pensis ŝi, ne povas reveni. Ne, ĉi tiun fojon, li ne plu revenos. Foje-foje, en

ŝiaj memoroj, li aperados sur iu monto, en iu arbaro, en sonĝo bela kiel vircervo en printempa krepusko, sed alvenos tagoj, kiam li ekŝajnos al ŝi abomena, kiel ia urso en malbonodora groto. Kaj ŝi ekploris denove. Ĉar la amo estas sendube mizera, ŝi vivos sename kun ĉi tiu, seka, flava homo, kiu sur pesilo pesas arĝenton, kaj lekas ŝiajn manojn, humile kiel hundeto. Ŝia vivo pasos tiele – pretere kaj agrable, sen la terura bruado, kriado kaj maltrankvilo, kiuj nepre komenciĝadis, tuj kiam ŝia edzo estis reveninta.

Kiam ŝi rememoris Aranĝelon Isakoviĉon, li al ŝi ekŝajnis malpli abomena ol ĉi-nokte, eĉ, rememorinte iojn, kiojn li faris al ŝi, ŝi plezure enpenŝiĝis, kaj malĉaste ekridis. En la unua momento, kelkaj agoj, kiujn ŝi kun la edzo neniam praktikis, ekŝajnis al ŝi multe pli repuŝaj, ol nun, kiam ŝi denove primemoris ilin. Ŝia bofrato ne estis tute nekapabla, kvankam ŝi komence tion kredis. Finfine, eble post la unua, terura kaj orgojla viro, devis alveni ĝuste ĉi tiu, kiu al ŝi nun ekŝajnis, se ne kara, almenaŭ tre kapabla alflatiĝi kaj kariĝi al ŝi. Ŝi decidis nenion al li riproĉi, sed devigi lin edziĝi je ŝi.

Kiam la servistinoj alvenis, ŝi, unuamomente, denove konsterniĝis mirtimiĝis, rememorinte kion faris, sed poste, sub la kvietaj rigardo de tiuj virinoj, ankaŭ ŝi kvietiĝis. Lasinte siajn lignosandalojn ĉe la pordo, ili alpaŝis ŝin, nenion parolante pri si. Pro tio ankaŭ ŝi tiam ŝajnigis, ke ankaŭ ŝi, kvazaŭe, eniras deie, ne rakontante pri si, kaŝante eĉ la okulojn. Ŝi diris, ke la tutan tagon ŝi restos en la kuŝejo, ĉar ŝin doloras la kapo. Sed kiam ili diris al ŝi, ke la sinjoro Aranĝelo foriris al turkoj, en Beogradon, por konduki tien venditajn ĉevalojn, ŝi iomete skuiĝis, kaj esprimis deziron, ke oni pretigu por ŝi akvon, por ke ŝi sin lavu kaj purigu per akvo.

Plena da sensignifaj okazaĵoj, tiel, pasis tiu tago, kaj ŝi ne ebligis, ke oni rimarku, vidante ŝin, kio al ŝi okazis. Ili rimarkis nur, ke ŝi estas plortrema, kaj tio poste disfamiĝis inter la domanaro. La maljunaĉa Ananio, kiu dormis ĉiunokte sur la sojlo, kun granda kaj rustiĝinta kurbsabro sub la kapo, rakontis, ke foje li aŭdis ŝin ŝrikanta kaj krietanata. Poste disfamiĝis inter la domanaro, ke frato al frato kaj edzino reaperas, tute sangkovrita, kun la vizaĝo tranĉezita, la kapo detranĉita, rajdante sur granda rano, kaj paŝanta sur akvo. Pro tio, pensis ili tiam, hundoj tiel terure hurlis la antaŭan nokton. Cetere, ankaŭ la forpasinta Lazaro Isakoviĉo mem estis reaperanta, kvazaŭ li estus negocanta pri armiloj en aero, la tutan aŭtunon, antaŭ ok jaroj, sed ĉio ĉi tio estis okazanta, ĉar lia filo, post lia morto, ne trapikis lian koron per pinglo.

La unua tago post la adulto, al la sinjorino Dafina Isakoviĉo ekŝajnis, vere, bagatela. Antaŭvespere, ŝi eksentis sin senenergia pro atendado, ke io neordinara okazu.

La tutan antaŭtagmezon ŝi ploris, meditis kaj elegantigis sin, kaj dum la posttagmezo atendis la sinjoron Aranĝelon, kiu estis foririnta, trans la riveron, en Beogradon, por transdoni al turkoj la ĉevalojn, kun kiuj li preskaŭ dronis en Danubo.

Tamen, ankaŭ tiu posttagmezo pasis, en tiu granda flava domo, plena da faruno kvazaŭ en akvomuelejo, tiel egalritme, akompanata de lirlado de akvo, kiu preterfluis, ke la sinjorino Dafina sentis kriemon, nur por ĉesigi per sia voĉo la silenton, kiu, en la odoro kaj polvo de malfreŝa tritiko kaj sekalo, estis sufoka.

Ŝi ne bedaŭris, ke la edzon ŝi perfidis, sed ŝi sentis naŭzon, vidinte ke, malgraŭ tio, nenio ŝanĝiĝas. La nokton ŝi estis pasiginta kun propra bofrato, sed tio movigis eĉ ne unu aveneron en la subtegmento, super iliaj kapoj. Sentinte ankaŭ antaŭe, malgraŭ sia granda ordonpovo, ke ŝi kuŝas en la domo kiel ia objekto, kiun oni nur ĉirkaŭiras, ŝi nun sopiris, ke la domo ĉirkaŭ ŝi renversiĝu, kaj la senvivaĵoj, senmovaj kaj ĉiam samaj, ŝin incitis kaj ekscitis. Ŝi eksoporis la bofraton, por ke li promesu al ŝi, antaŭ ĉio, geedziĝon, kaj ke li forkondukos ŝin de ĉi tie, en sian novan domon, en Budaon.

Al la servistinoj ŝi ordonis, ke ili venigu la infanojn, sed ankaŭ tio ne helpis.

La malpli aĝa knabino, tute varioldifektita, kuŝis envolvita kaj ligita kiel suĉinfano. Per siaj flavaj okuloj, suĉante sian fingron, ŝi rigardegis la plafonon, mispaŝante. La okulojn, plenan da nigraj punktetoj, ŝi direktis al la subtegmento, eĉ ne rimarkinte, ke ŝi estas transportita el unu parto de la domo en alian. La pli aĝa falis, unuamomente, kun timida ĝojo en la sinon de la patrino, sed same rapide lasis ŝin, ludante blindludon inter buntaj roboj, kiuj pendis malantaŭ la forno. La sinjorino Dafina baldaŭ komprenis, ke ŝi nenion povas paroli al la infanoj, ke ŝi ne havas kialon rigardi ilin. Dum ŝi observis ilin, ili ekŝajnis al ŝi hebetaj kaj fremdaj. Dum la tuta tempo la infanoj eĉ ne rimarkis ŝin. Pendantaj diverskoloraj tukoj, la krado sur la fenestro, kaj precipe la hejtita forno kun sia ruĝa brulo, altiradis infanajn rigardojn, sed ŝia malfeliĉo kaj larmoplenaj okuloj tute ne. Eĉ el ŝia sino, ŝiaj filinetoj etendadis la manojn al neproksimaj objektoj, kvazaŭ al alia bordo, pri kiu ili luktis ŝrikante, kvazaŭ baraktante el la manoj de iu giganto. Kaj ŝi ilin, finfine, kune kun servistinoj kaj hundetoj, forpelis.

Ŝi ordonis venigi la edzinon de Dimĉo Diamanto, la laŭleĝan; longan nigran balailon, kiu dum la tuta tago viŝadis endomaĵojn, vestita ĉiam per pluraj ĉirkaŭtaliaĵoj. Tiu virino sciis kartaŭguri, ŝi ŝatis ankaŭ rakonti, tirante samtempe, pensodrone, ĉiam la saman verukon. Tamen, ankaŭ tio

estis vana. La sinjorino Finka Diamanto rakontis nur kiel unu ĉevalo, el tiuj, kiuj estis dronantaj, atakis, sur la bordo, ŝian edzon, kiu elkuris savi la dronantojn, sed precipe sian kunnegocanon Aranĝelon Isakoviĉon, pri kio ĉiuj Zemunanoj jam parolis. Tuj post tio ŝi foriris.

Kaj, kiam jam noktiĝis, la sinjorino Dafina tamen restis sola. Ŝin plenis teruro pro la teda, malseka tago, de kiu ŝi ĝis antaŭnelonge, multon atendis.

Ĉio al ŝi ŝajnis iel senseca. Kaj tio, kion ŝi faris, same kiel se ŝi tion ne farus. Ĉio, kion ŝia bofrato Aranĝelo jam plurajn semajnojn parolis, al ŝi nun ekŝajnis vera. Kvankam ŝi ankoraŭ klare memoris tutan tiun amoran nokton, ŝi sentis, ke ŝi povus dum momento ĝin forgesi, tiel, ke ŝi ĝin neniam plu rememorus. Precipe se ŝia edzo subite revenus. Ŝi sentis, ke la adolto ne alportos al ŝi ĝojon. Ŝi povis tion fari same, kun iu ajn alia, morgaŭ denove, sed tio jam ne ŝajnos al ŝi tre grava. Tial ŝi komencis mediti kaj konsoli sin per riĉeco, en kiu ŝi de nun vivos, se ŝi reedziniĝos kun la bofrato. Ŝi pensis pri novaj roboj kiujn ŝi mendos, kaj, kvazaŭ ŝi jam havus ilin, ŝi sentis silkajn pecojn sur sia korpo. Post tiu krompenso, tamen, ŝi ne nur ne sentis ian plezuron, sed konjektis eĉ iun malgajon. Al ŝi ŝajnis negrave ĉu ŝi apartenas al unu frato, aŭ al la alia, kaj ŝiaflanke, al ŝi ekŝajnis, en tiu posttagmezo, ke ŝi konsentus aparteni al ambaŭ. Eĉ al iu alia, al iu ajn.

La tuta grandega krepusko videblis tra fenestro, kaj, sur akvo, disfluinta – la malvarma, griza ĉielo. La rivero estis malklara kaj flava, plena da koto, kaj salikejoj, kiuj jam komencis burĝoni, frostiĝis dum la lastaj, subite malvarmaj, tagoj. Super insuloj, tamen, sur la fundo de la ĉielo, malfermiĝis granda bluejo, en kiu klare aperis, el hela kaj humida vespero, minaretoj kaj defendmuroj de Beogrado. Kvakado de ranoj, ĉirkaŭ la domo, komencis bleki kaj brui.

Granda, hela parto de la ĉielo heligis ankaŭ muron en ĉambreto, en kiu tordiĝis pro enuo kaj malespero, preskaŭ plorante, la sinjorino Dafina, perdinte malantaŭ forno unu sian broditan pantoflon, kaj la alian – ĉe la pordo. Kuŝante sub granda kaj malnova ikono de Kristo, ŝi ekemis estingi meĉon, sed, neatendite, ŝi sentis timon antaŭ eka mallumo. Ne kuraĝante preni siajn pantoflojn, ŝi apenaŭ moviĝis, kuŝante surdorse sur kusenoj, en neeltenebla fumo pro ŝia senĉesa fumado. Kun la kapo peziĝinta, ŝi nur tiam rimarkis, ke en la ejo preskaŭ ekregis mallumo.

La murojn kaj objektojn jam konkeris mallumego, nur direkte al la forno, sur unu muron, estis falanta griza lumo de la lasta, vespera lumigo, de la rivero, perdiĝante, malantaŭ la kurteno, ĉe kuŝejo. Malhela, granda kesto kun ŝiaj roboj nigris leviĝante sur la grunto, kvazaŭ alta surŝutita tombo.

En la fumo de turka tabako, la sinjorino Dafina rigardis la lumon de fenestro, kiel en la malluma nokto oni fiksrigardas helan Lunon. Kuŝante laca, pro pensoj, la sinjorino Dafina aŭdis, abrupte, malantaŭ si, kuretadon de musoj. Nur tiam ŝi sentis, ke en la ĉambreto regas mallumo, ŝi estis ek-krianta, sed ŝia voĉo haltis en ŝia gorĝo.

Malferminte larĝe la okulojn, ŝi nur tiam vidis, ke ŝi ne savis sin ĝustatempe de la mallumo, kiu ŝin ĉirkaŭis, sed kiun ŝi tiel terure timis. Krom la blanka forno, sur kiu estis sekiĝanta litotuko, kiel hantulo, kaj hela truo de fenestro, ĉio alia en la granda malluma ĉambreto trafalis en profundan mallumejon, kun lirlado de akvo. Nun nek la tabloj, nek la kuŝejo, nek la pordo plu videblis, kaj ŝi, teruriĝinta, rimarkis, ke ŝi ne povas sur la tapiŝo distingi eĉ siajn pantoflojn. Hundoj hurlis ekstere.

Sufokata de mallumo, ŝi ne povis ekkrii, kaj, paraliziĝinta pro timo, ŝi ne povis ekmoviĝi. Ŝi skuiĝis pro tremo, sentante ke, de la piedoj, ŝin travibrigas glacia frosto. Sentante ĉiujn piedfingrojn rigidiĝantaj, ŝi tamen ne povis ekmovi la piedon, sed dezirante leviĝi kaj fuĝi, ŝi sentis ke ŝi, male, ĉiam pli puŝiĝas inter la kusenojn.

Al ŝi ekŝajnis, ke la litotuko, sur la forno, leviĝas, kaj ke tra kurteno, ĉe la kuŝejo, blovas malvarma spiro. Kuntiriĝinta, kun dismalfermitaj okuloj, tremante tuta, ŝi vidis, ke el la nigra granda kesto, en kiu estis ŝiaj roboj, torentas kaj rampas musoj. Kun ŝriko en la gorĝo, kliniĝinta super la genuoj, ŝi rimarkis ĉirkaŭ tiu kesto ranojn, serpentojn, limakojn, en koto, buliĝintajn, knediĝantaj, piedpremataj, kvazaŭ svarmantaj.

Kun la okuloj kiuj penis elfali elsub ŝiaj palpebroj, ŝi rimarkis, ke la blanka litotuko, sur la forno, proksimiĝas al ŝi ĉiam pli. Samtempe, ŝi sentis, ke iu staras malantaŭ la kurteno, en la mallumo, kaj, hirtigante per la tremantaj manoj sian hararon, skuiĝante pro malvarmo, kvazaŭ en glacio, ŝi vidis, ke el la mallumego aperas mano.

Ĝiaj fingroj, blankaj kiel kalko, rampis ĉiu aparte, tordiĝante, ĉiam pli proksime. Ĝi subvenis desur lumigita muro kiel blanka kato, rampante sur mebloj kaj sur la forno. Tiumomente la sinjorino Dafina rimarkis ankaŭ la alian, kiu al ŝi proksimiĝis dedorse, kiu estis kaptanta kaj knedanta ŝiajn robojn sur la muro, disĵetante ilin sur la plankon. Ekŝrikinte finfine dampite, ŝi antaŭ la kurteno rimarkis ankaŭ ventron, la grandegan ventron de sia edzo, liajn buŝon kaj okulojn kaj nazon, tutan lian figuron sur blanka littuko, sanganta, kun buĉita gorĝo, kaj nigran bulĉapelon, kiu flugpendis super tiu kapo.

Kiam la muro ekŝanceliĝis, malantaŭ tiu miraĝo, ŝi vidis ankaŭ orajn spikojn kaj montojn, kiuj ŝutiĝis tra la muro, kune kun la ondoj de tritiko,

sekalo kaj aveno, desur la plafono. Post tio ekbrilis antaŭ okuloj ŝiaj tutaj ringoj de steloj, bluaj, violkoloraj kaj flavaj, kaj ŝin surverŝis eksterordinara varmeta akvo, super kiuj fluis ankaŭ la ĉielo. Ekkrietinte horore, eksaltinte supren, ŝi aperis, vidalvide al la edzo, sangokovrita kaj terura, kaj ekvidis antaŭ si Vukon Isakoviĉon, disfalantan. Tiel oni ekvidas, en sonĝo, teruran urson, kiam fuĝante el arbaro, de lupoj, oni subite, elkuras antaŭ ŝtonegon.

Tiel falis ankaŭ la sinjorino Dafina, batinte per la manoj mallumon, tuj, la unuan tagon post la adulto, lezinte en si naskoton.

Tiamaniere varmegoj cerbaj, kaj timo, malplenoj kaj trompoj vesperaj, obskuro kaj frenezaj miraĝoj de la sinjorino Dafina, neniigis la kvieton de la domo de Aranĝelo Isakoviĉo, en tiu printempo, kiu, post la malfruaj kaj strangaj frostoj, ekbrilis varme kaj senbride.

La sinjorino Dafina estis trovita, senkonsciiginta en mallumo, kuŝanta en sangoflako. El ŝi du semajnojn elfluadis sango kaj, neniue akuŝistino povis helpi. Ĝibiĝinta, flava kaj seka, sako da ostoj, ŝi apenaŭ povis fari kvar paŝojn de la kuŝejo ĝis la fenestro kun kradoj, kie oni kuŝigis ŝin sur kusenojn.

De tie, ŝi povis rigardi de la mateno ĝis la mallumiĝo, kiel fluas la rive-ro, floras insuloj kaj ŝanĝiĝas la ĉielo.

Krom unu horon matene, kiam al ŝi venadis maljuna medicinisto el Beogrado, kiun venigadis per sia ŝipo sinjoro Aranĝelo mem, kaj kiu ŝin kuracis per kelkaj herbaĵoj, kiujn ŝi devis trinki en varma banujo, kaj vespere, merkrede, kiam venadis kuracisto eĉ el Oseko, kiu ĉiufoje ricevis unu dukaton, kaj kiu ŝin kuracis per iaj feraj tuboj, kuŝigante ŝin, dum tuta horo, tiel, ke ŝi kuŝis preskaŭ kaposube, ŝi ordinare estis libera, kaj ĉiuj lasadis ŝin kvieta, ĉiuj foriradis.

La servistinoj pro timo, la najbaroj ĉar ŝi, tiel flava, al ili similis al mortontino, kaj sinjoro Aranĝelo, ho, tiu Aranĝelo, ĉar li sentis naŭzon.

La malsanulino estis ordinare kvieta kaj senbrua. Post tiu terura vespero ŝiaj okuloj restis dispalpebraj, grandaj, bluaj, krom tio ŝi tute ŝanĝiĝis, velkis, sulkiĝis. En la mano kun kaptuko el Veneciaj punktoj, ŝi sidis preskaŭ senmove ĉe sia fenestro. Post terura ŝriko, ŝi ja ŝrikis la tutan nokton, kiam oni ŝin rekonsciigis, en ŝi nestiĝis plena silento.

La ŝanĝo estis tiel rapida kaj terura, ke ĝi preskaŭ nebuligis ŝian cerbon. La riĉeco, la eventabunda vivo en Budao, la humila amo de ŝia flava bofrato; la juneco, kiun ŝi ĵus eksopiris sperti, ĉio ĉi forfluadis je spasmoj, je ŝia sango. Ŝi komprenis, ke ŝi malbeliĝos, sulkiĝos, ke post kelkaj tagoj ŝi treniĝos kiel ombro. Ŝi ne ekmiris, eĉ kiam la servistaro komencis ŝin ignori, eĉ kiam la bofrato komencis fuĝi el la domo. Persiste ŝi silentis, pasigante tagon post tago apud la fenestro, super la akvo.

Tie, krom maloftaj, multkoloraj ŝipoj, forveterantaj kaj alveturantaj, nenio estis ŝanĝiganta, kaj krom kornoj de ŝipistoj kun profunda, obtuza sono, nenio aŭdiĝis. La hirundoj tiun jaron, multe pli poste komencis al-migri, kaj transturniĝadi, malalte flugante, super la rivero.

Ĉiun tagon ŝi trovadis, sur la sama loko, super la fenestro, svarmon da muŝetoj, brilaj kiel kirlolevita sablo, trunkojn de fiŝistaj retoj, kiuj elstaris el koto, salikejojn kiuj de tago al tago estis ĉiam pli densaj, kaj pli malhelaj, verdajn insulojn kaj flirtantajn kanejojn, kaj super ili teran, flavan monteton de fortikaĵoj. La larĝajn akvojn ŝi jam konis, same kiel la blankajn minaretojn, kiuj, tagmeze, flugpendis en la varma aero super la urbo.

Tiele, ŝi kutimiĝis rimarki etajn ŝanĝojn en ĉio videbla, kaj ankaŭ nevidebla. Post kelkaj tagoj jam, ŝi sciis, laŭ la koloro de akvo kaj salikejoj, kiu tagero estas. Vespere, ŝi povis laŭ la koloro de la ĉielo, kaj laŭ la formo de la nuboj, senerare antaŭscii, kia vetero estos la morgaŭan tagon. Ŝi rimarkis sablaĵon, kiu antaŭ la insulo aperis el la rivero, kaj sur kiu, baldaŭ, ĉiuloke, loĝiĝis birdoj, inter kiuj ŝi rekonis cikoniojn kun longaj, ruĝaj kruroj.

Baldaŭ, ŝi antaŭsciis, tute kaj absolute, kiel okazas sunsubiro, kaj same tiel ankaŭ ĉiujn aperojn de frumateno, kiujn ŝi rimarkis, kvazaŭ tra sonĝo, alpaŝinte sian fenestron, fojfoje, tuj post noktomezo, turmentata de dormomanko, kaj timiginte servistinojn, kiuj maldevis plu lasi ŝin sola dum la nokto.

Naŭzante sin mem, ŝi absolute ne kredis, ke al ŝi proksimiĝas la morto, kaj ke tiu ŝia sidado apud la fenestro, estas lanta mortado. Etendante la manon en varman aeron, tra la krado, sentinte ke ŝi kvazaŭ povus traŝovi ĝin tra la varmetan surfacon de la preterfluanta rivero, ŝi per la korpo konjektis kaj la sablon kaj la kanojn de la insulo, kaj la branĉojn de salikoj kiuj jam delonge ekbutonis, kaj la svarmon sur la suproj de montoj, kaj vespere, senvestiĝante kaj kuŝiĝante, la grandan, limosenan bluejon ĉielan, inter diversaj steloj kaj stelaroj, kiuj sinsekve venadis en la kvarangulon de ŝia fenestro, kaj tie kelkan tempon staris kaj tremetis.

Kun persista silento, ŝi kredis, ke la kuracistoj ŝin savos, kaj ke ŝi resaniĝos. Konjektante, ke ŝi ne plu estos tiel bela, kaj ke, meze de ŝia korpo, restos tiu terura, ĉiamaktiva vundo.

Ne sen multa ploro, ŝi promesigis sinjoron Aranĝelo, ke li foriros al la patriarko Ŝakabento, kaj elpetos, iel, pastron, kiu ŝin liberigos de unu frato, kaj edzinigos al la alia frato.

Pri la infanoj ŝi ne tre zorgis, kaj ne deziras ofte vidi ilin. Ŝi nur bedaŭris, ke ili ambaŭ estas knabinetoj, kaj ke ankaŭ ili, kiam ili estos, same kiel ŝi, plenkreskulinoj, suferegos.

Ĉar la ĉefa sento de la sinjorino Dafina, dum tiuj tagoj, kiam ŝi sidis kvazaŭ paralizita, estis senfina envio al la ambaŭ viroj, kiujn ŝi amis kaj malamis, kaj senlima malestimo al si mem.

La mizero, soleco, malsaneco, ĉio ĉi ŝajnis al ŝi ina sorto, same kiel la mizera restado kaj atendado de alveno jen de unu, jen de la alia viro. Ŝi rememoris, subite, la domon de siaj gepatroj en Triesto, kie ŝi estis aŭ pupo, vestita bunte, aŭ servistino, kiu vespere kaj matene demetadis, kaj vestadis, la fratojn kaj la kadukan duonpatron, frotlavante ĉiun sabaton la pesilojn kaj ŝtonajn benkojn, ĉirkaŭ la vendotablo. Ŝi rememoris ankaŭ la edzinecon, en kiu ŝi estis tiel feliĉa.

Ŝi naskadis infanojn, transloĝigadis, sed neniam sciis kien kaj kial. Ĝojoj kaj malĝojoj ŝiaj venadis tute hazarde, sed plej malofte laŭ ŝia volo. Kaj ĉi tiu adulto, kaj ĉi tiu ĝuado kun nova kaj alia viro, kaŝe, alvenis sen ŝia volo, laŭ ilia volo, neeviteble. Objekto, objekto ŝi estis, samkiel tio ankaŭ ŝiaj filinoj estos, prenatalaj kaj forlasataj, kisataj kaj forĵetataj, lekataj kaj batataj, ordosene, sencosene. La tuta amo al ŝi, ĉu tio ne estis iaspeca distriĝo por tiu duopo?

Tamen, se Vuko Isakoviĉo estus hejme, li ne naŭzus ŝin. Ĉi tiu varmo de la printempo, kaj ĉi tiuj akvoj memorigus lin pri ŝia junaĝo. Kvankam tute flava, malbela, sulkoplana, al li ŝi ankoraŭ ĉiam ŝajnus bela. Li portus ŝin sur la brakoj de la kuŝejo ĝis la fenestro. La amis infanojn, tial li kisadus la infanojn. Ŝin li metus tien, sub la aleron, en senventejon, sub la sunon. Ŝi fermus la okulojn, kaj vidus arĝentajn, lunlume inundatajn arbarojn, ankoraŭfoje, neĝajn kampojn malantaŭ Oseka urbo, spurojn de vulpoj, de rajdado, spiron ilian, kiel nebulon, pasintecon. Eble li neniam plu forlasus ŝin. Li metus sian larĝan manon sur ŝian ventron. La doloroj estingigis.

Larmante, tamen, la sinjorino Dafina, malgraŭ ĉio ĉi, konjektis ke al ŝi pli grave estis senti tiun alian, kun kiu ŝi pasigis nur unu nokton, komence tiel negravan, hororan, abomenan, same kia estis lia glata flava mano, malmola kiel sukceso, komence timema, en mallumo.

Vuko Isakoviĉo estis foririnta, kaj post li malaperis ankaŭ la bildoj de ŝia pasinta vivo, jam malklaraj, kaj ĉiuj ĉi montoj, kiujn ŝi vidis la lastan fojon, disiĝante de li.

Al ŝi restis nur Aranĝelo Isakoviĉo, kun siaj strangaj manoj, al kiuj ŝi unuafoje sin transdonis, kvazaŭ pro enuo, sed kiujn ŝi nun volonte rememoris, ĉiun tagon ĉiam pli. Ŝi sentis, ke ĉio ĉi estas vana. Kiel objekton oni enportis ŝin en la domon, kiel objekton oni ŝin ankaŭ elportos, por fari lokon por alia virino, kiu same tiel estos karesata per vortoj, surŝutata de arĝenta mono, petata humile, kaj kisata tremante. Ŝi ekdeziris tial esti denove, tiel rapide kiel eble, almenaŭ edziniĝinta.

Koncerne Aranĝelon Isakoviĉon, al li, vere, ŝajnis, ke li malnormaliĝos.

Neniu al li tion profetis, li tion tute ne antaŭvidis. La bela revturo, plena da eksterordinaraj negocaj sukcesoj, renversiĝas rekte sur lian kapon. En la animala deziro, kiu lian vivon dum multaj jaroj nebuligadis, kiu dumnokte lin obsedis, en mirsonĝoj, li kutimiĝis la finon de sia amo al propra bofratino, vidi tute alia. En seksimpulso, kiun li dum multaj jaroj subpremadis, kun kiu li tiel longe ŝanceliĝadis, li kutimiĝis la finon de tiu sia malsano, kaj de tiu sia entrepreno, mense vidi agrabla, sen ia ajn mafeliĉo.

Eĉ, se li fojfoje, ekscitita, kun larĝe malfermitaj naztruo, pensis ankaŭ, ke tiu peka pasio estos estingita tuj kiam li kun sia bofilino geos kelkajn noktojn; eĉ, se kelkfoje, kolera, li eĉ planis ŝin post tio forĵeti, samkiel siajn uzitajn, junajn servistinojn li forĵetadis, li tamen, en la fundo de sia esto sentis, ke tiel ne okazos, kaj ke li deziras je sia bofratino kvietiĝi, longe, longege.

En senĉesa transloĝiĝado, jam dum la patro estis viva, suferante pro sia petolaĉa frato, al Aranĝelo Isakoviĉo la vivo de lia familio kaj parencoj, kaj de la aliaj homoj, kiuj kune kun li almigris el Serblando, denove enmigradis Serblandon, ŝajnis vera frenezaĵo. Vidinte ĉirkaŭ si, ĉie, ŝlimegejojn kaj koton, homojn kiuj enteriĝadis, vivis en enfositejo, kaj en printempo, aŭ antaŭ neĝsezono, denove transloĝiĝadis, Aranĝelo Isakoviĉo eksentis sovaĝan bezonon ĉion ĉi ĉesigi, resti en iu loko, kaj ankaŭ aliajn devigi resti.

Senĉese kverelante kun la patro, kiu sekvis la armeon, kaj kun la frato, kiu abrupte avancis en la armeo, Aranĝelo Isakoviĉo ekmalamis ankaŭ la aliajn, kiuj kune kun ili transloĝiĝadis. Komercante, per siaj buntaj ŝipoj, sur la bordoj kaj urboj, ankoraŭ pli buntaj, li kutimiĝis ĉion forlasi, kaj ĉion malestimi. La ŝanĝado de regionoj, domoj kaj personoj, homoj, kun kiuj li renkontiĝadis, faris lin memfida kaj orgojla, ĉar li, flava, nigra, kun siaj sekaj manoj, kvankam pli malforta ol ili, ne ŝanĝiĝis, kaj ĉiam restis la sama.

Potencon supernaturan li sentis ankaŭ en siaj taleroj, ĉar kie li ilin elŝutis el saketoj, tie haltadis barkoj, kaj la domoj iĝadis senmovaj kaj liaj. Ili moviĝis laŭ lia deziro kaj liaj planoj, kaj baldaŭ al li ŝajnis, ke super ili pluvos, kaj printempoj ĉirkaŭ ili aperos, kiam li volas, kaj kiel li volas. Ekmalaminte, precipe, la soldatojn, kiuj laŭ la ordono de maljunaĉaj kaj fiornamitaj oficiroj iris interbuĉi kun turkoj, francoj, prusoj kaj hungaroj, li faradis malbonon al ĉiuj, kiuj estis transloĝiĝantaj. Kiam la frato kaj iuj liaj kamaradoj, komencis paroli pri Rusujo kaj foriro en Rusujon, li estis la unua kiu komencis denunci ilin al la armeaj aŭtoritatoj, kaj sendadis falsajn akuzojn, al katolikaj episkopoj.

Aranĝelo Isakoviĉo deziris la tutan homamason, kiu kutimiĝis al la cigana vivo, alligi per komercado. Li malamis, precipe, kapitanojn, kiuj

irigadis liajn homojn en militon, kaj ankoraŭ pli la homojn, kun kiuj ofte transloĝigadis ankaŭ la familio. Monon li donadis nur al komercistoj kaj metiistoj, kiuj loĝiĝis, kaj kiuj jam ne emis reveni en Turkujon, kien li plu venadis, komercante.

Per mono, arĝento, li, en la senĉesajn transloĝiĝojn de sia familio kaj siaj parencoj, enmetis tuberojn, kaj trude loĝigadis ilin en urboj laŭlonge de riveroj, kiujn li elektis. En senĉese moviĝo, kun siaj herdoj kaj saketoj de arĝento, kiujn li donadis prunte, li elektis lokojn, kie li persiste aĉetadis domojn, plejparte ĉe preĝejoj, kaj brutejojn, ĝardenojn kaj trinkejojn, por kiuj li donadis pruntojn, rentumomanke.

Antaŭnelonge li aĉetis domon en Poĵuno, kaj en la urbo Budao. Grandan, grandegan konstruaĵon el ŝtono kun magazenoj kaj monto, super akvo. Li eĉ aŭdi ne volis pri reveno en Turkujon, kaj des malpli pri iu migrado en Rusujon.

Dezirante senmovon kaj nepasemon, subite, li ekhavis eblacon plenumi sian deziron posedi la korpon de sia bofratino, kiun li sonĝis kaj amis, malgraŭ la sennombraj virinoj, kiujn oni al li venigadis, tie, kie li tranoktis, aŭ restadis unu-du tagojn, komercante.

En la fundo de lia vivo, jam dum multaj jaroj, kiel sur la fundo de rivero, sur kiu li veturis, troviĝis tiu korpo, kvazaŭ peza ŝtono, kiu haltigadis kaj liajn barkojn, kaj liajn trezorojn, kaj liajn laborojn kaj pensojn; la belega, blanka korpo, sur kiu li volis resti, longe, longege.

Dio al li ĝin donis.

Kaj, jen, li kvazaŭ forirus post Vuko Isakoviĉo, kvazaŭ forironte, lasante al li nur tiun monstra fluon, miksiton kun sango, kiu fluas senĉese, jam du semajnojn, sur lian cerbon.



LA FORIROJ KAJ TRANSLOĜIĜOJ, FARIS ILIN PASEMAJ, KIEL FUMO, POST BATALOJ

En la tempo, kiam la sinjorino Dafina falis en la manojn de sia bofrato, Vuko Isakoviĉo, kun siaj soldatoj, komencis supreniri en Stirion.

La Slavonia-Danubregiona regimento foriris militi, post la revuo en Peĉao, kiel draŝita hundo, humila kaj senbrua. En nekompaktaj, torditaj, duoblaj vicoj, ĝi levadis polvon, kiel brutoj, ĉirkaŭirante vilaĝojn kaj ŝlimegejojn, piedpremante de mateno ĝis mallumiĝo sablon, gresejojn kaj koton. Dormante en mallumaj, grandaj ombroj de arbaroj, sur herbo, la regimentanoj vekiĝadis frumatene, kiel ebria, frostiĝinta, kun prujno sur la harplektaĵoj kaj lipharoj, kaj komencadis hurli kaj kanti tirtone... hej... hej... sed ili ekmutis, zonumante armilojn, rememorinte, ke ili ne plu scias, kie ili troviĝas, kien oni ilin irigas.

La regimento alvenis ĝis la limo de la mondo, pri kiu oni parolis en vilaĝoj kaj enfositejoj, kaj la mondo, kiu komenciĝis de tie, estis nekonata, necerta mondo, el kiu ĝi revenos, tion ĝi sciis, kun amaso da mortintoj.

Kunpremiĝante, pli kaj pli, la regimento iris plue, grege, kun la kapoj pli kaj pli suben mallevitaj, transirante plugkampojn kaj loĝlokojn, eĉ ne alrigardante ilin. Dum transiro de pontoj, komenciĝis kunpuŝiĝoj kaj tumultoj, indignaj kaj sensencaj. Longaj pafiloj, ornamitaj per kupro kaj arĝento, kiujn la regimento portis kiel bastonojn, post kelkaj tagoj da rapida irado, komencis ŝiri la haŭton, dekstraŭltre. Pistolegoj, ponardoj, pulvosaketoj, en volvrime-no sur la ventro pendaĉis sur la koloj homaj, pro kio la regimentanoj paŝis tute diskrure, kvazaŭ nodaj ŝtipoj estis ligitaj al iliaj postaĵoj.

Polvo, ŝvito kaj etaj, nigraj muŝetoj, gluiĝis al iliaj naztruoj kaj palpebroj. Inter dentoj iliaj grincis sablo.

Kantistoj, senditaj al la fronto de la regimento, silentiĝis. Post ĉashundoj de oficiroj, kiuj rajdis antaŭ la regimento, fumante per pipoj, ekkuris amaso da kamparanaj hundoj, kiuj poste, perdinte la spurojn, bezonatajn por

reveni, iris kun la vostoj mallevitaj, kun la langoj flirtantaj, inter la piedoj de la soldatoj. La tuta regimento malbonodoris je sebo, eĉ elfore.

Post iomo da tagoj, la regimentanoj jam estis supre malplenaj, pro fortostreĉa seninterrompa irado, portataj, kvazaŭ torente, pli kaj pli malproksimen, ne sciante kien ili iras.

Tial, ne rigardante ĉirkaŭ si, la regimentanoj rigardis, fojfoje, supren, kvazaŭ deterigante. Ili sentis timon antaŭ fremdujo, kaj antaŭ io tute freneza.

Haltetante meze de nekonataj vilaĝoj, interpuŝigante sur pontoj, kiuj ŝajnis malordinaraj, tranoktante plurfoje ĉe putoj, nevideblaj en mallumo, la regimentanoj neniel povis kompreni, kiel ili tiel, freneze, povis ja ekiri.

En la ĉirkaŭaĵo de Peĉao la regimenton ankoraŭ atingadis baptoj el forlasitaj vilaĝoj, portante post ĝi panojn. Kelkaj virinoj iris malantaŭ siaj fratoj, paŝante tutan dekkvartagon, antaŭ ol revenis. Malsata vespere, frostiĝinta matene, ĉe bruligitaj fojnamasoj, la regimento nur tiam komencis konscii kion ĝi faris. Forlasinte siajn vilaĝojn, ĝi estis forlasanta ĉion, kio al ĝi estis komprenebla kaj videbla, por eniri tiun mondon, nekompreneblan kaj nepercepteblan.

Kampanoj, kiujn ili vidis preterire, sur kampoj, plugadis rajdante. Nur ŝafoj ankoraŭ memorigis ilin pri iliaj ŝafoj hejme, kaj iuj ĉevaloj, brunuloj – pri iuj iliaj brunuloj.

Cetere, ili ekkredis, finfine, la tuta batalionaro, ke ili ne iras kontraŭ la turkoj, kiel antaŭe, kaj tiu tero, al kiu ili iris, ekŝajnis al ili, vere, mistera kaj nekonata. Komenciĝis tiam profunda deprimado.

Tio, kio restis hejme, komencis, en memoro ilia, same kiel en la animo de Isakoviĉo, disflui kaj malaperi fumsimile. Vidante antaŭ si ĉiam pli da montoj, ebenejon ŝlimejan, desur kiu ili ekiris, tio impresis ilin kvazaŭ sonĝo, kun siaj putoj kaj gregejoj. Same kiel nebuloj, kiuj flugpendis malalte, super la kampoj, kaj malaperis malantaŭ ili, disŝiriĝis, en iliaj pensoj, ankaŭ la bildoj de iliaj edzinoj kaj infanoj.

Kiam ŝanĝiĝis la arboj, unue sur la deklivo de vidaĵo, kaj poste ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo, kiam ŝanĝiĝis kaj la tero sub iliaj piedoj, kaj aero, kiu iĝis diafana, malvarma, ili malĝojiĝis plene. Grandaj ŝanĝoj en la diejo okazadis antaŭ ili; laŭlonge de la rivero kontinuis densaj arbaroj, en kiuj rompadis arbustaron kaj fosis pluvejon apoj; nizoj rondflugis super iliaj kapoj, kaj akompanis ilin ĝis la bazoj de montoj, sur kiujn ili komencis, senfortiĝintaj, leviĝadi.

Same kiel en la animo de Isakoviĉo, ankaŭ en iliaj animoj ekĝermis malpleno. Domojn kaj hejmojn siajn ili forgesis, pri la edzinoj kaj infanoj ili ne plu pensis, siajn suferon kaj ŝviton ili sentis pli kaj pli forte. Ilin jam naŭzis la vivo, naŭzis la memoro pri siaj domanoj. Ili jam ne kredis, ke ili iam ajn revenos. Ili jam estis supre malplenaj, eĉ la bildon de siaj karuloj ili ne povis

al si prezenti, en fermitaj siaj okuloj, sub la kunpremitaj, ardiĝintaj palpebroj, kun la vizaĝoj, kiujn turmentis internaj doloroj kaj suferoj, pro paŝado kaj laco. Fraŭloj priridadis ilin, kaj tiuj, kiuj jam antaŭe partoprenis militojn, komencis paroli senbrue, en la batalionaro, kaj rabadis, nokte, survoje, ĉion, kion ili vidis.

Post la ripozo en la urbo Radkersburgo, Isakoviĉo komencis umi ilin per trejnado, dum marŝado. Li instruis ilin kuri kun pistoloj en la manoj, kaj ponardoj inter la dentoj. Tiel ili pafadis, kuregante amase, al arbajn trunkojn, kaj batis per ponardoj branĉojn, hurlante samtempe, unuvoĉe, la nomon de Maria Terezo, tirtone kaj laŭtakte. Tuj kiam li kune kun ili supreniris iun altaĵon, li ilin haltigis, dislokis, kaj ordonis kuri, pafante, al valo, sed tuj kiam li kune kun ili venis en tiun valon, li ĉiufoje ilin haltigis, dislokis kaj ordonis kuri, pafante al la monteto, sur kiu antaŭ ili, rapide, oni levis flagon.

Ĉe pontoj li dividadis ilin en du grupojn, kaj mem gvidas la grupojn unu kontraŭ la alia, kaj sur la ponto li ilin intermiksas kaj konfuzigas, turniĝante furioze sur la ĉevalo, inter brilantaj sabroj, en fumo de pulvo, inter tiuj konfuzitaj homamasoj, kiuj hurlis, incite kaj sangavide.

En kampadejoj li ilin turmentis, ordonante fari fosaĵojn, apud kiuj ili devis kuŝi, dum sub la tero oni eksplodigadis pulvoplenajn barelojn.

Senfortiĝintaj pro tiuj trejnadaj, ili senĉese grimpis arbarriĉajn montojn. Plurafoje ili kvin fojojn dum unu tago transiris la serpentuman riveron Muraon, vadante tra akvo. Pro la trejnado ili preskaŭ freneziĝis.

Ili iris sur monto, en kies ombro, sube, restis plugkampoj, vilaĝoj, preĝejoj, vinberejoj, videblaj desupre, kiel birdoj, ne kiel homoj. Ili paŝis sub grandegaj rokoj, kiuj pendis super iliaj kapoj. Puraj kaj sennombraj rojoj lirlis desur tiuj rokoj, kaj aero penetradis iliajn brustojn kiel ponardoj. Malsanuliĝis multaj.

Mirtime ili ekvidis urbojn el ŝtono, strangajn pontojn, aparatojn, kies uzadon ili ne sciis, tutajn montojn el kunmetitaj falĉiloj, kiuj estis venditaj al rusaj komercistoj. Ili aŭskultis muzikon, kies devenon ili ne povis kompreni, ĉar ĝi aŭdiĝis el muroj. Sur la supro de iu domo, iun lundon, sur ĝia tegmento, ili ekvidis, kvazaŭvivan forĝiston el fero, kiu per feraj manoj estis levanta martelon kaj batanta amboson. Iuj krucsignis kaj konsterniĝis, dum aliaj, elpreninte pipojn elinter la dentoj, kraĉetadis kolere, kredegante ke tio estas trompaĵo.

La aero ebriigis ilin.

La lando en kiu ili loĝis, vasta, marĉoriĉa, kun nebuloj kaj varmegaj vaporaĵoj, kun finosena bruado kaj ondiĝado de kanoj kaj salikejoj, kun ĝiaj enfositejoj kaj gregejoj en koto, kun lignaj preĝejetoj, estis plene malaperanta el ilia memoro. Ĉi tiun novan landon, tute verdan kaj malvarman, kun

mallumaj arbaroj, kun senarbejoj, super kiuj la ĉielo glimis kiel profunda, travidebla lago, de ĉiuj flankoj traromps aero, kaj portempe, plene elpremis el animoj iliaj tiun alian, ventoriĉan landon. Ili spiradis, enspiradis, kun la kapo klinita, tiujn eksterordinarajn montojn, sur kiuj, en malproksimo, ili vidis neĝon, ne kredante al propraj okuloj. Malpuraj kaj mizeraj, ili trairis ŝtonajn vilaĝajn kortojn, plenajn da fojnostakoj, brutoriĉajn, kaj sentis, ke malriĉo ilia estas malriĉo senfina, kaj ke la kotejo, en kiu ili loĝiĝis, estas nemezurebla kotejo.

Ili konjektis grandegan diferencon inter ilia senĉesa sufero kaj ĉi tiu gajeco fremda, kiam en vilaĝoj ili vidis festenojn, bakitajn kapridojn, aŭdis batadon de preĝejoj sonoriloj, kaj vidis plenaj kaldronoj da vino. Lando ilia, ĉarmaspekta, aperadis pli kaj pli malofte en iliaj pensoj, kun siaj malviglaj, malklaraj, malfreŝaj riveroj, insuloj, kiujn invadis hiskiamo, sambuko kaj grenrozoj, nigraj poploj kaj kvakado de ranoj, simila al subtera ululado. En kotaj kaj monstraj vidaĵoj el ilia memoro malaperis tiuj, kiujn ili lasis hejme, kaj unuafoje iuj inter ili vortigis, ke ili ne intencas reveni hejmen.

Vizitante vilaĝojn, ili preteriris grandegajn fornojn kaj ferajn fandejojn, el kiuj elkuradis laboristoj por vidi ilin, vestitaj en feloj, peĉvangaj kaj bruniĝintaj, nigraj kiel diabloj. Grandaj fajregoj en fandegoj, kiuj vespere lumigadis tutajn montojn, prilumis ankaŭ ilin, en noktohaltejoj, tiel, ke ili sonĝis strangajn, ruĝajn rabobestojn, brulantajn akvojn, fajrantajn virbovojn kaj bubalojn kaj inferon.

Petolaĉaj kaj furiozaj dum ekiro, ili iĝis malgajaj kaj humilaj, malproksimiĝantaj tra la fremdejo. Ili jam ne havis forton rompadi kaj frakasadi, ili jam ne kuraĝis tuŝumi virinojn. Kunpremiĝintaj je grupego, ili staris meze de vilaĝo, embarasema. Ili interfratiĝadis kaj amikiĝadis kun ĉiuj, kiuj ilin alpaŝis, timeme kaj humilaĉe. Neniam pli malsovaĝaj soldatoj trairis tiun lokon.

Pluse, ĉiun tagon, oni lacigadis ilin per trejnado en arbaroj kaj herbejoj. Malsategaj, post abruptaj tagmanĝoj kaj diboĉadoj, kun vundoplenaj kruroj, ili eniris la urbon Gracon, flaviĝintaj, sekiĝintaj, kun la okuloj sangruĝaj kaj rigardoj malklaraj. Ili ravis la loĝantojn per siaj brilegantaj, speciale purigitaj armiloj, per sia terura, kura paŝado, kaj per siaj ekkrioj, unuvoĉaj. Al la impriestrino estis sendita rajdheroldo, kiam ili estis forirantaj el Graco. Laca pro trejnado de la soldatoj, Isakoviĉo kun ili eniris Aŭstrujon, suferanta intestajn spasmojn. Ĉiam pli ofte li pro tio deseliĝadis. Li forlasadis la oficiojn, kiuj kantante, rajdis antaŭ la soldataro, kaj sidiĝadis en ĉaron, kiu lin kiel kadavraĵon veturigis kaj skuadis, en nubo de polvo, kiun post si levadis la regimento.

Veturante malantaŭ la regimento, kiel giganta felsako, plena da vino, Vuko Isakoviĉo preterrigardis homojn, postlasantajn la ĉaron, kvazaŭ en sonĝo.

Militante dum multaj jaroj, li delonge kutimiĝis veturi al bataloj, tiel, en ĉaro, sencomanke kaj kialomanke, pro ia neevitebla ordo, laŭ volo fremda, tra landoj fremdaj.

Kvankam li havis neniun kaj nenion sian en la fremdlando, tamen li trovadis spurojn de siaj soldatoj – eĉ la siajn. Urbojn, en kiuj li iam jam estis, kie li maldormis ĝis mateniĝo, aŭ ripozis dum vesperoj, en kiuj li, ankaŭ antaŭ kelkaj jaroj, estis pasanta inter muregoj, sur vojoj, heligataj de lunlumo, kiel ombro.

Li konis kontrabandistojn kaj flosistojn, kaj renkontadis forgesitajn virinaĉojn, siajn, kaj virinaĉojn de siaj kamaradoj, rememorojn pri siaj diboboj kaj malfeliĉoj. Tiele, kiam li estis pasanta tra tute alia regiono, tra suna tago, dormetante, senfortiĝinta pro doloroj en la ventro, antaŭ li aperadis, kiel ŝajnaĵoj, staloj, de malsanegoj infektitaj domvicoj, vekriantaj vunditoj kaj pluvaj noktoj, en kiuj li vivis iam.

Li ne plu estis zorgema, ĉar li kolapsis pro kolerego kaj malespero. Ne nur ĉar lin en Peĉao oni tiel ofendadis kaj turmentadis, sed ankaŭ ĉar oni al li ne donis la titolon de subkolonelo, kion li, ĉi tiel oldaĝa, konstante esperis, kaj kion oni al li jam en Varadino, estis promesintaj.

Li sentis, ke lia disiĝo de la familio estas plena, malgraŭ konstanta pensado kaj memorado pri ĝi. Se iu estus alflustrinta al li, ke la edzinon kaj la infanojn li jam ne havas, li eĉ tion ekkredus, en sia soleco, en tiu ĉaro, en kiu li apenaŭ povis sterniĝi pro bulĉapeloj, rubandoj, kaldronoj kaj seloj. Rememorinte la familianojn, li sentis kiom li apartenas al iu alia, al iu, kiu lin ĉi tiel buntan kaj troornamitan irigadas tien-reen, kune kun tiu armeo, kies nur krurojn li vidis, en nubo de polvo, irantaj egalpaŝe.

Preterlasante, preter la ĉaro, boskojn, valojn kaj senarbejojn, skuiĝante en la ĉaro, al Vuko Isakoviĉo finfine ekŝajnis, ke la mondo haltis, sed ke li trapasas ĝin, veturante sencele kaj senprudente. Elmalproksime, antaŭ si, li aŭdis ritmon de kurantaj paŝoj, frapbatadon de armiloj, kaj laŭtan ripetadon de silaboj, unuvoĉe: Ma-ri-a, Ma-ri-a, Te-re-zo, Te-re-zo.

Varma ŝprucaĵo de aero surŝutis lin, kiam li estis transiranta vojojn, kaj agrabla nevarmo, kiam li estis eniranta arbaron. Sube, sur la montodeklivoj kaj krutaĵoj, videblis domaretoj, kaj sur montetoj – sonorilturoj de preĝejoj, en lumo, kiun vento disportadis, kiel pluvegon.

Kvankam li senerare antaŭvidis ĉion, kion li ĝis la batalejoj bezonos, tamen al li komencis manki kaj manĝaĵo kaj mono, krom tio liaj homoj komencis malsaniĝi, pro akvo. Li enviis siajn oficirojn, kiuj veturis senzorge, kaj des pli siajn soldatojn, kiuj eĉ ne sciis, kien ili iras. Li komencis kredi, ke la plorado kaj vekriado, dum lia ekiro estis kialohavaj, kaj antaŭsentis, ke ĉi tio estos lia lasta foriro, kaj ke li dum ĉi tiu milito mortos.

Abrupte estis ŝanĝiĝanta lia humoro kaj konduto, dum tiuj tagoj. Li rajdis antaŭ la regimento kun oficiroj, fumante pipon, kaj subite ĵetiĝis en ĉaron, kiu skuiĝis post la regimento. La flankenigitan bulĉapelon li movis gaje kantoritme, kaj poste, denove forrajdis kaj eksilentis, frapinte per la boto la subpugon de la ĉevalo. Dum li ĝemis pro la doloro en la ĉaro, al li ŝajnis, ke jam kelkajn tagojn pluas, senfine, senĉese, senhalte, pro kio defluas desur li ne nur la edzino kaj infanoj, sed ankaŭ lia eksa vivo, kaj ĉio, kion li vidis. Vidinte el la ĉaro, super altaj montoj, preterkrozantaj nubojn, li ekkredis, ke ili subfluas, samkiel subeniĝas gigantaj rojoj da ŝtonoj desur pintoj, sub kiuj blankis tutaj kampoj da profunda neĝo, kaj grandaj, malhelaj ombroj de rojoj.

Tra abiaro, li supreniris post la regimento, tute perdinte poste el la vidkampo la teron kaj vilaĝojn, subajn. Grincado de kurbteniloj, spokoj kaj kluĉnaboj dormigadis lin, same kiel la senĉesa bruoj, sub la ĉaro, de forfaltintaj branĉetoj kaj pingloj, kiuj surŝutis la monton, molaj kiel musko, pro kio la radoj sinkadis tutan spanon.

En silento, kiun eĉ la pasado de la regimento ne povis ĝeni, la suproj de la montoj restis senmovaj kaj klare videblaj, pro kio Isakoviĉo, la tutan tagon, senĉese okulfiksadis ilin. Kiel finosenaj ondoj, ili proksimiĝadis ĉiam pli, kun neĝokovritaj ravinoj, renversiĝante en valojn, en grandajn, mallumajn, ombroplenajn deklivojn, kie ili disfluadis en abiarojn, sub kiuj kiel akvo, inundanta, vastiĝis alta herbo, kreskante super ŝtupoj, ŝtonoj, rojoj.

Konjektinte, ĉi tiun fojon, sian morton, Vuko Isakoviĉo, same kiel ordinare okazas kun ĉiuj dikaj kaj sanaj homoj, malĝojiĝis nenial. Korpulentega, sed tamen anemia kaj senfortiĝinta, kuŝante en ĉaro, kiu lin malrapide portis post la regimento, li ĉiam pli cedis al malĝojo, ke ĉio ĉi okazas, jen, vane.

Fiksrigardante ĉielenajn pintojn, sub kiuj ombroj bluis en neĝon, li veturis tra varma, printempa tago kaj odoro de abiaj arbaroj, revidante, en la memoro, preskaŭ tutan sian vivon. Kompare kun ĉioma terura pezo de apudaj montoj, inter abioj, kies branĉoj, elmalproksime, konstante aspektis kiel disetendiĝintaj flugiloj, kun profundaj krutaĵoj sub si, al li tio ĉi ŝajnis tre senpeza, kaj preskaŭ ekŝvebonta en la aero.

Tiele, krediginte sin, ke li senfortiĝis, li haltigadis la ĉaron, kaj kuŝiĝadis ĉe la vojo, inter malnovaj arbostumpoj, sunbanante sian malsanan ventron, observante dum horoj, kun la bulĉapelo ŝovita sur la okulojn, formikojn, svarmantajn ĉe lia kapo.

Afliktita, en la ĉaro, li tiom dronis en siajn pensojn, ke al li ŝajnis, fojfoje, ke li vidas sin mem kuŝanta sur fojno, kaj veturigata. Al li ŝajnis, ke li sidas ĉe propraj piedoj, sub altaj abioj, kaj vidas siajn grandegajn botojn kaj streĉitajn femurojn, kaj ankaŭ la nudigitan, multvilan bruston, punktojn de la ĉemizo kaj arĝentajn rubandojn, same kiel siajn pendantajn, dikajn vangojn kaj platan

nazon. Ŝajnis al li, ke li rigardas siajn grandajn, pufiĝintajn flavecajn okulojn, kun punktetoj ĉe la pupiloj, kaj ke vidas ankaŭ nigran sian mantelon, per kiu li estis kovrita. Ŝajnis al li, ke li konsiliĝas kun si mem.

Junaĝo lia ne nur ne aperadis en lia memoro, sed eĉ kiam li deziris re-memori ĝin, ĝi malheliĝis en la memoro, malaperante, antaŭ la ĉiam samaj vidaĵoj de la edzino kaj infanoj. Nek la brila tempo, kiun li travivis dum la kontraŭturkaj militoj, ne deziris reparadi en lia memoro, sed konstante miksiĝadis kun memoroj pri diversaj lokoj, kie li vivis kun la edzino, kaj en kiuj al li naskiĝis la infanoj. Sed ĉio ĉi estis tre sencomanka, ĉi-jene, elmalproksime.

Kiel iaspeca ombro lin akompanis tiu edzino, je kiu li jam enuis, krome la infanoj, kiuj estis liaj, sed konstante en ia malproksimo. Ĉu li revenos, aŭ ne revenos, lia sento, ke li disiĝis de sia familio tute, li sciis tion, restos en lia animo. Sed kial li bezonas ĉion ĉi, se li ne havis eĉ tiom da povo, por fari kun ili tion, kion li deziras, sed kune kun ili, aŭ sen ili, li ja devis turniĝi, laŭ la volo de aliaj, simile al ŝnurego ventomovata? Kiĉvestita kaj grandkapa, ĉi-jene, li ja apartenis al iu alia, ne al tiu virino, ne al tiuj infanoj, kiuj ploris post lia foriro; al aliulo, al kiu sufiĉis nur ekfajfi, por ke li ekkuru ne retrorigardante, trans montojn kaj riverojn, ajnaflanken, ne konsiderante, kiom da doloro li tiamaniere al si faras, nek kian teruron li post si lasas, nek en kian frenezumon li mergiĝas.

Vivante tiun teruran vivon, laŭ volo fremda, ĉu li, kvazaŭ disŝirita, ne forlasadis pecojn de sia estaĵo, surpikitajn sur diversajn domojn, en regionoj, en kiuj lia piedo neniam plu aperos? Ĉu li ne kutimiĝis rigardi tiel, kvazaŭ videblaĵo estus nevidebla, sed nevideblaĵo videbla, kaj trairi tie, kie li volonte restus, kaj resti tie, de kie li volonte forirus? Ne nur ke post la morto li ne plu povos venadi tien, kie li fartis bone, kaj kie oni lin kun ĝojo atendis, sed eĉ jam nun, dum sia vivo, li ne povis reveni al la lokoj, kie li vivis po dekon da jaroj, kaj kie li ja volis resti. Ĉu li sentis, aŭ ne sentis, la plej delikatan vekiĝon de printempo, antaŭ dudek jaroj, kiam li troviĝis sub la fortikaĵo de Oseko, aŭ la plej silentan silenton de vespero, sub la urbo Varadino, kie li estis loĝiĝinta – neniun lin demandis pri tio. Nek tien, nek alien lin gvidas lia vojo, ĝi lin gvidas al tute alia flanko, laŭ fremda volo. Kun la terura vundo, kiu etendiĝis de lia gorĝo ĝis de la dekstra ŝultro, sed vane, li, multajn monatoj, kuŝis senmova, super la enfluejo de Danubo, ŝvebante inter la vivo kaj morto, kun flavaj lumoj de disfluinta akvo, sablo kaj pintoj de piramidaloj en la okuloj. Post tri jaroj, kiam li estis pasanta tie, oni eĉ lian nomon ne memoris, kaj valaĥino, kiun li speciale amis, kaj pagadis, eĉ ne rekonis lin.

Kuŝante sub abioj, en herbo, dormigita de maldensa kaj malvarma aero, kun grandaj valoj kaj malhelaj arbaroj sub si, Vuko Isakoviĉo, do,

senfortiĝinta, penegis rememori ion ajn el sia vivo, kio lin konsolus en tiu malordinara laco kaj konjekto pri sia morto, kiu lin ekregis.

Atinginte per sia peza ĉaro la regimenton, kiu ripozis en vilaĝoj kaj ĉe pontoj, aŭ oficirojn siajn, kiuj serĉis amuzon en ĉasado kaj hunda batuo, partoprenante nokte balojn, organizitajn je ilia honoro, Vuko Isakoviĉo ordinare elektadis tranoktejon sur iu altebenaĵo, permesinte al la armeo eniri valon, pro kio la regimento tranoktadis proksime, antaŭ li, dislokiĝinta ĉirkaŭ multaj fajroj en arbaro, apud kiuj, heligitaj de flamo, homoj en herbo similis al rabobestoj.

Tiam ordinare malaperadis la vojo, en la mallumo, kiu ĉiam pli flugpendis direkte al la suproj, kiuj ankoraŭ longe estis lumigataj.

La vilaĝon, en kiun li povus subeniri, li duonvidis baldaŭ, en la valo, nur kiel ĥaason da ŝtonoj en sekiĝinta fluejo de rojo. Kun densa arbaro, kiu estis malleviĝanta sur ĝin, antaŭata de kelkaj, hirtaj arboj, kiuj ĵetadis grandajn ombrojn sur herbon, ĉe la elirejo el arbaro.

Super la vilaĝo etendiĝis kampoj, kiuj pli longe restis videblaj, traretitaj de vicoj da arboj kaj rojoj. En tiuj kampoj, antaŭ la arbaro, li rimarkis ankoraŭ kelkajn solstarajn domojn, kiel ŝtipojn, kaj kelkajn arbojn, kiuj eliris sur senarbejon, grandaj kaj pezaj, kiel urso. Post tio denove aperis densa arbaro, supre, en monto, kaj post ĝi, kiel grandegaj ŝtonaj kurtenoj, rokoj, pintoj, abruptaj muregoj. La ĉielo super ili longe, preskaŭ ĝis noktomezo, restis hela, surŝutita de palaj, sed grandaj steloj, kiuj antaŭ mateniĝo iĝadis etaj, sed brilaj kaj tremetantaj.

Tranoktante ĉe abio, pej ofte la plej granda, Vuko Isakoviĉo tre ofte sidis longe, inter siaj hundoj, grumblante, dum ĉiuj ĉirkaŭ li jam delonge dormis. Turniĝinta dors-al-fajre, li varmiĝadis nedormante, dum printempa nokto, provante, jam kelkajn tagojn, kuraci la ventron per malsato, vino kaj brando, surkovrante ĝin per ŝafaj feloj, laŭ la konsilo de sia servisto.

Sur dismetita fojno kuŝis liaj homoj, apud ĉevaloj, kiuj batadis, obtuze, per la hufoj teron, dorme. Hundoj, ariĝintaj ĉirkaŭ li mire kaj admire, ĉar li maldormis, spiregis pro soifo kaj malsato, persekutante unu la alian dum la tago, eĉ sur la alia flanko de la monto. Laca pro ĉarskuado, senfortiĝinta pro daŭra meditado, pri sia pasinta vivo kaj edzino kaj infanoj, li rigardis atente, dormema, ke sur la vojo, kies nur unu parto estis videbla, blankis, kiel helikoj, ŝtonetoj, ĉiuj samdirekte, proksime unu al la alia. Tiel ankaŭ la palisoj de plektita barilo, kunigitaj per arbustotufoj, viciĝadis ĉiam pli malproksimen, ĉiuj samdirekte, proksime unu al la alia. Unu granda abio, kun alia malgranda apud ĝi, estis malluma, proksimiĝanta al li tra altaj herboj, sur kiu, restante sur la supraĵo, vastiĝadis malvarma, nevidebla vento. En arbaro, kiu, dekstraflanke, troviĝis je kelkpaŝa distanco, regis mallumego, sed ankaŭ sur ĝia supraĵo

li vidis sennombrajn branĉetojn, kiel plumojn. Super profundaj abismoj de mallumo, lia rigardo denove haltis en granda sternaĵo de neĝo, malleviganta sur ravinoj kiel blankaj rojoj, plenaj da ŝtonoj, super kiuj la montopintoj jam kvazaŭ estus ne antaŭ li, sed en sonĝo. La pura brilo de la blua ĉielo paralizis liajn okulojn tiel, ke li longe restis, senmova, fiksrigardanta.

Tiam, samkiel en liaj homoj, unuafoje ankaŭ en li ekĝermis la penso kaj neklara dezirego neniam plu reveni. Krom konjekto pri morto kiun li sentis nun unuafoje kaj kiun li dum siaj ekiroj militi, ĝis nun, neniam sentis, al li aliĝis ankaŭ la senĉesa enuo, kiun li jam bone konis, kaj kiu lin akompanis, ĉiam, ĝis la unuaj bataloj. Elnombrante, mense, la malsanulojn kaj eklamin-tajn ĉevalojn, li kun senlima malestimo pensis ankaŭ pri la aliaj, sanaj kaj elanaj plue vojaĝi kaj batali. Kvietaj kaj memfida, li tamen mense per la insultoj superŝutis unue sin, kaj poste la aliajn. Senĉesa trejnado kaj konstantaj militoj igis lin vera majstro kiu kapablis irigi homojn en militon, li antaŭvidis ĉiun, eĉ la plej malgrandan, eventon, kiu okazos, kaj li povis, anticipe profeti eĉ bagatelaĵojn. Se okazis, ke li mise pritaksis iun energian Valaĥan ĉevalon, aŭ ian pezan, germanan ĉevalinon, havantajn nepercepteblajn malsanojn kaj naturojn, tamen neniam al li okazis, ke li eraris elektante ĉarojn, radojn, aŭ homojn. Manko da manĝaĵoj lin ankaŭ nun ne zorgigis, kvankam ili devis mem prizorgi la nutradon kaj armadon, sed nun tio estis al li teda pli ol iam ajn. Li sciis, ke plej grave estas venigi ilin tien, kie la unua renversiĝos trafita, sed la sento de malestimo, miksitaj kun kompatado, aperis en lia animo pli fie, ol ordinare. Ne reveni plu kaj ne turmenti sin pro ili plu, ŝajnis al li, pro elĉerpiteco, io eksterordinara kaj nebla, kion li neniam ĝisvivis. Ne plu rektigadi tiujn grandegajn krurojn, kiuj neniel volis, kaj ne scipovis, marŝi paŝotene, ne plu frapadi iliajn dorsojn, kaj ventrojn, por ke ili rektiĝu tenante pafilon antaŭ la brusto. Ne bati ilin plu. Ne bati ilin, kiam ili anusule rigardas en pulvobarelon, kiun ili devas bruligi. Ne bati plu ilin sur la vizaĝojn, sur la kapojn, sur la genuojn. Kaj, precipe, ne reveni kun ili. Ne vidi la kriegadon, ploradon, saltadon, de kvazaŭfrenezaj, maljunulinoj, la vekriadon kaj plorkantadon, lamentadon pri mortintoj.

Por Vuko Isakoviĉo, la tuta regiono el kiu ili alvenis, en kiu li lasis la familion, jam iĝis forpuŝa. Kun la ordono instrui la homojn fosi sieĝajn tranĉeojn, li ricevadis ankaŭ ordonojn instrui ilin kiamaniere elsekigi ŝlimegejojn, kaj kiom li instruis ilin pafadi per fusiloj samtempe, kion li neniam sukcesis lernigi al ili, li instruis ilin ankaŭ fari murojn el argilo apud marĉaĵoj kaj salikejoj, kie ili prefere loĝis en branĉaro kaj veprejo, sub arboj, kaj eĉ en enfositejoj kaj kabanoj, kie ili mortadis kaŭrante. Idiota estis tiu regiono, idiota, akveca, marĉoriĉa, ebena, ĝi jam tedis lin kaj, se li povus, li plej volonte forirus, jam delonge, por reveni neniam.

Kutimiĝinte al la armea laboro, iĝinte isto de sia profesio, li malestimis ĝin, kaj ankoraŭ pli la homojn, kiuj hejme similis al ciganoj, same kiel iliaj loĝlokoj similis al tendaĉoj. Sed ne al tendaĉoj en Valaĥujo, kiujn la honorinda Isakoviĉo memorfiksis, flarante ilin fojfoje, mense, kiel rozojn, pensante pri malgrandaj ciganinetoj, sed al tendaĉoj vulgarulaj, mizerulaj, povrulaj, en Turkujo, ĉirkaŭ rubejoj. Kun kolero, li tutan tiun regionon, tra kiu lin irigis la patro kaj frato, komercante, li volontege cindrigus aŭ vendus, kune kun ĉiuj homoj, kiujn li, ĝuste li, mem, loĝigis ĉirkaŭ Varadino, kaj kiuj lin adoris.

Cetere, eĉ kiam lin plenigis kompato, la kompato lin absorbis same tiel impete, post kolero, kaj tiam li deziris kun ili foriri ien, for de tia vivo kaj de tia regiono.

En malespera pensgalimatio, kvankam li estis dankoplena ĉar tiu gardas lian edzinon kaj infanojn, li rememoris tiam la fraton, la malkorpulentan, kun furiozo, sentata rilate al tiu, kiu forestas. Ties ĉiama ajnistumado, harsplitado kaj negocado ŝajnis al li tre ridindaj. Kverelante, li devis, antaŭ ekiro, interpaciĝi kun li, ne ricevinte sian monon, ne ricevinte talerojn de sia edzino, aŭskultante samtempe, konstante, subridon de la frato, pro la ideo transloĝiĝi ien, eble en Rusujon.

Vivo, la vivo en la hejmo, por Vuko Isakoviĉo ne estis vivo, la vera vivo por li estis ie aliloke, admirinda kaj sencoriĉa. Hejme troviĝis nur kotejo kaj aflikto, ĉiutempa negocado jen tie jen alie, interpuŝiĝo en malpuraj lokoj, kiuj al Aranĝelo Isakoviĉo ŝajnis indaj plenajn saketojn, afablajn ridetojn kaj negocajn interparolojn, kiuj ne havis finon. Vuko Isakoviĉo, se li povus, li eĉ degnus alrigardi ĉion ĉi, des pli Turkujon, kien iuj estis reloĝiĝantaj. Turkujon, kiun Vuko Isakoviĉo malamis, neniam rimarkinte ĝiajn pavimitajn kortojn, fontanojn, belajn pontojn, kaj neglektante ĝiajn minaretojn, belegajn, similajn al altaj, centjaraj lancoj.

Foriri ien, vivi senzorge, forkonduki ankaŭ ilin, por ke ili ie vivu senpene, agrable, tio al Vuko Isakoviĉo ŝajnis tre ebla. Ie devis esti io hela, dezirinda, do, tien oni devas foriri. Vidante ilin sube, en herbaro, mallumajn tiujn amasojn, kuŝantaj ĉirkaŭ ĉaroj, lumigitaj de fajro, ŝajnis al li, kiu estis apogita sur radon, ke oni devas ilin forkonduki ien foren. Forgesinte dum momento, kaj kie li estas, kaj kien ili iras, fiksrigardante altajn murojn de rokoj, super kiuj brilis la ĉielo, plene klara kaj plene palblua, Vuko Isakoviĉo kvietiĝis, kune kun la homoj el la Slavonia-Danubregiona regimento.

Ili dormis. Kiam forŝaŭmis la doloroj en la intestoj, ekdormetis ankaŭ li, karesante tampaltempe siajn hundoj, kiuj kaĵole ŝoviĝis sub ŝafajn felojn, kiuj varmiĝis sur li. Subabie, malantaŭ la ĉaroj, li aŭdis remaĉadon de bovidoj, kiuj estis venigitaj el Grazo por li kaj por liaj oficiroj, kaj ekster la arbaro – sennombran pepadon de griloj.

Vidigi, ke oni povas iri ĝis Bavarujo, laŭ la vojo, kiun proponis li, kaj ne laŭ tiu, kiun ordonis la grafo Serbelono, generalo de rajdantaro, tamen estis la ĉefa zorgo de Vuko Isakoviĉo. Tial, aŭrore, tuj kiam liaj doloroj en la ventro komplete endormiĝis, li vekis, antaŭtempe, la regimenton, kaj haste daŭrigis la vojaĝon ĝis Danubo.

Malleviĝinte en valojn, frukarbejojn kaj grenriĉajn plataĵojn de Supra Aŭstrujo, la regimento iris tre volonte, pli bone nutrata, sed precipe, pro hastado, malpli trejnita.

Tagoj estis pasantaj en senĉesa irado, en etendiĝantaj, duoblaj vicoj, kaj nokte – en ronkado. Honore al la serboj, kiuj estis preterpasantaj, en vilaĝoj estis organizataj dancoj, kaj ĉe nemalriĉaj bienuloj – maskobaloj. Iomete rekaptinte sian spiron post silentado kaj malbonhumoro, la regimento denove komencis kanti, precipe dekiam ĝi komencis trapasadi eturbojn, en kiuj troviĝis, abunde, bona vino. Revenis multaj malsanuloj, kiuj estis surĉarigitaj. Ekirinte apud Kremminstero laŭ Danubo, kiu al ili ĉiuj estis kara, la regimento denove komencis rapidegi, same kiel de Sremo ĝis Peĉao, kriante kaj rompante en multaj lokoj hurdojn.

Tamen, ankaŭ tiu dua ŝtormo de kolerego rapide kvietiĝis, kiam ili eniris Bavarujon, malriĉiĝintan kaj malsatantan.

Vuko Isakoviĉo ilin denove gvidis, rajdante antaŭ ili, kun sia maldiligenta, obeza servisto Arkadio, kiu estis konata en la tuta regimento kiel ebriulo kaj kantanto, kaj kun oficiroj, kiuj, senescepte, fumis pipojn kaj kantis, dum la regimento malantaŭ ili grumblis, krietadis, entrudiĝante per la voĉo kiu misnuanciĝis je cent aspektoj, penante kiel eble pli longigi kaj profundigi, ĉe la fino, du voĉojn e... ej... e... ej...

Penplene eltirante la piedojn el glueca salgrundo, la regimento sukcesis iele trepele alveni kompleta, kun ĉiuj siaj ĉaroj ĝis Engelŝtato, apud Danubo, kie ĝi devis renkontiĝi kun pli grandaj amasoj de Aŭstruja armeo, kiu estis pretiĝanta iri al al Rejno, sed ankaŭ kun siaj samlandanoj, el Limoregionoj.

Alveninte frumatene, el sudo, antaŭ la urbon sur la alia bordo de Danubo, la regimento haltis en marĉegoj, por koncentriĝi, antaŭ ol transiri ĝin, por montriĝi. Tamen, tuj kiam tagiĝis, aliflanke de la rivero komencis kriado de malsobraj voĉoj, swingado de brakoj, kaj aŭdiĝis blasfemoj kaj fivortoj, ordinare neaŭdataj en tiu regiono, alkriataj ŝajnofende, frate. Tio estis, ĵus vekiĝintaj, en kalsonoj, homoj de la subkolonelo Arsenio Vuiĉo, kiun kun siaj du regimentoj jam atingis la ĉefarmeon. Al ili ekŝajnis, kvazaŭ ili estus hejme, kaj ili gajiĝis.

Limsoldatoj el marregiono, kiujn estis veniganta la ĉefkapitano Ivano Horvato, ankoraŭ ne estis alvenintaj. Pri ili nur aŭdiĝis, ke ili faras fiaĵojn kaj aĉaĵojn, ie en Malsupra Bavarujo.

Du semajnojn kampadis Isakoviĉo ĉe Engelŝtato, apud la regimentoj de Vuiĉo, kiuj estis pli malbonaj ol la liaj. Post du semajnoj da ripozo, la estroj de la regimentoj ekiris, ĉiuj aparte, sed laŭ antcipe difinita vojo, al Rejno.

Isakoviĉo kiu ilin ĉiujn preterlasis, sur la lasta parto de la vojo, decidis devanci ilin. Turmentante la regimenton, kiu denove estis incitita, ĉar ĝi iris kiel la lasta, li per ekzercado de rivera transiro sukcesis la soldatojn pretigi por la lasta momento, por kiu li ilin akurate trejnis. Por sabrado kaj buĉado. Dorsal-dorse, en la formo de kvarangulo, divesaj partoj de la regimento pafaris kaj avanis kiel ensorĉitaj pro lia kriado, ĉiam pli krude, ĉiam pli firme, ĉiam pli terure. La lastajn du tagojn, li prunteprenadis de siaj najbaroj en la kampaĵo kavalerion kaj rajdigis ĝin kontraŭ sia regimento, kun elingigitaj sabroj, furiozantaj ĉevaloj, tiel, ke la tero skuiĝis sub iliaj hufoj. Kun bastono en la mano, li rajdis tien, kie inter la soldatoj komenciĝis konfuzego kaj retiriĝo.

Ekirinte finfine ankaŭ mem, li trairis la urbon fiera, sen ununura mal-sanulo, eĉ sen ununura difektita ĉaro. Elirinte el Bavarujo, kiun ili kredis malamika lando, li eniris Virtembergon, plenan da disflorintaj arboj, bonodoraj arbaroj kaj montoj, serĉante oportunan lokon por travintri, kie li povos elŝarĝi ĉiujn multenombrajn felojn, kapuĉojn, lankovriilojn, kiujn la regimento trenis kaj surdorse portis de siaj domoj. La printempo jam eksplodis plenforte, varma somero anonciĝis.

Tranoktante en herbo, kiu jam ne estis malseka, kvankam frumatene ĉiam estis belega, printempa nebulo super floriĉaj herbejoj, la regimento nun piediris senĉese, la tutan tagon, tagmanĝante sur placoj en malgrandaj, krutaj urbetoj, kaj vespermanĝis malproksime, en iu malluma montarana vilaĝo, kie oni malgraŭ lacego dancis sub lunlumo. Akacioj odoris kaj skaraboj zumis la tutan nokton.

Isakoviĉo, laciginte ilin plene, permesis al ili nun, antaŭ la morto, fari kion ili volas laŭ propra volo. La gardista kontrolo nokte ne plu estis tiel severa, kaj eĉ se frumatene iu ne estis sur sia loko, tiu ricevis nur kelkajn bastonbatojn. Nur kiam eĉ la veteranojn el la kontraŭturkaj militoj kamparanoj komencis alportadi ebrigajn, kaj kiam ankaŭ lia servisto Arkadio, iun nokton malaperis, kaj oni lin trovis nur la trian tagon, vestitan en sennombrajn jupojn, Isakoviĉo denove alidecidis. Li dormis tage, kaj marŝis nokte, sub plenluno.

Du semajnojn pasigitaj en Engelŝtato, apud la kampaĵo de Vuiĉo, estis sufiĉaj, ke oni lin aldone malgajigu. Li aŭdis, ke sian vickolonelan rangon li neniam ricevos, ke oni entute estas tre malkontentaj pri ili, kaj ke Milita Konsilio eĉ diskutis igi ilin ordinara regimento. Kirasuloj, kiuj senescepte havis falsharaĵojn, akceptadis ilin tre malvarme, kaj unu el liaj oficiroj, la kapitano Antonoviĉo, nur dank al sabro sukcesis konservi sian lokon en gastejo, en kiun ferkirasuloj venigis du italajn aktorinojn, por ke ili tie teatrumu.

Nacio ilia, en la okuloj de ĉiuj tiuj troornamitaj, kiĉvestaj, imperiestraj soldatoj, estis konvena nur por diversaj primokoj, ĉar ĝi tamen restis nekonata, ekstermensa, kaj oni eĉ ne devis kredi, ke ĝi ekzistas, kvankam ili konstante pruvadis, ke ili ricevis imperiestrajn privilegiojn.

Manĝaĵo, kiun oni al ili nun komencis donadi, estis la plej malbona el ĉiuj manĝaĵoj, kiujn oni alportadis al la soldataro. Vuiĉo vane minacis plendi al Vieno, kaj alvenis la tago, kiam oni forprenis ĉiujn liajn ĉevalojn, eĉ la ĉaron kun pulvo, aĉetita per mono, kiun la regimentoj alportis de Landlimo. Samtempe oni de ili postulis starigi gardantarojn ĉirkaŭ la tuta kampadejo, pro kio ofte pli ol duono da homoj gardostaris, tagnokte, sed la aliaj tute ne devis starigi gardantarojn, kaj libere iris en la urbon.

Isakoviĉo, grincante per la dentoj, sentis, samkiel la aliaj, same, ke li estas trompita. Li havis propran opinion pri tiu armeo, en kiun ili alvarmis, sed por kiu ili, ĉiuj, kiuj alvenis el la koto, estis nepo de kuzo, de onklo de konato, kune kun iliaj petoj, monaĥoj, kolektiĝoj kaj jeremiadoj kaj „dolĉa ortodokseco“. Isakoviĉo, krom tio, proksimiĝante, jam la kvaran fojon, al batakampoj, antaŭsentis, ke neniam estos pli bone, kaj ke oni ilin ne nur disdonos al regulaj regimentojn, sed dividos ilin ankaŭ hejme, dome, disdonos ilin al feŭdestroj kaj urboj kiel sklavojn, kiel servistojn, kiel kampistojn. Oni ne permesos al ili resti soldatoj, ne permesos al ili eĉ havi siajn preĝejojn, samkiel ili ne permesas al ili sian regionon nomi Novserbujo.

Tiale, subite, sur la lasta parto de la vojo, li iĝis pli malsevera rilate al siaj soldatoj. Nenion parolante al ili, li rigardis ilian marŝadon, iliajn vizaĝojn, ilian amason, kiel polvon, kiu leviĝis sur la vojo, sed kiu baldaŭ diseriĝos kaj disŝutiĝos. Silentante tutajn tagojn, li ilin rigardis, indulgis, sciante ke ili baldaŭ ne plu ekzistos, ke ili malaperos, kiel fumo post bataloj.

Lacega jam, pro siaj pensoj kaj ĉagrenoj, nun, kiam li aperis inter nemalgrandaj amasoj de samaj tiaj homoj, kiaj estis ankaŭ tiuj, kiujn li gvidis al morto, Vuko Isakoviĉo pensis kaj malĝojis ne nur pri siaj homoj, sed ankaŭ pro la homoj de Vuiĉo, kolektitaj kaj elektitaj en Savaejo, el Dravaejo kaj en Pakro. La malpleno de lia vivo, la vaneco de lia familio, edzino kaj infanoj, de la domo kaj hejmo, de reveno, de ĉio, kion ili faras, kreskis de kiam li rigardis ilin multajn, tiel malproksime de ilia lando, en fremdejo, tra kiu ili iris kiel surduloj kaj mutuloj, ne sciante, kien oni ilin gvidas. Kadukiĝinta pro la humiligo, preskaŭcedanta al malsano, li pli kaj pli malfortiĝis pro galo malklariĝinta, kaj pro sango, kiu inundis lian cerbon. Parolante kun si mem, movante nur la lipajn harojn, li ne rajdis komforte kaj ĝojabunde tra la bela printempo, kiel tiuj, kiuj estis pasantaj antaŭ li, haltetante antaŭ ĉiu drinkejo kaj disflorantaj fruktarbejoj, kaj antaŭ ĉiu kastelo kun feraj pordegoj kaj muroj, kiujn surkovris hedero, blua akaciario kaj dornoplenaj, etaj

rozoj, sed kiel freneza malsanulo, perdiĝinta, flava, ŝvela, kolera, kun granda ventro kaj inerta kapo. En sia senorda memoro li senĉese ripetadis leterojn de la patriarko Ŝakabento, petojn, kiujn li iam portis en kortegon, kverelojn kun la frato Aranĝelo, kaj ĉion, kion li mem, maldolĉe kaj malespere, diris al si. Rimarkante nek fruktarbojn, kiuj invadis tutajn montetojn, desur kiuj kiel bonodora pluvo jam komencis forfaladi floretoj, nek homamsojn kiuj ŝtopis stratojn kaj plenigis fenestrojn, admirante lin, lian grandegan, pezan ĉevalon, liajn kantantajn oficirojn, kiuj elingigis siajn sabrojn, kaj portis ilin nudajn sur siaj genuoj; vestitaj en malordinaraj vilaĝanaj vestoj, sed same tajlitaj kaj samkoloraj.

Tamen, se la sorto volis turmenti lian animon, dum ĉi tiu foriro militi, pli ol iam ajn antaŭe, la hazardo volis humiligi ankaŭ lian korpon, iam senteman pri ajna signo de printempo kaj ĉia ebleco delici. Vuko Isakoviĉo estis pasanta tra Virtermbergo, kun memoroj, pri kiuj li ne parolis, kaj kiujn eĉ liaj neĵunaĝaj oficiroj, nur antaŭsentis.

En la princlando Virtembergo, en kiu oni sciis, ke ĝi facile povas iĝi milita areno, vastiĝis onidiroj pri trapaso de la armeo de Maria Terezo. Atendante, ke alvenu francoj, pri kiuj oni parolis precipe en la ina mondo, multaj ekkuris por vidi ankaŭ ĉi tiujn, pri kiuj ili pensis, ke tiuj baldaŭ fuĝos batitaj kaj hontigitaj. Tial eĉ ne unu tago pasis, sen ke honore al la armeo, kiu estis kolektiĝanta kaj iranta al Rejno, estis organizataj dancoj, dum kiuj oni bieron senindulge malŝparis, aŭ vespermanĝoj sur urbaj placoj antaŭ preĝejoj, sub lanternoj, kie oni ĝis komato maĉadis.

Jam la unuan tagon post transiro de la landlimo, al Isakoviĉo alvenis rajdisto-heroldo, kun ordono de la princo Virtemberga – Karlo Eŭgeno, iri tuj post Vuiĉo, ĉar Lia Moŝto Princo eliros antaŭ la armeon por vidi tiujn serbojn, kiuj tiel fidele servis lian patron, la karmemoran, gloran Karlon Aleksandron, imperian ĉefmarŝalon, la venkinton Temiŝoaran, guberniestron de Serbujo ktp., ktp. Aparte estis emfazite, ke tiujn serbojn volas vidi Princino Patrino, kiu post la morto de sia edzo vivis nesocieteme, ĉe sia filo.

Jam la sekvan tagon, pist tiu heroldo, alvenis mesaĝo ankaŭ de vickolonelo Arsenio Vuiĉo, kiu kun siaj du regimentoj jam estis for, je du tagoj da marŝado, antaŭ Isakoviĉo, pro kio li bivakis atendante, ĉar la Princino Patrino alvenos en kompanio de sia filo, por vidi ilin.

Por la regimento tiuj novaĵoj signifas ĝojon, ĉar la regimento supozis, ke ili ĝuos rostitajn virbovojn, sebon, bieron, dormadon, almenaŭ du tagojn. Por Vuko Isakoviĉo tiuj novaĵoj signifis teruran embarason, subitan kaj strangan. Ekdorminte tiun vesperon, tute proksime de iu rivero, ĉe kiu ili piediris, li sidis ĝis profunda nokto, kliniĝinta, sur selo, observante lumetadon de akvo. Li estis tiom surprizita, kvazaŭ li estus fiŝisto, kiu, eltirinte reton tiun tagon,

vidis ke ĝi estas plena da fiŝoj, plaŭdigantaj la akvon, strangaj, arĝentaj, ruĝaj, verdaj, nekredeblaj.

Tiel glimis ankaŭ antaŭ liaj okuloj, kiam li pensis pri la venontaj tagoj.

Hejme, li havis bildon de Karlo Aleksandro Virtemberga, en arĝento, emajlo kaj turmalino, donace ricevitan, en la tempo, kiam li servis ĉe tiu, en Beograda urbo. Rememorinte tiun altvaloran aĵon, li klare vidis ĝin mense, kun miniatura portreto, kiun tenis baroka Herkulo, kun bastonego en la mano, kaj Marso, kun ŝildo en la mano, sur kiu hurlas la kapo de Meduzo, dum super ili flugpendas flugilhava Venko, kun eksterordinara rozkolora brusto, blovante en fanfaron. Standardoj kun duonluno, tamburoj, klaboj, hakiloj, ĉevalaj vostoĵoj kuŝis obeemaj antaŭ la Princo, kiu tenis la nazon supren, vestita en kirason, kun falsharaĵo sur la kapo.

Tuj post tiu bildo komencis viciĝi ankaŭ aliaj, vivaj, en la memoro de Isakoviĉo, el la epoko kiam Danuba batalionaro luktis kontraŭ la turkoj, kaj estis loĝigita en Beograda urbo. La plej juna en la regimento, li estis ankaŭ la plej ŝatata en la kortego de Princo, kaj ofte servis Princon. Tiu servado, interalie, ne estis facila. Tio estis, ofte, persona servado ĉe Princo, eĉ en dormaj ejoj, kaj en monŝanĝejoj de grekoj kaj hebreoj, kiuj, ĉiuj kune, ne povis pruntedoni al li tiom, kiom li bezonis. Ofte li servis ankaŭ ĉe la hazardludaj tabloj de Princo, kie li devis scii ludregulojn. Tiu servo ne estis facila, kvankam dum ĉio ĉi, kaj dum multaj aliaj umoj, Vuko Isakoviĉo devis plej ofte nur silenti kaj stari kviete, teni kandelon.

Isakoviĉon rememoroj pri ĉio ĉi, pri lii tia, kia li estis nun, denskorpa, kaj malasidua, tute ne senkuraĝigis, nek ŝveligis. Li tiun homon memoris kiel groteskan monstron, kiu kutimis dum interparolo kaptegi iun lian butonon, kaj teni lin tiel, spirante en lian buŝon.

La rememoroj, kiuj Vukon Isakoviĉon, ankaŭ ĉi tian, kun la hararo polva, kun la lipoj ŝrumpiĝintaj, kaj kun la pantalono pendanta, konfuzis, kaj tremigis, estis la rememoroj pri Princino Patrino, vidvino de la forpasinta Karlo Aleksandro, kiu, en lia tempo, estis juna virino. Kun kalkanumoj silkaj, altaj tutan spanon, kun la brusto nekovrita kaj rozkolora, same kiel de Venko, sur la bildo de Princo, kiun Isakoviĉo rememoris.



VI.

LA PASINTECO ESTAS MALBELEGA, MALKLARA SENFUNDEJO; KIO EN TIUN LUMOMANKON FORIRAS, NE EKZISTASPLU, KAJ EĈ NENIAM EKZISTIS

Isakoviĉo ne estis litamiko de la edzino de Aleksandro Virtemberga. Ŝi, en Beograda urbo, absolute, tute ne havis litamikon.

Vidinte lin bele elkreskinta, kaj juna, tre ofte, antaŭ la pordo de sia edzo, ŝi rimarkis baldaŭ ke li ŝin admire, sopire kaj time rigardas. Rigardas, kvazaŭ ŝi el la ĉielo malsuprenvenis. Li ŝajnis al ŝi ridiga, kaj tial ankaŭ ŝi komencis observi lin, same kiel oni observas, gvate, katidon, kiam oni ĵetas al ĝi volvaĵon de fadenoj. Al la edzo ŝi diris, ke li aspektas kiel infano, kvankam Isakoviĉo aspektis, en la soldata vesto, senmova, kiel lignobloko kiu estas alta tutan klafton.

Post tio ŝi komencis pli ofte preteri antaŭ li, kaj retrorigardante al siaj jupoj, ĉiam trovis ion, en la ĉambro, kion ŝi devis akurate demeti desur ili, flokon, ereton, ion, kion la aliaj ne povis vidi. Ŝi staris ofte ĉe fenestro, en lia kunesto, super defendmuroj, kaj disfluantaj akvoj, kaj rigardis astrejon vesperan, kiel anĝelo. Per la anguloj de siaj okuloj ŝi vidis lin ankaŭ tiam, kaj observis lin, parolante al siaj damoj kaj akompanantaro ion ajn, bagatelan.

Al li ŝi ŝajnis sin splenda kaj netuŝita. Kvankam ŝi jam havis plenkreŝkan filon, ŝi deziris, ke tiu juna sovaĝulo, ano de tiu stranga popolo, pensu, ke ŝi estas knabine ĉasta kaj neatingebla. Kaj ŝi sukcesis. Ĉiufoje kiam li matene venis deĵori, ŝi tuj, kvazaŭ hazarde, preteriris, sen falsharaĵo, kun sia bukla, mallonga hararo, nigra kvazaŭ hararo de diablino, kun dekoltita brusto, alrigardinte lin, tra lorno, per unu okulo, pro kio li staris stupore, tuj paliĝonta kaj gapa, fiksrigardanta ŝin.

Ĉiufoje, kiam oni lin alvokis vespermanĝi ĉe la tablo de Princo, ŝi lin tute ne rimarkis, ne alparolis, dum li penegis kaŝi la manojn, ĉar ili tremetis.

Tiel, kaŝe, estis okazanta io inter ili, la tutan printempon, dum la unua jaro de ŝia restado en Beogrado.

Al Isakoviĉo kelkaj virinoj, precipe iu francino, en Temeŝvaro, anino de teatra trupo, konigis la sekretojn de ĉio, kion la virinoj ŝatas, tial li bone sciis, kion li devus ankaŭ nun fari, sed li ektimis. Al li ŝajnis, ke ŝi tute diferencas de ĉiuj aliaj, splenda, belega, transcenda. Neniu el liaj kamaradoj pri tio eĉ pensi aŭdacis, kvankam ili ankaŭ en Kortego estis famaj, kiel amorantoj. Li vidis ŝiajn altajn, silkajn kalkanumojn kaj ŝtrumpojn, kun broditaj oraj floroj, ŝiajn ŝultrojn kaj eĉ ŝiajn maturajn genuojn, persikkolorajn, kiam li helpadis ŝin dum rajdado, sed li parolis al si mem, ke ĉio ĉi ne estas kiel ĉe la aliaj virinoj, kaj ke ŝi mortus, se ŝi sciis pri kio li pensas. Ankaŭ la aliaj serboj, kiuj havis honoron kelkfoje vespermanĝi ĉe ŝia tablo, pensis same.

Hazardludante, ĉiun vesperon preskaŭ, ĉe ŝia tablo, li estis feliĉa ĉar li povis nerimarkite tuŝi fingrojn de ŝiaj ĵetitaj gantoj, aŭ ekkaresi per la mano ŝian mantelon. Kvankam li, same kiel liaj aliaj kamaradoj, devis ellerni la dancarton, kaj dancis tre bone, ŝi lin neniam elektis, kaj li plejparte devis riverencadi, en akompano de teneraj sonoj de aldoj, antaŭ ŝia eksjuna parenfino, kiu lin adoris. Post tiuj vesperoj, kaj li kaj liaj kamaradoj ordinare okazigadis diboĉojn ĝis mateniĝo, hurlante en akompano de guzlo, vervaj pro elokventeco kaj forto.

Li tute velkis, tiel, pro amo kaj deziro, animsuferante tiom, ke ankaŭ la aliaj komencis tion rimarki. Plenumante la servon perfekte, konata pro sia kuraĝo, li devis, laŭ speciala peto de Princo, malsovaĝigi kaj dresi kelkajn valahajn ĉevalojn. Tiel Vuko Isakoviĉo, la plej juna en la regimento, memfida filo de la plej bona negocisto de Princo Virtembergga, dum kelkaj monatoj trasuferis silente ĉion: kaj solecon antaŭ ŝia alkovo, aŭskultante ŝian paŝadon, kaj sendormajn noktojn, sidante antaŭ ŝia pordo, vidante kiel servistinoj elportas ŝiajn robojn kaj alportas ĉemizon, kaj la ekzaltigan odoron de herbo kaj tero, kiun elfosis hufo, la sekvan tagon, dum rajdado kun Princino.

Sekreto ŝia iĝadis ĉiam pli neeltenebla, ĉar ŝi komencis ebligi al li vidi ŝin preskaŭ la tutan tempon kiam li servis, sed precipe nokte kaj matene, kiam ŝi preteriradis lin, ankoraŭ varmega post dormo kaj forta pro dezirego, kiun ŝi trovadis, neatendite, en siaj sonĝoj. En la sonĝoj ŝi nokte daŭrigadis sian ĉiutagan vivon, kvankam ŝi sciis, ke ĝi estas nur portempa, same kiel en Temeŝvaro. Iun tagon, preskaŭ falinte desur ĉevalo, ŝi plene apogis sin al li, kiam li alkuris ŝin. Tiam, unuafoje, li aŭdacis, tute tremema, ŝin intence tuŝi.

Suferanta, samtempe mallerta kaj humila, Isakoviĉo tiel travivis preskaŭ duonjaron, kvazaŭ en infero, preskaŭ ne alrigardinte alian virinon, nur tiun altan, eksterordinaran, parfumitan. Pasiiginta kaj maltrankvilega, li aŭdis, kiel voĉon de la ĉielo, la novaĵon, en la komenco de aŭtuno, ke oni pretigas atakon kontraŭ la turkoj, kaj ke Princino veturos en Temeŝvaron. Ne aŭdacinte fari eĉ unu movon per la mano, diri eĉ unu vorton, por konfesi al ŝi ĉion,

li ĝojis, ĉar li almenaŭ liberiĝos de ŝi, kaj finfine lin ĉesos ĝeni tiu aflikto, kiu ripetiĝis ĉiun tagon. Tion estis lia unua, vera amo, ĝuste kiam lia patro ekdeziris edzigi lin.

Terurplena tamen, pro la penso ke li ŝin eble neniam plu vidos, li okulegis ŝin tiom, kaj rigardis ŝin tiel malgaje, ke ŝi komencis perdi la senton de supereco, eĉ mem ne sciante kion fari kun li dum tiuj lastaj tagoj. Kun scio pri propra baldaŭa foriro, kaj vidante lin ĉiun tagon, al ŝi ĉiam pli ŝajnis, ke ŝi troigis, kaj ke ion malmultan ŝi tamen devus al li doni. Ŝi estis certa, ke tiu juna oficiro de ŝia edzo, kiun ŝi ofte mense vidis gvidanto de rabistoj en monto, estas ĝisoste enamiĝinta en ŝin. Sed oportuna okazo por tio ne plu aperis, kvankam ŝi nun tion preskaŭ bedaŭris.

Tial iun septembran tagon en tagmezo, kiam ŝi estis ekirinta al la edzo, kiu tiumomente estis kvitiganta sian ŝuldon al iuj grekoj, kriante tiom, ke tio aŭdiĝis en du salonoj, vidinte Isakoviĉon, ŝi haltis kaj revenis por demeti la falsharaĵon kaj disŝuti la hararon. Post tio ŝi denove preteriris la lipharan oficiron en la koridoro, kiu salutis ŝin mallevinte la pafilon al la tero. Kiam ŝi fermis post si la pordon, Isakoviĉo skuiĝis.

Ĉe lia malfermita fenestro ariĝis svarmo da muŝetoj, kaj sub la fenestro verdigis defendmuroj. Senfina herbaĉo vastiĝis al Nordo, ankaŭ kanaro, laŭlonge de akvo, en kiu estis videblaj kelkaj batalŝalupoj, kun grandaj verdaj veloj. En ties ombroj oscedis po unu kanono. Kiel grandega malseka tolo pendis ankaŭ nuba astrejo, super la akvoj varmaj.

Vigle fingrante malgrandan, oran krucon, tiel, altirante lian rigardon, al la roza kaj malhela valo de sia brusto, ŝi lin demandis, ĉu ŝia vojaĝa kaleŝo, kun juna grafo Pataŝiĉo, kiu ŝin akompanos ĝis Temeŝvaro, jam venis? Post tio, ankoraŭ pli proksimiĝinte al li, kaj fiksrigardinte lin, je la unua fojo, profunde en la okulojn, ŝi lin demandis ĉu li alvenos ofice, en Temeŝvaron, kie estas multe pli komforte kaj agrable, aŭ en Vienon, kie ŝi pasigos la vintron, aŭ en Virtembergon, kie ŝi povos danki lin por lia fidela servo ĉe ŝia edzo. Ekridis ŝi samtempe, subite, tiel malĉaste, ke li preskaŭ perdis starkapablon. Kvazaŭ hazarde, ŝi kliniĝis post tio tra fenestro, rigardante en la profundejon de la defendmuro kaj fosaĵoj. Kvazaŭ hazarde, elfalis tiam ĉirkaŭkolo el ŝiaj manoj, kaj ŝi mallaŭte ekŝrikis.

Isakoviĉo servoprete alkuris ŝin, perdinta spirpovon, kaj ŝi diris al li, ke li povas senĝene kliniĝi super ŝi, por eble rimarki la ĉirkaŭkolon en la herbo. Ŝi fiksaŭskultis samtempe ĉu iu alvenas. Ŝi ja sciis, ke ilin de la salono de ŝia edzo disigas nur du ĉambregoj.

Ĉar la fenestro estis mallarĝa, li senpove kaj peze, kiel kirasulo en fero, premiĝis al muro, por ne kontakti kun ŝia korpo. Ŝi, tamen, klinita suben, ordonis al li ankoraŭfoje kliniĝi, kroĉiĝinte al lia mano, kiu estis malvarma

kiel la mano de mortinto. Deturninte iomete sian kapon, ŝi tuŝinte lin per sia brusto, sentante lian proksimecon, ekkonsciinte nur tiam, kion ŝi havis kaj perdis. Vuko Isakoviĉo estis en tiu momento bela, kun siaj febraj okuloj, havantaj la koloron de malnova oro, kaj kun siaj violiĝintaj lipoj, sub fulgohaŭtaj, serpentaj, lozaj lipharoj, kiuj al ŝi ŝajnis tre-tre malordinaraj. Li estis agonie paliĝinta kaj senmova pli ol iam ajn.

Tiun tagon, ŝi ne plu eliradis el siaj ejoj, galhumora kaj larma. Antaŭvespere ŝi aŭdis, ke ĉaro alvenis, kaj ke ŝi postmorgaŭ veturos.

Vekiĝinte la sekvan tagon, en varma mateno, kaj vidinte en la korto grandan vojaĝan ĉaron, ŝi preskaŭ malsaniĝis pro kolerego. Nun, kiam ŝi devis forveturi, ŝi ne emis veturi, ŝi deziris resti almenaŭ tiom, ke ŝi povu kun li senĝene pasigi unu horon. En la malĉasteco, al kiu ŝi estis kutimiĝinta, ŝi sentis sin freneziĝanta, kaj ŝi volonte restus ankoraŭ pli longe, sub tiu tre blua orienta ĉielo, kiu ŝin antaŭe tiom tedis, same kiel la defendmuroj, koto kaj ĉiam samaj fiŝoj sur la tablo, ĉiam samaj interparoloj. Isakoviĉo ja tiom diferencis de ŝia edzo, kaj ĉiuj aliaj ŝiaj ĝistiamaj amorantoj, malserena, silentema, pli malfiera kaj pli serioza anime, kaj ankaŭ korpe.

Suferante tiel ĝis la tagmezo pro siaj deziroj, ŝi provis malkviete lin aldoni al sia akompanantaro, aŭ al la gardistoj, aŭ transloki lin en Temeŝvaron, serpente afektante antaŭ maljunaj oficiroj kaj la edzo. Finfine, antaŭ tagmezo, ŝi rezignis kaj cedis al sia sorto, plorante kortuŝe, dum damoj kaj servistinoj ŝin estis priverŝantaj per akvo, frotantaj, vestantaj, pretigante ŝin por la morgaŭa vojo, alportante al ŝi mesaĝojn de la juna grafo Pataŝiĉo, pri kiu oni parolis, ke li estas tre bela, kaj kiu ĝentile demandis pri ordono, kiel, do li veturos, ĉu sur ĉevalo, aŭ eble, en ŝia kompanio, en la ĉaro?

Finfine, tagmeze, rememoriginte tion, kio okazis hieraŭ, malprudentiĝinte, tute arda pro sopiro, vanto kaj spito, ŝi forigis unue la oficiron antaŭ la porde de Isakoviĉo. Post tio ŝi enrapidis la ĉambron, en kiu tiutage estis multe da malfreŝa polvo, kaj en kiu Isakoviĉo estis kontrolanta selon de la princo, aĉetitan de turkoj.

Dum li, malheliĝinta, nesatdorminta, konsternite leviĝis, ŝi ordonis al li malfermi la fenestron, kun senindulga rideto. Alirinte al li tute proksime, ŝi kliniĝis, same kiel la tagon antaŭ tio, super la defendmurojn kaj akvon, rigardante al li samtempe rekte en la okulojn, kiuj estis malklaraj kaj enfalintaj. Ŝi demandis lin, ĉu soldatoj trovis ŝian ĉirkaŭkolon?

La tago estis ankoraŭ pli varma ol la hieraŭa, arda, sufoka, nuba, antaŭpluva.

Demandinte lin, ĉu li nun vidas ion sube, en herbo, ŝi proksimiĝis al li plene. Ŝi estis surmetinta rajdvestojn, leĝerajn, molajn jupojn, tiel ke ŝi ek-sentis, dum intertuŝiĝo, liajn genuojn kaj femurojn.

Kelkajn momentojn, en tiu pozo, fleksiĝinta super la sufoke bonodoraj kaj velkaj kampoj kaj akvoj, en kiuj maturis plantoj, ŝi kunpremiĝis inter la firma muro kaj li. La silento estis plena. Kliniĝante, laŭŝajne por vidi sube, en la herboj, la perdiĝintajn juvelojn, ŝi fleksiĝis kaj fine kovris la vizaĝon per la manoj, sentinte, ke ankaŭ li kliniĝis super ŝin, kaj tremas. Algluiĝante ĉiam pli supre al li, ankaŭ ŝi sentis, ke ŝin malrapide travibrigas antaŭĝuo, kaj ke ŝi tremetas. Ŝi sentis kapturiniĝon.

Kaj ĝuste kiam ŝi ekdeziris retrorigardi, sen animo, kun la buŝo duonmalfermita, elspirante, dironte ion al li, ŝi sentis, ke ĉio, kio ŝiajn sentumojn disstreĉas, kreskas supren, kvazaŭ io senkorpa, kaj tiom ĉarma, ke ŝi ekdeziris ravite malfermi la okulojn, kaj vidi, kio estas tio. Kun la kapo peza pro enspirado de la aero kaj herbo, ŝi sinkis malrapide, hezitante, kun la genuoj kunpremitaj, ekscitite, senkonsciiĝante.

Jen, tion turnadis en sia cerbo Vuko Isakoviĉo, kelkajn jarojn, rememorante ĉion, en diversaj lokoj de sia vivo, diversmaniere, antaŭ ol forgesi ĉion.

Do, tiun virinon, kiun li memoris, same kiel la urbon super Danubo, same kiel la kamaradojn el la malnova, Danubregiona regimento, same kiel tiun aŭtunon, same kiel la junaĝon, kun nemezurebla kaj nepasebla admiro, kvankam li ŝin preskaŭ tridek jarojn ne vidis, li devis ŝin vidi nun, kvankam ne serĉante. Ŝi lin atendis en malgranda eturbo, kie oni sciis ke lia armeo preteriros.

Li estis iranta al ŝi vizite, en la nekompreneble proksima fremdlando, veninte plurfoje al la ideo foriĝi, haltetante kaj antaŭsentante ankaŭ tiun lastan teruron, kiun li ne povis eviti.

Dume en la regimenton estis venantaj rajdistoj-heroldoj, unu post la alia, portante salutojn kaj alvokojn de Princo kaj Princino-Patrino, kiuj estis veturantaj al ili renkonte.

– „Mi Vin ne povus rekonii“, diris finfine, renkontinte ilin majeste, Princino-Patrino de Karlo Eŭgeno Virtemberga, al Vuko Isakoviĉo, dum li staris antaŭ ŝi, rigida, puca kun siaj bluaj bendoj, gigantaj, blankaj ĝiskubutaj gantoj, ruĝa pantalono, kiu pendis antaŭe kiel saketoj, malantaŭe kiel sako – „Vi tre multe ŝanĝiĝis, kaj tre multe maljuniĝis.“

Ridetante konfuze, kvazaŭ sentante sin ial kulpa, Vuko Isakoviĉo estis ankoraŭ pli mallerta, ĉar en la spegulo, antaŭ kiu ŝi staris, li vidis sin mem, kaj ĉar post li, senmove, ŝiajn vortojn aŭskultis la tuta grupo da serboj, oficiroj, kiuj spiris tiel profunde, ke tio aŭdiĝis, kaj ilian spiron li sentis sur la haroj, en la nuko.

Vidinte en la spegulo, granda kiel pordego, murojn, kvazaŭ per lakto lavitajn, oritajn; la plafonon, plenan da blankaj anĝelo kaj paŝtistoj, kun levetitaj kaj alpinglitaj jupoj, pro kio dum momento li vidis iliajn rozkolorajn

genuojn; kuprajn kandelinojn, kun forĝitaj folioj kaj malgrandaj anĝeletoj, plenaj da sennombraj kandeloj, Isakoviĉo, timigita, vidis ankaŭ ŝin, en la spegulo, dorsdirekte, antaŭ ol li alrigardis ŝian vizaĝon.

Ŝi estis vestiĝinta kiel junco knabino. Sur la kapo ŝi havis tutan stakon da hararo, kiun kunigis blanka bendo, kaj kiu pendis malantaŭe, kiel tordita ĉevala vosto. Dekoltitaj ŝultroj ŝiaj brilis, kiel sekiĝintaj ostoj sub sunradioj, kun konkavaĵoj de faltita haŭto, plenaj da blanka pulvoro. Dorso ŝia estis rigida kaj streĉe vestita en kiraso el silko, la staturo estis firma kaj ronda, kiel trunko de malnova pirujo, kiu estas tie nur por ke oni sur ĝin povu surmeti silkajn jupejn, larĝajn kaj distreĉitajn kiel malplena tendo, tute brodita per floroj kaj branĉetoj, sub kiu troviĝas nenio. Fiksrigardante tiun malbelegulon, al li ankaŭ liaj kamaradoj en la spegulo, senmovaj antaŭ granda, ligna horloĝo, kies pendolo balanciĝis tien-reen, flava kaj brila kiel Suno, ekŝajnis similaj al pluvelvokistoj. Sub siaj ŝmiritaj haroj, tuko ĉirkaŭ la kolo, larĝaj, novaj rimenoj el ora trikaĵo sur la ŝultroj kaj firme kunpremita bulĉapelo, sur la koro. Dum momento li estis senkonsca, ne sciante kie li estas.

Ekrigardinte ŝin poste, miregante ankaŭ pri la vizaĝa flanko, li vidis, ke ŝi tuta estis en rozaj kaj blankaj punktoj, kun du vicoj da grandegaj vualoj sur la brusto, kaj kun manikoj, kiuj ekde la kubutoj fakte estis kompletaj jupej. En la hararo ŝi havis grandan plumajon, firmigitan per perloj, kaj sub la mentoneto larĝan, bluan banton. Sub la maldekstran ŝultron ŝi surpikis florfaskon. Ŝia kolo estis tute sulkita, kaj sur la maldekstra flanko de ŝia dekoltita brusto, videblis longa, blua, maldika, serpentuma vejno. Tre grandaj mamoj ŝin ĝenis, tial ŝi ilin subtiris kaj streĉis, kune kun la tuta torako, tiel, ke ili ricevis, kvankam malprofundan, tamen ankoraŭ plaĉan formon. Ŝi ŝvingis senĉese per ventumilo kiun buntigis birdidoj kaj ŝafidoj, kaj sur kies tenilon estis fiksita malgranda horloĝo. Ŝiaj fingroj estis tuberplenaj, la manon kovris dikaj vejnoj.

Per gapantaj okuloj Vuko Isakoviĉo rigardis ĉion ĉi, per rigardo direktita al ŝia maljuniĝinta vizaĝo kun sulkiginta submentono kaj pendanta haŭto sub la oreloj, kun mentoneto, kiu estis tre malgranda, kaj kun la vangostoj ruĝaj, kaj videblaj sub blanka pulvoro, disŝutita sur la tutan vizaĝon, plenan da nigraj, falsaj belgrajnoj. Ŝia nazo konsistis el tri rondaj pecoj, pinto kaj dikiĝintaj nazloboj – la brovoj el du linioj kurbaj kaj malicaj, estis farbitaj. En ŝiaj grandaj okuloj, nun, ankoraŭ restis prikaŝita, malhela beleco, sed ankaŭ ili estis enfalintaj en kavojn el haŭtetoj, saketoj, sulkoj, blankaj ĉifonetoj kaj ĉiaspecaj malpuraĵoj.

Rigardante lin subride, ankaŭ ŝi estis miranta pri lia kurba teniĝo, ŝrumpiĝinta buŝo kaj lipaj haroj kaj la rigardo laca, sed ŝin precipe agacis, ke li senĉese apogadis sin jen sur unu, jen sur la alian piedon. Ankaŭ al ŝi, same kiel al la aliaj, ekŝajnis, ke tio estas ia vestita barelo, kava kaj malplena.

Kvankam ŝi deziras esti afabla, ŝi estis mokema kaj malestima, proksimigante la manon sub la nazon de ĉiuj ĉi soldatoj, el kiuj ŝi persone konis nur Isakoviĉon, la plej maljunan en Danuba regimento, kiu servis ŝian karmemoran edzon en Beograda urbo.

Dum la aliaj estis alirantaj al ŝi, ŝi ankoraŭ kelkajn fojojn ekrigardis lin, ridetanta, kun acida esprimo de ĝuo kaj miro.

Kelkajn fojojn ankoraŭ, ŝi lin atente rigardmezuris, de la kapo ĝis la piedoj, dum li estis veniganta kaj prezentanta oficirojn, konfuzita, kun terura sento de malpleno en si, aŭskultante ŝian voĉon, kaj mallaŭtan ridon, tute malvarmiĝinta, glacia ĝis la genuoj, sed kun grandetaj ŝviteroj sur la frunto.

Turniĝinte, tamen, al sia filo, princo Karlo Eŭgeno, kiu staris ravita malantaŭ ŝi, antaŭ la akompanantaro, konsistanta el damoj, korteganoj kaj kirasuloj, same sub blanka pudrita falsharaĵo, ligita per nigra papilioforma kravato, tute kovrita de punktoj, kun batalista kiraso, Princino Patrino diris laŭte, tiel, ke ĉiuj povis aŭdi: „Alrigardu ĉi tiujn sinjorojn. Fidelaj kaj honestaj homoj ili estas. Ili servis sub la komando de mia karmemora edzo, kaj same kiel ili je ĉiu tempo estis lojalaj kaj fidelaj al li, ankaŭ li donadis al ili ĉiam sian amon, kaj respektis ilin.“

Princo, ludante, per la maldekstra mano, kun la ĉeno de horloĝo, observante miniaturojn, Amoretojn, mitologiajn diinojn kaj florojn, levis, per la dekstra mano, flankon de sia surtuto, sentinte, ke ŝi metis lin en malagrablan situacion, kaj ke li devus ion diri. Li vidis ĉiujn rigardantaj lin, sed ne povis elbuŝigi ununuran vorton.

Bonŝance Princino Patrino interrompis sian paroladon nur unu momenton, kaj tuj post tio daŭrigis, fiksrigardante, kortuŝite, la serbojn: „Ĉi tiu tago apartenas al la plej feliĉaj tagoj de mia vivo, ĉar mi havas eblecon ankoraŭfoje vidi tiujn, kiuj estis ĉiam kaj en ĉiuj cirkonstancoj favorantaj nin, kaj fidelaj“. Post tio ŝi komencis larmi. Ŝi ne povis sindeteni de ploro, pensante pri la tempo, kiun ŝi pasigis en Serbujo, apud sia edzo.

Kutimiĝintaj en ĉiuj cirkonstancoj kondukti same kiel la komandanto, liaj oficiroj rigardis Isakoviĉon ankaŭ nun, des pli, ĉar en la regimento ekzistis oniflustraj pri ilia interrilato. Ilia situacio tute ne estis pli agrabla ol la lia, ornamitaj, brositaj, ŝmiritaj, kun streĉitaj novaj rimenoj, pro kio ili knaretis dum ĉiu paŝo kaj movo. Sub la brilo de centoj kaj centoj da kandeloj, al ili ŝajnis, ke ili povas kaŝi spuron de ĉiuj ĝisnunaj pluvoj sur si, de noktoj, kiujn ili tradormis en vilaĝoj kaj sub ĉaroj, kelkajn semajnojn da hirtiĝo, malpuriĝo, kaj malzorgo. Malstabilaj sur la glatigita planko, ili estis timemaj sub la duonnudaj statuoj, starigitaj ĝuste en anguloj, kien ili sentis bezonon foriĝi. La ĝentilaj korteganoj, kun bonodoraj, kombitaj kapoj, silkaj tibioj, kun longaj surtutoj el veluro kaj verge maldikaj glavoj, kiuj al ili proponadis

hazardludi, estis al ili strangaj, same kiel la kortegaj damoj, kiuj ilin demandis, kiel ili pasigas noktojn subĉiele. Damoj kun tutaj arbustoj da hararoj, floroj kaj plumoj sur la kapo, kun farbitaj vizaĝoj, nudigitaj brustoj kaj larĝaj jupoj, pro kiuj, ĉirkaŭirante ilin, ili devis esti atentaj, por ne renversi rondtablojn, kun vazoj el alabastro.

En streĉitaj vestoj, kaj ŝvitaj, mallertaj same kiel ilia estro, la vespero estis pasanta malfacile kaj malplezurige. Starante ĉiuj kune, ĉium unu apud la alia, ili riverencadis, ridetis, klarigadis ruĝiĝinte kaj serveme, pretaj fuĝi. Multaj amikecoj, fratiĝoj, kiuj en la regimento aperis, firmiĝis tiun vesperon, pro kumuna suferado.

Klarigante vortojn de juna Princo, la korteganoj provis, laŭ ordono, klarigi al ili specialan, probleman staton de Virtembergo, en tiu tuta milita tohuvabohuo, ĉirkaŭ la trono de ilia imperiestro, kiu interalie estas virino, kaj entuziasmigi ilin por batalo, grandiozigan la amikecon inter Virtembergo kaj serboj, per sango sigelita, kaj konsiderinda pro pluraj kialoj. Precipe ĉar ĝi diskonigos la gloron de serboj tra la tuta mondo, kaj ĉar tia estas la volo de Dio. Pretiĝantaj hazardludi, la oficiroj de Isakoviĉo, tamen tute ne ĝojiĝis pro ĉiuj ĉi ditiramboj. La kapitano Antonoviĉo, la plej riĉa el ili, kiu sciis la kartludojn kiel Sanktan Bibliion, parolis al ili anticipe kiamaniere oni trompados dum kartludado, kaj admonis ilin gardi sin, precipe kontraŭ virinoj, kiuj sidiĝos ĉe iliaj genuoj. Kaj tial multaj belulinoj, sopirantaj ion alian, ne ilin, vane sidiĝis afable en ilia kompanio, kaŝante sian ridon malantaŭ ventumiloj, kaj palpebrumante per la okuloj, ĉar ili akceptadis la knabinojn malvolontege, premante spasme per unu mano la kartojn, kaj per la alia mano siajn monsaketojn, alkriante samtempe unu al la alia, serblingve, spritaĵojn pri la aliaj, senzorgaj, ĉar ilin neniu kompreni povas, kaj ĉar ilin neniu povos superruzi. Koncerne la kontaktojn inter Virtembergo kaj serboj, pri tio ili havis sian bonan opinion, insultante tra la dentoj kaj Virtembergon kaj ĉiujn Virtemberganojn.

Malgraŭ tio ili seniĝis je vidkapablo kaj blindiĝis pro vampiraj flamoj de kandeloj, en arĝentaj kandelinoj, pro lumetantaj speguloj, nigraj, laktitaj tabletoj, gravuraĵoj, marmoraj fajrejoj kaj per silko tegitaj bankedtabloj, sekve, ili mem ekdeziris malgajni, flatitaj kaj ekzaltitaj meze de tiu brilo kaj bonodora interpuŝiĝo de dekoltitaj virinoj, dezirantaj distingigi, vidigi sin tre riĉaj, pacnatura, kaj afablaj, la plej bonaj, tre respektendaj. Konkurante, ili komencis kaptadi kartojn de belaj damoj, surŝutitaj de pudro kaj odorigilo, maĉante bombonojn, kaj ŝtopante la pantalonojn per poŝtukoj kaj haroj de belulinoj, ricevitaj sub la tablo, kiel memoraĵon. Vane la kapitano Antonoviĉo kriadis al ili, disdonante kartojn kaj kolektante dukatojn, ili finfine varmiĝis kaj bonhumoriĝis, puŝante tabletojn kaj balanciĝante en brakseĝoj, tiel, ke ili knalis kiel nuksoj.

Kiam poste dismalfermiĝis la pordo, kiam ili ekvidis la vesperon en la ĝardeno, kiu estis proksimiĝanta al la ŝtuparo de la teraso, per siaj longaj ombroj, pritonditaj verdbranĉaj aleoj, kun longaj senarabaj vojetoj, ĉe la fino kun blankaj kolonoj, ilin malvarmigis la vento, kiu apenaŭ sentebliis, agrabla kaj facila, kaj la ĉielo, kiu tuta havis nur unu koloron, mildan kaj akvecan. Facilrompaj, kiel la vitro de la granda malfermita pordo, kiu troviĝis ĉe la tablo, maldika, rompiĝema, preta fendiĝi kaj frakasiĝi sub subita premo de kubutoj, bastonoj, glavoj kaj mebloj, ili ne ekpensis, neniu inter ili ekpensis, ke ili jam estas proksime al la morto, kaj ke post kelkaj tagoj ili eble ne plu ekzistos, same kiel tiuj buntaj ornamaĵoj, kiuj estis, honore al ili, pendigitaj en la ĉambrego, faritaj el orumita papero, floroj kaj vitro. Eĉ ne unu inter ili ekpensis, ke li postlasas nenion, eternan, kvietan kaj belan, kia estis tiu vespero super la ĝardeno, plena da senfinaj kiomoj da vivoj, kiuj kvietiĝis, por en mateniĝo denove vekigi, krom nur haŭton vilan, kaj malbonodoron kadavraĵan, same kiel la leporhundoj antaŭ ili, kaj tie, hejme, en koto kaj mizero, samfamilianojn, kiuj ilin kelkan tempon menciados. Kiam Isakoviĉo ilin memorigis, ke ili devas foriri, ili kolere deziris resti. Certan tempon, en brilo de speguloj, al ili ŝajnis, ke ili sidas en diejo, inter steloj, sur brilaj laktovojoj, balanciĝante facile. Sur sia vojo freneza, post la polvo kiu plenigis iliajn gorĝojn, nazon kaj buŝon, restis en la sulkoj de iliaj vizaĝoj, post seninterrompa irado trans montoj kaj riveroj, tra ŝlimejo kaj bariloj, etvilaĝoj kaj fruktarbejoj, kortoj kaj draŝejoj, al ili ekŝajnis nun, ke ili estas en alia mondo, kie oni en silko kaj veluro sidas, senmova, dum jarcentoj, rigaradante vesperojn kaj ĝardenojn, belegajn fontoŝtonojn kaj eksterordinarajn belulinojn, ravoriĉajn, bonodorajn, inter muroj kaj aĵoj el rozkoloraj arboj, tujoj, silko kaj ŝtonoj, tiel ke por la vespera ĉielo, por la plej belaj juveloj, por die rondigita brusto, por silento, sinforĝeso, estas sufiĉe nur etendi la manon, inter tiuj lunlume heligitaj speguloj.

Malgajnantaj hazardlude, ĉirkaŭitaj de damoj, orgojlaj, ĉar ili estis en la centro de atento, ili forĝesis dum momento sian tutan vojon, kaj ĉiujn siajn penegojn. Ili kvazaŭ ne estus en ĉi tiu mondo nur kelkajn horojn, eble antaŭ sia morto, sed kvazaŭ ĉio ĉi apartenus al ili, kaj kvazaŭ ĉiuj aliaj troviĝus tie nur hazarde, ili estis feliĉaj. Ili fascinis la akompanantojn de Karlo Eŭgeno, per disipado de mono, per beleco kaj gajo, post la komenca embaraso kaj bruskeco dum sidiĝo ĉe tabloj.

Iuj el Virtembergaj kirasulaj komencis uzi falskartojn, kaj iuj damoj komencis ilin persvadi, ke ili eliru en ĝardenon. Antaŭ disiĝo, la atmosfero estis eksterordinara, kaj Princino Patrino estis kontenta pri siaj protektatoj.

Malgraŭ tio, malgraŭ la tuta brua interparolo kaj malĉastaj interflustroj, hazardludante, ridante, ili, preskaŭ ĉiuj, serĉis per la rigardo Isakoviĉon,

akompanante lin ĉien, kie li en la ĉambrego iris, piedpremante atente post gigantaj bantomaŝoj kaj vualoj de Princino Patrino.

Ili sciis, ke ili estas famaj pro sia vira forto, kaj estis orgojlaj, ĉar ankaŭ tiun reputacion ili diskonigas tra la germana imperio. Ili sciis, ke Isakoviĉo estis favorato, same kiel la tuta Danubo batalionaro, en la kortego de Aleksandro Virtemberga, tial ili nun atendis, kvazaŭ miraklon, vidi: ĉu por Princino li restis neforgesebla? Ili bedaŭrus, se tiuj iliaj esperoj estus eraraj. Koleraj, ĉar ili devas forlasi la dezirindajn kunulojn, ili, kaj afliktitaj kaj kontentaj, rigardis kiel Princino evitas lin, kiel li iĝas ĉiam pli ĝenfrapita kaj silentema, ĉiam pli laca.

Fakte, Vuko Isakoviĉo mem evitadis Princinon Patrino, kvankam ankaŭ ŝi ne serĉis lin. Li evitadis ŝin, por ne devi rigardi ŝin en la vizaĝon, kaj por ne devi stari proksime al ŝi. La diferenco inter tiu, kiun li estis memoranta, kaj ĉi tiu, la nuna, estis tiel terura, ke li la tutan vesperon iris en la ĉambrego kun la okuloj terurstreĉitaj, senespera, ĉar ankaŭ tion li devis trasuferi, dezirante senĉese, ke ĉio ĉi, kiel eble plej rapide, estu finita. Tial, ekironte, li staris antaŭ ŝi sufiĉe apatie.

Princino Patrino subite sciigis, ke ŝi deziras vidi ilian kampadejon, kaj Vuko Isakoviĉo promesis al ŝi, ke morgaŭ, matene, ĉio estos farita kaj preta, do ŝi povos alveni. Ŝi, ankoraŭfoje, kun laca rideto, en kiu estis multe da malico, diris, ke ŝi sendos al li kelkajn virŝafojn kaj bovojn, kaj kelkajn barelojn da biero por la soldatoj, kaj por la oficiroj – kokaĵon, vinon kaj herbojn, etendante al li ankoraŭfoje, sub la nazon, kiatende, sian osteca manon.

Tiamaniere, jen, Isakoviĉo ekiris sur la lastan parton de la vojo, ĝis la malgrandan eturbon Ŝtokŝtato, ĉe Rejno, kie oni lin jam atendis en la kampadejo de la ĉefmarŝalo-leŭtenanto Johano Leopoldo Berenklaŭo, estro de la tuta avangardo.

Sur la alia bordo de la rivero troviĝis antaŭpostenoj de francoj, kiuj ankaŭ tuttage, sed precipe nokte, malrapide, senĉese pafadis.

Amasoj da aŭstrujaj armeanoj estis ariĝantaj, tutan printempon de la 1744-a jaro sur Rejno, malrapide kaj palpante kiel helikoj, tra la malamikaj Bavarujo kaj Supra Palatinato, tra la sendecida Virtembergo, tra Badeno kaj Heseno, por ataki Francujon, ne forgesante, ke malantaŭ ilia dorso restis la terura kaj fera, Prusujo.

La duko de Viena kortego, Karlo Lotaringa, nek rapidis, nek volis gvidi tiujn amasojn. Li pelis ilin kiel grandajn brutarojn, tien kaj ĉi tien, decidplena akcepti ĉiun devojiĝintan ŝafon, kaj vidigi afablan vizaĝon al ĉiu, kiu pace kondukas, eĉ se tio estis ordinara vilaĝo, aŭ urbo. Kvankam sur la alia bordo de Rejno estis lia hejmlando, la tero de lia familio, li tiom kutimiĝis pensi aŭstre, ke li tre malmulte sentis nostalgion pri ĉasejoj, kortegoj, kaj trono de siaj prauloj. Li estis kontenta pri la edziĝo de la frato Frano kun Maria

Terezo, kaj antaŭvidis, kvazaŭ tio estus certa, ke lia frato surmetos ankaŭ la imperiestran kronon.

Li deziris iel lasi la francojn al angloj, por ke ili interbatalu; la bavarojn kun ilia kontraŭimperiestro, saksojn, kaj ĉiujn aliajn, li malestimis profunde, jam de la antaŭaj militoj. Sincere li timis nur la prusojn, kiuj lin kelkajn fojojn disbatis, kvankam li sin opinias pli bona armeestro ol Frederiko, sed malpli bonŝanca, pli delikata, kun pli komplikaj taskoj, kaj gigantaj distancoj inter batalkampoj, de Rejno ĝis Silezio, kie li devis dissemi la ostojn de la tre diversgentaj, malkleraj kaj stultaj soldatoj, kio lin – ne pro la soldatoj, sed pro la distanco – igis melanholia.

Lacigata, tiel, de la vojaĝado, sur malbonaj vojoj, de la kampadejo ĉe Rejno ĝis Vieno kaj reen, li estis kontenta ĉiam, kiam li ripozis en sia itala baletoj aŭ franca komedio, konatiĝante kaj amikiĝante dum la vojado, interpacigante kaj kvereligante malgrandajn kortegojn, princojn, landojn kaj urbojn, per leteroj, donacoj, minacoj kaj moviĝoj de la armeo, absolute malserioze.

Li havis samtempe impreson, ke nenia diferenco ekzistas inter liaj damoj kaj ĉi tiuj kortegoj kaj popoloj, ĉirkaŭ li, en la mondo. Kiam iu nova aliancano proponis sin, li parolis al sia akompanantaro, ke li komencis amorludon kun princlando, kies nomon li diris, kaj ke ĝi jam komencis sin beligaĉi, por pli multe plaĉi al li; kiam, dum vespermanĝo, antaŭ hazardludo, li parolis, ekzemple, pri intertraktado kun Saksujo, li menciis tion simple, kvazaŭ Saksujo jam estus naskipreta, sed kiam generaloj atentigis pri malfavora pozicio ĉe la dekstra alo, kun eblaj surprizoj en Vestfalujo, li agnoskis, ke tio estos problemo, kaj ke, bedaŭrinde, malvirigiĝos ankaŭ Nasao. Fojfoje nur, vidinte, subite, el la ĉaro, la sklavigitan, mizeran, malriĉiĝintan Bavarujon, vilaĝojn, malriĉecon, malsanojn, al li en la mondo ĉio ekŝajnis neesprimeble teda.

Observante tiel ŝtatojn, same kiel siajn dancistinojn kaj obstinajn aktoriinojn, li klopodis elteni printempon, ne daŭrigante la militon, precipe dekiam lin lia rondo, el Versajlo, estis informanta, ke Prusujo prosperas en la franca kortego, kun kiu oni pretigas aliancon, kaj ke la jaro ne finiĝos sen atako de Prusujo.

El Vieno tamen oni ordonadis ĉiam pli malpacience, ke ankaŭ li ataku, kaj fine de printempo li cedis, preta vidi batalkampojn kaj mortintojn, bruligitajn stratojn, kadavrigitajn virinojn, pluvojn, arbarojn, montojn, gresejojn, samkiel liaj soldatoj, sed ĉion ĉi kvazaŭ en lia teatro, ne tuŝante per siaj puraj manoj tiujn aferojn, kaj konservante la tembron de gajeco kaj diskreteco rilate al Kortego, timante konstante, ke en liajn taskojn ili enŝovos anstataŭanton, la krudan kaj bruskan grafon Baĉanion, kiu soifis je sango kaj gloro.

Do, li devis komenci, kiel li diris, ludi „faraon“ kun la franca reĝo, irante trans Rejno, kio al li ŝajnis stulta, vanan incitadon de francoj, Karlo Lotaringuja, meze de balfestoj kaj vespermanĝoj, kiujn li organizis, antaŭ la foriro,

elkovis en sia teatro ludon, kiun, fakte, nek li, nek la armeo partoprenos, sed nur unu amaso da frenezuloj kaj malfeliĉuloj, kiuj ja ne estas tie por io ajn alia.

Irigante siajn armeojn malrapide, li planis antaŭenigi avangardon, sur la scenejon, je altaĵoj, kampoj kaj nuboj, por ĝi luktu tiel, kiel povas, dum li tion observos desur montopintoj aliflanke de la rivero, gardante sin por alia, por vera kontraŭulo, kiu amarigis lian vivon, kaj kiu lin atendis en malproksimo, en Silezio.

Tial, en malmultenombraj arbaroj, sur la dekstra bordo de Rejno, sub Majnico kaj Vormso, bivakis la armeo de la generalo ĉefmarŝalo-leŭtenanto barono Johano Leopoldo Berenklaŭo, la terura venkinto de Bavarujo, kiun Karlo Lotaringuja elektis, speciale, por la invado. Preta ataki, tiu armeo konsistis el kroataj, hungaraj kaj serbaj kavaleriaj regimentoj kaj elektita limregiona piedsoldataro, ĝendarmoj kaj hajdukoj, al kiuj estis aligita kiel rezervo, por atendi eksterordinarajn situaciojn, ankaŭ la regimento de „rabistoj“, la posedaĵo de la barono Trenko, arigita en Slavoniaj arbaroj.

Karlo Lotaringuja elektis tiujn regimentojn, ĉar li tion devis, kaj ne ŝatis tiun Slavonian armeon. Malbone vestita, ĝi malbonodoris antaŭ ĉio, kaj krom tio, ĝin ne estis eble regi. Ĝi moviĝis laŭ siaj reguloj, kiujn li neniel povis difini, ĝi alvenadis foje pli frue, foje pli malfrue, ol li atendis, farante al li, ĝenerale, neantaŭvideblajn malfacilaĵojn. Ĝi sturmis kie li tion ne volis, sed fuĝis kie li tion ne atendis. Kaj ĝi nek pafadis kiel oni devas pafi, nek retiriĝadis kiel oni devas retiriĝi. Ili malsaniĝadis ĉiuj, ili ebriiĝadis ĉiuj, kaj rabadis ĉie, kie ĝi havis tian eblecon. Krom tio, ili pereadis tiom amase, ke li neniam povis laŭplane ĝin uzi laŭplane kun la aliaj, ĉar kun ili estis mortigataj kaj kaptataj la plej ekzercitaj kaj la plej multekostaj regimentoj.

Sed se tiun armeon ne ŝatis Karlo Lotaringuja, ĝin ja ŝatis la barono Berenklaŭo, kiu per ĝi pereigis Bavarujon, obeiginte la landon de la rivalo de Maria Terezo, kaj tiel iĝis favorato de la imperiestrino.

Ankaŭ li, en la amaso de la terure lipharaj, sovaĝaj kaj grasaj, vilaj soldatoj, abomenis sian metion, ankaŭ li estis perdanta paciencon pro batkvereloj, diboĉoj kaj multenombraj malsanoj en tiu armeo, sed ĉion ĉi li pardonadis, ĉar ili estis plaĉaj pli ol ĉiuj aliaj. Pri ili li ne devis zorgi; nek pri iliaj manĝaĵoj, nek pri iliaj piedvestoj. Liaj soldatoj dormis en koto, vadis en riveroj, kaj piediris ĝis falo pro senfortiĝo. Ili nek sciis kial ili militas, nek demandis lin pri tio, nek li devis ion ajn klarigi al ili. Al li ili ne nur ne ŝajnis malobeemaj, kiel al Karlo Lotaringuja, sed male, ekirante kun ili, li ĉiam havis impreson, ke li iras ĉasi, kun hundoj, kiuj lin rigardas humile kaj fidele, kiujn li povas inciti, por ke ili dismordu ĉion, kio baras lian vojon. Kruela kaj senindulga al ili kiel rabobesto, li estis tia, ne pro tio ĉar ili tion meritas, sed ĉar li volis, ke ili por li faru miraklojn. Sciante nur kelkajn vortojn de ilia lingvo, li spionsimile ekkonis

ilian animon. Li ilin incitadis kaj turmentis, ne nur la soldatojn, sed ankaŭ la oficiojn, sed poste kun ili impete repaciĝadis. Elĉerpitajn, li gvidis ilin sur la plej terurajn lokojn de bataloj, kaj toleris, post la batalo, ĉiujn iliajn kriegojn kaj diboĉojn. Ili ne nur ne surprizadis lin per neesperitaj malfacilaĵoj, sed male, nur rilate al ili li ĉiam precize povis scii, kion li povas atendi. Ili venadis ĉien, kien li volis, kaj pereadis tiomope, kiom li antaŭkalkulis. Li ilin ne nur ne konsideris rabistoj, senbriduloj kaj voluptemuloj, sed male, ili al li ŝajnis hontemaj kaj devotaj, seriozaj kaj preskaŭ malgajaj.

Mallertaj, kvankam plejparte belstaturaj, ili ne estis trupo, per kiu li montradis sin dum paradoj. Sufere li turmentiĝis kun ili ankaŭ dum kontroloj, sed tamen ĉiufoje denove postulis ilin. Ĉar tio, kion li plej alte taksis, same kiel ĉiuj oficioj, kiuj servis sub lia komando, same kiel Isakoviĉo, tio estis la jena – ili batalis horore, ili buĉadis, ili ŝatis miksbatalojn, renversadis kaj buĉadis, ŝirante per la manoj gorĝojn, ĉifonigante haŭtojn kaj karnojn kiel tukojn, rompante per pafiloj ripojn, brakojn kaj genuojn, frakasante vertojn kiel kukurbojn. Tial Berenklaŭo, kaj nur tial, respondadis orgojle en Kortego, kiam iu al li moke diris: „Viaj ĝendarmoj“ – „Jes, miaj ĝendarmoj.“

Sur la sulkega vizaĝo la ĉefmarŝalo-leŭtenanto barono Berenklaŭo, kvazaŭ sur la vizaĝo de maljuna popo, videblis ĉiutempa paleco. Tiu vizaĝo neniam ridetis, sur ĝi estis restinta spuro de ĉio, kion li per propraj okuloj vidis, irante ne malantaŭ tiuj slavaj soldatoj, sed kun ili en la unua vico, kun glavo en la mano.

Ili dum la milito igis lin fama, per buĉadoj kaj masakroj, kaj li ankaŭ poste tion ne ŝanĝis. Li amis miksbatalon, sed la miksbatalo al li plaĉis nur kiam estis inter ili. Sincere kaj malsincere, depende, li kondustis afable al ili kaj dum retiriĝo, kaj dum marŝo, rajdante silentema. Multglorata en Kortego, dum monatoj sen muziko, salono kaj sia kuŝejo, li jam ne povis prezenti al si la militon alia, ol tia, kun sennombraj mortigoj, hororaĵoj kaj suferoj, kiujn li rigardis senpere... Sentimiĝinte, li komencis pensi, ke li devas venki ĉie, kie li aperis, tial li ne plu priatentis militajn konsiliojn, instrukciojn de la ĉefa estro, kaj leterojn de Kortego. Sufiĉis, ke komenciĝu pluvoj, aŭ ŝtormoj, aŭ mallumaj noktoj, por ekbatali. La nokto por li iĝis ordinara bataltempo, kaj li eniradis ĝin, sen multaj soldataj antaŭmoviĝoj, en kompleta silento, kun ordono buĉi kaj nenian pardonon.

Nura sako da ostoj, pro maldormo kaj nemanĝado, li estis sekiĝanta ĉiam pli, pro kio liaj vangoj estis enfalintaj, la ostecaj zigomoj elstaris, kaj la okuloj fulmis kiel la okuloj de dezertulo. Lia tuta vizaĝo dum la milito longiĝis, sub la grandega frunto, kiun trasulkis faldoj, kaj sub la okulostoj, kiuj kiel alero estis leviĝintaj super la grandaj, glaciaj okuloj. Lia buŝo, en la tavoloj de sulkiĝinta haŭto, estis, same kiel la dentoj, tre malebena, kiel segilo kiu knaras. Raŭka ĉiam, li kriis tamen klare kaj laŭte, kaj la soldatoj, kiuj

lin nomis „maljuna oldulino“, timis lin, kiel sorĉistinon. Li havis hororajn manojn, nur el ostoj, per kiuj li ilin kaptadis, kaj vestadis sin preskaŭ nur en nigran silkon kaj ore broditan veluron, kaj kutime, troigante, aperadis ĉie, en pezaj, rajdbotoj kaj en kiraso.

Tiu homo, do, atendis ilin, dislokinte la regimentojn de Vuiĉo, de Horvato, de Vencelo, en maldensaj arbaroj, super Ŝtokŝtato, kie li ilin kontrolis, trejnigis kaj suferigis, irigante ĉiunokte gvatistojn, transen, sur la alian bordon, sed precipe en Majencon. Isakoviĉo ne nur ne devancis, sur la lasta parto de la vojo, la aliajn, sed eĉ malfruis tri tagojn. Pri li Berenklaŭo havis bonegajn novaĵojn, kaj el Engelŝtato, kaj el Grazo, kaj el Peĉao, de Komisararo, kiu pri Danuba batalionaro skribis, per akraj kaj tro ornamitaj vortoj, longan, tre longan raporton, kun ĉiuj donitaĵoj. Pri la oficiroj, homoj, armiloj, rezervoj, menciinte aparte la demandon pri ortodokseco, pri la skismuloj, kaj ilia fideleco kaj fideleco al Impriestrino, kun eblaj komplikaj de ĉio ĉi.

Instruito de jezuitoj, kun tre malestima opinio pri la skisma pastraro, kiun li havis en armeo, la barono Berenklaŭo tra legis tiun tutan raporton preteratente. Li ensis, ke tiuj demandoj estos solvataj poste, sed ĉi tie, male, li opiniis, ke al ili oni devas doni ankoraŭ kelkajn monaĥoj. La monaĥoj post bataloj kaj dum ilia vintrumado, dum kiu multaj mortadis, des pli, ĉar li rimarkis ke tiu popolo sentas profundan bezonon multe kanti al Dio, kaj lamenti pri mortintoj, pasiganta tutajn noktojn, post bataloj, en la kampadejo, veante, kaj drinkegante, apud fajroj.

Ordinare, Isakoviĉo, respektata en la armeo, estis veniganta al li tricent elektitajn soldatojn, kiujn li volis uzi precipe dum sieĝoj, kaj Berenklaŭo planis nepre doni al li la rangon de subkolonelo, se li ne pereos.

La atakplanon, kiun Karlo Lotaringuja opiniis sia, Berenklaŭo havis preta. Li volis per neeblo invado deflanke, konkerinte Majencon, kaj poste irante laŭlonge de Rejno, konkeri Vormson kaj Spiron, kaj la fuorton Seno Luio, kaj Strasburgon, kaj poste de tie penetri profunde en Lotaringujon, kien Karlo la Lotaringuja, kun amaso da soldatoj, povos malrapide marŝseki lin.

Alveninte, finfine, Isakoviĉo tranoktis kun la regimento, la unuan nokton, en arbaro, el kiu videblis la urbeto Ŝtokŝtato kaj Rejno, kun riverbrako, kiun Berenklaŭo elektis kiel lokon, kie li komencos la unuan atakon. Kaj tuj malantaŭ ili, en malproksimo – montoj.

La regimentanoj sentis faciliĝon animan, falis unu post la alia sur la teron por satdormi, post tiom da tagoj da senĉesa irado, en la varma, somera nokto, plena da steloj.

Li fartis, kvazaŭ estus veninta hejmen. La sama ebena, la sama rivero, la samaj ŝlimegejoj, sablo, salikejoj, kaj malantaŭ ili – bluaj montoj. El kanejo estis elflugantaj cikonioj; ranoj kvakadas kaj bruis la tutan nokton.

Sed tuj kiam komencis mateniĝi, ilin preterrajdis Berenklaŭo, kiel sorĉisto, kaj ordonis ke oni ilin veku kaj venigu malantaŭ la arbaron, sub iujn monte-tojn, por inspektado.

La mateniĝo ankaŭ tie, same kiel hejme, estis granda kaj malleviĝanta desur longaj, malhelaj montoj, sur la ebenon, kiun invadis densa herbo. Sur akvo mateniĝis tute senbrue, tiel ke la malforta vento faltis la surfacon de la rivero. Sur la malfreŝa supraĵo, kiun kvazaŭ estus kovrinta araneaĵo, verdaj libeloj kaj malgrandaj muŝoj, ekflugadis apenaŭ videbaj.

La mezo de Rejno, tamen, portis, multe pli rapide, branĉojn, klare vide-blajn, dum la kontraŭa bordo estis apenaŭ distingebla. Inter ĝiaj densaj arboj troviĝis tranĉeoj de francoj, kun du kanonoj.

Antaŭ tiu bordo videblis malhela insulo, invadita de arbaro, kiun Berenklaŭo volis kunigi per ponto kun siaj pozicioj, kaj sur kiun li, antaŭ tio, volis transigi, nokte, kelkajn homojn, por ke ili fosfaru kampan fortikaĵon. Ordinare ilia bordo, antaŭ la arbaro, estis nuda sablo, kie ne eblis kaŝiĝi de pafkugloj.

Rigardante el la arbaro la kontraŭan bordon, oni povis vidi nenion krom arboj kaj, super ili, grandan malplenon, en kiu ili ne sciis kio troviĝas. Ne aŭdacante plu kuri al la akvo, ili, restante nelavitaj, ŝmiris la rimenojn kaj armilojn, radojn kaj lezitajn siajn tretitajn piedojn. Sen bruego, al kiu ili ordinare estis kutimiĝintaj, ili viciĝis nun, en proksimo de la malamiko, en longajn vicojn, elirante el la arbaro, dormemaj, ŝancelpaŝe, butonumante unu la alian dedorse, falante en la duonlumo sur arbostumpoj, surmetante longajn ponardojn sur la pafilojn.

Kiam mateniĝis, malantaŭ montetoj, apud kelkaj forhakitaj vinberejoj sur kiuj kuretis zizeloj, ili viciĝis, en plena silento, laŭ duonlaŭtaj ordonoj de siaj estroj, kvankam transborde, jam, de tie, eĉ ilia kriado, ne estus klare aŭdebla.

Ili fiksaŭskultis alaŭdojn, observante malordinarajn tegmentojn de Ŝtokŝtato, kun pafiloj direktitaj al la tero, ne aŭdacante multe ŝanĝadi siajn piedpozojn, por ke polvo ne enflugu la ŝmiritajn tubojn. Ĝis kiam Isakoviĉo alvenis, oficiroj estis vicigantaj ilin, enrigardantaj iliajn sakojn, trarigardantaj iliajn armilojn, sabrojn, pistolojn. Kiam Isakoviĉo alrajdis, la oficiroj okupis siajn lokojn antaŭ la pedsoldatoj. Isakoviĉo estis en novega vesto, el ruĝa drapaĵo, tute ŝvela sub surmetita bulĉapelo kaj monstre razita. Lia Arkadio rasis lin tiun matenon, fuŝege. Arkadio gvidis vicĉevalon, blankĉevalon, kun kiu la stalknabo ĉiam kverelis, sidante tre necerte, nesatdorminta kaj nesobriĝinta, sur sia ĉevalo, kiu turniĝadis.

Suferante tutan horon, Isakoviĉo ilin vicigadis, rajdante laŭlonge de la vicoj, haltante kelkajn fojojn „pred persi“, ĝis kiam ili fine staris tiel, kiel soldatoj devas stari, en du vicoj, rektaj, frunt-al-flage. Tiam li ordonis al ili ne

moviĝi plu, kaj permesis al ili etendi fojfoje nur unu kruron. Tiel ili staris kaj atendis preskaŭ kvar horojn, kvankam la inspektado devis esti okazinta tuj. Eĉ la suno jam brilis, sed Berenklaŭ ankoraŭ ne estis alvenanta. Ne ĉar malfruis, sed ĉar li tro longe okupiĝis pri sia ĉiutaga inspektado, kaj fiksaŭskultis la alian bordon, rajdante kontraŭflue.

Finfine li aperis subite, skuiĝante sur la ĉevalo, akompanata de kelkaj generaloj, oficiroj kaj musketeroj, kaj, apenaŭ salutinte Isakoviĉon, ordonis, ke la regimento trejniĝu. Isakoviĉo aŭdigis al li unue la krion de la nomo de Maria Terezo, post tio saluton je lia honoro, kun flago, kaj elkriadon de lia nomo kaj titolo, kiujn la soldatoj, malgraŭ ĉiuj punoj, senintence, elparoladis Renbeklau, en akompano de brua „vivat“.

Post tio Isakoviĉo vidigis, direktinte la regimenton rekte al li, la kurpaŝadon kun ponardo inter la dentoj, pro kio la generaloj embarasiĝis, kaj Berenklaŭ pro agrablo hirtiĝis. Post tio – kiel oni pafas en tri vicoj. Kaj fine, diversajn movojn kaj malŝargadon.

La ĉefmarŝalo-leŭtenanto barono Johano Leopoldo Berenklaŭ, rajdante kun la kruroj tiel longaj, ke ŝajnis, kvazaŭ li per ili brakumas la ĉevalon ĉirkaŭ ĝia kolo, komencis kontroli la homojn, rakontante al sia akompanantaro pri bataloj, kio estis pruvo de lia plej granda gajo. Post tio li diris al Isakoviĉo alveni posttagmeze, kaj demandis, ĉu liaj soldatoj scias remi, senĉese samtempe plurajdante, salutinte la flagon.

Ĝuste kiam, tamen, kontenta, je granda ĝojo de Isakoviĉo, li volis forlasi la regimenton, kiu staris senmova kaj kvazaŭ ŝtoniĝinta, li turniĝis subite kaj ekpaŭtis, post kio ankaŭ Isakoviĉo ekstremegis.

Arkadio, kiu kondukis la ĉevalojn malantaŭ ili, atentante esti malantaŭ malfrunte de ili, komencis ĉirkaŭkuri ilin, ŝanceliĝante tiel, ke en la ĝenerala senmoveco, tio devis iĝi okulfrapa.

„Al diablo, kion faras tiu homo“ – diris mallaŭte Berenklaŭ, por kiu estis grave, ke la unua revuo pasu kiel eble pli majeste, rigardante fikse la serviston. Isakoviĉo, al kiu estis same grave, ke la revuo pasu kiel eble pli bele, ne respondis, li senvortiĝis.

Arkadio, skuante la blankĉevalon, vidis la paŭtan vizaĝon antaŭ si, kaj provis kvietigi la ĉevalon, al kiu li, jam kutime, parolis dorlote kaj flustre. Li sentis tamen, ke li glitas, kune kun la selo, teniĝante malespere al la kolharoj. Li estis drinkinta, same kiel ĉiunokte, pro malĝojo, ke eble iuj el la regimentanoj pereos, baldaŭ, ke pereos ankaŭ aliaj, kaj li nur nun estis malebriiĝanta, pro la aflikto kaj timo.

Kiam Berenklaŭ ekkriegis al li, antaŭ liaj okuloj ĉio mallumiĝis, kaj al li ekŝajnis, ke li sonĝas, vidinta kioma malbono okazas pro li, kaj ke ĝuste li ĉiujn malfeliĉigas. Jam tute malebria, fleksiĝante pro doloro, li tutforte penis

ne fali kun la selo, kies rimeno estis malstreĉiĝinta, kaptinte finfine la voston de la ĉevalo, kiu turniĝadis.

Berenklao rigardis lin kolere, ne sciante, ke al la servisto dume fera bo-trimeno, samtempe, enkarniĝis, super la artikoj, kaj poste trotigis la ĉevalon, antaŭ la generaloj, oficiroj kaj musketeroj.

Devante rajdi malantaŭ Isakoviĉo, kiu sekvis la estron, ektrotis ankaŭ Arkadio, suferante sur la ĉevalo kiu volis deĵeti lin. Li sentis malvarmon, ŝvito eliĝis tra la poroj de lia haŭto, pro doloro, dum li okulis la montetojn kaj salikejojn, sukcesinte penplene rektiĝi. Post tio, cerbumante pri tio, kion Berenklao alkriis al li germanlingve, tute konsternita, observante la ŝvabajn generalojn kaj oficirojn, li insultis mense iliajn patrojn, kun malĝoja mieno.

La regimento dume, indiferenta kaj laca, ekiris returne en sian kampa-dejon, en arbaro.

Tamen, trarajdinte intermonteton, subite, al ili iĝis videbla arbarriĉa, alia bordo de Rejno, tute lumigata de Suno, en malproksimo kun la silueto de Vormso, sub montoj. Tiumomente francoj ekpafis al ili, kaj ili ĉiuj ekspronis la ĉevalojn, krom Arkadio, kiu aŭdis la fajfadon de pafkugloj, sed fiksrigardis, desur la ĉevalo kiu tremis, la sunan, larĝan vidaĵon aliflanke de la akvo.

Post la sekvaj pafoj, tamen, li deĉevaliĝis por kvietigi la beston, ĉar la ĉevalo staris stupore. Vidinte, ke li estas sola sur la monteto, kun la ĉevaloj, li komencis flustri al sia ĉevalo, skuante alian, kaj ekrigardis ankoraŭfoje trans la riveron, rimarkinte sur la alia bordo francajn antaŭpostenojn. Dezirante savi la ĉevalojn, li intencis reveni, sub alian monteton, al iuj arboj, kaj tie decidi kion fari kaj kien iri. Li ekkuris kun la ĉevaloj, sed pafkugloj denove tute okupis lian atenton, frapante teron ĉirkaŭ li. Lin mirigis tiu subita pafado, kaj li admiris ilin, ĉar ili lin rimarkis. Tiel postebria, kolera, same kiel antaŭnelonge kontraŭ ĉiuj tiuj, li leviĝis por vidi la aliajn, aliflanke de la rivero, kaj insultis, mense, iliajn infanojn francajn.

Iel tiel li pereis, leviĝante iom pli poste jam la kvaran fojon, por gvidi la ĉevalojn, kun truigitaj intestoj, kroĉiĝinte al rimeno, murmurante por si mem, jam en komato, dolorĝeme:

– Ho, dio mia, ho dio mia!...

Jam la saman nokton Berenklao komencis konstruigi ponton ĝis la insulo, kaj tie pereis ankoraŭ dekunuopo, kaj sepopo estis vundita.

Tiel komencis, sen specialaj pretiĝoj, pereadi kaj mortadi Danubregiona batalionaro, ĉe Rejno, nur dio scias kial kaj kiakauze.



VII.

ILI PASUMIS, EMBARASE; MANĜIS, DRINKIS, DORMIS, POR FINFINE KURPAŜE PEREI, EKPAŜINTE EN MALPLENON, LAŬ FREMDA VOLO, KAJ POR FREMDA UTILO

La tuta kampanjo en Lotaringio, en kiu batalis, gvidante la armeon, kun siaj tricent distingindaj soldatoj, ankaŭ la noblanima Vuko Isakoviĉo, estis finita post kelkaj semajnoj. La estro de la avangardo, la ĉefmarŝalo-leŭtenanto barono Johano Leopoldo Berenklaŭo, konkeris, surprizatake, la tranĉeojn ĉirkaŭ Majenco, post kio ankaŭ la urbo kapitulacis. Karlo la Lotaringuja tiam transiris Rejnon kun la cetera armeo. Post tri tagoj, interŝanĝinte kun francaj husaroj nur kelkajn pafkuglojn el pistolo, ili eniris ankaŭ en Vormson, kaj sub pluvo, sub pluvego, uzinte eĉ ne unu pafilon, en Spiron. Post tri tagoj da ripozo ili ekkampadis sub la urbo de Sankta Ludoviko, kaj tie endanĝeriĝis. Kanonpafado daŭris plurajn tagojn, bomboj faladis en ilian kampadejon, francoj digis la riveron, kiu disfluis kaj inundis la ĉarojn, ĉevalojn, kanonojn, pro kio ili preskaŭ dronis, en koto. Ne sukcesinte sturme konkeri la urbon, ili ĝin ĉirkaŭiris, kaj alvenis sub Strasburgon, ĝuste kiam tien alvenis ankaŭ la franca reĝo.

Tiam tie okazis batalhalto, sed nur mallonga, kaj ili denove komencis batali kontraŭ la franca rajdantaro, ĝis kiam oni ordonis al ili penetri pli profunde en Alzacon. Ili atakis Cabernon kaj aĉe pereadis sur la stratoj urbaj, dum Trenko kun siaj kroataj ĝendarmoj buĉadis, kaptadis, embuske, en apudaj arbaroj, tutajn amasegojn da konsternitaj, malamikaj oficiroj kaj soldatoj.

Sed tuj kiam ili ekiris, pli profunde en la malamikejon, oni ilin repuŝis. Ili ekrapidis retiriĝi, hastapaŝe, al Rejno, kaj transiris ĝin ĉe la vilaĝo Dajnhajmo, forbruliginte la pontojn malantaŭ si. Karlo Lotaringuja rapidis veni en Ĉehujon, ĉar Prusujo vere komencis militi.

Dum atako troviĝante kape de la armeo, nun ili restis malantaŭe, en ariergardo, kaj venis kadukaj kaj malsanaj ĝis Ŝerdingo, ĉe Danubo, kie ili eksciis, ke ili vintros en Supra Falaĉkujo, kaj kie ili aŭdis, ke mortis multaj

baptanoj, onkloj, kuzoj, ankaŭ en la alia armeo, en Ĉehujo, en la kampadejoj de la princo Atanasio Raškoviĉo, la kolonelo Varadina.

Ĉio ĉi, kio okazis, pasis tiel sence, ke al Vuko Isakoviĉo konstante ŝajnis, ke ekzistas du Vukoj Isakoviĉoj; unu kiu rajdas, hurlas, svingas sabron, tretas riverojn, kuras tra tumulto kaj pafas el la pistolo, irante al Majenco, aŭ al la muregoj de Ludovikaj fortikaĵoj, kiuj klare konturiĝis super la akvo, dum mortigitoj falas kaj restas sur la tero. Kaj la alia, kiu kviete, kiel ombro, paŝas apud li, kaj rigardas kaj silentas.

Ĉar li ne sciis la intencojn de la ĉefmarŝalo-leŭtenanto, li vivis kaj pretigadis la soldatojn laŭ ĉi-momentaj bezonoj, pro kio pluvaj noktoj komenciĝadis kiam li estis sen ekipaĵo, kaj longaj kampadoj sen tendoj kaj tolaĵoj. Oni demandis lian konsilon, sed nur en la lasta momento, antaŭ batalo, do li absolute ne sciis, kiun urbon ili atakos, kaj kien ili poste iros. Sciante nek kial ili batalas, nek kontraŭ kiu ili batalas, nek por kiu ili batalas, aŭ ne pensante pri tio, Isakoviĉo tretis batalkampojn samkiel kiam li tretis la ŝoseojn, obeza, peza, kun absoluta manko de kompreno en la animo. Kiam oni al li eĉ post la unuaj venkoj, ne donis la rangon de subkolonelo, ankaŭ sin razi kaj ordigadi li ĉesis, pro kio liaj ungoj iĝis tro grandaj, kaj apud Strasburgo li eliris antaŭ Karlon la Lotaringujan, simianta al sovaĝiĝinta urso.

La anima amaro, kiu leviĝis ĝis lia gorĝo, disfluis tra lia tuta korpo, pro kio li komencis malsanadi, en diversaj korpopartoj, suferante kaj priplorante sin mem, pense. Kurbakrura, kutimiĝinta rajdi, li lacegiĝis pro longa paŝado, jam dum la unuaj bataloj. Kruroj liaj ŝveliĝis, tibioj tuberiĝis, la genuo, kie lin, antaŭ la ekiro, estis batinta la ĉevalo, plene malmoliĝis. Ventro lia malstreĉis, same kiel la vangoj sub la oreloj, okuloj liaj iĝis sangruĝaj. Grizethara delonge, en komenco nur tiom, kiom virinoj tion ŝatas, li komencis nun ankaŭ kalviĝi; haroj restadis sur liaj fingroj kiam li frumatene, lavante sin, eltiradis la kapon el sitelo. Kun la lipoj bluiĝintaj, li komencis malfacile spiri, la dolorojn en la ventro li jam frontis kiel ion neeviteblan post manĝo, al kio li jam estis kutimiĝinta. Trememaj iĝis liaj manoj, kaj ridige malĝoja, kiel viransero sur novalo, li staris ofte, inter blankaj tendoj, en kampo, diskurra, kun klinita kapo kaj okuloj, rigardante ĉielen.

Li estis tiom kvietiĝinta, post ĉio, kion li travivis en Virtembergo, ke kun siaj soldatoj li apenaŭ parolis; kaj eĉ kiam parolis, li vortis nur iomete.

„Por Honorom ed Glorom noses Regimentes, nutrir Phamilioyn Orphes per miham propram Elspezom, por que ityom estu Memorom prid miham Nomom.“ – diris li antaŭ Caberno, dum retiriĝo, irigante lin antaŭesplori, en la urbon, kun kelkaj kavaliroj, al la kapitano Antonoviĉo. Kiam ĉi tiu tamen, vidinte lin kadukan kaj zorgoplenan, nigriĝintan, diris, pensante ke li tiamaniere bonfartigos lin: „Дужан јесам и буду и ја даровати што за

поминание императорке...“ Isakoviĉo lin interrompis kolere, kriegante: „*Dolchom Richescas, ho Antonowichom, lewat tuin Menson Wantazhod Wantazhes. Passot, malaperot cheyuy ismonday Bonoy ed Glorom Regantes. Se mihi tristam adproximizzims ad Tombod, Culpintom prid miham Tristom ne estat ityu Imperiestrinnom, sed miham malsanam Wentrom. Iru tu!*“ – ekkriegis li, deturninte sin.

Tio al li ŝajnis vera, fojfoje, vekiĝinte el sia sonĝo, el la sonĝo kiu daŭris jam pli ol dekopon da jaroj, el la sonĝo, en kiu li estas senpova kaj vana, sed klare videbla kaj komprenebla por si mem. Ne sciante la tutan strategian planon de Karlo la Lotaringuja, samkiel, interalie, li ne sciis eĉ ĉiujn kialojn de la milito, li same demandis nek pri la nomoj de la generaloj, kiuj aperadis kaj revenadis en postfronton, nek pri la nomoj de la urboj kiuj vidiĝadis antaŭ ili, helaj, en frumateno, aŭ bruligitaj, post batalo. Samkiel li ne sentis Prusujon, en landinterno, same li sciis nek kie estas Lotaringio, antaŭ li. Ĉu, post iliaj venkoj, Maria Terezo sukcesos kroni sian edzon en Germanujo, tio lin ne jukis, same kiel ilin ne jukis lia subkoloneliĝo. Anstataŭ la militon, kiun li partoprenis, li memoris tiun sian iradon tien-reen, kiel iaspecan sensencan disvagon tra varmegaj, someraj noktoj, kaj pluvaj tagoj, ne rimarkante la staton de la fortikaĵoj, poziciojn de la urboj, dispozicion de la kontraŭula armeo, sed nur deklivojn de montetoj, bordojn de riveroj, akaciojn, ŝanĝiĝemon de la astrejo, de printempaj, someraj kaj aŭtunaj tagoj. En kompleta sento de sonĝo, li trairis tiujn diversajn fremdajn ŝtatojn, kaj tutan mondon tiun de Rejno, reveninte, en tarda aŭtuno, al Danubo, kun la sama sento de senĉesa eferemeco kaj vano. Li ekĝojis pro onidiroj, ke ili transiros la montojn, en Ĉehujon, por batali tie kontraŭ prusoj, en ĉirkaŭaĵo de Hebo, de kie, antaŭnelonge, Raŝkoviĉo estis forportinta la korpon de la regnestro Ĝurĝo Brankoviĉo, elĉerpitan kaj, kiel en la batalionaro oni parolis, venenigitan.

Ekkompatinte, pli ol iam ajn antaŭe, siajn soldatojn, li ne sciis kiun regali per sia kolerego kaj amareco, kiu ĉiam pli profunde sorbiĝis en lian korpon. La atendado, multmonata, de la subkolonela rango, igis lin febra, kaj li, nun, klare vidis ankaŭ la mizeron de la aliaj. La ĉifonvestojn de la soldatoj, la malbonodoron de vunditoj, kiuj ne estis forportataj, sed, laŭ propra volo, restis kun la regimento, la tutan malzorgon, kun kiu oni ilin elmetadis antaŭ kanonojn. Laŭlonge de la tuta bordo, ĝis la soldatoj de Ivano Horvato, oni al li sendis nur unu kuraciston, por bandaĝi iliajn vundojn. La subkolonelo Arsenio Vuiĉo, gvidanta du regimentojn, irigadis al li oft ofte oficirojn por prunti monon, ĉar oni lin prirabadis, dum havigadoj, kaj dum batalhaltoj oni komencis pendumi iliajn soldatojn, kaptitajn dum ŝtelo, eĉ kiam temis pri ununura brasikkapo en kampo.

Kaj ne nur li, sed ankaŭ liaj oficiroj, kaj eĉ la soldatoj mem sentis ion, kio igis ilin fragilaj, pro kio ili iris anserpaŝe post bataloj, kiel en sonĝo. Ili ne

nur ne sciis, kie ili batalas, sed ankaŭ ne povis ellerni, por la revuo, eĉ la nomon de sia estro, kvankam ili devis tion ekzerci eĉ dum marŝoj. Du miloj da gorgoj, vicigitaj kvarangule, kriegis, malgraŭ multenombraj batadoj, dum la tuta milito, post laŭta kriado de la oficiroj, ripetante: „ĉefmarŝalo-leŭtenanto, ĉefmarŝalo-leŭtenanto, barono, barono, Johano, Johano, Leopoldo, Leopoldo, Berenklaŭ, Renbeklaŭ, Berenklaŭ, Renbeklaŭ.“

Eĉ la bataloj restis en la memoro de Isakoviĉo sensencaj kaj obskuraj. Li jen memoris, ankaŭ la nokton kiam ili transiris Rejnnon. Berenklaŭ tri tagojn pasumis kun ili, en arbaroj super Ŝtokŝtato, alpaŝante Rejnnon. Veninte en la kampadejon, li surmetis la veston de ordinara soldato kaj gvidis ilin senbrue, sur la bordo, tra arbustaro en arbaron. Li venigadis ilin al akvo, kiel rabobestojn en mallumo, kaj kuŝis kun ili en sablo, sub folioj, kaj densaj branĉoj. Li fiksaŭskultis kaj ŝtelobservis la kontraŭan bordon, de kie aŭdiĝis rumoro kaj interkriado de francoj. Varma, somera nokto estis plena da skaraboj, kiuj rampis sur ili, kaj da herboj, kiuj kaŭzis jukadon en nazo kaj oreloj, krom tio, manoj kaj ĉemizoj iliaj estis, frumatene, plenajn da makuloj de ruĝaj, dispremitaj, sovaĝaj fruktoj. En la mallumo, okazadis ke ili subite surpaŝas kavojn, plenajn da akvo, kaj enfalas en ŝlimejojn, plenajn da ranoj, pro kio poste longe aŭdeblis dampita rido de la aliaj. Helikoj faladis sur iliajn kolojn, gluiĝadis al iliaj vangoj kaj manoj, kiam ili dormis.

Sub lunlumo, post noktomezo, ili devis kuŝi senmove, por ne malkaŝiĝi, spirante unu al la alia al kotaj opankoj kaj akraj ponardoj, ne movante la kapon. Tiam antaŭ ili vidiĝis, klare, brua rivero kiu estis forfluanta, malrapide rulante kaj turnante ŝtupojn kaj branĉojn, irigante ilin fojfoje sur la kontraŭan bordon, kie francoj tion renkontis per pafado el pafiloj. Super arbaroj, per lunlumo heligitaj, estis tiam absoluta silento, pro kio fojfoje aŭdiĝis bojado de hundoj eĉ el Majenco. Malsekaj, pro la mateno fridiĝintaj, ili renkontadis la tagon, kvazaŭ gluiĝintaj en la koto, fiksaŭskultante kiel, en altejo, pegoj tiktakas. Ili klare distingis soldatojn, en tranĉeoj, sur la alia bordo.

Berenklaŭ fojfoje kriegis kune kun ili, pro kio al la francoj ŝajnis, ke ili translokas la kampadejojn, des pli ĉar ili ankaŭ fajrojn bruligadis, kriis senbride, kaj tamburis.

Kiam al li ekŝajnis, ke la malamiko sufiĉe konfuziĝis, Berenklaŭ finfine dum nehela nokto proksimiĝis kun ili al Rejno, proksime de Majenco. Interkonsentinte, antaŭ mateniĝo, kun Isakoviĉo, pri surprizatako, li malproksimiĝis por trovi boatojn.

Dum la soldatoj kuŝis, en arbareto, Isakoviĉo descendis antaŭ ili en sablon, sur akvon. Li vidis la stelan ĉielon, vidis arbarojn, sur la kontraŭa bordo, du malgrandajn insulojn meze de akvo kiu nigris. Regis plena silento. Li sentis, ke humideco penetras ĝis liaj fingroj, en la pezaj rajdbotoj. Per unu ŝultromovo, laca, sed

tre agrabla, li deĵetis la mantelon, kiu al li jam ŝajnis peza, kaj sentis, ke ankoraŭ estas malvarme. Levante la pistolon ĝis la pinto de sia nazo, li ankoraŭfoje trarigardis la pintsaketojn, li denove blokis la ĉanon, post tio eltiris la sabron, forĵetinte malproksimen, antaŭ la soldatojn, ĝian ingon. Malrapide, senmova, li suprenvolvis la dekstran manikon kaj, kvankam al li estis malvarme, li sentis agrablon nudigante la vilan brakon, preskaŭ ĝis la kubuto, ĉar lia korpo estis varmega.

Tio estis la nura momento, kiu al li estis, ankaŭ antaŭe, ĉiam, la plej kara. La momento kiam ŝajnis al li, ke la kuntiriĝintajn fingrojn li ne povus deigi, eĉ trude, de la sabrotenilo, tiom forte li ĝin premis. Tio estis la ŝvelado de la korpo, pli dolĉa ol ĉiuj ĝuoj, kiam al li ŝajnis, ke ĉesas ĉiuj doloroj, kaj ĉiuj malsanoj, kaj ke ĉio boniĝas, tiom, ke li povus haltigi tiun riveron, elŝiri arbojn, distranĉi nubojn.

Li aŭdis soldaton senbrue treniĝanta ĝis lia mantelo, kaj levanta ĝin, post tio li rimarkis, ke boatoj aperis malantaŭ la malgranda insulo. Reveninte al la soldatoj, li rapidpaŝe irigis ilin tra maldensa arbaro, laŭflue, ĝis Berenklaŭo, kiu lin atendis apud boatoj.

Neniu elbuŝigis ununuran vorton.

Tie estis dekdu grandaj boatoj kun remantoj, kaj Berenklaŭo tuj ensaltis la unuan el ili.

Tuj kiam la boatoj pleniĝis, ili direktiĝis laŭflue, transloĝiĝante ĉe maluma bordo de la insulo, meze de la rivero.

Ĝus komencis tagiĝi, kaj ne estis videble eĉ kvindek paŝojn de ili.

Neaŭdeble ili preterfluis branĉojn de la insulo kaj aperis, subite en la mezo de la rivero, en ĉeefluo, kiu ilin komencis turnadi. La du unuaj boatoj grundis sur sablaĵo. Isakoviĉo vidis ankoraŭ Berenklaŭon leviĝanta en la boato, kaj soldatojn saltintajn en akvon, por la boatojn liberigi, post kio li tuj eniĝis en duonlumon, rimarkante, ke li troviĝas proksime de la kontraŭa bordo.

Dek boatoj apenaŭ aŭdeble eniĝis en sablon, kaj soldatoj komencis elsalti sur la bordon, kapteginte la pafilojn per la manojn, kontrolante haste pafilan polvon kaj fajrilojn, puŝante, post tio, ponardojn inter la dentojn.

Francoj ilin ĝis tiam tute ne estis rimarkintaj.

Nur kiam Isakoviĉo kaj kelkaj soldatoj aperis sur montkoloj de la bordo, ekkriegis unu el malamikaj soldatoj konsternite. Sammomente estis alveninta ankaŭ Berenklaŭo, kun la du postrestintaj boatoj, kaj tra la nokto orelrompe aŭdiĝis ritma hurlo: Ma-ri-a, Ma-ri-a, Te-re-z-o, Te-re-z-o.

Ekknalis pafiloj, kaj komenciĝis freneza grunto de pistoloj, pafiloj, terura kriaĉado kaj hurlo. La soldatoj de Isakoviĉo komencis ensaltadi en tranĉeon, kun ponardoj inter la dentoj, disrompante kapojn.

Post duonhoro, dum ĉirkaŭ li vunditoj estis falantaj sur la teron kaj tor-diĝis pro doloro, mortante, Isakoviĉo estis, kun kelkaj soldatoj, jam aperinta

en la ĉefa strato de la urbo, kun sangruĝaj okuloj, ŝvita, spireganta, apogante sin sur murojn de domo per sanga sia sabro, dum soldatoj ĉirkaŭ li estis pafantaj en malluman kaj malplenan straton, super kiu preskaŭ intertuŝiĝis du vicoj da nigraj, fulgaj, akraj tegmentoj, senhomaj kaj senmovaj, inter kiuj videblas maldika ŝprucaĵo de la bluiĝinta ĉielo kaj, sur ĝi, Matenstelo.

Tiel sen granda ĝojo, sed ankaŭ sen granda malĝojo, li permesis preteriri al la delegitaro, kiu serĉis la baronon Berenklaon, por transdoni al li la urbon, kaj unu ĉaron, ŝarĝitan per mortintoj, kies pendantaj brakoj svingiĝis, kaj elfalintaj kruroj skuiĝis.

Tiel, sen ia ajn ĝuo, li aŭdis, ke la armeo transriveriĝis malantaŭ ili, kaj ke la ponto estas jam konstruita. Tri tagojn, dum Karlo la Lotaringuja estis transiganta la armeon, li pasigis en dormo, ebriiĝinte.

Du vizaĝoj fantomis, en lia sonĝo, du kapoj, kiujn li estis distranĉinta propramane. Forbloviĝante el lia memoro, ili aperadis super lia konscio, ankoraŭ kelkajn tagon. Kiam ili jam komencis plene perdiĝi el liaj pensoj, ili aperis sangaj, dum momento, rondaj kaj neklaraj, en ruĝaj akvomelonoj, duonigitaj, per kiuj dum tiuj tagoj li kaj la soldatoj nutris sin.

Laŭdita pro la atako kontraŭ Majenco, Isakoviĉo restis, ankaŭ en la koto sub Vormso, sur la frunto de avangardo. Por ĉiu sia soldato li ricevis de Karlo la Lotaringuja po unu arĝentan forinton. Tiun monon li disdividis al la soldatoj kun konvena parolo pri Grandmartiro Caro Lazaro.

Post kelkaj tagoj li estis en sieĝanta armeo, antaŭ la fortikaĵo de Sankta Ludoviko, kie li atendis specialan taskon: atakon kontraŭ la defendmuroj, per sieĝfosaĵoj, altranĉeoj. Pri tio, hejmtreegione, sub Varadino, li plej multe ekzercis la soldatojn.

La urbo de Sankta Ludoviko troviĝis sur ebenejo, tute surkreskita de plantoj, ĉirkaŭmurigita profunde en marĉegoj. De unu flanko ĝin defendis la larĝa fluo de Rejno kaj unu riverbrako, kaj de la alia, malmolaj defendmuroj kaj kaŝitaj fosaĵoj, plenaj da akvo.

Nokte en la ĉirkaŭaĵo estis terura aerhumideco, en la kotejo, plenplena da kuloj, sed tage regis absoluta silento en la herbaĉo, super kiu nur malofte videblis akcipitro aŭ passeraro. Se ne estus falantaj bomboj, la soldatoj de Isakoviĉo forgesus kie ili estas, pensante ke ili trejnas sin sub Varadino.

Enteriĝintaj, ili nokte tirkantis en akompano de guzloj, premante per la dorsoj tranĉemuron, kiu eriĝadis sub iliajn kolojn, kaj mallevinte la krurojn en ŝlimkavon, inter kanojn, en kiu estis saltantaj ranoj.

Ili kantis, ĉar multaj pereis, kaj ĉar multaj malsaniĝis. Ili priploradis mortintojn kaj vivantojn, per kantoj tirtonaj, lamentaj, tiel longedaŭraj, ke dume la malamiko ĉiam pli malofte pafadis, kaj fine, entute, la pafado ĉesis.

Vuko Isakoviĉo estis konstruinta por si kabanon el salikaj vergoj kaj kanoj, ĉe profunda, ĵus elfosita kavo, en kiun ili, penplene, lokis du kanonojn. Kabano lia estis tiel malalta, ke en ĝin li devis enŝovigi kvarpiede, sed kiam li kuŝiĝis en ĝi, sur larĝan drapkovritan teraltaĵon, li povis tra kanaro vidi preskaŭ tutan ĉirkaŭaĵon de la urbo, kaj ĉiujn defendmurojn, kaj krom tio ankaŭ ĉiujn siajn fosaĵojn.

Multon, tuttage, li ja povis vidi. Inter liaj fosaĵoj, pro enuo, kiam la pafado iom ĉesis, kaj liaj soldatoj pasumis, falante en ŝlimejojn. Ili disportadis brasikkapojn, kukurbojn, plenmanojn da fazeolo, de foskavo al foskavo, ĝis kiam francaj kanonistoj okupis ilian atenton per siaj bomboj. Tiam ili estis komencantaj kuri, zigzagi, enfaladi ŝlimejojn, koton, malbarante por si vojon, kiel porkidoj, tra ŝlimo, kiun frapadis bomboj. Por preni perditajn brasikkapojn elkuradis kompletaj tranĉejanaroj.

En silento posta, interrompata de salvoj kaj pafado kaj tondrado de kanonoj, Isakoviĉo denove, kiel en sonĝo, rigardis tiujn senlimajn kanojn, ŝlimejojn kaj defendmurojn. Vidinte sin denove kvazaŭ duobliĝintan, li pripensadis sian tutan vivon, travivinte, tiel, kelkajn kvietajn tagojn. Lia kabano estis komplete droninta, inter arbustoj, invadita de verdalgaro, kaj super ĝi susuris kanaro.

En ia duonveka stato, kiu al li jam similis al mortado, li akceptadis oficiojn kaj heroldojn, kiujn al li sendadis Berenklaŭo, kun ordonoj kaj novaĵoj pri la sieĝo. Bonega estro en ordinara situacio, Isakoviĉo cedis finfine, ĉar oni lin promociis ne igis subkolonelo. Li faris eĉ ne unu noktan surprizatakon, ne buĉis eĉ tiujn malamikajn tranĉeojn, kiuj al li estis la plej proksimaj, sub la fortikaĵo li restis absolute sensukcesa. La milito lin, ŝajne, ektedis.

Kiam iun nokton francoj digis riverbrakon kaj fluigis ondojn de Rejno kontraŭ la sieĝaj tranĉeoj, pro kio ĉevaloj dronis, ĉaroj rompiĝis, kanonoj enkotiĝis, Isakoviĉo en sia kabano kviete dormis. Li sonĝis, ke li edzinigas sian filinon, savantan la belegan figuron kaj staturon de Princino de Aleksandro la Virtemberga, sed el la tempo, kiam tiu estis juna, ne ĉi tia, kian li vidis antaŭnelonge. Malantaŭ lia filino iris, tra la sonĝo, plej kara sanktulo lia, al kiu kaj li kaj lia frato Aranĝelo, volis konstruigi preĝejon, super la patra tombo, la regnestro Stefano Ŝtilanoviĉo. La regnestro lin alrigardis milde, haltinte ĉe lia kapo, parolante: „*Malphermitayn widams Pordon Mortes tues, ho Isacowicho, chez lastam Spirom tuam! Edzinnom tuam putrot cum Wermoy. Ed Amarescom Animes tues phorpassot. Pru tuam Wiwom longam, nur PosteuLOY tuay in Noctom trowoit ityun bonluman Matenstelon.*“ Ĉar li tiel, dormante ŝtonan dormon, interparolis en la sonĝo kun sanktuloj kaj anĝeloj, ronkante, li ne vekigis eĉ tiam, kiam akvo lin renversis, kune kun la kabano, en profundan riverbrakon, kiu, neglektata, disfluigis torenton tra la tuta plataĵo, sub la fortikaĵo.

Tiun nokton ĉiuj soldatoj estis dronantaj, piedpremantaj unu la alian, kaj penplene savintaj siajn kanonojn. Nur post kelkaj tagoj aperis denove tendaroj aŭstrujaj sub la urbo, sed malproksime de la muregoj, kaj finfine, ĉirkaŭirinte la urbon, ili foriris sub Strasburgon.

Isakoviĉo, sub Strasburgo, estis ankoraŭ pli dormema. Francaj husaroj rajdis ĝis liaj tendoj, pafante sentime proksime al li, el siaj longaj pistoloj, kaj liaj homoj buĉis nur kelkajn antaŭpostenojn.

En herbomaro, heligita de Suno, ringfosaĵoj kaj muregoj de la urbo, sur kiuj estis plantitaj arboj, ŝvebis antaŭ liaj okuloj ĉiumatene. Fiksrigardante altajn kaj akrapintajn preĝejajn sonorilturojn, li vidis super ili ankaŭ violan astrejon, malsekan pro pluvo, kun grandaj, bluaj fenestroj, sur la fundo de horizonto. Li mense konstatis, ke ankaŭ tie oni povus vivi, kaj iun vesperon, kiam kavalerianoj alkondukis kaptitojn, li detale ilin pridemandis, per interpretistoj, pri iliaj oficiroj, pri diversaj rangoj de estroj, precipe de subkoloneloj kaj koloneloj, kun tute flava vizaĝo, pro senpova kolerego.

Berenklo, kiun la militmaniero de Karlo la Lotaringuja senesperigis, kaj kiu siajn antaŭpostenojn starigis tuj ĉe la urbaj muregoj, mesaĝis al li, pere de Vuiĉo, ke li provu, rekte el la kampadejo, fari surprizatakon, nokte, kontraŭ granda ŝtona gardistejo, kies pordego estis la tutan tagon malfermita. Sekve, iun nokton, sen volo kaj deziro batali, Isakoviĉo, en granda kampadejo, vekis siajn oficirojn, kaj ordonis al ili senbrue veki soldatojn, kiuj nokte fuĝis el la kampadejo por ŝteli brasikojn kaj melonojn, en ĝardenoj, sub urbaj muregoj. Kaj dum ili, taŭzaj kaj hirtaj, estis elŝoviĝantaj el la tendoj, kunpremiĝante en amasojn kiel nigraj virŝafoj, Isakoviĉo montris al la oficiroj tiun gardistejon, en silentego de matenkepusko, kiel iun malproksiman ŝtonon. Per binoklo, ili jam klare povis distingi gardistojn sur la muregoj, unuopajn domojn kaj verdajn kronojn de arboj. Super kampoj flugpendis lakta nebulo, kiu stringis la genuojn de ĉevaloj. En la kampadejo oni havis nek scion nek supozon pri tio, por kio ili pretiĝas. Gardistoj malantaŭ tendoj, ĉaroj, grandaj stakoj da fojno kaj pajlo, tralasis lin, dormantaj stare, apogitaj sur siajn pafilojn, kiel paŝtistoj sur siajn bastonojn.

Isakoviĉo elrajdis el la kampadejo, en malplenan, stelan matenon, sur verdan herbon, varmiĝante en vaporiĝo de sia ĉevalo, al apudaj arboj, por rerigardi la vojon, laŭ kiu li intencis iri. En larĝaj, verdaj kampoj, en la silento de malproksimaj teraj ringfosaĵoj, li duonvidis la muron, kontraŭ kiun li volis hurle ĵetiĝi, antaŭ ol Suno ekbrilos. Lasinte la gvidrimenojn, li ĉirkaŭgardis, sur la selo, kaj vidis soldatojn, en matena mallumo, kolektiĝantaj sur novalo, ĉirkaŭ oficiroj, ŝargante siajn pafilojn kaj pistolojn.

Skuiĝante sur la ĉevalo, kiu senĉese elĵetadis la kapon, kaj retropaŝis, timanta pro io, Isakoviĉo denove sentis la antaŭatakan korpan ĝuegon, kiu al

li estis pli kara ol ĉiuj aliaj. La milda ĝojo leviĝis denove de liaj kalkanostoj ĝis la nuko, kiel trem sento, kaj tial, sproninte la ĉevalon, li ekrajdis rapide, balanciĝante al la soldatoj, por irigi ilin. Kiam la ĉevalo eksaltis, li sentis ke el li malaperas la malsano, kiu lin turmentis, malaperis la doloro en ostoj kaj piedartikoj, kaj enspirante herbon, roson, varmon de la rajdĉevalo, hufobatojn kaj obtuzan guston de la feraĵoj sur si, dum nur unu momento li forskuis sian ĉi-noktan varmon, sufoksenton pro vino, malespero, pensoj malgajaj, kaj ekkriis plengorĝe al la soldatoj, trotigante la ĉevalon cirkle, antaŭ ili, pro kio ili timretiriĝis. Li volis, laŭkutime, diri al ili kelkajn vortojn, antaŭ la morto, estis menciota la sanktan regnestron Stefanon Stilanoviĉon, skoldinte ilin unue, ĉar ili nokte estis fuĝantaj el la kampadejo, vagantaj por priŝteli vilaĝajn kortojn en la ĉirkaŭaĵo. Tiam, subite, el malproksimo ekŝriis franca trumpeto.

La franca reĝo, jen, survoje, volis viziti, dum kelkaj momentoj, la atakitan Strasburgon, kaj vidi sian armeon. Tion li sukcesis, senpene, ĝuste tiun tagon, kiam, antaŭ la mateniĝo, Vuko Isakoviĉo estis intencinta, kun sia Danubregiona bataliono, laŭ la ordono de la barono Berenklaŭ, konkeri surprizatake unu neserioze gardatan urban gvardiejon, antaŭ kiu la gardantoj eĉ ne faris fosaĵojn.

En akompano de subita trumpeta ĝojbruado, tiun matenon, francaj regimentoj komencis eliradi el la urbo, kun rajdantaro, sur novalon antaŭ la ringfosaĵoj, kaj, preskaŭ pafdistance de la Aŭstruja kampadejo. ili staris sur ŝoseo, antaŭ grandaj tendoj de siaj antaŭpostenoj, en paradaj vicoj, malantaŭ kiuj baldaŭ kolektiĝis ankaŭ urbaj loĝantaroj, kurante, kriante, salutante per la ĉapeloj.

Kavalerianoj peliĝis sur paŝtejo por vidi la junan reĝon, oficiroj el apudaj francaj kampadejoj estis alkurantaj, centoj kaj centoj da musketeroj kaj ĝendarmoj de la reĝa gardistaro turniĝadis, tien-reen, inter du vivaj muroj – senmovaj taĉmentoj. Inter ili pasis la kaleŝo de la reĝo, je kiu estis jungitaj ok blankĉevaloj, sekvata de amaso da gardistoj, kiuj karakolis sur siaj ĉevaloj, kun la sabroj elingitaj, retrorigardante kaj penante vidi, en malproksimo, blankajn kaj diverskolorajn aŭstrujajn antaŭpostenojn.

La kanonoj el la urbo pafis tricent fojojn, kaj la armeo elĵetis tri salvojn.

Isakoviĉo kaj liaj oficiroj, kiuj ĉion ĉi povis vidi, kaj per binoklo, kaj nudokule, kuŝiĝinte malantaŭ arbustaro, nenion povis fari, krom ne miksiĝi en tiujn aferojn. Deĉevaliĝinte, ili silente interrigardis, atendante ke Berenklaŭ sendu al ili novan ordonon.

Karlo la Lotaringuja dume jam interkonsentis pri batalhalto, kaj en la kampadejoj de la serboj komenciĝis, jam tiun tagon, kriaĉado en akompano de guzla reeĥo, hojlado kaj rondodanca saltado. Tamburoj sonis, kaj kurieroj kriis ordonojn al la soldatoj, ke ili ne rabadu, dum la batalhalto, ĉar pro eĉ la

plej malgranda ŝtelo de herboj aŭ fruktoj, el apudaj ĝardenoj kaj vilaĝoj, ili estos senvivigitaj.

Tiel, jen, Danubregiona batalionaro, denove, dronis en voĉhaoson kaj kriegadon, inter tendoj, portante en siaj taŭzaj hararoj pajlerojn kaj fojne-rojn, odorante je sebo kaj pulvo, ŝmirante siajn krurojn, ponardojn, pafilojn, pintsaketojn, rimenojn, de la mateno ĝis la mallumo, trejnante samtempe, antaŭtagmeze pafadi salve, en tri vicoj, kaj posttagmeze fari paradan saluton al la ĉefa estro, kvankam la tuta regimento hurlis ĝuste nur la latinan vorton „vivat“, sed la la vorton Karolus ĝi misprononcis, jam la milan fojon, Kalorus, duks, dus, kaj Lotaringio – Lotaringujo.

Ili disiradis, cetere, tuj kiam mallumiĝis, malgraŭ ĉiuj gardistoj kaj bata-doj, en apudajn vilaĝojn, serĉante ion ajn glutindan, elĉerpitaj kaj malsatantaj. Isakoviĉo pensis ke li nepre freneziĝos, se ĉi tiu kaj ĉi tia milito ankoraŭ longe daŭros. Same kiel Vuiĉo, Markoviĉo, kaj aliaj estroj, ankaŭ li tuttage atendaĉis antaŭ la tendoj de Komisaro; por havigi iom da greno.

Kun siaj ŝiritaj tendoj, kun malmultaj ĉaroj en la kampadejo, plena da sovaĝiĝintaj hundoj, li hontis antaŭ aliaj soldatoj. Malantaŭ la plej proksimaj francaj gardistejoj, li povis, eĉ nudokule, vidi arbojn kaj kanonojn en la urbo, brutojn kiuj sin paŝtis antaŭ la urbaj muregoj, kaj kamparanojn kiuj skukolektis la lastajn, neplukitajn fruktojn. Tio, kio okazas en la urbo, ripetiĝis antaŭ li kiel vibrado de nuboj, kun ĉiam samaj kampoj, muregoj, gardistoj, bastionoj kaj baterioj. Homoj estis skukolektantaj fruktojn, kaj malantaŭ ili estis ĉiam sama arbataĵaro, alta kanabo kaj malplena horizonto.

Jam la sekvan tagon estis pendumitaj du soldatoj de Vuiĉo, pro pom-ŝtelo. Taĉmento de germanaj kavaliroj, popo kaj ekzekutisto estis vizitan-taj la ĉuirkaŭaĵon kaj pendigadis homojn senprokraste. La popo aŭskultis antaŭmortajn konfesojn.

Isakoviĉo ŝanĝis la tendon, fosigis en tero kabanon, kovrigis ĝin per her-bo, turninte la elirejon tiel, ke la urbon li ne povis vidi. Tra la aperturo, li vidis la tendaron de siaj homoj, plenan da disĵetita, putrinta pajlo kaj hundojn. La hundoj postkuris unu la alian, ludante, ĵetante pajlon per la muzeloj supren. En malcerteco, li ne aŭdacis forlasi la kampadejon, dum liaj oficiroj iris ne nur en aliajn regimentojn, sed ankaŭ ĉasadi, kaj drinkejumi, en apudaj urboj, serĉante knabinojn.

Je la fino de la somero, en terura aerpremo, Isakoviĉo vivis, tiel, sian malfacilan vivon, de hodiaŭ ĝis morgaŭ, konstante certa, ke el ĉi tiu milito li ne revenos. Silentema, li vidis ĉion, kio ĉirkaŭ li estis okazanta, kaj daŭre bedaŭris, ke li entute deziris ricevi pli altan rangon. Estis klare, ke la tempo de la kontraŭturkaj militoj neniam plu revenos, kaj ke Karlo fajfas pri lia regimento, kaj pri la regimentoj de Vuiĉo kaj Horvato.

La nekonata lando, en kiu li militis, lin tute lacigis, kaj krom tio, multaj liaj soldatoj pereis. La renkontiĝo kun la eksjuna Princino mordis lian cerbon kiel vermo, kaj dum kelkaj tagoj li senfine bedaŭris pro sia servisto Arkadio, kies morta korpo ne estis trovita, same kiel tiuj liaj du ĉevaloj. Sendube kamparanoj trovis kaj prirabis la mortinton, la ĉevalojn forkondukis, kaj la kadavron, eble, ĵetis en Rejnon.

La vivo de Isakoviĉo, li ja rezonis tiel, finiĝos, tie, antaŭ Strasburgo. Liaj pezaj botoj estis tute senkoloriĝintaj, kaj lia pantalono, sur la postaĵo saksimila, tute senformiĝis. Li mem flikis ĝin. Pro paŝado, ventoj kaj Suno li vizaĝe estis kuprosimila, grasa kaj firma pro penoj. Denove li aspektis kiel tutplena, peza barelo, kun granda sia ventro. Eksjuniĝinta tute, li komencis tamen, post du tagoj da dormado, strabrigardi vilaĝaninojn, malgraŭ malĝojego en sia animo. Pensante ke mortos, li emociiĝis, sed la ĉevalon li batadis per sia pugno.

Li tute ne razis sin, kaj tial lia vizaĝo estis pli kvietaj, preskaŭ milda. Nur kiam ankaŭ al lia regimento oni disponigis katolikan pastron, liaj flavaj okuloj, kun malgrandaj, nigraj punktetoj, ricevis febran brilon, kiun ili survoje ne havis. Parolante diference de ĉiuj liaj oficiroj, pie, kiel popo, li dum tiuj tagoj elektadis homojn, pri kiuj li pensis, ke ilin oni devas rehejmenigi. „Прочитаите сие со усер – днем diris li al la kapitano Antonoviĉo, transdonante al li la liston de elektitoj – и исправляйте ме, ащче негде погрешении обрешчете. ????? – Skribu: чрез Лорену рукоју воeнују проидоше и воеваше; дому приидоше, и при нем в службах воених бити...“ Fakte, li sentis bedaŭron, ĉar, sendante siajn homojn en Varadinon, li ne povis ilin, tiel, per sia troornamita subskribo, irigi en Rusujon.

Ĉar, turmentata de malsano, pri kiu li ne volis zorgi, sed elreviĝinta dum sia atendado de la rangaltiĝo, jam furiozanta pro problemoj kun havigo de faruno kaj viando por la soldatoj, la honorinda Isakoviĉo, dum tiu batalhalto, antaŭ Strasburgo, kuŝante en sia kavo, finfine plene ekkonsciis, ke li iĝis ridinda kaj vana, simila al maljunaĉa, dikiĝinta popo, kiu konstante popas, sed kiu fakte jam estas plene senutila. Same kiel okazas komence de maljunaĝo, antaŭ li klare vidiĝis senfunda malplenaĵo en kiu troviĝas nenio.

Ekirante en ĉi tiun militon, la kvaran fojon en sia vivo vidante morton, li esperis, dum la ekiro, ke finfine finiĝos kaj plenumiĝos io, kio jen neniam finiĝas. En iu eksterorda armeo, en iu sovaĝa batalo, li pensis, ke aperos li kaj liaj homoj, potencaj, famiĝintaj kaj premiitaj per io, ne sciante, kio estas tio, sed kion li imagis, kiel ion speciale agrablan kaj gravan, kaj por li, kaj por ili. Ekirinte, li postlasis siajn zorgojn, kiuj lin tiun printempon precipe tedis, la kverelon kun la frato pri la mono de la edzino, malsanan infanon, verukozan sur la tuta korpo, la forpuŝan edzinon, kiun li ne plu povis bridati, kaj finfine tutan ĉi tiun vilaĝanaron, en la koto, sub Varadino, kiu komencis fari domojn

el ramita tero. Plendaĉante ĉiun tagon, atendante ke li havigu al ili manĝaĵojn, kaj ke li trovu por ili fostojn kaj trabojn, kaj ke li enskribu ilin el la armeon, migrante kaj samtempe fuĝante de li en vilaĝojn pli malnovajn kaj pli riĉajn, ĉirkaŭajn loĝlokoj. Suferante dum la lastaj tagoj, antaŭ la foriro, dum putfosado, serĉante trinkakvon, kaj dum konstruado de preĝejo meze de la vilaĝo, Isakoviĉo foriris volonte, certa ke ĉio ĉi tio estas mizera kaj sengrava, kaj ke tio, kio lin en la milito atendas, estas furioza kaj hela, kaj povas finiĝi per io belega, kaj por li, kaj por ĉiuj ĉi tiuj liaj homoj.

Antaŭ ol foriri, vivo lia tedis lin ne nur pro mizero kaj malriĉeco, kiun li vidis en sia domo, en siaj kabanoj, en siaj brutejoj, kaj en la tuta ĉirkaŭaĵo de sia vilaĝo, laŭlonge de la rivero, ĝis Varadino, sed ankaŭ pro la malagrablajoj, kiujn al li faris la markizo Gvadano, komandanto de Oseko, okupiĝanta pri nova dispozicio de Slavoniaj vilaĝoj, implikiĝinta samtempe en trudpetadon kaj skribajn peticiojn de la patriarko Ŝakabento. Kaj tial ŝajnis al li ke ĉiuj, same kiel li, sentas la vanecon de ĉio, kion ili travivas, de loĝigado, de pasumado, de vekriado kaj de fruktado, tie, laŭlonge de Danubo. El nebulaj vaporiĝoj de la marĉaĵoj kaj koto, el nemezurebla sufero, kiu ripetiĝadis ĉiun tagon, dum transloĝiĝoj, dum dronado de brutoj, dum plugado en kotejo kaj en salgrundo, ŝajnis al li, ke li forrajdos sur iun altan monteton, en printempa, varma mateno, kie li ricevos ion, kio al ili ĉiuj helpos, kio ilin ĉiujn gajigos. Antaŭsentante, ke li ne revenos, tamen li pensis, ke dum la reveno, kiam ili subeniros sur la alia flanko de tio, kio al li ŝajnis monteto, rajdos hejmen, ĉiuj kontentaj, trovante ĉion aliiĝinta kaj ĝoja. La infanojn kaj edzinon li estis lasinta en la domo de la frato senzorga, kaj pri la loĝlokoj, kaj pri tiuj, kiuj restis hejme, ŝajnis al li, ke eble, ankaŭ pri ili iu zorgos, pro kio li ilin trovos en alta greno, kiu en ebenejo jam ekkreskas, liberiĝintaj de mortado kaj malsanaĉoj. Ŝtelojn kaj mortigojn, pri kiuj li en sia regiono ĉiutage disputis, li esperis forgesi, kaj super ĉiuj liaj soldatoj, kaj ĉaroj, laŭlonge de la tuta vojo al la militkampoj, li esperis ke estos etendita ia Dia aŭ imperiestra mano. Tial li precipe atentis, ke bele estu skribitaj la nomoj kaj statoj de unuopoj vilaĝoj kaj taĉmentoj, en la listo, kiun Komisaro estis sendonta, per speciala kuriero, al Milita Konsilio en Vienon.

Kreskinte en la domo de la patro, kiu jam al Eŭgeno la Savoja estis vendanta brutojn, kaj kiu ĉiujn siajn infanojn, fratojn, parencojn, kaj sian tutan baptonaron kaj konataron persvadis aliĝi al la Aŭstruja armeo, kiu estis forpremanta la turkojn, li havis en la junaĝo eĉ belan vivon en tiu armeo.

Dorlotata kaj ofte premiita, li konservis en si nebulecan, sed profundan nocion de feliĉo kaj plezuro, en espero, ke la tuta militado finiĝos kun ĉiea paco, en kiu ankaŭ li, kaj liaj parencoj kaj konatoj, kaj ĉiuj liaj soldatoj estos vestitaj en solena kaj elegantega vesto, kaj tiel, rondire, li vizitos la militkampojn kaj imperion, videbla al la tuta mondo, kiu ekkrios: jen, serboj!

Sub la influo de promesoj de la patro, kiu plenigis lian kapon pri reveno en bruligitan kaj buĉitan, senhomigitan Serbujon, li en la armeo vivis ne nur en paco, sed dum ĉiuj siaj tri militoj, senzorge kaj kontente, atendante konstante ion agrablan, kio al ili ĉiuj okazos. Nur post la morto de la patro, dronante ĉiam pli profunde en tiun soldatan vivon de loĝigoj, listigoj, amasigoj de homoj kaj brutoj, en fortikaĵoj kaj soldate dislokitaj vilaĝoj, Isakoviĉo sentis, ke okazas nenio pli bona, kaj nur tiam li rimarkis ĉirkaŭ si kotkampojn kaj ŝlimejojn, mizeron de siaj homoj, la vivon, ĉiun tagon la saman ĉagrenan vivon en la vilaĝoj kaj tranĉeoj, en la domoj sur akvo, en kabanoj kaj gregejoj, en kavoj fositaj en la tero.

Travivis li tiel, dum la lastaj jaroj, ĉiujn malagrablajojn de konstanta transloĝigado kaj servado, kaj ĉiujn senluiziiĝojn de la pli aĝaj ol li, en la taskoj armeaj kaj en la taskoj de patriarko. En ĉi tiu milito krome, komence de Peĉao, li iris, en la amaso, ĉiam pli malfacile. Humiligita intence, al li tiel ŝajnis, li transiris Rejnon kontemplantante siajn agojn kvazaŭ ilin iu alia estus farinta, paŝante inter kadavraĵoj tra bruligita strato, kvazaŭ en songo. Kaj nur tie, dum tiu neeltenebla batalhalto, antaŭ Strasburgo, li sentis finfine la hororan, kapturitan malplenon antaŭ si, en kiu jam nenio ekzistis.

Kuŝante en terura varmego kaj sufokeco sur la tero, en malalta kabano, kovrita de herbo, kiu, sekiĝinta, narkote odoris, li restis, dum tagoj, preskaŭ tute sola, kun unu argilkruĉo da akvo, transloĝigante, sur la kovrilo kaj selo, de la flanko, kie Suno brulis, al la flanko, kie estis ombro, forigante samtempe per la mano, sub la kaploko, formikojn, kiuj estis ĉirkaŭ li ariĝantaj. Kun sia malsana ventro, kiu lin malpli ĝenis dekiam komenciĝis bataloj, li kuŝis kvazaŭ en tombo, en tiu kabano, klopodante tuttage ne eliri en la kampadejon, kiu estis farita sur paŝtejo, inter ĉaroj. Vera cigana tendaro, en kiu oni hurlis en akompano de guzlo, apud fajro, pli pro malsato, ol pro drinkadoj. Etendinte ambaŭ siajn kruojn kaj disiginte la brakojn, Isakoviĉo kvazaŭvidis, duondorme, ke li per ili atingas eĉ la ringfosaĵojn de la urbo, kaj la tendojn de Berenklaŭ, tiel, ke li per la plandoj preskaŭ povus puŝi la fortikaĵojn, kaj per la manoj sufoki kelkajn Berenklaŭojn en la kampadejo. Tiel li ekdormis, furioza kaj senespera plurfoje, vekigante antaŭ vespero, pro kantoj de soldatoj kaj frapado de tamburoj.

Obeza pro dormado kaj ripozo, peziĝinta denove, li sinkadis tiam, plenforte, en la kvieto kaj duonhelo, tra la frapbruo kaj voĉhaoso de la tendaro, batoj de hufoj, klakiloj de brutoj, sonoj de forĝambosoj, en la mallaŭtan, nemezureblan ĉirpadon de griloj, sur tuta tiu larĝa kampo, en la senfundan neniejon kaj malplenon, kiujn li subite, sed proksime, antaŭ sia maljuneco, ekvidis. Timante ĝeni sin per iliaj zorgoj, sed ankaŭ per iliaj festenoj, li ne demandis pri siaj oficiroj, ne elirante eĉ ĝis Berenklaŭo, kie oni multe

hazardludis kaj gajis. En soleco sia, en la okuloj de ĉio kun la bildo de kelkaj malriĉaj, senmovaj ĉaroj, desur kiuj pendis jungaĵoj kaj ŝnuregoj, kaj kun longaj monotonaj bruldifektitaj kampoj kaj la arda ĉielo, Isakoviĉo apike forskuis ĉion, kion li ĝis tiam esperis. Post sia subkoloneliĝo, li forflankigis ankaŭ la baronon Berenklaon, kiun li ĝis tiam admiris, kaj tutan vicon da fiornamitaj estroj, sub falsharaĵoj. Li jam fajfis pri tiu tuta armeo, kiun ili trenis post si, malbarante por ĝi la vojon per siaj masakroj, sed ankaŭ tuta lia pasinteco ŝajnis al li senlima frenezo. Li nenion plu esperis, nek de la reveno, kaj tutan tiun homamason, kiu jam loĝiĝis tie sube, en la koto, li vidis ŝanĝiĝinta, kompatinda, trompita.

Sed post la pensoj, per kiuj li tutan ĉi tiun armeon forlasis kaj ekmalestimis, li forlasis finfine ankaŭ ion alian. La edzinon kaj infanojn tiujn, por kiuj li tiom multe rompiĝadis, sed kiuj forestis, kiuj povis nek vidi, nek tuŝi, nek helpi lin. Ĉioman tiun koton, en kiun li devis reveni, kun sia vivo freneza kaj malplena kaj bagatela. Ĉiujn tiujn taskojn, kiujn li volis ankoraŭ plenumi.

En la mallumon kaj nemezureblan malplenon dronis tiun vesperon ne nur lia kabano, en kiu li kuŝis, sed ankaŭ lia tuta vivo. Ĝi malaperis, li demetis ĝin, same kiel iam li demetadis per arĝento broditajn siajn uniformojn, antaŭ virinoj, hihante ebrie. Virinaĉo aperis en la loko de lia unua amo, malplenaĵo en la loko de urboj, en kiuj li vivis, negocis, aŭ fosis fosaĵojn, pafadis kaj batadis homojn.

De lia tuta vivo, meditante, al li restis helaj en la memoro ankaŭ nun, nur tiuj brilaj, puraj steloj, kaj arĝentaj, arbaraj vojoj super kiujn malleviĝas aprila nebulo, sur kiuj li rajdis dum la unuaj tagoj de sia gevido kun la edzino, vivante en tiu monotona tedo de malgranda Slavonia garnizono, ĉasante vulpoj, kaj en la estonteco, nur tiu senlima, neĝvualita Rusujo, en kiun li deziris transloĝiĝi, por fine estonte pli facile vivi, kaj por fine ripozi kaj kvietiĝi.

Elirante tiun vesperon el la kabano, Isakoviĉo en sia animo estis malproksime de la briditaj ĉevaloj, en pajlo disŝutitaj malsanuloj, tendoj, pafiloj kaj bareloj kun pulvo, apud gardistoj, kiuj lin salutadis. Ekrigardinte en profundajn vojojn de la kampadejo, en kiuj svarmis homoj kaj varmego, li alrigardis ankaŭ horizonton. Ŝajnis, ke la neeltenebla varmego ne ĉesos. Sur la stela ĉielo estis eĉ ne unu nubeto. La montoj, kiuj ĉielenis en malproksimo, bruldifektita herbo, fruktarbejoj, ĉio odoris je polvo kaj sufoko.

Vilaĝaj sonorilturoj, en malproksimo, trenis post si longajn vicojn da arboj kaj arbustoj, laŭlonge de la rivero, kaj sur altaĵoj kaj fortikaĵoj de francoj, li vidis grandajn fojnamasojn kaj buntecon da falĉitaj kaj cindrigitaj plugkampoj, buntajn, kuprokolorajn kaj flavajn. El seninterrompaj ebenejoj, sal-teroj kaj arbustokovritaj ŝlimejoj, leviĝadis fruktarbejoj kaj montetoj, en kiujn estis enfositaj kanonoj. La urbo, tute trembrilanta pro sunbrulo kaj varmo, ŝajnis ŝvebanta, dum la vojoj ĉirkaŭ ĝi estis nubaj, pro longaj vicoj da kavaliroj kaj ĉaroj.

Apogita dorse al sia kabano, Isakoviĉo, nevestita, aŭskultis la raporton de la kapitano Antonoviĉo, kiu estis deĵoronta en la kampadejo dum tiu nokto, kaj la kaŝvortojn, kiujn al li sendis Berenklaŭo, invintante lin la sekvan tagon partopreni komunan tagmanĝon. Etendinte la krurojn sur herbojn, li rompis tigojn, kiuj preskaŭtuŝis lian vizaĝon, per siaj sekiĝintaj fruktoj, en kiuj tintis grajnoj; li kuŝiĝis surdorse, por malvarmiĝi, sub arbusto kiu kliniĝis super la kabano, observante intense, ŝprucaĵojn de lumo en la polvo, kiu flugpendis en malproksimaj ringfosaĵoj. Nudiginte la bruston, li forsendis rapide la kapitanon, ordonis bruske ke, nokte, en la tendaro, neniu fuĝanto estu arestita, kaj dum reveno, frumatene, neniu estu transdonita al la gardistoj. Apenaŭ ne alrigardinte la soldaton, kiu, malproksimete, genuante sur fojno, estis puriganta liajn pistolojn, li fiksirgardis la senfundan alton super si.

Li atendis mallumiĝon en la kampadejo, enspirante la fumodoron de bruligitaj herboj, inter soldattendoj. En akompano de hundobojo, estis malleviĝanta ankaŭ mallumo sur la kampon. La unuaj fajroj, malantaŭ la ringfosaĵo, prilumis la vizaĝojn de la soldatoj en malproksimo, kiuj kaŭrante senŝeligadis kaj tranĉetis terpomojn kaj kukurbojn, erigante kaj ĵetante ilin en kaldronojn, kaj rostante ilin super fajro. La ĉielo estis malleviĝinta en la fruktarbejoj plene pala, kaj tuj, iĝis agrabla kaj sentebla malvarmo. Ĝemhojlado, guzlado kaj bruaĉado denove komenciĝis, kaj aŭdiĝis ankaŭ kelkaj flutetoj. Ĉie kvazaŭ vastiĝus silento, kune kun la vesperkrepusko. Baldaŭ nebuliĝis la mallumo en la kampadejo, polvo volvis ĉion, krom la pintoj de fruktarbejoj malproksimaj, kaj Isakoviĉo kvietiĝis.

Malplena do estis, antaŭ li, eterne, kaj vane, post li, ĉio kio estis pasinta. Nenion li atingis, ankaŭ en ĉi tiu milito, same kiel la aliaj, kaj tuta tiu lia irado kaj konstanta transloĝiĝado nur senĉese daŭris. Ĝis la fundo tamen, en si, li sentis ke estas neeble, ke ĉio ĉi tiel finiĝu, kaj ke lin tiras voĉo iu, en li, promesante al li ion eksterordinaran, ĉe la fino.

Antaŭ malplena akvokanalo, freneza profundego ĝis kiu li alvenis, ek-konsciinte, ke lia vivo pasis, kaj ke li ĝin bonigi ne povas, same kiel la malestemindan sorton de ĉiuj tiuj, kiuj ekiris kun li, kaj kiuj aŭ pereos, aŭ revenos tien, en la koton, laŭ tute fremda volo, kaj je utilo de aliaj, rezigninte ian ajn esperon, li tamen sentis ion super si, same kiel la ĉielon, kiu tiun someran vesperon estis malvarmiganta.

Vidante, en larĝaj, malplenaj kampoj, ĝis la rivero, kaj, malantaŭ ĝi, ĝis la montoj en lazuro, li sentis ankaŭ tion, en tiu malproksimo, ke li ja ne estas destinita por tiu neesprimeble forpuŝa tedo kaj malpleno en kiu li aperis. Ie, same kiel tiu fasko de brilo, kiu staris sur la supro de fruktarbejo, super la urbo, kun stela ĉielo malantaŭ si, en la mallumo de tegmentoj kiuj en la profundo estis plenaj da kolomboj kaj hirundoj, devas esti io ĉiela por li. La

facila vivo, sereno, okazaĵoj kiuj kunfluas kiel puraj kaj malvarmaj, plaĉaj, ŝaŭmaj kaskadoj, devas esti ie ankaŭ por ili atingeblaj. Transloĝiĝi oni devas tial, foriri ien, kvietiĝi ie sur io pura, klara, glata kiel surfaco de profundaj, montaj lagoj, mense ripetadis li, ŝvita kuŝante apud siaj hundoj, kiuj spiregante kaptadis muŝojn, sterniĝintaj sur pajlo. Foriri kun la aliaj, ankaŭ kun la patriarko, el la koto, el la senĉesaj militoj, servoj kaj devoj. Vivi laŭ propra volo, sen ĉi tiu terura konfuzo, sekvante sian vivon, ĝuste por kiu li ja naskiĝis. Irante al io eksterordinara, kion li sentis ĉielo, kiu ĉion kovras kaj finas. Tiel, ke ĉio, kion li ĝis nun faris, al li ne ŝajnis freneza kaj vana, ke la estonteco por li estu komprenebla, kaj ke en ĝi ĉi tiu malplena, horora atendo de paco konstante ne daŭriĝas.

Neniam, kiel en tiu terura puto de malespero, super kiu, senenergia, li kliniĝis, post tiom da semajnoj, plenaj da fortostreĉo kaj erarvagado, Vuko Isakoviĉo ne sentis tiom grandan deziregon pri io ĝoja, luma, kion ĝuste li povus plenumi, travivi, por ne foriri tiel mizera, eksjuna kaj malplena, el ĉi tiu mondo. Neniam antaŭe la honorinda Isakoviĉo sentis, ke li tiel volonte fiksaŭskultus iun flustron, tra tiu stela ĉielo, kiu al li flustradus pri ĉiama lia destino gvidi sian regimenton, kiu nun al li ekŝajnis pli kara ol ĉio en la mondo, kaj pli bona ol ĉiuj aliaj regimentoj, kaj neniam ĝis tiam li kvazaŭvidis ankaŭ tiujn, kiuj restis hejme, tiel meritantaj, ke ankaŭ por ili la suno eklumos. Ion transmondan eksopiris tiun nokton Vuko Isakoviĉo, ne nur por si, sed ankaŭ por siaj homoj, ekdorminte antaŭ sia kabano, en la sufoko de la somera nokto antaŭ Strasburgo, sentinte, ke li estas trompita, humiligita, kaj ke li estis naskita por io pura, hela, eksterordinara kaj eterna, kiel tiuj pecoj de la ĉielo, kiuj, arĝentaj kaj bluaj flugpendas la tutan nokton, sub la brilaj stelaroj, super la tegmentoj de la urbo, herboj, montoj kaj riveroj, laŭlonge de kiuj trembrilis kampadejaj fajroj de la armeo, kiun, kiel sensona, somera pluvo, surŝutis la lunlumo.

Matene, la sekvan tagon, vekiĝinte, li tuj aŭdis, ke tiuaŭrore, oni denove pendumis triopon, kaptinte ilin ŝtelantaj ĉe apuda vilaĝo. La kapitano Antonoviĉo, en sia malakurate skribita raporto, speciale substrekis: ke la karcerestro, kiu gvidas taĉmenton de dragonoj, fakte estas ebria bubalaĉo kirasula, kiu homojn batas per sabrotenilo sur la nazon, kiu ilin nek pridemandas, nek aŭskultas, sed pendumas ilin, sur la plej proksiman branĉon. Samtempe kun la taĉmento iras iu katolika pastro, kiuj konfesprenas ankaŭ ortodoksulojn, tiel, ke ili ploras pro malĝojo dum oni ilin pendumas, ne havante al kiu preĝi, kaj al kiu forlasi siajn familianojn, en la malproksima patrolando. Fine, kiam la pendumitoj pendis jam tri horojn, la kapitano Antonoviĉo petis ordonon transdoni ilin por entombigo al la subkolonelo Arsenio Vuiĉo, ĉar la homoj, ŝajne, en la lasta momento, faris mensogan ateston, kaj ili ne apartenas al lia regimento.

Puŝante la kapon en sitelon, lavante sin antaŭ sia kabano, Isakoviĉo bluiĝis pro amarsento kaj kolerego. Dum de sur lia barbo akvo gutis sur lian nudan bruston, li sentis, ke lia koro maltrankvile batas. Li ordonis, ke al Antonoviĉo oni respondu, ke li tuj irigu al la mortintoj monaĥon, iru tuj al Berenklaŭ, kaj informi la regimenton, ke neniu eliru el la tendaro sen ponardo. Post tio, transvestiĝante, li alrigardis vojojn malantaŭ la kabano, kiujn ŝtopis ĉaroj de francoj, polvon kaj kampojn, super kiuj malalte trembrilis alaŭdoj kaj, vizitinte per rigardo la antaŭpostenojn, ringfosaĵojn kaj muregojn, li vidis en la fundo de la horizonto vicon de akacioj kaj fruktarboj, antaŭ domareto, kaj diris al si mense, ke tiuj sendube tie pendas.

Li senfortiĝis kaj malleviĝis tuta, dum oni estis pretigantaj lian ĉevalon, kaj li okulis la etendiĝantan kampon, en kiu, super fosaĵoj, kiujn invadis kardo kaj urtiko, malleviĝanta estis la griza ĉielo, malklara, antaŭ pluvo.

La ĉevalo, ordinare kvieta, kun la muzelo mallevita ĝis la tero, nazbruan- te en grenventumaĵojn, ekstremis kiam li alpaŝis ĝin. Dum la servistoj estis ekipantaj ĝin, la besto komencis rondiri, rigardante lin maltrankvile per siaj grandaj, nigraj okuloj. Tamen, kiam li frapis ĝin per la pugno, ĝi ekstremis kaj haltis, post kio li surseliĝis. Pensante, ke li ankoraŭ povas rajdi kiel junulo, li ekiris, skuiĝante, tra la kampo, streĉante la rimenojn en la zono.

Trotante rekte en tiun sufokan, humidaeran sombron de la mateno, preterrajdante ĉevalarojn de Berenklaŭ, grandajn stakojn da timonoj kaj radoj, sakoj kaj fojnamasoj, apud enfositaj kanonoj, tra disrompitaj barilojn kaj forhakitaj fruktarbejoj, sur malkruta altaĵo.

Fiksrigardante, streĉe, la akaciojn, la domojn, la malproksimon, al li ekŝajnis, ke ili neniel proksimiĝas. En la larĝa verdo de la kampoj, en la fundo de la horizonto, al li ili ekŝajnis des pli senmovaj, ĉar la ĉevalo lin tiel terure sku- is; nazbruan- te furioze super urtika vepro, super malglataĵoj kaj trafositaj ĝardenoj, stumpletante kaj interfrapante la hufojn.

Estis malklara kaj varma tago, kaj li tutkorpe ŝvitegis alvenante. Jam el- malproksime li rimarkis, laŭlonge de malfreŝa etrivero, melonojn kaj altan kanabon, poste domojn, bovojn kaj plugkampon, en kiu ankoraŭ estis alta herbo, plena da grenrozoj. Apud granda pajlamaso, kiu estis plena da korto- birdoj, ĉirkaŭ ĉaro kun du grandaj radoj, estis ariĝinta amaso da kamparanoj, kamparaninoj kaj infanoj. Antaŭ ili, tenante la bridojn de siaj ĉevaloj, staris du dragonoj, evidente tre kontentaj. El la voĉĥaoso kiu ĉirkaŭ ili regis, el sin- teno de virinoj kaj knabinoj ĉirkaŭ ili, el la maniero kiel ili trenis la piedojn kaj viŝadis la kolojn, li komprenis ke ili dancis.

Iriginte la ĉevalon trans foskavon, Isakoviĉo malaperis malantaŭ aliaj domoj kaj kanabo, ĝuste kiam ili lin ekvidis, penante trapuŝiĝi tra falintaj bariloj sur la alian flankon de la melonejo, kie, laŭlonge de la malfreŝa akvo,

estis vicigitaj ok akacioj. Kelkaj gutoj de varma pluvo falis sur lian vizaĝon, kaj li haltigis la ĉevalon. Super la kapo li aŭdis pigon, kaj tuj poste, korvojn.

Sammomente la ĉevalo, skuiĝante, komencis retroiri, kaj haltis stupore, kun la kruroj tremantaj.

Emerĝinte malantaŭ kanaboj, Isakoviĉo ekvidis antaŭ si du alaŭdojn, kurantajn sur falĉita plugkampo, kiu leviĝis al monteto, kiu postkaŝis grandan parton de Strasburgo en malproksimo, kaj, ektirinte la bridojn de la ĉevalo, dekstre, super la melonejo, fruktarbejon je kelkpaŝa distanco, kaj, pendigitajn sur tri la plej proksimajn pirujojn, tri birdotimigilojn, komplete kvietajn, super malplenaj, malproksimaj kampoj.

Ili estis pendigitaj tiel malalte, ke ili estis preskaŭ tuŝantaj kukurbojn kaj akvomelonojn kaj iliajn grandajn, flavajn florojn, inter kiuj estis ankaŭ grandegaj kukumoj. Ĉar oni ne estis ligintaj iliajn genuojn, demetinte iliajn opankojn, iliaj sensuaj piedoj estis diskruraj, kvazaŭ ili dezirus sidiĝi sur ion altan, en sia malvasta, griza pantalone. Nudaj piedoj iliaj estis tute bluaj, kvazaŭ glaciigintaj kaj ŝvelaj, kaj, vidinte tiujn ses kuntiriĝintajn krurojn, kiel ses senhaŭtigintajn ŝafidojn, Isakoviĉo penplene aŭdacis alrigardi supren.

Oni ligis iliajn manojn sur la dorsoj, sed sur iliajn vizaĝojn ne surĵetis iajn ajn tukojn, pro kio ĉirkaŭ iliaj okuloj kaj nazoj svarmis etaj bananmuŝoj. Pendigitaj je trunkoj de fruktarbejoj, proksime al la tero, kie forkiĝis branĉoj, ili pendis senmove, kun torditaj kapoj, kvazaŭ freneze saltintaj kun arboj sur la dorsoj, super tiu foskavo, plena da malfreŝa akvo, laŭlonge de la melonejo. En malplenejo malantaŭ ili, de unu al alia pajloamaso, flugis aroj da paseroj.

La plej proksima estis pendigita sur pirarbo, sur kiu ankoraŭ estis sufiĉe da maturaj fruktoj, kaj, kvankam lia ĉevalo volis proksimiĝi eĉ ne unu paŝon, Isakoviĉo, terurfrapita, vidis lin tute klare. Tio estis malgrandeta kaj obeza homo, kiu eble longe sin defendis kaj baraktis, ĉar tuta ĉemizo lia estis ŝirita, ĝi pendis el lia zono kaj brusto; vesto lia estis disŝirita kaj sur la genuoj, kaj sur la manikoj.

Lia kapo estis sinkinta maldekstren, hirta, kun gorĝo tute ŝvela kaj plena da sango, blua, kaj pufa, super ŝnuro, ĉe kiu pendis bluiĝinta lango.

La meza estis homo grandega, kun longaj lipharoj, kies unu kruro estis leviĝinta malproksime de la tero, kurba kaj staranta krurkruce sur la alia, kiu tuŝis la teron. La branĉo, sur kiun li estis pendumita, derompiĝis de la trunko, dum lia agonia batalo kontraŭ la morto, kaj desur ĝi la piroj estis falintaj sur la teron. En la teruta batalo de siaj ŝultrojn, kontraŭ la stringa maŝo, li estis tute ŝvela, tiel ke lia suba makzelo, per siaj grandegaj, flavaj dentoj enpikiĝis en la supran parton de la buŝo, tute sanga. Pendante strangolita, kun la kapo retroŝovita, li malfermegis la blankajn okulojn ĉielen, tute violiĝinta.

Nur al la tria oni sukcesis rompi la kolon, pro kio li pendis rekta, kun la kapo malstreĉita tiom, ke lia vizaĝo tute ne videblis, krom la hararo kaj grizetaj lipharoj, desur kiuj gutis sango.

Post tri horoj, nur, kiam pluvo jam torentis, dragonoj ilin demetis, kaj surĉarigis, meze de la kortoj de tiuj domoj, apud kiuj ili estis kaptitaj kaj ligitaj. Isakoviĉo estis sendinta ambaŭ monaĥojn el la regimentoj de Vuiĉo, por fari funebran preĝon. Tra lia kabano fluis akvo. Li ekdormis, ankaŭ tiun vesperon, tremanta pro malvarmo sub la ĉaro, en plena silento de malsekega tendaro, en kiu eĉ hundoj estis silentantaj.

Tuj kiam li vekigis la sekvan tagon, oni sciigis lin, ke du liaj soldatoj kuŝas, bategitaj, en la ĉefa gardistejo de la tendaro, kaj ke la tria, veterano, kiu portis en sia kaptuko kapon de brasiko, pri kiu li, cetere, asertis, ke ĝin li aĉetis, kun ponardo en la mano sukcesis forŝiriĝi de dragonoj kaj fuĝi.

La deĵoranta generalo Isakoviĉon jam antaŭtagmeze esplordemandis, kaj antaŭvespere li persone estis irigita al Karlo la Lotaringuja, kiu timis, ke la sinkaŝanto foriros al la malamikoj. Dum li parolis, li rigardis Isakoviĉon, longbarban kaj koleregan, mire, per lorno.

Ekde tiu tago oni neniun plu pendumis.

Oni batadis nur tiujn, kiujn oni kaptis en kampo, La sinkaŝanto de Isakoviĉo aperis, antaŭvespere, en la kampadejo kaj estis eĉ premiita, li ricevis kvin dukatojn, kiam li al Karlo la Lotaringuja vidigis sian korpon kiun vundoj trafosis dum la kontraŭturka milito.

Post du tagoj francaj husaroj interrompis la batalhalton, kaj Slavoniaj regimentoj foriris sub Cabernon, kie Berenklaŭ elpensis, por Trenko kaj por la kavalerio de Markoviĉo, insidon, en kiu la tuta garnizono de tiu urbo pereis kaj transdonis eĉ siajn stabejojn.

Isakoviĉo ĝisatendis matenon, dormema, je pafdistanco antaŭ la urbo, sub monto, en gregejo plena da ŝafoj. Gvatisto Aŭstruja, kiu lin kondukis, venigis lin tute nerimarkitan ĝis la francaj antaŭpostenoj. Kuŝiĝinte sur alta herbo, Danubregiona batalionaro denove havis tempon sate manĝi, antaŭ ol sugrimpis monteton, kvarpiede, de kie li ekvidis, en fruktarbejoj, la plej proksimajn domojn de la urbo, tiel apude, ke liajn okulojn blindigis brilantaj fenestroj. Grandaj, nigraj bulĉapeloj aperis sur la supro de monteto, en alta herbo, kiel nigra grego, kiu eksvarmis de la monto, el brutejoj. Francoj ilin rimarkis kaj ekpafis al ili, post kio de ĉiuj flankoj sur la montetoj kaj arbustaro kaj arbaroj, eksonis pafado.

Sen ia ajn ordo, estis malsupreniĝantaj, ruliĝantaj desur montetoj la soldatoj de Isakoviĉo, al la plej proksimaj domoj, kiuj estis bruligitaj, same kiel la pordegoj de la urbo, per kanonbomboj. Sidante ĝisgorĝe en herbo, ili fumiĝis, kvazaŭ sennombraj, malgrandaj fumtuboj, kiuj sub la tero estis proksimiĝantaj ĉiam pli.

En la urbo kiu antaŭ ili, en monteto, estis senmova, morta, senhomiĝinta, brulis du lokoj. Sur la vojo al la supra parto de la urbo, kie troviĝis fortikaĵoj, videblis, en polvo, infanterio kaj kanonaro, intermiksitaj, malproksimiĝantaj. La regimentoj de Vuiĉo, alvenintaj el Okcidento, pafis al ĝi, retiriĝante, ĝenuante kaj starante en du vicoj, antaŭ arbareto, komandataj de rajdantoj, mem kriante samtempe komandojn tiel terure, ke iuj vortoj aŭdeblis, trans monto kaj inter arboj, eĉ en la alia rando de la urbo, kiu estis sunumita kaj ankoraŭ kvieta.

Isakoviĉo, baraktante sur falĉita kaj oblikva suprenirejo, apogante sin per la dekstra mano sur la teron, aperis kun siaj servistoj sur la ŝoseo, kiu ŝoviĝis tra fruktarbejo, kaj ekvidis, ĉe la enirejo en la urbon, apud forbrulintaj kolojoj kaj ardantaj traboj de gardistoj, kelkajn husarojn, kiuj kurigis la ĉevalojn kaj forrapidis tuj kiam ili lin rimarkis.

Kurante al la bruligitaj domoj, li ankoraŭ vidis la husarojn malaperantaj inter konstruaĵojn, kaj tuj poste komplete malplanan, larĝan straton, en kiu estis fermitaj kaj ŝtopitaj ĉiuj fenestroj. Liaj soldatoj, vidinte lin apud la plej proksimaj domoj urbaj, kuris nun en la alta herbo, al li.

Malantaŭ ili, en la sama valo, en kiu ankaŭ li estis proksimiĝinta, li rimarkis la ĉaron de Berenklaŭ kaj la ĉefmarŝalon-leŭtenanton, vestitan kiel simpla soldato, haste paŝanta apud ĉevaloj, ĉirkaŭita de oficiroj, krianta al li ion elmalproksime, braksvingante.

Soldatoj de Isakoviĉo estis preterkurantaj, avancante en la urbon, retrorigardante al li, pleniginte la straton per sia kriadado kaj kuraj paŝoj. Dum momento nur, ankaŭ li ĉirkaŭrigardis kaj vidis arbojn, ŝoseon kiu grimpis el la valo malantaŭ li, kanonojn kiuj estis tirataj pli proksimen, kaj amasojn da soldatoj kiuj estis torentantaj ambaŭflanke de la vojo. Post tio li, ekrigardinte tegmentojn super si, fenestrojn, kun florkruĉoj, kaj siajn hundojn kiuj hurlis meze de la strato, kun la koloj leviĝintaj, lasis servistojn, kiuj forkondukis la ĉevalojn, kaj unu ĉevalisto, neatendite, falis sur la ŝtonpavimon, kiel sako.

Enirinte rapidpaŝe inter domojn, Isakoviĉo jam ne povis aŭdi, kion oni kriis al li, pro voĉĥaoso kaj krakado de pafiloj. Li vidis ankoraŭ nur, antaŭ si, en profundo de la urbo, kiel liaj soldatoj pereas, saltas kaj kiel, dum unu momento, ili malplenigis la mezon de la strato, gluiĝinte dekstre kaj maldekstre, al la muroj. Post tio, li rimarkis, ke ankaŭ ĉirkaŭ li ili falas. Salvoj francaj bruegis al lia vizaĝo.

Retiriĝante, la tuta amaso da francaj soldatoj provis atingi elirejon, ĉe la alia rando de la urbo, apud fortikaĵo, sur monteto, fuĝante al arbaroj, kie ili esperis trovi savon, tute ne supozante, ke ilin tie atendas Trenko, kun siaj kroataj ĝendarmoj kaj Slavoniaj „rabistoj“. Ŝtopinte la elirejon el la urbo, tiu homamaso konkorde pafadis, salvo-post-salve, kaj la larĝan ŝtonpavimon,

angulojn kaj pordegojn de domo plenigis mortintoj, desur kies kapoj forruliĝis nigraj bulĉapeloj.

En tiu infero, laŭlonge de fumplenaj muroj, antaŭ kvietaj ĉevaloj, kiuj pro la pafado eĉ ne skuiĝis, kun siaj hundoj, kiuj mire snufis la odoron de pulvo, observante mortintojn, iris Isakoviĉo, ne sciante kie estas lia regimento, ĉar la soldatoj intermiksiĝis.

En la terura kriĉado kaj pafado, li rimarkis finfine, ke eĉ el la ŝtopitaj fenestroj, kaj riglofermitaj pordegoj oni pafadas al ili, kaj li haltis. Formoviĝinte sub pordegon, super kies volbo estis konvekso fenestro, kiun ornamis granda blua virkoko el ligno, li staris tiel, inter la vivo kaj morto, kiuj estis tiel malnormale, frenezete, nekompreneble, proksimaj unu al la alia. Samtempe, preskaŭ sen ia ajn diferenco, li povis esti ankaŭ en ĉi mondo, kun altaj herboj, kun verdaj montoj, en ĉi tiu malplena strato, sur kiu mortigitoj kuŝis kiel pupoj diverskoloraj, dum vunditoj veis suferante, sed ankaŭ en tiu alia mondo, en silento, inter la mortintoj.

Kiam pafkugloj derompis murerojn ĉirkaŭ lia kapo, li kliniĝis ankoraŭ iomete kaj komencis senzoniĝi, lasinte sur si nur sabron. Subite, malantaŭ la muro, je kelkaj paŝoj antaŭ li, aperis du malamikaj soldatoj, ne sciante kie ili estas. Jam antaŭ ol ili rekonsciĝis, servistoj de Isakoviĉo draŝis ilin per pafiloj kaj ponardoj, tiel rapide, ke ili apenuŭ sukcesis ekstertori.

Soldatoj, kiuj alkuradis al li, trovinte lin finfine, klinitaj, ĝibiĝintaj pro pafado, sciigis al li nomojn de la pereintoj. Pro fumo, li apenaŭ povis sur la fundo de la strato, inter domoj, distingi soldatojn kiuj interpafadis salve, je nur kelkdekpaŝa distanco. Vidinte, ke malantaŭ li denove aperta, baraktante, sur bombe disrompita ŝtonpavimo, granda pasaĝera ĉaro de la barono Berenklaŭo, Isakoviĉo ordonis al la soldatoj pafi en altajn fenestrojn, kaj ĉe malaltaj, en domojn. Post tio, forĵetinte ankaŭ la bulĉapelon, incitante siajn hundojn, li aperis sur la mezo de la strato, kun nuda sabro en la mano, kurrante de soldato al soldato, kiuj ekiris, tuj kiam ili lin rekonis, sturme.

Rimarkinte vicojn de siaj soldatoj, kiuj, volvitaj de fumo, pafadis salve, kriante al si mem: „Malŝargu, la unua, la dua, la unua, la dua...” li levis ilin desur la ŝtonpavimo kaj kurigis post si, hurlante en eŭforio al grupoj de veteranoj, kies pafilojn estis ŝargantaj junaj soldatoj „Serboj! – por la grafo Valiso! Serboj! – por la grafo Valiso!...” svingante samtempe la sabron, turniĝante, atentante ke, se malamikaj soldatoj lin trafos, ili almenaŭ ne trafu en la dorson.

Tiel pereis, tiun vesperon, ĝis mallumiĝo, Slavonia-Danubregiona batalionaro, sur la montaj stratoj de Caberno, forpuŝinte la malamikon en la embuskojn de Trenko, kiu ĝin poste disbatis.

Ses tagojn loĝis poste la barono Berenklaŭo en la plej bona domo, sur la placo de la urbo, dormante denove en silka, longa ĉemizo, sur kuŝejo, dum

sub la urbo, en fosaĵoj, Danubregiona batalionaro entombigadis du tagojn siajn mortintojn, inter kiuj estis ankaŭ pluraj oficiroj.

Tiu venkakiro de Caberno disrompis la pordegon de Alzaco, sed restis la lasta batalo de la regimento dum tiu militekspedicio. Post ses tagoj Karlo la Lotaringuja ekiris amase al Rejno, transirante ĝin sur bruligitaj pontoj, apud la vilaĝo Dajnhajmo.

La batalionaro de Isakoviĉo, kiu dum la transiro estis la unua, nun estis la lasta kiu transkuris la bruligitajn rondlignojn.

Post ĝi, sur la alia bordo de Rejno, restis nur polvo kaj fumo, kiuj tiel rapide malaperis.

Tio, kio poste komenciĝis, estis tute ĉagrena.

Malsato kaj soifo kaj marŝado, senĉesa marŝado, tra Bavarujo, malamika, prirabita, malplena, ĝis Ĉehujo.

Aŭtuno estis alveninta pli frue ol ordinare, la vetero estis pluva. Isakoviĉo estis dormanta sub ĉaro, lin finvenkis la malsano, zorgoj kaj turmentoj. Pri la frato kaj edzino ĝis tiam li tute ne ricevis novaĵojn, pro kio li ilin estis preskaŭ forgesinta.

En la regimento aŭdiĝis, ke ili vintro en Oberfalco, sed ankaŭ ke liaj aliaj regimentoj batalas kontraŭ Prajso. Oni parolis ankaŭ pri tio, ke ili estos senditaj hejmen, kaj ke oni ilin dissendos en aliajn imperiestrajn regimentojn. Por plene malplezurigi Isakoviĉon, oni en tiuj tagoj en lian regimenton sendis du germanajn oficirojn. Pasis du semajnoj, post tio, kiam oni katenis la kaptanon Pisĉeviĉon, kaj forkondukis lin al tribunalo, por juĝi lin sub preteksto ke li organizis ribelon. Karlo la Lotaringuja estis forveturinta en Vienon, kaj la ĉefstabon transprenis Baĉanjo.

Bivakante poste ĉe la urbo Ŝerdingo, ĉe la rivero Ino, Danubregiona batalionaro malaperis en aŭtunaj nebuloj kaj pluvoj. Isakoviĉo dormis. Tutajn tagojn li dormis, sub ĉaro.

Iun tagon li aŭdis, ke en la urbo oni lin serĉas, kaj ke pri li interesiĝas iu negocisto, kiu al li alportas novaĵojn de lia frato, pere de Viena negocisto, Dimitrio Kopŝo.

Isakoviĉo tial descendis antaŭvespere al la rivero, atendante apud pramo, ke al li de la alia bordo, alvenu homo, kiun venigi li sendis soldaton. Ĉar estis venta kaj malvarma tago, sidante sur malnova, surbordiĝinta floso, sub kruta bordo, inter mallumaj, grandaj arbustoj, li en la mallumo apenaŭ povis distingi boaton kaj homojn, kiam ili deĝis de la kontraŭa bordo.

Mallumo estis sinkanta en la ŝlimon antaŭ li kaj, ĉar pluvetis en la tuta vidatingo, li penplene atendis la momenton, kiam li povis leviĝi kaj alpaŝi pli proksime al la akvo, kiu fluis antaŭ la malnovaj fostoj, sur kiuj li sidis.

Rimarkinte boato, alproksimiĝintan, li malpacience ekkriis al sia soldato, kiun li sendis en la urbon, kaj poste germane, ankaŭ al la negocisto.

La homo, kun surŝultra soldatmantelo, leviĝis tiam en la boato, kriante al li sur la akvo, ke li alportas novaĵojn de lia frato, kaj, kiam Isakoviĉo tute descendis en koton, ke li alportas novaĵojn pri lia edzino. Isakoviĉo vidis la barikon, grandan kaj nigran, proksimiĝanta, turnata per remiloj, por ke ĝi sekvu la akvofluon, mallumegan, ĝis arboj, kie briletis la urbo. Neaŭdebla, post la lastaj batoj de la remilo, la boato proksimiĝis al la bordo, kaj li ĝin kaptis, proksimigante ĝin per la manoj. Korpulenta homo tiam, kiun lia soldato helpis ne fali, diris, ke li nomiĝas Ahimo Rigelo, ke estas negocisto el Ŝerdingo, ke antaŭ trisemajno li estis en Vieno, kie lin lia konato Dimitrio Kopŝo, negocisto, petis pere de siaj amikoj trovi Vukon Isakoviĉon en Engelŝtato, en armeo, ĉar Vuko al neniuj leteroj respondas, kaj diri al li, ke liaj infanoj estas sanaj, same kiel lia frato, sed ke lia edzino, la sinjorino Dafina, mortis.



VIII.

MALĜOJĜINTE, SUPER LA AKUŜA MALPLENO, ŜI EKKONSCIIS, KE AL ŜIA ANIMO, EĈ PRI LA INFANOJ, NE RESTOS SPURO, KAJ ŜI FORPISIS, BEDAŬRANTE, KE NE POVAS SATIGI ALMENAŬ LA KORPON, ĜOJSENTA PRO ĜUADOJ

La tago, kiam alvenis la mortotempo de sinjorino Dafina, estis varma, some-
ra tago, aŭgustfine, post trisemajna sekeco.

La sangado de ŝia ventro, ĉesinta antaŭ kelka tempo, kiun eble la turka
medicinisto, per siaj banoj, aŭ la kuracisto el Oseka urbo, per siaj fertuboj,
estis provizore saniginta, rekomenciĝis.

El sango ŝia, post tio, komencis vastiĝi fiodoraĉo, pro kio ĉiuj eksjunu-
linoj el la domo arigadis ĉirkaŭ ŝi, krucsignante kaj preĝsorĉante.

La lastan nokton, antaŭ la morto, ŝi pasigis en febro, petante senĉese la
bofraton veturigi ŝin al la patriarko, kaj elpeti permeson transporti ŝin en
monaĥejon. Ŝi esperis, ankoraŭ, ke ŝi tie saniĝos. Kvietiĝis ŝi nur en mateniĝo,
aŭdinte, ke oni per siteloj malsekigis la kaleŝon de Aranĝelo Isakoviĉo, kaj
elirigas liajn ĉevalojn. Ŝia bofrato vere estis foriranta. Li decidis, finfine, post
multegaj semajnoj da hezitado, iri al la patriarko, kaj paroli kun popoloj pri la
sankta mistero de nupto, pri la edziĝo, kiun li, iam, por sia frato organizis,
sed kiun nun, ĝuste li, detruis.

La lastan mateniĝon en sia vivo, do, la sinjorino Dafina nek vidis, nek aŭdis.

Elĉerpita pro febro, ŝi ekdormis sterniĝinta kaj senmova, pro fortoman-
ko, kvazaŭmorta, kun okuloj siaj enfalintaj, kun la haŭto, sub kiu videblis
ĉiu osto kaj ĉiu vejno kaj vejneto.

Ŝin aspergis, kiel matena roso, malvarma ŝvito, kiu verŝiĝis sur ŝiajn
palpebrojn, grandgute, kaj ŝi ne plu moviĝis, ne vekiĝis, tuŝante per siaj
violigiĝintaj lipoj kaj nazloboj la lumon de la tago, same sensente kaj kviete,
kiel blanka forno, apud ŝia kuŝejo, kiel ŝia seĝo, kun kusenoj, ĉe la krado de

fenestro, kiel la pordo, kiun, en duonlumo, borderis maldika lumframo, kiu penetris eĉ trafende.

Kuŝante en ekzalto, ŝi ne plu vidis la ŝanĝiĝon de koloroj de la aĵoj, kaj ĉiam pli klarajn ombrojn de fera fenestrokrado, malantaŭ kurtenoj, kiujn ŝi kutimiĝis rigardi, ordinare, ĉiun matenon. Nek la flugadon de grandaj muŝoj sur kalkumita plafono, en akompano de mallaŭta zumado, fortiĝanta ĉe la fino, kiam ĝi finiĝas, kiun ŝi rigardis kaj aŭskultis dum sia malsano, tuj post vekiĝo. Ŝi ankaŭ ne aŭdis la bruon de la rivero forfluanta, sub tiu domo, tute bonodora pro faruno, bruon, kiu en la komenco estis ĝena, sed poste dormiga, same kiel la bruon de akvomueliloj, ekstere, sur la rivero, kiun ŝi aŭdis tre malbone, elfore, sed tamen estis senĉese aŭdanta.

La brilon de Suno ŝi ne vidis disfluanta desur la monto, en salikejojn kaj inunditajn veprejojn kaj ŝlimejojn, super kiuj flugis cikonioj kaj vaneloj, kiujn ŝi estis kutimiĝinta observi, sidante apud la fenestro, same kiel kvietajn brutarojn sur la bordo, kiuj speguliĝis, kaposube, en la akvo. Ŝi ne vekiĝis ankaŭ kiam malaperis desur la ĉielo eĉ la arĝenta parto de Luno, kiun, dum la lastaj tagoj, sidante, terurfrapita pro sia stato, de frumateno apud la fenestro, ŝi precipe volonte trovadis en lazuro. Sed ŝi ne vidis ankaŭ tre malproksiman vicon da arboj, sur la monto, kiu estis videbla nur kiam brilo inundis ĉiujn plataĵojn, kion ŝi jam preskaŭ du monatojn bone sciis kaj rimarkis, atendante ĉiutage tiun momenton, ĉar tiam estis malaperanta la malbonodora vaporigo de la ŝlimejo kaj koto, sub ŝia fenestro, kaj Suno ŝin, kuŝpozan kaj rigidiĝintan, lumigis de la piedoj ĝis la talio, tiel agrable, ke al ŝi ŝajnis, ke ŝi resaniĝos.

Ŝi vekiĝis, nek kiam estis vekiĝintaj ĉiuj domanoj ĉirkaŭ ŝi, kun la ŝipoj, ŝipistoj, ŝafistoj, kaj porkistoj, kun knarado de gruo, kaj hurlado ĉirkaŭ trogo, kaj nek tiam, kiam ŝiaj servistinoj enrigardis tra la senbrue trionmalfermita pordo, kaj, vidinte, ke ŝi dormas, piedpinte proksimiĝadis al ŝia kesto kun novaj roboj, kiujn ŝi dum la lastaj tagoj garnadis kaj kudrigis.

En komato, kun tremantaj lipoj, klakante per la dentoj, kiujn tegis ŝaumo, ŝi ne plu havis kontakton kun la febraj, imagataj bildoj, same kiel la realaj, ĉiun mateniĝon aperadis antaŭ la okuloj.

Kun ŝlimejoj kaj marĉoriĉaj kotkampoj, laŭ kiuj al ŝi estis proksimiĝanta la edzo, kun teruraj vundoj sur la korpo, faŭkantaj, kun distranĉita ventro, elfluantaj okuloj, frakasita verto, disetendante la brakojn por ŝin preni kaj strangoli, kvankam ŝi estis malaperanta el liaj manoj, kiel ombro. Kun soldata kolono, paŝanta ĉirkaŭ ŝi, ĉiam pli rapide, en kiu, jam dek fojojn, ŝi ekvidis ankaŭ sian edzon, teruran, grandkapan kaj sangokovritan. Kun malproksimaj urboj, sur kies krutaj stratoj, tute spireganta, ŝi kuris kun la

edzo, dum kontraŭ ili, kaj precipe kontraŭ ŝi, ĉiuj pafadis; ne nur iuj soldatoj, sed ankaŭ armiloj, kiuj ŝvebis en la aero kaj pendis sur arboj. Kun bofrato sia, Aranĝelo, kiun dum la malsano ŝi ofte kaj volonte sonĝis, kisantan ŝian akselon, kaj tiklanta ŝin.

Sinkante el komato en komaton, ŝi estis tiumatene ĉesiganta ĉiun kontakton kaj kun la ĉielo kaj kun la tero. Ŝi kuŝis senmove, malhela kiel kadavraĵo, ŝvita, en la kuŝejo.

Malgraŭ tio, antaŭ tagmezo, ŝi refortiĝis. Ŝi komencis vidi lace, per siaj grandaj okuloj; vidis ŝi la plafonon super la kapo, kaj kalkumitan, dikan trabon, en kiun estis ĉizitaj la kvar literoj de Kristo. Rekonsciiginte, ŝi dum momento rekonis sian ĉambreton, kiun tute kurtenis littukoj vinagrunitaj, kaj du eksjunulinojn, kiuj senĉese moviĝis ĉirkaŭ ŝi, viŝante ŝian buŝon kaj okulojn, mirpufigante la lipojn, kaj krucsignante. Konsternita, ŝi komprenis, ke ŝi estas mortanta.

Tiam ŝi ekvolis salti pro teruro, kaj ekŝriki, skuigante sur la kuŝejo, kaj ŝvingante la kapon sur la kusenoj, ĝis kiam la eksjunulinoj kaptis ŝin. Ŝia krio apenaŭ aŭdiĝis ĝis la korto, kvankam al ŝi ŝajnis, ke ŝi krias tiel laŭte, ke oni ŝin aŭdos eĉ sur la kontraŭa bordo de la rivero, sed ŝia skuado de la brakoj ŝin nur iom levetis. Tiu malforteco, subitega, kompare kun kiu ŝia hieraŭa forto ŝajnis nekredibla, timigis ŝin tiom, ke ŝi frenezete komencis plori. Responde tra la tuta domo eksonis ploro kaj ŝrikoj de virinoj. Levita sur kusenojn, murmurante kvazaŭfreneze, ŝi estis provanta per la manoj ekpreni ion, dum oni estis viŝantaj ŝviton kaj hararon sur ŝia vizaĝo, kaj ŝi kvietiĝis nur kiam oni venigis al ŝi la infanojn.

Kun la kapo supreniĝinta, kun larĝe malfermitaj okuloj, spirante rapide, ŝi flugigadis sian rigardon, senĉese, de unu al alia muro.

Ŝi estis komplete konscia, sed oftfofte forgesis kie ŝi troviĝas. Tiamaniere, kunigante la palpebrojn, kaj denove disigante ilin, perdante aŭdsenton, post kio ŝi denove aŭdis eĉ la plej mallaŭtan vorton, balbutante, kaj denove ekparolinta mallaŭte, sed tute distingeble, komencis agonii, kaj agonii ĝis la nokto.

Kun sensenca malespero ŝi ekdeziris vidi, ankoraŭfoje, la edzon, kvankam ŝi sciis, plenkonscie, ke Vuko Isakoviĉo foriris, kaj kien li foriris. Tiamante dum jaroj pri lia vivo, kaj havante antaŭsenton ke li estos mortigita, ŝi, sentante naŭzon pro tio, jam kutimiĝis pensi, ke li mortos, aŭ ke lin iun tagon oni revenigos hejmen sangantan, des pli ĉar ankaŭ li ĉiam tion parolis. Nun al ŝi ŝajnis nekompreneble, ke ŝi mortas pli frue ol li, kaj ankoraŭ pli, ke li ne estas tie. Ŝajnis al ŝi, ke nur lia ĉeesto estus tute sufiĉa, por ŝian morton eble, eĉ, forigi, aŭ certe faciligi ĝin, tiel, ke al ŝi ĝi ŝajnis nur alvenanta sonĝo. Estis for de ŝi la penso, ke tio eble ne povus okazi, pro tio ke ŝi al li

estis malfidela. Tute male, ŝi estis pensanta, ke ŝi al li ankaŭ pri tio rakontus, same kiel pri ĉiuj aliaj siaj suferoj, dum lia foresto. Plej grave estus, ke li estas tie, apud ŝi, kaj ŝi estis certa, ke li alvenus, se li scius, ke ŝi estas mortanta.

Kvar fojojn al ŝi, tiun posttagmezon, ŝajnis, ke ŝia edzo eniras, kaj kvar fojojn ŝi demandis pri li kaj parolis pri li, kiel pri apudestanto, tiel ke al la eksjunulinoj, kaj precipe al la eksjuna Ananio, ekŝajnis ke diablo eniris la domon.

Deziregante vidi la edzon, ŝi ne nur estis persista kaj senceda, dum tuta tiu horora tago, sed, male, ŝi same sopire esperatendis ankaŭ sian bofraton, Aranĝelon, kaj demandis pri li, fiksaŭskultante, por aŭdi liajn paŝojn, aŭ voĉon. Dum la malsano, kiam ŝi fartis bone, ŝi ne nur ne plu vidis li flava kaj naŭza, sed al ŝi eĉ ŝajnis, ĉiam pli, ke li tuta estas el sukceso, precipe kiam li per siaj tuŝviglij brakoj ĉirkaŭprenadis ŝiajn genuojn.

Ekŝa ŝia vivo, kun la edzo, revenadis al ŝi en la memoron, tiun lastan tagon, plene nebuligita, kaj ŝi ĝin jam ne plu, kiel antaŭe, la tutan repensadis. Kun la bofrato, male, kiu al ŝi, post tiu nokto, en kiu li ekposedis ŝin, ne ekŝajnis al ŝi kara, sed nur poste, al ŝi ŝajnis la vivo, la estonta vivo, admirinda. Admirinda, ĉar ŝi nur nun scius vivi, tiel kiel, antaŭe, konjektis, ke oni povas vivi.

Sendecida, en siaj pensoj, pri ĉio ĉi, ŝi rimarkis, ke tiel sendecida ŝi estus ankaŭ pri etaj deziroj siaj. Ŝi sentis nur, ke tiuj virinaĉoj: unu turkino kaj du fratinoj, rumaninoj, kiujn ŝi antaŭe ne ŝatis, sed kiuj venadis en ŝian domon preskaŭ ĉiun tagon, por rakonti al ŝi pri mirindaĵoj, kiujn ili estis farantaj kun viroj, pravis, ĉar ili almenaŭ sciis, kial ili vivis. Ŝi enviis ilian malĉasta vivon kaj troplezurojn, kaj en siaj febraj pensoj ŝi mense vidadis scenojn el ilia pasiplena vivo. Tiel, kiel ŝi tiujn scenojn, laŭ ilia rakontado, bildigis al si. Sub la influo de la memoro pri amormaniero kaj pri la ĝuado de sia bofrato, ŝi ekdeziris eĉ dum la lasta tago de sia vivo konvinki sin, ke ŝi ekvojis al harstarige agrabla vivo, kiu ŝin atendis kun Aranĝelo Isakoviĉo. Fakte al vivo, kompare kun kiu ŝia ekŝa vivo estis ne nur priplorinda, sed ankaŭ vana, terure vana, kun infanaĝo apud duonpatro, kun knabinaĝo apud onklino, kun edziniĝo, akuŝoj kaj forpasemo, kiu en mizero kaj migrado, estis tiel monotona kaj sencomanka.

Spirante rapide kaj malfacile, levita sur kusenojn, ŝi ekkuregis ankoraŭfoje, pense, tra la malplenejo de sia ina vivo, kiun, same kiel la traboj ramitaj en teron, same kiel la greno en subtegmento, sub kiu cedetis plafono, same kiel ŝiaj roboj, kiuj estis diŝjetitaj en kesto, tute onigis la kapricoj kaj seksimpulsoj de ŝiaj edzo kaj bofrato, inter kiuj ŝi aperis, kvazaŭ freneza.

Kun teruro en sia rigida rigardo, ŝi ordonis, ke al ŝia vizaĝo oni proksimigu spegulon, la saman spegulon kun firma framo el feraj floroj, kiun al ŝi

la eksjunulinoj, ĵus, puŝis sub la nazon, por vidi, ĉu ŝi ankoraŭ spiras. Vidinte siajn enfalintajn okulojn, teruran frunton kaj sekiĝintan kolon, kvankam kuŝanta senmove, ŝi konjektis ankaŭ la tutan malbelegon de siaj kovritaj membroj, kaj denove komencis plori. Dum tiuj du viroj restos vivi kaj gaji, kadukiĝintaj, kun siaj internaĵoj, en kiuj ne estis malsano kian ŝi havis, nek estis sangado, ŝi sentis, ke ŝi estos ĵetita el la domo, kiel ĉifono. Rimarkinte sub dissternita litotuko siajn knabinecojn, ŝi, per rigardo, en kiu estis pli da abomeno ol da malĝojo, forturnus la kapon de la malpli aĝa, tute veruka, kaj haltigis la rigardon sur la pli aĝa, kiu, tenante la manon de servistino, konstante ion demandadis. Kaj en tiu infano, ŝi vidis, ke ŝi restos nur kiel dubememoro, kun nedifinita figuro, kiun la filino apenaŭ memoros. Meditante, antaŭe, kiel estus reedziniĝi al la riĉa Aranĝelo, precipe se ŝia edzo pereos, ŝi kvazaŭ forgesis, ke ŝi havas infanojn, ĉar tiuj infanoj ŝin tre tedis. Ŝi nek povis pri ili zorgi, nek oni ŝin pri tio demandis. Sciante jam, ke ŝi mortos, ŝi ilin estis forlasanta kun la sento, ke ŝi ne povas ilin restigi apud si, same kiel ĉion alian, kion oni al ŝi, por mallonga tempo, donadis, kvazaŭ tio estas ŝia, sed poste oni tion de ŝi denove forprenadis. Desur ŝia korpo estis foriĝanta ĉio ĉi tio, ne lasante bonon al ŝi, sen dankemo, sen estonteco. Ŝi estas restanta kun sia horora, maplena internaĵo, el kiu vastiĝis premimpresa fiodoro, dum ŝi spasmis pro doloroj kaj sufero.

Antaŭvespere, la sinjorino Dafina estis rekonsciiganta, en febro, jam nur dum momentoj.

Ŝi vidis tiam, kiel ombrojn, nekonatajn personojn alpaŝantaj ŝian kuŝejon, kiujn lumigis lucerno, ĉar duono de la arĝentoriĉaj zemunanoj alsvarmis rigardi ŝin.

Ĉirkaŭ la kvina horo, proksimume, ŝi vekiĝis kaj rememoris la ĉevalojn. kiujn Aranĝelo estis donacinta al ŝi, kaj per malforta voĉo ŝi ordonis, ke oni alportu al ili sukeron. Samtempe ŝi parolis pri la bofrato tre laŭde, emfazante, ke ŝi kun li transloĝiĝos en Budaon.

Iom pli poste, ŝi denove ekrigardis per siaj grandaj lazuraj okuloj, havantaj la koloron de la vintra ĉielo, kviete kaj klare. Ŝi estis plene konscia. Demandinte pri la edzo, ŝi tuj rememoris, vole, la unuan jaron de ilia gevido. Al ŝi ekŝajnis denove, ke nur tiu somero estis vera, kun siaj herboj kaj folioj, etaj skaraboj kaj formikoj, nokte kun arĝentaj arbaroj. Meditante pri siaj unuaj tagoj kun Vuko Isakoviĉo, lia frato, lia amindumado, nun, ekŝajnis al ŝi vere ridiga, tiu, la unua, kaj la komenca tempo de ŝia edzineco al ŝi ekŝajnis belegaj. Ŝi kvazaŭ vidus sin, ankoraŭfoje, en siaj bluaj, flavaj, verdaj, fibelaj silkaĵoj, kiujn ŝi amis, kun siaj fortaj, ĉarmaj kruroj, kaj rektaj ŝultroj, tiam okuloj ŝiaj bluiĝis pro malĝojo, pri si. Ankaŭ tiam ŝi ankoraŭ sopiris amon.

Ŝi rimarkis nek ke ekstere subiras Suno, nek varmegon ĉirkaŭ la domo, nek polvon, ŝi ne plu sciis kie ekstere estas montoj, salikejoj, insuloj, ŝi jam aŭdis nek la murmuron de akvo, nek la popon, en la fundo de la ĉambro, kiu senĉese, murmuris grekajn preĝojn.

Proksimume je la sepa horo ŝi ordonis ke oni disŝovu la kurtenojn, kaj enlasu aeron de la somera vespero, en kiu estis kvietiĝanta ekstere ĉio, kaj barkoj, kaj brutaroj, kaj longaj vicoj de portaĵoj, kiuj estis alvenantaj kaj tintetantaj per siaj tintiletoj. La komencon de tiu vespero ŝi vidis jam iom nebule, desur sia alta, ŝvitsaturita kuseno, deklivojn de montoj, nemezureblan larĝon kaj akvojn de kotkampo forsekiĝinta, el kiuj, en la fenestro, videblis nur unu parto, kun muregoj de la urbo. En suferoj, lastaforte, ŝi ordonis, ke oni ŝin banu kaj vizaĝlavu, kaj, je konsterno de la larmvizaĝaj servistinoj, ŝi komencis ordigi sian hararon, kaj ordonis, ke oni aranĝu kaj kolorigu ŝiajn ungojn. Kovrita per silka kaptuko, kiun ŝi elektis hezitante, ŝi donis saketon da dukatoj, kiun ŝi gardis sub la kuseno, al eksjuna servisto de sia bofrato, kaj post tio komencis fiksrigardi la pordon, kvazaŭ atendente, ke iu eniru.

Ŝi kuŝis poste, lavita kaj kombita, kvietita, elspirante, kun la okuloj larĝe malfermitaj, pro kio neniu aŭdicis alpaŝi ŝin, ne sciante, ĉu ŝi ankoraŭ estas viva, aŭ estas morta.

* * *

Dum lia bofratino estis mortanta, Aranĝelo Isakoviĉo veturskuiĝis sur vojo, en sia kaleŝo, certa ke ŝi vere mortos.

Kuracistoj al li jam delonge estis dirintaj, ke ili tute ne havas esperon, ĉar ili ambaŭ estis certaj, ke ŝi provis mem liberiĝi de gravedeco, kaj ke ŝi ion tiucele fortrinkis. Antaŭvidante ŝian morton, ili ambaŭ konvikandis lin, ke ŝia forpaso estas proksima, ĉar turko opiniis, ke ŝia internaĵo putras, kaj tial sangas, dum la alia kredis, ke ŝia internaĵo sangas, kaj pro tio io en ŝi putras. Ili ambaŭ estis certaj, ke lia bofratino mortos.

Aranĝelo Isakoviĉo estis certa, ankaŭ, ke pri eksedziniĝo oni eĉ paroli ne povas, kaj ke ekzistas nek popo, nek patriarko, kiuj forprenos ŝin de lia frato, por transdoni ŝin al li. Tamen li ĉiun tagon estis promesanta al sia bofratino, ke li vizitos la patriarkon.

De tiu tago, kiam li trovis sian bofratinon kontuzita, Aranĝelo Isakoviĉo estis kvazaŭfreneza. Li foriradis nenien. Dum la unuaj tagoj li iradis ĝis Oseko kaj, Kovino, al siaj ŝipoj kaj al siaj herdoj, rapide, navigante ankaŭ nokte, silentema, parolante nur kelkajn vortojn, sed en la Supra Danubejo, en Vieno kaj Budao, kie li havis grandajn stakojn da pretaj ledoj kaj ekipaĵoj por ĉevaloj, oni lin vane estis atendantaj tiun someron, ĝis la tarda aŭtuno.

Post unu-du semajnoj, li ne plu veturis eĉ al Oseko, eĉ al Petrovaradino, li same ne plu transveturadis ankaŭ al la turkoj. Kolerverda pro siaj malgajnoj, li paŝadis neaŭdeble tra la ĉambretoj de sia granda domo sur akvo, observante la bofratinon dormantan, kaj kisant e ŝin, tuj kiam ŝu unu-du tagojn fartis iom pli bone. Naŭzante tion, kio al ŝi estis okazinta, li, eble la nura, vidis sur ŝi klarajn spurojn de ŝia eksterordinara beleco, kiun ŝi estis abrupte perdanta. Arigante barkojn ĉirkau sia domo kaj siaj brutejoj, en koto, li komencis forprenadi ankaŭ sian monon el Turkujo kaj Valaĥujo, sendante ĝin en Nordon. Li ne volis, kiel antaŭe, forlasadi ŝin, li ne volis foriradi pli profunde en Sudon, por venigi brutaron, sed decidis komerci nur per arĝento, kvankam samtiel freneze, kuraĝe, sencerte kaj rabe, kiel li negocis per brutoj kaj nutraĵo. Tamen, la plej grandan parton de la tago li estis pasiganta apud ŝi, nepovante riproĉmencii, kiom ŝi damaĝas lian komercadon, tamen komprenigante tion al ŝi ĉiun fojon, ĉirkaŭdire, emfazante sian grandan amon al ŝi, kvazaŭ ŝi por tio devus esti dankema al li. Sidante sur ŝia kuŝejo, en sia blua kaftano, streĉita per silka, bunta zono, li per siaj flavaj manoj estis premanta ŝiajn ŝultrojn, kiuj jam estis nek tiel firmaj, nek tiel belaj, flatante, per siaj flavecaj okuloj kaj plata nazo, tiklante ŝin per sia maldensa barbeto, puŝetante per la kapo ŝian bruston, simile al malsovaĝa virkapro.

Sentinte ke ŝi, malgraŭ ĉio ĉi tio, sufiĉe malvarme silentas kaj lin kredas kialo de sia mafeliĉo kaj malsano, li post tio, ordinare, komencis ŝin detale memorigi pri ilia terura, volupta nokto, kiam li ŝin, pli trude, ol maltrude, ekhavis. Per sia buŝo, kiu estis bonodoranta pro altapreza tabako, kaj dolĉa, pro turkaj dolĉaĵoj, li ŝin tiam memorigis pri iliaj amoraj scenoj, ripetante siajn laŭdojn pri ŝiaj eksterordinaraj movoj, pri la beleco de ŝiaj membroj, pri la maniero kiel ŝi sinhavigadis, priskribante tute kaj absolute ĉiujn detalojn, kun arda rigardo kaj dampita flustro, kiasante ŝin fine, kiel freneza.

La sinjorino Dafina, kiu tiajn deklarojn de sia edzo neniam estis aŭdinta, ĉar Vuko Isakoviĉo silentis, ne nur post la renkontiĝo kun ŝi, sed ankaŭ dum la amoraj aktivecoj, ne priatentis tiun vortkaresadon, tiun belparolon de sia bofrato, post la amoro, ĉar tio al ŝi ŝajnis malalloga. Deturninte la kapon flanken, kuntiriĝinta pro doloroj, ŝi tamen toleris liajn impetajn kisojn, kun neklara rideto, same kiel tiun fatalan nokton, ne malkaŝante ĉu tio, reale, ŝin plezurigas.

Aranĝelo Isakoviĉo, kiu en la komenco de ŝia malsano sentis tiel grandan naŭzon, ke li kelkan tempon fuĝadis el la domo, cedis poste, timoplena kaj konsternita, kaj iĝis dum ŝia malsano zorgema, ĉar li havis por tio propraĵajn celojn. En la tagoj, kiam ŝia stato boniĝis, li al ŝi estis proksimiĝanta pli ofte, kiasante ŝin. Kiam ŝi tute malbonfartiĝis, li ne nur denove fuĝis, sed

finfine haltis apud ŝia malsanula kuŝejo. Plurajn horojn li tiam estis tenanta ŝin en brakumo, kvazaŭ en ia agrabla ekzalto.

Ŝi jam ne estis forta, sed ŝiajn genuojn li neniel povis forgesi. Ankaŭ pasia ŝi ne plu estis, sed ŝia voĉo ankoraŭ estis plaĉa kaj, pro ŝia brakumo, li ankoraŭ sentis voluptotremon. Li ne nur ne plu pensis venigi alian, sed daŭre al ŝi rediradis, kia ŝi estis tiun nokton, kaj ke ŝi, nur ŝi, diferencas de ĉiuj aliaj vurinoj, ĉiusence. Obstine, kvazaŭ ensorĉita, li daŭre al ŝi priskribadis ŝiajn korpajn ĉarmojn, kiuj ne plu ekzistis, pro kio ŝi ploris.

La fakto, ke ŝi estis malsana, poste lin ne nur ne forpuŝadis, sed eĉ allogis lin. Deteniĝemo lia transformiĝis en ian atendadon, neordinaran kaj eksterordinaran, laŭ lia opinio. Kvankam tra sia subkorpa infero li tralasis multegajn virinojn, kun ĉi tiu al li ŝajnis, kvazaŭ li ĉieleniĝas. Fiksrigardante ŝiajn okulojn, li eĉ komencis kviete pensi ankaŭ pri tio, ke ŝi povas morti. Des pli ĉar la tutviva amrilato kun ŝi ankaŭ nun al li ŝajnis vera frenezaĵo.

Kutimiĝinta al malĉastado, dum sia negocado kaj migrado, Arangelo Isakoviĉo ekamis sian bofratinon antaŭ ŝia morto, kun pura kaj akra sento, kontraŭ kiu li baraktis kaj pri kiu li ĝis tiam sciis tute kaj absolute nenion. Polemikante kun si mem, li sentis, ke en li okazas io, pri kio li antaŭe ne sciis, ke tio povas okazi. Skuiĝante kaj desaltante, en sia kaleŝo, per kiu li furioze rapidegis, sur ŝparvojoj, al Fruŝka Goro, li staris en la ĉaro kiel timigilo, inter boskoj, arbustoj kaj falĉitaj herbejoj, kriante al siaj servistoj. Incitita, preta por ĉiaj surprizoj, por rabado kaj marĉandado, same kiel en siaj komercaj aferoj, li volis de popoj elruzi ĉion riceveblan, sed ne petante ĝuste la eksedziĝon mem. Kial li volis nun ĉion konfesi al fremdaj homoj, kial li atendis, ke tiuj popoj povos iom helpi lin, kvankam, antaŭe, li estis certa, ke konfesdonado estas sensencaĵo kaj senpripensaĵo – tion eĉ li mem ne sciis. Al li estis klare nur, ke li devas plenumi ĉion, kion ŝi petas, ke li devas doni al ŝi ĉion, kion ŝi deziras. Eĉ se poste fuĝus de ŝi, li pretis eksedzinigi ŝin de la frato, kaj akcepti ŝin kun la infanoj. Kvankam li konjektis, ke ŝi sopiras liajn talerojn, li estis decidinta lasi ŝin ankaŭ en sian riĉon, donacante al ŝi barkojn, gregejojn kaj domojn. Kiel ian karulinon, li volis, antaŭ ĉio, bone pagi al ŝi, des pli, ĉar ŝi baldaŭ sendube povis morti. Cetere, post ĉiu ekpenso rifuzi ŝin, ŝi leviĝadis antaŭ li, timiga kiel sorĉistino, minacante, tiel ke la vivo al li ekŝajnis mala-minda, tuj kiam li rememoris, ke ŝi povas komenci ĝemplendi kaj riproĉi lin.

Ke li ĉion ĉi ne antaŭvidis, kvankam li ĉion alian antaŭvidis, tio por li estis la plej terura. Lin ĝenegis, ke li ĉiujn siajn laborojn bonordigis, sed ĉi tiun li ne povis bonordigi. La tutan printempon la sorto favoregis lin dum li vendadis brutojn, li ja prirabis duonon de Valaĥujo, kaj, post foriro de la frato, li esperis, ke kun sia bofratino li vivos senfinan feliĉon, sen iaj ajn zorgoj. Kun delicoj,

voluptoj, kaŝe, de neniu sciate, en tiu sia granda domo sur akvo, rekompencinte ŝin poste abunde, restiginte ŝin en la domo, ĝis kiam lia frato revenos, kaj ankaŭ poste, se li neniam plu revenos. Tio, kion Aranĝelo Isakoviĉo, finfine, post tiom multaj virinoj, deziregis, estis ĝuo sen ĉiamaj inaj friponaĵoj, aĉetado de juveloj, donacoj, jupoj, dukatoj, sen tiu ĉiama plendaĉo, trudpetado, ploro kaj lamentado, sen zorgo kaj suferoj kun ili. Li volis ke lia vivo estu, kvazaŭ sub ia verda, senfina akvo, en kiu restus mildigita la lumo taga, en kiu lia korpo moviĝus, kvazaŭ en sonĝo, sur kiu li povus sterniĝi, por ke la akvo lin portu, portadu, kiel liajn barkoj, kiam forestas vento, facile kaj neaŭdeble. Anstataŭ tio, li komencis droni kun ĉevaloj en koto, kaj gluti sablon, baraktante, en ŝlimo, kiun li neniel povis forviŝi el sia memoro. Li sopiris sian bofratinon, pro ŝia superbelec kaj forto de ŝiaj membroj, ne atendante en tiu peko, kiu restos kaŝita de la mondo, nenian zorgon, nenian malagrabraĵon, kiajn li havis apud aliaj virinoj. Kaj anstataŭ la vivofluo senproblema kaj delicoj korpaj, kiel paŝao ĉirkau sia ĝardeno kaj fontano, trovi treege pli teruran suferon, ol iu ajn, kiun li povis atendi, tio lin plej multe ekscitis, incitis, frakasis, kaj, finfine, ĝis la fundo de la animo malĝojigis.

Obstine, flaviĝinta kaj verdiĝinta pro kolerego kaj malespero, li volis esperi eĉ poste, kiam li jam vidis, ke ĉio estas finita. Pensante pri la frato eĉ ne unu momenton, ne atendante lin, ne timante lin, tute ne zorgante pri li, sen ia ajn konscienciproĉo, li iĝis tamen deprimita pro mafeliĉo, kiu falegis sur lian dorson. Pri siaj sennombraj virinoj, dum sia transloĝigado, li neniam demandis, kaj eĉ ne priantis ilin post la disiĝo. En lian kapon tute ne venis la ideo, ke li devus al iu ajn el ili reveni. Ke lian bofratinon trafis tragedio, ke ŝi malbeliĝis, kaj ke tio okazis tuj kiam li ŝin havis, tion li neniel povis encerbigi. Neeble estas, ŝajnis al li, ke ŝi, tiom bela, ne estas nun ĉarmega, kun sia brusto, ŝultroj, koksoj, genuoj, almenaŭ ĝis kiam li tuta degelos en eŭforio, ĝis kiam li ne satiĝos de ĝuado. Al li ŝajnis neeble, ke ŝia beleco, tioma beleco de la korpo, ne revenos. Fuĝante el la domo, kiam ŝi veis, venigante kuraciston, li ŝin ne forlasadis dum tagoj, sidante kun ŝi ravita, tuj kiam ŝi estis refortiĝanta, kun la frunto hela, kun dolore ridetanta buŝo, kaj tuj, kun denove belaj, blankaj maleoloj. Savo por ŝi devas ja ekzisti, same kiel por li, rezonis li, kaj li eĉ pensi ne volis, ke tiu belega senzorga tempo, kiun li deziris gevisi kun sia bofratino, povus, same kiel kun la alia virinoj, en malagrabraĵoj kaj tedoj, kaj eĉ en suferoj kaj teruroj, pri tio. Li kredis ke, ĉi tiun fojon, li travivos ion, kion la aliaj inoj ne povis al li doni, kaj li kredis, ke devas ekzisti en lia vivo periodo, en kiu li fartos agrable kaj bone, facile, kiel en diejo, same kiel lia frato Vuko kredis, ke ie devas ekzisti bona kaj ĉarmega lando, kien ili ĉiuj devas elmigri.

Kiam li komprenis, ke ŝi vere mortas, Aranĝelo Isakoviĉo estis tiel embarasita, ke liaj pensoj kaj deziroj iĝis pli malcertaj, ol la pensoj kaj deziroj ŝiaj, kaj de la frato, kiu vagis sur militkampoj. Sufokante sian propran senton de senpacienco, Aranĝelo Isakoviĉo pensis, ke ŝia morto finiĝos ĉiujn suferojn. Peko lia restos sekreto, neniu alia ŝin havos, kaj tiu lia nura, vera amo en lia vivo, finiĝos en ia lumo, sen kiu, tion li sentis, ĝi iĝus neeltenebla, malluma sufero kaj puno. Ŝia morto al li ŝajnis fojfoje bezonata, je la fino de la ŝtormaj movoj de ŝia nudigita, eksterordinara kaj plenpasia korpo. Tuj post tio li skuiĝis en siaj pensoj, kredante, ke li nenion devas timi, eĉ se ŝi restos viva, kaj ŝia morto al li tiam, je la fino de tiu, tiel longa, atendado ekhavi ŝin, ŝajnis tiom horora, ke li pensis, ke tiam ankaŭ li pereos, forflugos vekrie ien kaposuben, en akvon, incitita, senespera, hontigita, trompita, ne povante resti sen ŝi, en tiu domo, kun tiuj infanoj, atendante la fraton. Li estis opinianta, ke, post ŝia morto, li povus resti en ĉi tiu mondo nur se ne plu devus moviĝi, se li povus resti plene sola, kaj silenti, se li ŝtoniĝus.

En Karlovacon li ekveturis nur por ke en la domo oni kvietiĝu, kaj por plenumi ŝian deziron, venigi popon.

Kuregante sur plugejoj, marĉaĵoj kaj irebligataj arbaroj, li sciis, ke li veturas vane, sed li tamen hastis. Radikojn de poploj, piramidaloj kaj akacioj li frapadis per sia ĉaro, sed branĉoj refrapadis lin, kroĉiĝante al la ĉaro, kaj frapante lian kapon.

El profundaj ombrejoj, li subeniĝis en sunumitajn plataĵojn, multe pli nesentema pri ĉiuj tiuj ŝanĝoj ol la frato, sed hundoj, kiuj lacaj postkuris la ĉaron, elpelante el herbo alaŭdojn, li eĉ ne unu fojon alrigardis. Krietante al la servistoj, kiuj devis sidi alte kaj rekte, en danĝero, oftofte, fali inter la ĉevalojn, kaj ne aŭdacis retrorigardi, li vidis nek paŝtejojn, nek novajn loĝlokojn, sed rapidegis rekte, starante, kun la dentoj kunpremitaj, fikskontemplante sin, sian vivon kaj sian domon, en kiu lia bofratino estis mortanta.

Nur kiam la ĉaro ekveturis malrapide montosupren, al la doganejo Karlovaca, Aranĝelo Isakoviĉo renversiĝis surdorsen, laca, kaj okulfermis, senfortiĝinta, bruligita de sunvarmo, sentante agrable, ĉar li estis pasanta tra ombroj de kverkaj boskoj, post tio apud bonodoraj vinberejoj, trans etrivejoj, kiuj lirlas, laŭlonge de fruktarbejoj kaj prunĝardenoj, desur kiuj prunoj, pro brufrapado de lia kaleŝo, estis falantaj post li, sur la teron.

Jam apud la plej proksimaj domoj Karlovacaj, veturante deklivosupren, kun la radoj enfalantaj en kavojn, kiujn faris malnovaj pluvoj, oblikviĝante tiom, ke ŝajnis, kvazaŭ ĝi tujtuje renversiĝos montosuben, la ĉaro de Aranĝelo Isakoviĉo igis grandan agitiĝon kaj tumulton en domoj kaj gregejoj, sed precipe en enfositejoj de novaj alloĝiĝintoj. Ili estis alvenintaj el Serblando post

la patriarko, antaŭ nur sep jaroj. La patron de Aranĝelo, Lazaron Isakoviĉon, ili bone konis, pelante liajn brutarojn, kaj vendante al li bovojn, ĉie, sekvante la Aŭstrujan armeon, kiu estis penetranta post la turkoj.

Jam elmalproksime, pro sia freŝa farbo kaj tintilaro, la kaleŝo de Aranĝelo Isakoviĉo arigadis, luliĝante sub kaj super apudaj montetoj, tute kaj absolute ĉiujn. Ĉiuj kuris renkonte al li, atendante, ke li alproksimiĝu, kiel ŝipo. La servistoj, kiuj rajdis antaŭ li, kaj la servistoj, kiuj sidis sur la kaleŝo kurbiĝintaj, provante sidi senmove kaj rekte, krakigis vipojn kaj kriis kontraŭ la tuta homamaso, kiu kolektiĝis ĉirkaŭ la ĉaro, postrastante dum momento, kiam Aranĝelo Isakoviĉo ĵetis, sur herbon kaj dornaĵojn post si, aŭ supren, inter branĉojn, plenmanon da moneroj, incitante per tiu movo de la mano, ĉiun fojon, siajn hundojn, kiuj pro tio atakadis la homojn.

Komforte sidiĝinte sur kusenojn en la ĉaro, enpensiginta, li, cetere, tute ne rigardis la homamason, sed bovojn kaj gregejojn, kaj tegmentojn de enfositejoj, elstarantaj nur du-tri manlarĝojn super la tero. Mense, li ĉion ĉi vendadis kaj aĉetadis, murmurante.

Sur krutaj pasejoj super fosaĵoj li vidis nur streĉitajn gluteojn kaj ventrojn de la ĉevaloj, sur kiuj pro penego elsaltis vejnoj, post kio li, denove, fiksrigardis, kvazaŭ en ia sonĝo, siajn servistojn, kiuj egalritme saltadis desur la ĉaro, jen dekstren, jen maldekstren, por ŝovi lignoblokojn sub radojn, kaj senmovigi ilin.

Descendante al masonitaj domoj de la urbo, Aranĝelo Isakoviĉo trenis post sia granda ĉaro tutan kolonon da scivolema homamaso, kiun neniu povis forpeli. Kutimiĝinta, ke ĉirkaŭ li ariĝas homoj, petantaj kaj almozantaj, li ankaŭ nun permesadis, ke ili proksimiĝu al lia mano, kaj kviete toleris ankaŭ tiujn, kiuj kuris ĉe la ĉaro, kaj eĉ tiujn, kiuj kaptadis lian manikon, plorante. Haltinte apud fontoŝtono, li lasis sian ĉaron sub prunuoj, ekirinte montosuben, sekvata de amaso da scivolemuloj tra fosfositaj vinberejoj kaj dornoplena arbustaro, ĝis la domo en kiu estis loĝiĝinta, tiun someron, la ĉefepiskopo.

Aperinte antaŭ la pordego, en sia stranga vesto, troornamita kaj parfumita, trapreĝante sian rozarion, dum ĉirkaŭ li interpuŝiĝis kaj interpremiĝis malriĉularo, Aranĝelo Isakoviĉo mem eksentis, ke tiel bunta, ĉirkaŭita de hundoj, li vere ne aspektas kiel haĝulo, kaj vidis, kiel oni lin ankaŭ desur ĉirkaŭaj, malgrandaj kaj malhelaj fenestretoj de domoj observas.

Atendinte kelkan tempon antaŭ la giganta pordego, sur kiu estis eltranĉitaj du krucoj, kaj satrigardinte apudajn domojn kaj tegmentojn, li ricevis permeson eniri, sed kun nur unu servisto.

Sub la peza volbo de la konstruaĵo, sur kiu estis dispendigitaj ikonoj, Aranĝelo Isakoviĉo, en mallumo kaj ombrejo, post la varmego kaj brilo ekstera, mallevis la kapon, kaj konigis al la monaĥoj sian nomon.

Paŝante necerte, sur tabuloj metitaj sur la teron, li proksimiĝis al enkonstruita benko kaj sidiĝis, vidinte, kiel ili lin konfuzo observas, anstataŭ venigi lin al la patriarko. La domo en kiun li estis enirinta, estis malnova konstruaĵo, ĉirkaŭmurigita de ĉiuj flankoj, kun korto kaj staloj, antaŭ kiujn estis surŝutita ia tero, el kiu estis ĝerminta abunda herbo. Super tiu altaĵeto, kliniĝis kelkaj fekundaj pomujoj, kies branĉoj kurbiĝis ĝis la tero, plenaj da maturaj fruktoj.

Ĉirkaŭe, supre, li vidis lignajn portikojn, sur kiuj zigzakis monaĥoj, kiel nigraj ombroj, sub grandaj lucerno, kaj en la fundo de la korto, malantaŭ arboj, sonorilturon el rondlignoj, sur kiu, alte, loĝiĝis kelkaj korvoj. Malantaŭ la sonorilturo pendis stranga, longa ŝnuro, falinta sur la teron kiel volvaĵo de blanka kaj dika serpento. En la korto estis absoluta silento. Inter la altaj muroj videblis mallarĝa kaj blua surfaco de la ĉielo, senŝanĝa kaj pura.

Aranĝelo Isakoviĉo estis kurbiginta la ŝultrojn, ankoraŭ pli, pro laco, post la longa veturo, kaj sentis ke, fakte, de ĉi tiu lia renkontiĝo kun la patriarko dependas ŝia vivo, aŭ kvietata mortado.

La muroj ĉirkaŭ li kaj la portikoj estis tiom kvietaj, monaĥoj lin estis alpaŝantaj tiel malvigle kaj senbrue, ke al li unuamomente ekŝajnis, ke estas sence tie, entute, paroli, kaj ke ĉio estos solvita per si mem.

Kiam la monaĥoj revenis al li, kaj kiam al li diris, ke ili lin al la patriarko ne povas venigi, ĉar en la domo estas multe da gastoj, ĉar tiun tagon alvenis, vizite, la fratino de la patriarko, la edzino de la kolonelo Raŝkoviĉo, kun siaj filinoj, Aranĝelo Isakoviĉo ofendite leviĝis desur la benko kaj, kvankam li estis nur mezalta kaj tre malpeza, li ekŝajnis iel pli alta kaj orgojla, kun sia flava, malhela, laca vizaĝo. Unu el la monaĥoj tiam, mallevente la okulojn, aldiris, ke, cetere, la ĉefepiskopo jam plurajn tagojn suferas pro okula malsano, pro kio li kuŝas en malluma ĉelo, sternaĝinta, kun kovritaj palpebroj, preĝas al dio, kaj kun neniuj interparolas.

Aranĝelo Isakoviĉo distiris siajn vestojn kaj pufigis la bruston, sub siaj flavaj kaj buntaj silkaĵoj, kaj streĉiĝis, kovrita de multekostaj juvelaĵoj. Per voĉo mallaŭta kaj afabla, falsa modesteco, li rediris kiu li estas, menciis sian fraton Vukon, dirinte, ke li volas mem paroli kun la patriarko, kun kiu li havis honoron la pasintan vintron, du fojojn, nemallonge interparoli.

Aŭdinte la nomon de lia frato Vuko, la monaĥoj kvazaŭ gajiĝus. Ili torentigis laŭdojn kaj benojn pro la milita kuraĝo de tiu, pro lia lojaleco al la ortodoksismo, kaj malavareco antaŭ ili. En iliaj ekkrioj, Vuko Isakoviĉo similis al kristana sanktulo, rajdanta sur ĉevalo, defendante la malfeliĉajn monaĥojn kaj ĉiujn rifuĝintojn el la sangokovrita Serblando, kiu ankoraŭ multan bonon por ili faros, kiam li revenos el la milito.

Aranĝelo Isakoviĉo sidis, iriginte ilin denove, kun sia servisto, kiu estis staranta preskaŭ senmove, funde de la pordego. „Eble ili min kredas malĉastulo“, mense diris li – „eble ili aŭdis onidirojn“, rezonis li – fiksrigardante senesprime la lignan sonorilturon kaj fruktarojn en la korto. Li pentis pro sia alveno, vidinte, ke ili ne povas lin helpi, kaj ke ili, sendube, scias kia estas lia vivo, kiun li estis pasiganta sur ŝipoj kaj en fremdlandoj. Al li ŝajnis, ke lin, kvankam ankaŭ li estis donacema rilate al la eklezio, ili malestimas. Al li ekŝajnis ke, ĉe fenestro sur la dua etaĝo, li vidas la vizaĝon de la ĉefepiskopo, ĝisgorgĉe kaj ĝisorele invaditan de barbo, kun malgrandaj lipaj haroj kaj ruzaj okuloj. Rimarkis li, ke oni lin ankaŭ de aliaj fenestroj observas kaj priatentas. Tiam, en sia kolerego kaj honto, li krucmetis la krurojn sur la ŝtona benko, ekfumis kaj sidiĝis kiel turko.

La monaĥoj alvenis al li ankaŭ la duan fojon, sciigante lin, ke la patriarko ne povas allasi lin, sed ke al la malsana sinjorino Dafina estos sendita speciala monaĥo. Krom tio, la patriarko konsilas lin iri al la episkopo Nenadoviĉo, kiu lin ja konas, kaj kun tiu interparolu pri tiu lia grava afero, pri kiu li volas paroli.

Perdinta paciencon tiam, Aranĝelo Isakoviĉo komencis ilin riproĉi, jam komplete koncentriĝinta, kun acida kaj kolersenta subrido. Subite, li kritikis ilin, parolante, ke ili estas pli malbonaj ol tiuj soldatoj, kiuj verŝas sangon kaj vivas kiel ciganoj, ajnaloke. Li riproĉadis ilin, dirante ke ili kulpas ĉar la homoj transloĝiĝas, kaj ĉar ili, la komercistoj kaj metiistoj, neniel povas fiksligi. Koncerne lian fraton Vukon, kiun ili tiom laŭdas, tiu ja estas senduba cigano, kiu siajn friponaĵojn kaj maldiligentadon maskas per eterna ripetado de promesoj, ke li foriros en Rusujon, kie ĉio estos pli bona. Parolante post tio kontraŭ la patriarko, li diris al la konsternitaj monaĥoj multon, kio ne estis dirinda. Li nomis avaraĉulo la eksan Peĉan ĉefepiskopon kaj la slavserban patriarkon de Hungarlando, Serblando, Bulgarujo, Bosnujo, Grekujo, Dalmatujo, Kroatlando, Slavonio kaj la tuta Ilirujo, kiu sendube bezonos lian monon. Koncerne la monon, li monon tuj montris, elŝutinte en sian sinon du saketojn da dukatoj. Tiujn dukatojn li ne nur montris al ili, sed ankaŭ komencis nombri ilin, aldonante, kioman sumon li volis donaci por konstruado de la patriarka preĝejo, kioman sumon li volis donaci por sonoriloj, kioman sumon por fari pentraĵon de la karmamora Caro Uroŝo la Malpotenca, kioman sumon por riparo de la monaĥejo kaj, finfine, kioman por la monaĥoj de la patriarko. Samtempe li profunde spiris, dum ili flaris la bazilion, ĉiam pli ofte.

Preterdire, li tiam menciis, ke finfine ankaŭ li, Aranĝelo Isakoviĉo, kvankam li estas nur negocisto, ne estas malpli merita ol lia frato Vuko, kvankam tiu famiĝis dum kolektiĝoj, des pli ĉar la frato nur sensencumas kaj parolas

kaj promesas, dum li en vera maniero komercas, vendas kaj aĉetas, kaj kion li aĉetas, tion li ankaŭ kapablas konservi. Se ili trompiĝos pri lia frato Vuko, kiu ilin ĉiujn plej volonte denove irigus tra ebenejoj, montoj, marĉegoj kaj arbaroj ĝis tiu nekonata Rusujo, kvankam ili pereos pro elĉerpiĝo antaŭ ol alveni tien, ili komprenos, kiu estas li, Aranĝelo Isakoviĉo, al kiu la disvago jam tedis, kaj kiu restos tie, kie ili, finfine, loĝiĝis. Kaj ne nur restos, sed ankaŭ ĉion foraĉetos, por ke ankaŭ al preĝejoj povu donadi, same kiel li donadas ankaŭ al aliaj, metiistoj kaj ŝipanoj, multe pli ol lia frato. Ofendita, sentinte sin haltigita tie, ĉe la pordego, starante kiel surverŝita, el fenestro, per sitelo de malvarma akvo, Aranĝelo Isakoviĉo disetendis komerciste siajn larĝajn manikojn, levante la kapon, kaj turniĝante kiel forironto, inter la monaĥoj kiuj estis konfuzitaj kaj sendecidaj, ne sciantaj kion fari, ĉar ili komprenis nek kial li estas tiom kolerega, nek kion li parolas al ili. Li scias, cetere, li ankaŭ tion diris, ke iu parolis sensencaĵojn pri tio, ke lia bofratino vivas en lia domo, en Zemuno. Sed la vero estas, ke lia frato foriris en militon, kaj ke iu devis akcepti la neplenkreskajn infanetojn, krom tio, la vero estas ankaŭ, ke ŝi kuŝas mortante, kaj ke li pri tio volas interparoli kun la patriarko, ĉar li pri tio ion devas diri ankaŭ al la patriarko.

Ne permesante al la monaĥoj ekparoli, kvankam unu el ili proponis ankoraŭfoje iri supren kaj sciigi lian deziron, Aranĝelo Isakoviĉo, plene nebridebla, per sibla voĉo, komencis antaŭ foriro fanfaroni pri si mem. Ĉar li estas negocisto, oni almenaŭ scias, ke kion li enmanigas, tion li neniam elmanigas. Kies monon lia frato donacadis al iliaj preĝejoj – se tio ne estis lia mono, kaj kiu savgardos ĉion, kion ili ricevos – se tion ne faros li kaj liaj homoj, kiuj loĝiĝas laŭlonge de la rivero, sed por resti tie, ne por forloĝiĝi denove. Ĉio apartenas al tiu, kiu estas en proksimejo, ne al tiu, kiu vagas kiel cigano. Homo, kiu eltenis la amasmortadon de brutoj, kiam tio okazis, sen kriado kaj kriĉado, eltenos ankaŭ la estontecon, kaj ne foriros, cetere, ĉu iu ajn vidis lin, Aranĝelon Isakoviĉon, ke li iam ajn, eĉ ekstremetis, kiam dronis liaj barkoj, aŭ kiam oni forrabis liajn gregoj? Kvankam diskoniĝis, ke li estas malĉastulo, kaj kvankam oni jam delonge parolas, ke li aĉetas ankaŭ virinojn, tamen estas sendube, ke li povas esti ilia donacisto, kaj ke, kiam li kvietiĝos, li povos vivi kiel vera sanktulo. El Zemuno, tuj kiam li revenos, li promesis sendi al ili plenan ĉaron da ikonoj, pli belaj ol ĉi tiuj, kiuj troviĝas sur la volbo, kaj koncerne la sonorilturon, kiun li alrigardis malestime, en la fundo de la korto, la sonorilturo en lia loĝloko estas pli alta, farita el pli grandaj rondligno, kaj kun ŝtona soklo. Ili tion diru al la patriarko.

Tiel, fiksrigardante la sonorilturon lignan, en kiu senmove pendis sonorilo, fruktarbejon, en kiu senmove pendis sennombraj pomoj, stalojn kaj

portikojn, fenestrojn supre, en kiuj videblis eĉ ne unu movo, li sentis abrupte, en la malluma sensunejo de la volbo, sub ikonoj kaj lucernoj, ke li parolas tro laŭte, kaj ke li fakte kverelas, sed kverelas sence, tie, kie neindas kvereli. Eksilentinte subite, li ekiris abrupte al la pordego, aperis antaŭ la homamaso, tute flava pro honto, kriante kontraŭ la servistoj, ternante pro varmego, ĉirkaŭita de monaĥoj, kiuj nun estis farantaj ĉion eblan, por restigi lin.

La homamaso, kiu estis ariĝinta antaŭ la pordego, en kiu nun estis ankaŭ kelkaj ciganoj, en ĉifonoj, preskaŭ nudaj, kiuj saltadis senĉese sur unu piedo, almozante kaj petegante monhelpon, aŭdis nenion, vidis nenion el tio, kio malantaŭ la pordego estis okazanta. Apud ĉiuj servistoj de Aranĝelo, kiuj krakadis per la vipoj, la homoj amase ekiris post Aranĝelo Isakoviĉo ĝis la ĉaro, eĉ ne sciante kien iras.

Aranĝelo Isakoviĉo trotigis la ĉevalojn haste, montosupren, malproksimiĝante tra klusoj kaj fruktarbejoj, kvazaŭ veturante sur tegmentoj de domoj, kiuj restis en valetoj, kun siaj aleroj el pajlo kaj kano, kun siaj brutejoj kaj porkejoj, fositaj en tero, sub grandegaj trunkoj kaj radikoj de kverkoj kaj akacioj. Post li, interarbe, surmonte, kuris ankoraŭ nur kelkaj almozuloj, la aliaj estis postrestintaj. En valetoj kaj sur monto videblis la tuta urbo, disŝutita inter marĉegoj kaj kanoj, kaj malproksimate troviĝis irebligigitaj arbaroj kaj, ankoraŭ pli profunde, larĝa rivero, en kanejoj kaj ŝlimejoj, inter salikejoj, tra kiuj videblis senfina ebenaĵo.

La suno estis treege ardanta, pro kio la ĉaro, kvazaŭ katenita de ara fero, baraktis inter ravinoj kaj arboj, sekvata de elĉerpitaj hundoj, ĝis la fruktarbejo de la episkopo Nenadoviĉo, kiu tiun someron konstruigis malgrandan, lignan preĝejon, apud sia domo, kaj kolektis ĉirkaŭ si kelkajn monaĥojn, kiuj libervole konsentis rezigni la anakoretan kaj sovaĝan vivon, per kiu ili vivis, ĉiu por si mem, en arbaro kaj vinberejoj, por loĝiĝi kiel monaĥaro, en Fruŝka-Goraj monaĥejojn.

Veturante kaj skuiĝante al tiuj fruktarbejoj, Aranĝelo Isakoviĉo eĉ menciis ne plu deziris la patriarkon kaj eksedziniĝon de sia bofratino, li simple volis fari ion ajn, por faciligi ŝiajn antaŭmortajn suferojn, kiujn li, portempe, estis forgesinta. Pensante pri la bofratino, li estis decidanta petvenigi iun monaĥon, kiu ekiros kun li en Zemunon, kaj diri, ke tiu alvenas, sendita de la patriarko, nur por silentigi tiun ŝian febran ŝrikon kaj senracian flustron, per kiu ŝi lin estis peteganta, kiam li ekiris. Aliflanke, ŝvitega, li sentis sin kvazaŭfreneta en tiu varma tago, super domoj, herbejoj, kaj kanaro, en la ĉaro, kiu penoplene puŝiĝis tra herbaĉo, de trunko al trunko. Li rememoris, ke li jam plurajn semajnojn ne negocis, kaj ekpensis, ke lia vivo de nun ja ne plu povas esti tia, kia ĝi estis antaŭe, gaja, agrabla, ĉar kiam ŝi forpasos,

li nenion plu bezonos. Komforte sidiĝinta, kun tiaj pensoj en la ĉaro, sur kusenoj, li envie rememoris, ke iam li estis malproksime de tiu bofratino, kaj ke li komence estis firme decidinta plezurigi sin per ŝi, nur du – tri fojojn.

Ĉaro lia dume puŝiĝis laŭlonge de foskavo, en kiu akvo forsekiĝis, ĝis ponto el rondlignoj kaj branĉoj, inter arbustoj. La ĉevaloj prancis, sentante, subhufe, knaladon kaj rompiĝadon de ligno, luliĝon kaj kurbiĝadon de branĉoj, kaj la servistoj tre malfacilege povis ilin brideti, por ke ili ne transturnu la kaleŝon.

Aranĝelo Isakoviĉo leviĝis, enĉare, kaj vidis vicon da malnovaj akacioj, kiuj estis kunigitaj per interplektitaj arbustoj, tiel, ke tie, per ĉaro, oni neniel povis travetruiti. Torentoj printempaj alportis sur tiun vivan barilon herbojn kaj plantojn, kiuj nun, sekiĝintaj kaj putraj, preme odoris. Malantaŭ herbejo, kiu gvidis montosupren, kun kelkaj maturfruktaj prunuoj, videblis granda flava domo kaj tegmento de ligna preĝejeto, sub grandaj kverkoj, kaj inter ili larĝa horizonto, vastiĝanta foren, en valojn, en herbaĉojn kaj vinberejojn, malantaŭ kiuj densis arbaro. Ne sciante kie estas la enirejo, ĉar la monaĥoj al li nedetale klarigis la pozicion de la domo, kiu ekvideblis sur la monto, Aranĝelo Isakoviĉo deziris jam ordoni al la servistoj detrui la barilon, kiam lian rigardon altiris stranga homfiguro, kiu nigris malantaŭ arboj.

Subakacie, surherbe, sidis juna monaĥo, senmove kliniĝinta, kun la brusto nudigita, evidente ekzaltita, preĝanta.

Antaŭ li la tero estis ebenigita, ĝis la montodeklivo desur kiu videblis malproksimejo, laŭlonge de Danubo, en ebenejo. Malmola paliso de juna akacio estis enbatita, antaŭ li, en teron, pinta kaj senŝeligita, pro kio estis preskaŭ nekredible, ke li povis sen dolorhurlo ĵetiĝi sur ĝin bruste kaj ventre kaj dorse. Vidante nenium, surdiĝinta, monstrosimila, li konstante kruccisgnadis kaj tordiĝis, senvoĉe. Li svingadis la brakojn supren, adorkliniĝadis, kaj Aranĝelo Isakoviĉo nur poste rimarkis, ke li ploras.

Dum liaj servistoj estis kvietigantaj la ĉevalojn, kaj provadis la radojn retromovi, Aranĝelo Isakoviĉo, starante en la ĉaro, tute hirtiĝis, sentinte, kvazaŭ sur sia korpo, pikon de la lignaĵo, kiun la homo antaŭ li kvazaŭ ne sentus. Envolvante, per miranta rigardo, la varmegan ĉielon, sur kiu estis eĉ ne unu nubeto, arbarojn kaj deklivojn de montetoj, kune kun tio, kio estis antaŭ li okazanta, Aranĝelo Isakoviĉo postenpaŝis en la ĉaro, ne komprenante, kion tiu homo, sur la verda kampo, en sunbrulo kaj ardo, senĉese kaj tiel freneze faras. La adorkliniĝado kaj fleksiĝado de la monaĥo, en disŝirita nigra monaĥvesto, super la pinta lignaĵo, al li ŝajnis tiel malprudenta, ke li eksentis kriurĝon. Sed kiam li vere ekkriis, tiel, ke la ĉevaloj ektemis, li mem konsterniĝis pro sia voĉo, kaj la monaĥo ektemis, kvazaŭ lin iu pervipe draŝus.

Aranĝelo tiam ekvidis kiom la monaĥo estas alta, nudpieda, en nigra sutano, kun la brusto sangkovrita, kaj vidis lian vizaĝon, sakon da ostoj, kun grandaj okuloj, kun febra kaj nebuligita rigardo. La monaĥo estis proksimiĝanta al li, montrante kolere, ke la ĉaro devas ĉirkaŭveturi arbojn, kie verŝajne troviĝis enirejo.

La servistoj sukcesis la ĉaron fortreni malantaŭen, dum la ĉevaloj tremis ekscite, la sinjoreca kaleŝo baldaŭ ekiris al la enirejo kun pordego el ŝtonoj, kiu troviĝis malantaŭ la akacioj. Tamen, ankaŭ tiam Aranĝelo Isakoviĉo ankoraŭ estis staranta, en sia ĉaro, ĉirkaŭita de maturaj fruktarboj, verdaj montoj, montodeklivoj kaj larĝa rivero, unuflanke, kaj aliflanke, de tegmentoj el kano, arbustoj kaj lignaj sonorilturoj, fiksrigardante tiun frenezan estaĵon, kiu senĉese kliniĝadis al la paliso, fleksiĝante pro doloro, ne pensante pri io ajn ĉirkaŭ si, ne pensante pri la varma, somera tago, malantaŭ ombrejo akacia, kaj pri ĉio alia, kio estis videbla desur la monto, herbaĉejo, domejoj, marĉokampo, ŝtonaj konstruaĵoj, sur kiuj senmove staris, sur vinĉo, feraj virkokoĵoj. Kvazaŭfreneza pro evidenta dezirego surpikiĝi sur ĝin, resti sur ĝi, ne foriĝi de ĝi, adorkliniĝadis tiu ulo, tordiĝanta super la paliso, kvazaŭ brakumante ĝin.

Kiam la ĉaro enveturis tra la pordego, sur larĝan novalon kun preĝejeto kaj granda domo, sub maljunajn kverkojn, antaŭ Aranĝelon Isakoviĉon eliris maljuna monaĥejestro, kiu lin rapide kvietigis, dirinte, ke la episkopo estas hejme, sed ie en ĝardeno. La adorkliniĝanto apud la paliso, estis monaĥopastro Pantelejmono, ĵus alveninta el Serblando. Tiutage estis la sepa datreveno de la tago, kiam lian tutan familion, fuĝantan, antaŭ liaj okuloj, oni paliŝumis, post kio li malnormaliĝis. Turkoj estis elŝirintaj lian langon, tial li nun silentis. Cetere, oni ne devis lin timi, li estas kvieta kaj malsovaĝa, li nur ploras.

Dum Aranĝelon Isakoviĉon oni irigis en la domon, desur alta ligna porĉo, li rimarkis en malproksimo riveron kaj Sunon, kiu estis bruliginta kanejojn kaj malproksimajn ŝlimejojn, pro kio el ili leviĝadis densa kaj nigra fumo. Kiam oni lin lasis dum momento apud fenestro, en ĉambreto, en kiu estis nenio, krom unu, surmure pentrita, Sankta Johano la Dezerta, kun granda hakilo, li rimarkis, subfenestre, tri monaĥojn, el kiuj unu, grandega kaj dika, kuŝante surventre, kun la kapo puŝita herben, dormis.

Aliaj du, unu bela kaj mola virine, kun bruna hararo, kaj la alia nigra kaj barbohava, apogitaj unu al la alia, dorse, kantetis, sidante en herbo, kaptante unu la alian, transŝultre, je gorĝo, hihante. De tiu domparto, la arbaro troviĝis je kelkpaŝa distanco.

Senenergia kaj malsatiĝanta, tuthumida pro ŝvito, apogita al malvarma muro, pro kio li sentis, ke tiu malvarmo pasas tra liaj ostoj, Aranĝelo

Isakoviĉo tiam denove aŭdis paŝojn. Opiniante, ke al li iras la episkopo, kun kiu li konatiĝis jam en Budao, li diris mense: mi diros, ke mi alportis dek dukatojn por la monaĥejo, kaj dek por ornattoj. Mi diros al li, ke li permesu al ŝi veni al la monaĥinoj en Jazakon, eble tie la akvo ŝin sanigos. Mi diros al li, ke mi ŝin prenis de la frato, ke mi ŝin gravedigis, kaj ke mi ne volas disiĝi de ŝi. Kaj trapreĝante senĉese siajn rozariojn, senatente, senkonscie, li murmuris senĉese, ripetante tiujn vortojn.

Kion li poste diris al la episkopo, kiun li konis jam el la tempo kiam Nenadoviĉo estis skribisto en Budaa magistrato, kaj kio al li okazis poste, en tiu episkopa somerdomo, kie oni organizis la unuan severan komunejon, forlasinte la diboĉan vivon en kabanoj, pri tio Aranĝelo Isakoviĉo, nek poste, en sia malfacila, maljunula vivo, kiam li iĝis terura kaj fama avarulo, de la hunda animo, ne parolis.

Kiam lin, tiuvespere, servistoj veturigis hejmen ebrian, kia li delonge ne estis, ili aŭdis nur, ke li sian tutan bienon testamentos al la eklezio, kion, cetere, ankaŭ ili devus, mortante, fari, ĉar la vivo estas la plej bela en la diejo, kaj ke ili, jam morgaŭ, devos veturigi la sinjorinon Dafinan en Jazakon, kie ekzistas ia akvo, kiu ŝin, sendube, sanigos. Kiam li maljuniĝos, aŭ eĉ antaŭe, li parolis, poste, kiam la ĉaro elveturanta tra la doganejo Karlovaca, kie soldatoj elkuris, pensante, ke preterpasas iu Petrovaradina generalo, li monaĥiĝos, en la kabano, kie li ripozos de tio, kion li faradis, kaj kie li ne plu komercos kun la malbenitaj valaĥoj kaj kriplakruraj grekoj. Tie, post ĉio, li estos kontenta, kuŝante surdorse, kaj kantante laŭvole kaj laŭpove. Se li ekdeziros vinon, li havos ankaŭ vinon, kaj kiam iu rondfigura vilaĝanino preteriros, li subŝovos sian monaĥan bastonegon, ke ŝi ŝanceliĝu, kaj vizitu lin preterpasante. Laŭdante la episkopon, li tamen estis kontraŭ la komunejo, ĉar li volis esti sola kun Dio, krom tio, li parolas pri la monaĥoj, kvazaŭ li estus pasiginta kun ili la tutan vivon. Li kredigadis siajn servistojn, ke nun kun la monaĥoj, kiuj gardas la sanktajn ostojn de la regnestro, li estas pli bona amiko ol lia frato Vuko, kaj ke oni nun al li klarigis kion li pekis, kaj pardonis kion li pekis.

Liaj servistoj, kun kiuj li ordinare neniam parolis, ne nur ne aŭskultis lin tente, sed penis tute ne aŭdi, interrigardante konsternite. Antaŭsentis ili prave, ke kiam li malebriiĝos, li pentegos pri ĉio, kion li kun ili babilis, kaj ke li ilin turmentos pro tio, plurajn semajnojn, ĝis kiam li tion forgesos.

Kaj vere, tuj kiam vesperaj blovetoj lin iom freŝigis, li rekonsciiĝis kaj eksilentis. Silente, li rigardis kiel la ĉaro subenveturas al ŝlimejoj laŭlonge de Danubo, kaj kiel malantaŭ ili restis, sur la monteto, domoj Karlovacaj, kiujn la suno ankoraŭ lumigis.

Veturante, tra densaj ombroj kaj duonlumo de bosketo, tra cindrigitaj kanaro kaj herbaĉoj, li aŭskultis en malproksimo la bojadon de siaj hundoj, timigantaj alaŭdojn kaj ĉasantaj koturnojn.

Kiam liaj servistoj haltis antaŭ arbaroj, trarigardante kaj pretigante siajn pafilojn kaj pistolojn, ĉar la vojo tien ne estis sufiĉe sendanĝera, li, kaptita denove de vina nebulo, transloĝiĝadis en la ĉaro ĉiufanken, grimpane eĉ por sidiĝi ankaŭ sur la altajn ornamaĵojn de la kaleŝo, el fero.

Gajigan ion kaj agrablan li sendube aŭdis en la domo de la episkopo, ĉar la episkopon li senĉese laŭdis, kaj ĉar li senĉese estis provanta kanti, kion li tie estis ellerninta.

Ĉar lia voĉo sonis grake, ŝajnis, ke li kantas pli laŭte ol li vere kantis, pro kio la servistoj lin penoplene aŭskultis.

La ebrico lin, pro la vespera aero, ankoraŭfoje estis kaptanta, kaj la asertojn, ke li monaĥiĝos, li denove komencis ripetadi. Li priploris la tutan familion de Pantelejmono, kiun turkoj palisumis, menciante, galhumore, ĉiujn eblajn sanktulojn, al kiuj li ekirante estis donacinta po unu dukaton. Firme li kredis, ke la monaĥeja akvo sanigos lian bofratinon, kaj ke ŝi, poste, denove iĝos naskipova. Nepre naskipova. Tiel li ankaŭ repaciĝos kun la frato, kiu ĉiam estis pli feliĉa ol li, cetere, kial ne interpacigi, fratoj ja ili estas.

La pensoj, ke ŝi ankoraŭ povas saviĝi, kaj ke ŝia baldaŭa morto estas nur misaserto de stultaj kuracistoj, lin tiom ĝojigis, kaj tiom konkeris lin, ke li preskaŭ iĝis preta ekdanci en la ĉaro. La manojn li distendis al la vespero, kiu fariĝis malvarma, kaj, turmentante sian cerbon per ĉio, kion li al la monaĥoj diris, kaj kion ili estis dirintaj al li, kaj kion li jam tute ne memoris, li ĝojis pro sia bofratino. Ĉar al Aranĝelo Isakoviĉo, vere, ĝis nun en la vivo nenio estis ĉi tiel malfavora. La fakto, ke ĉio ĉi tiel neantaŭvidite komenciĝis, estis lin konsternanta kaj sufokanta. Alimaniere kaj pli akre, ol lia frato, Aranĝelo Isakoviĉo sentis teruron, hororan teruron, ĉar ĉio ĉirkaŭ ili estas tiel ŝanĝiĝema kaj sensenca, ĉar nenio okazas laŭ ilia volo kaj iliaj esperoj. Ke ie interpacigu, li kaj lia frato, tion li ĉiam pli deziris, kaj ke ili ambaŭ ekkuru en ĉi tiun novan landon, marĉoriĉan, kaj ebenan, sed bonodoran kaj ĉielan, en kiu ili komencis kvietiĝi, post tioma erarvagado. Freneze deziregante la korpon de sia bofratino, antaŭe en lian kapon tute ne venis la ideo, ke tiu dezirego povas realiĝi.

Pro tio lin doloris la fakto, nun, ke ŝi mortas en lia domo. La fakto, ke en la komenco li planis nur satĝui kun ŝi, kaŝe, sekrete, kaj post tio fordoni ŝin al la frato, tio al li nun ŝajnis ege malgaja. Rememorante ŝian eksterordinaran korpon, ŝiajn malvarmajn membrojn kaj ŝiajn ŝtormajn movojn, al li nun ŝajnis eĉ la ekpenso revenigi ŝin al la frato, al kiu ŝi apartenis, frenezaĵo. Li

sentis, ke anstataŭ sin al neniu alian li permesos viziti ŝin, samkiel li ne en-lasus alian, anstataŭ sin, se li povus ekpaŝi nun sur tiu blua, vibranta rivero, aŭ super arbaroj, en la ĉielo.

Sur la alia bordo de la rivero, kvazaŭ restus ĉiuj virinoj, tiom da virinoj, kun kiuj li saltadis spireganta, ŝvita, ofte eĉ kvaronebria, nigraharaj, brunu-linoj, kun flavruĝa hararo kaj abunda brusto, kiuj profunde suspiradis kaj senbrue snufadis en lia brakumo, kaj sur ĉi tiu bordo, sternita kial mortinto, veturis kun li, en ĉaro, tiu nura, bonodora kaj glata virino, kiu al li neniam ŝajnis forpuŝa, kun la okuloj havantaj la koloron de blua vintra, pura ĉielo.

Se ŝi tamen naskus infanon, anstataŭ morti, kio al la kvaronebria Aranĝelo Isakoviĉo, en tiu momento, tute ne ŝajnis malebla, li kredis, ke tiu ilia tuta malfeliĉo bone finiĝos, kaj ke li, tiukaze, estus plaĉa kaj kara eĉ al si mem, kaj por ŝi, kaj por la frato, kaj por ĉiuj.

Vidi ŝin ankoraŭ unu fojon sanan, ekfuriozi pro eŭforio, detruu inter ŝiaj femuroj siajn fingrojn, vortici ĉirkaŭ ŝi, eĉ se ŝi starus malvarma kiel ŝtono, kiel dum la unua nokto, ŝajnis en lia ebria stato tiel belega miraĝo, ke li komplete dronis ankoraŭfoje en la nebulan senracion, veturante kvazaŭ en paradizon per la ĉaro, al kampoj en lunlumo.

Ĉio, kion li tiun tagon faris, estis vana. Kaŝi li devis ĉion, kaj silenti, ĉar neniu al ili povis helpi.

Veturante sur vasta plataĵo, en travidebla mallumo, en kiu estis restantaj ĉiam pli malproksimaj montoj Karlovacaj, malebriiĝinte finfine tute, pro la vespera ombro sur akvoj kaj diversaj vegetaĵoj, Aranĝelo Isakoviĉo afliktiĝis en la ĉaro, vidinte, ke li veturas hejmen, eĉ ne sciante, ĉu ŝi ankoraŭ estas viva. Frostotrema pro malvarmo nokta, fumante, li sidis kun la kapo klinita, pli kaj pli akceptante al si malĝojon, pro ĉio, kio kun ŝi estis okazinta. Li vidis ŝin en sia memoro, kun ŝiaj fortaj genuoj kaj piedoj, kvazaŭ anĝelaj, senmortan, kaj vidis ŝin – ke ŝi tuj post la komenco de la gevido kun li kadukiĝis kaj tute kurbiĝis, zonumita promalsane.

La fakto, ke eble li kaŭzis tioman malfeliĉon, tioman neatenditan suferon, tio lin faris senracia.

La veturo ĝis la domo daŭris la tutan nokton. Veturi li devis ankoraŭ kelkajn horojn. Li sentis, maldekstre de si, la malvarmon de la marĉejoj, kiuj, post longa sekeco, estis forsekiĝinta, kaj videblis heligitaj de lunlumo, kiel reaperantoj. Ĉirkaŭ ili densa kanaro aŭdeble susuris. Malantaŭ ili videblis rivero, kiu ŝajnis senflua, senmova kun siaj salikejoj. Ĉiufoje kiam la ĉaro atingis iun bosketon, renkonte al ili trembrilis lampiroj. La tero estis tiom malmola pro sekeco, pro kio la ĉevala klakbruo aŭdiĝis obtuze, kvazaŭ dum transirado de ponto. La trotadon kaj senĉesan alternadon de ĉevalpiedoj,

li estis rigardonta ĝis la sekva tago, en akompano de vampira lumado de lanterno, kiu estis pendigita sur timonon, kaj sub kiu videblas hundoj, senfortiĝintaj delonge, pro kurado malantaŭ la ĉaro.

Dekstre, senfine, vastiĝis altajn herbaĉoj, inter kiuj troviĝis maloftaj loĝlokoj, el kiuj aŭdiĝis bojado de hundoj, dum ĉio en malproksimo estis dronanta en mallumon, en kiu la morto estis certa kaj neevitebla. Tamen, dum sur la akvo, kie estis multe da lumo sur la supraĵo ĉi-monda, la ĉielo estis plene malluma, senfunda kaj nevidebla, dekstre, super ebenejoj, nigraj kaj mallumaj, super densaj herboj, brilis la ĉielejo blua, videbla, alta kaj steloplana.

En akompano de vibrado de tintilaro sur la ĉaro kaj alta, nokta, serena ĉielo, en akompano de la vojo sur herboj, kiun li vidis nur kiam la lanterno ĝin lumigis, en akompano de komplete fantomecaj personoj, veraj kaj senmovaj, kiuj eble, eĉ ne estis liaj servistoj – iliajn vizaĝojn li ja ne plu vidis – Aranĝelo Isakoviĉo, sobriĝinte dum tiu nokta reveno, same sortodecide ŝanĝiĝis.

Ke li estis ekirinta al la patriarko por konfesdoni, kredante je la amikeco inter la mitropolito Jovanoviĉo kaj lia patro, ŝajnis al li pli kaj li freneza ideo. Ke li rakontis pri sia peko kun la bofratino, ĉe la episkopo Nenadoviĉo, kaj ke tiu lin konsolis, kun li drinkis, ricevinte ankaŭ saketon da dukatoj por rebonigo de la monaĥejo, al li ŝajnis, ke tio okazadis en alia mondo.

Lignaj sonorilturoj de preĝejoj, monaĥejaj ikonoj, kiuj lin vokis per ia superstiĉa flustro, per kiu li flustris por si mem, ekirante, ŝajnis al li nun samrapide forpasintaj kaj senpovaj por helpi lin, same kiel ĉiuj aliaj ordinaraj aferoj viditaj tiun tagon. Sola, en la ĉaro, veturante tra la nokto sur la kampo, Aranĝelo Isakoviĉo forlasis ĉiujn ĉi esperojn, kaj revenis al si mem, sentante, ke li fakte devis silenti.

Samkiel al frato lia dum la milito, tiel ankaŭ al li subite, ĉe ĉi tiu virino, lia tuta ĝistiam viva ĉesis premi la animon, lasinte lin sola, solega, kun tio, kio estis antaŭ li, ĝis la morta.

Tio, pri kio, antaŭe, Aranĝelo Isakoviĉo plej volonte meditis, pri liaj stakoj da ledoj kaj tabako, pri lia arĝento, pri liaj ŝuldantoj, ŝajnis al li tiun nokton porĉiame perdita. Etendinte la manon tiel, ke ĝi pendis el la ĉaro, li diris mense, ke ĉiuj liaj domoj, ĉiuj liaj brutejoj, ĉiuj liaj kromsakoj kun arĝento, ne povas, el malproksime, mallevi lian manon almenaŭ tiom, kiom estis bezonate, pro ke li sentu almenaŭ unu sableron. Negocado lia, mono lia, uzita en multmultaj lokoj, lia fiero, ŝajnis al li, nun, tute troa kaj sen ajna valoro por li, pluveturanta, ĉe tiuj ĉi forsekiĝintaj, malprofundaj marĉegoj, kiuj ankoraŭ helas. Tute ŝokita pro la penso, ke li trovos ŝin morta, kaj ke li sendube vivos funebre dum jaroj, li eksentis, samkiel lia frato Vuko, ke ĉio,

kion li estis faranta, estas songosimila. Ne ĵetinte vane iam ajn en la vivo oran, aŭ arĝentan monon, sed nur monerojn, kiujn li ĵetadis, solene humora, al povrularo, li sentis nun, ke por li estus ĝuige disŝuti dukatojn, kiuj ĉe lia zono troviĝis sub lia mano. Iĝinte anserhaŭteca pro malĝojo kaj eŭforio, li etendis la manon el la ĉaro, super herbaĉoj, kaj pugnigis la manon tiel, ke la dukatoj eliĝis inter liaj fingroj, kaj gutis neaŭdeble sur herbon.

Tuj kiam li, do, provis ŝin konkeri antaŭ la mondo, kaj ne antaŭ sia ombro, kiel en tiu terura ĉambreto de sia domo, li devis tuj kompreni, ke tio estas neebla. Sufiĉis ke li elbuŝigu ŝian nomon, ke la episkopo eksaltu. Li ja devis silenti.

Ĉar malaperanta estas tiu vivo, pri kiu li ĝis tiam pensis, ke ĝi estas tute firma, konsistanta el ciferoj, kalkuloj, trompoj kaj enspezoj, la vivo en kiu li paŝis, veturis, rabadis kaj satĝuis kun multegaj virinoj. Opiniante, ke, en tiu vivo, li povos ordigi ĉion laŭ propra volo, kaj eniĝi, serĉante siajn ĝuojn, en ĉiujn ĝiajn anguletojn, li trompadis homojn, turmentis ilin eĉ, subridaĉante, ĝis la fundo de sia animo li ilin malestimis. En tiu vivo tamen ankaŭ li kuretis kiel stultulo, perflatante malfeliĉa kaj malestimata de la aliaj.

Ekzistis tamen alia vivo, nevidebla, ŝajne, kaj nekomprenebla, en kiu li ne povis aranĝi eĉ la plej malgrandajn bagatelaĵojn, sed tamen ĉio kune estis tiel brila, kiel tiu lunlumo sur la vojo, antaŭ la ĉaro, kiu fadene estis implikiĝanta de la ĉielo ĝis la tero, kaj de la tero ĝis la ĉielo. En tiu vivo, kvankam ĉio estis okazanta laŭ senlogika, surpriza neatenditeco, ĉio glimis pro la stelaj formoj de okazaĵoj, kiuj estis eksterordinaraj kaj por la korpo kaj por la animo. En tiu vivo neniu povis lin malhelpi, kaj en tiu vivo maskita kaj hazarda kaj li kaj lia bofratino sentis, ekzaltitaj kaj ŝokitaj pro la terura sensamo, ke ilin absolute neniu rigardas. Post tio alvenis tiu lia soleco. Veturante hejmen, nokte, Aranĝelo Isakoviĉo maljuniĝis, je la fino de tiu somero, kiam plenumiĝis tiu la plej intima deziro en lia vivo, same kiel lia frato, en la malproksima, fremda lando, dum kelkaj horoj pli ol antaŭe dum kelkaj jaroj.

Antaŭ mateniĝo, kiam ili estis proksimiĝantaj al Zemuno, li kuŝis en la ĉaro, lacega pro la nokta veturo, paliĝinta, maljuniĝinta, kvazaŭ maljuna virkapro, kun la mentono tremetanta. Stelojn, kiuj estis estingiĝantaj, li ne plu rigardis, same kiel la lumon, kiu en altejo blinkis. Ekvidinte en malproksimo sonorilturojn de la urbo, li lastfoje ekkriis al la servistoj, kiuj estis ekdormintaj sidante, kaj al la ĉevaloj, kiuj estis elĉerpitaj. Leviĝinte sur la ĉaro, li alrigardis malproksimajn tegmentojn kaj akvomuelilojn sur la rivero, indiferentege. Li konjektis, ke lia tuta vivo ĝis tiu mateno estis songo, kaj ke nun komenciĝos vivo tute alia.

Alveninte hejmen, afable kaj malgaje ridetante al homamaso, kiu estis ariĝinta sur la ponto, antaŭ lia domo, li konkludis, laŭ la larmvizaĝa homomulto, ke ŝi mortis.

Tuj kiam ĉe la pordego aperis lia flava mano kaj konata maniko, kiam ili ekvidis nur unu flankon de lia vizaĝo, ili ĉiuj komencis are lamenti kaj plori, batante la brustojn, kvazaŭ frapante timbalojn. En la domo estis terura malbonodoro de kandeloj.

La sinjorino Dafina kuŝis pura kaj kvietaj, kun grandaj, dismalfermitaj okuloj, etenditaj brakoj, kovrita de siaj silkaĵoj, kvazaŭ estante reaperanto en blanka, kalkumita muro.

Per horora kaj severa rigardo ŝi rigardis la pordon. Aranĝelo Isakoviĉo dispelis eksjunulinojn, por ke la mortantino ne vidu ilin. Li ne sciis, ke ŝi jam eĉ tute ne rigardas, ke ŝi eĉ lin ne rekonis, kaj ke ŝi forpasas ĝuste en la momento, kiam li, alpaŝinte, prenis ŝin en la manojn. Brakuminte ŝin kune kun la kuseno, li ŝin levis kaj ĉirkaŭprenis, luliĝante super ŝi, plorante. Fiksrigardante ŝian vizaĝon kaj palpebrojn, kiuj estis bluiĝintaj, li estis senĉesa volviĝanta kaj svingiĝanta. Forpuŝante de si ĉiujn, li premadis sur ŝin sian bruston, ne forlasante ŝin eĉ kiam la eksjunulinoj volis fermi ŝiajn okulojn. La kandeloj, kiu estis puŝita en ŝiajn manojn, falis sur lian dorson, kaj bruligis lin. Li estis kvazaŭfreneta. Lia ombro sur la muro similas al la nigra monaĥo, kiun li la antaŭan tagon, kun nekredemo, observis tordiĝantan, super la paliso en la tero.

Li haltis nur kiam li profunde enrigardis la okulojn de la sinjorino Dafina kiu forpasis, tiujn du senmovajn, blujajn rindaĵojn, havantajn la koloron de la vintra ĉielo, malvarma kaj pura, kiuj rigardataj elfore estis malgrandaj, sed kiuj elproksime kreskis kaj ampleksis lin tutan.

Tiu rigardo estis la nuraĵo kiu al li restis, kaj ĝian koloron li neniam plu povis forgesi. En la forpaso de lia bofilino, kiu jam ne povis paroli, al li ekŝajnis ke aperas alta ĉielo. Samkiel lia frato, en sonĝo, ankaŭ li super ŝi vidis, ekster si pro timo kaj malĝojo, blujajn cirklojn, kaj en ili stelon.

La koloro de ŝiaj okuloj estis disfluinta, kaj li super ŝia morta korpo estis perdanta la konscion, murmurante kvazaŭfrenete preĝojn, nomante ŝin: „Dafino mia, Dafino“ – dum sin mem li kromnomis: „Aranĝelĉjo, eta Aranĝelĉjo,“ – vekriante kiel virkapro. La eksjunulinoj vane ŝrikis kaj provadis forŝiri ŝin el liaj brakoj.

La sinjorino Dafina, tamen, jam ne vidante kaj ne aŭdante ĉion ĉi, kun perla vico da agonias ŝviteroj sur la frunto, rigardis, en transmonda brilo, en kirlado de neĝeroj kaj turniĝo de flamoj, en miksaĵo de Slavoniaj arbaroj kaj ĉielaj stelaroj, Vukon Isakoviĉon.



IX.

UNU EL ILI, LA PLEJ MALRIĈA, KONSERVIS, EĈ POST LA MORTO, LA BRILON DE SIA ESTAĴO, KAJ TIAL LI POVIS REVENI KAJ APERI, ĈE LA ENIREJO EN LA VILAĜON, SUR ŜOSEO, SUR LA SAMA LOKO, KIE DISFLORANTA APERADIS, PRINTEMPE, LA UNUA AKACIO

Ĝis la aŭtuno, en Slavoniaj vilaĝoj, aŭdiĝis nenio pri tiuj, kiu foriris en militon. Foririntaj ili estis, kvazaŭ estus malaperintaj, ien, en nubojn.

Antaŭe, interbuĉante kun turkoj, ili vidis flamigitajn vilaĝojn, turkajn barkojn, plenajn da sklavoj, sur akvo, preterpasantaj, ili aŭdis, ke brulas monaĥejoj, ke turkoj perfortas virinojn, kaj ĵetas alten infanojn, falontajn sur ponardojn, sed nun nenion similan ili vidis propraokule.

La foririntoj, militis ie, nur Dio scias kie, en landoj, kies eĉ nomojn ili ne sciis, kontraŭ armeoj, kiujn ili eĉ neniam vidis. Ĉio ĉi tio estis harstariga kaj horora, kiam oni parolis, ĉe fajrejo, pli terura ol la novaĵoj pri masakroj, kaj kvaronumo dum la turka epoko. Granda profundo de la rivero, kaj densaj salikejoj, malantaŭ kiuj estis, nun, griza, malklara, pluva ĉielo, faŭkis antaŭ iliaj okuloj, kiam ili fiksigardis tien, kien la armeo kaj Isakoviĉo estis foririntaj.

La unuaj novaĵoj, ke oni ilin vere irigis kontraŭ Franclandon, dum aliajn, el la ĉirkaŭaĵo de Varadino, ili irigis kontraŭ Pruslando, konsternegis ilin. Homoj vekriis pro timo kaj malĝojo, ĉar oni al ili eĉ morti kune ne permesas, sed ilin dividas kaj disigas.

Ĉio ĉi, cetere, estis tre konfuza kaj stranga, ĉio kio aŭdiĝis. Ili devis batali kontraŭ diversaj popoloj, transloĝiĝadi en diversajn landojn, kiuj havis tre strangan klimaton, strangajn akvojn kaj arbarojn kaj ankoraŭ pli strangajn morojn. Ili devis resti, tie, dum jaroj. Kiam alvenis la unuaj informoj pri ili, oni aŭdis, ke ili tie edziĝis, poste, ke ili tute ne revenos, kaj fine, ke ili ankaŭ infanoj naskigis. Jam en la komenco de aŭtuno virinoj ekis plori kaj ŝriki, kaj komencis malbenadi.

La vera, senduba novaĵo, ke ĝismorte estis vergumita Sekulo, kiun ĉiuj konis, ĉar li estis soldato de Isakoviĉo, kaj gardisto de ligna sonorilturo kaj preĝejeto en sia loĝloko, tio haltigis spirojn en iliaj brustoj. Onidire li estis revenigata hejmen, unu lia okulo elfluis, ambaŭ liaj oreloj forfalas, kaj nun lia vizaĝo similis al la kapo de senhaŭtigta virbovo, sen haŭto, kun elfalintaj ostoj.

Ankaŭ la tero, sur kiu ili volis kvietiĝi kaj loĝiĝi, kaj kiu tiun someron ŝajnis fekunda kaj malsovaĝa, tiel ke la ŝlimejoj plene sekiĝis, devigis ilin tiun aŭtunon denove transloĝiĝi kaj fuĝi, estigante hurlojn pro teruro kaj malespero, per siaj malkontinuaĵaj pluvoj kaj inundoj, kiuj dronigis iliajn brutojn, maluzebligis putojn, detruis defensejojn kaj gregejojn, alportis en vilaĝojn rompitaĵojn, falĉitan herbon, lasinte poste dikajn tavolojn de ŝlimo kaj koto sur barioloj, sur vojoj kaj tegmentoj de terdomoj, kaj en kabanoj kaj enfositejoj. Krom tio, transportado de korpoj el fremdlando, kaj entombigo en Fruška Goro, de la regnestro kaj grafo Ĝuraĝo Brankoviĉo, rapide diskoniĝis ĉie, eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj. Ili tremetis kvazaŭ en ia maltrankvila, luma aero, antaŭ la fino de tiu aŭtuno en kiu apenaŭ estis sunaj kaj varmaj tagoj, post longaj pluvoj.

Tiam ilin alsturmis denove hororaj novaĵoj, vastiĝantaj ĝis tiuj malsekaj Slavoniaj vilaĝoj malkontinuaĵaj kaj necertaj, kun misaj nomoj kaj malklara sinsekvo de okazaĵoj. Ke plej multe pereintaj estis regimentanoj de Isakoviĉo, jam estis absolute senduba, sed novaĵoj, kiuj aŭdiĝis el la vilaĝoj, el kiuj Vuiĉo estis forminta siajn du regimentojn, estis ankoraŭ pli teruraj. Kiam oni aŭdis ĉion, kio okazis kun tiuj, kiuj post la regimentestro, princo Raŝkoviĉo foriris en Ĉehujon, vekriado kaj ĝemado eksonis ankaŭ en ebenejoj, sur la alia bordo de la rivero kaj ŝlimejoj.

La lando, kiujn ili senarbarigis kaj kies ŝlimejojn vojigis, ĝis la varmaj kaj fekundaj, malsovaĝaj deklivosuproj, ankoraŭfoje montriĝis tia, kia ĝi estis kiam ili tien alvenis.

Nebulaj salikejoj estis vaporiĝantaj ĉiun tagon, nuboj kirliĝis ĉiam pli malalte. Profundoj, kiujn trafluis riveroj estis malklaraj kaj netrapaseblaj. La tero estas malhela, nevidebla kaj pluvoplana.

En mallumo bruetis arbaro kaj muĝis ŝlimejoj, desur kiuj ĝermis brilo de lunlumo, ĝi ĝermis kaj aperadis super la malhelo, kaj denove malaperadis en la nokto kaj senfinaj suproj de salikejoj, plenaj da arbustoj.

Pro pluvoj kaj inundoj, precipe suferis tiun aŭtunon la regiono, kie jam la patro de Vuko Isakoviĉo loĝigis kelkajn domojn, sur la deklivo de monto, kaj de kie Vuko Isakoviĉo ekveturis kun la ŝalupoj.

Tago tagon sekvis sub pluvoj, estis deiĝanta tie la bordo, akvo forportadis barilojn kaj amasojn da sekiĝinta herbo, en la profundujon, en ŝlimejojn, laŭlonge de la rivero. La domo de Isakoviĉo estis fendiĝinta nordflanke, kaj ŝajnis ke, se la pluvo ankoraŭ longe daŭros, ĝi disfalos. La herbejo ĉirkaŭ ĝi,

alte super Danubo, estis tiom pripluvita, ke eĉ en la herbolokoj komencis aperadi kavoj kaj fendoj en kiujn enfaladis grego. Montosube flirtis densa, alte elkreskinta kanaro. Malantaŭ la domo, je certa distanco, ĉe monto, estis arbaro kiun la soldatoj de Vuko Isakoviĉo komencis senarbigi, kaj subterejoj de tiuj, kiuj ankoraŭ ne estis farintaj argildomojn en la vilaĝo, troviĝante sur alakva deklivo, en kies mezo troviĝis ligna sonorilturo, sub kies tegmento estis dispendigitaj ikonoj, alportitaj el malnovaj domoj de Vukoviĉo kaj Isakoviĉo. Super la pintoj de salikoj kaj arbustoj, malproksime de la vilaĝo, oni povis perrigarde atingi brutejojn kaj la domon, en kiu Vuko Isakoviĉo kun sia edzino estis pasiginta la lastan nokton, antaŭ lia foriro militi.

Tiu regiono estis precipe famiĝinta pro novaĵoj, ricevataj el fremdlando. Tie oni unue eksciis, ke pereis la servisto de Arkadio Isakoviĉo, kaj ke eĉ lian mortan korpon oni ne trovis. Tie oni eksciis ankaŭ ĉion alian. Ke pereis multaj, ankaŭ pluraj oficiroj, ke al la soldatoj Maria Terezo sendis po unu taleron por iliaj bravagoj. Oni parolis, certan tempon, ke pereis ankaŭ la riĉa Antonoviĉo, por kiu Temisoaraj komercistoj konstruigos preĝejon tuj super la vilaĝo, sur monteto, direkte al Petrovaradinaj tranĉeoj. Krome, kiam diskoniĝis, ke iujn tie, en la armeo, oni pendumas, ĉar ili ŝtelis pomojn, veado kaj ŝrikado denove aŭdiĝis.

La morto de sinjorino Dafina, kaj ŝia vivo estis en tiu loĝloko, je la fino de somero, temo de ĉiutagaj interparoloj.

Oni sciis pro kio ŝi mortis, kaj tion oni kredis puno pro la pekoj kaj aroganteco de Isakoviĉo. Onidire ĉiuj arĝentoriĉaj zemunanoj alkuris por vidi ŝin sur mortolito, tiom ŝi estis bela sinjorino, kaj tiom ŝi havis, eĉ senviva, sur si multekostajn roboj, kaj juvelojn. Oni ploris, tiel, distance, suspiras, ĉar la entombigo de la mortintino estas tiel malproksime, ke oni ne povis alveni al ĝi. Oni sciis, ke eĉ el Turkujo homoj venados por vidi la funebran kunvenon, en la domo de Aranĝelo Isakoviĉo.

Oni aŭdis poste ankaŭ pri la disputo, kiun generis ŝia enterigo.

La pastraro Zemuna estis pruvanta, ke Hristoduloj ĉiam estis bonaj kaj famaj financistoj de la greka religio, kaj ke la grekaj popoloj devas ŝin entombigi, en la korto, sub la sojlo preĝeja. Aranĝelo Isakoviĉo asertegis, dirante, ke ŝi laŭ la patro estis pursanga serbino, kvankam ŝia patrino foriris en fremdujon, reedziniĝinte al greko. Kompreneble, oni devas ŝin entombigi laŭ la novaj ritoj de la serba pastraro.

Tiamaniere, en la vilaĝoj, kie ĉiuj konis Vukon Isakoviĉon, igis, finfine, grandegan ĝojon la novaĵo ke Aranĝelo Isakoviĉo, rankora kaj malica, decidis la korpon de sia bofratino ne transdoni al la grekaj popoloj, sed transporti ĝin, kaj entombigi ĝin sur monteto, super la vilaĝo, malantaŭ la domo de Vuko, apud la tombo de Lazaron Isakoviĉo, kiu estis videbla, elfore, de la plataĵo.

Tiamaniere la homoj, kiuj forakompanis en militon Vukon Isakoviĉon, povis satlamenti kaj satsingulti akompanante en tombon ankaŭ lian edzinon. Kaj, kvankam antaŭ la okuloj de tiu bunta homamaso, elĉerpita pro malriĉego kaj militkampaj novaĵoj, oni organizis nur mallongan fenebran preĝon, la homamaso, poste, tamen disiris kontenta. Ĝi vidis la kaleŝon de Aranĝelo kaj liajn ĉevalojn, liajn malordinare vestitajn servistojn, kaj eĉ lin mem, similan al ia paŝao, almenaŭ dum unu momento, en la silkaj zonoj, blankaj ŝtrumpoj, kun la oraj bukaj kaj brodaĵoj, kun rozarioj, strangaj, flavaj okuloj kaj plata nazo, la osteca mano, plena da oraj bidoj, el kiu estis elfalanta arĝento dum la tuta veturo, por malriĉularo, pli ol iam ajn antaŭe.

Tiel do, vere, ankoraŭfoje preterveturis la morta sinjorino Dafina tiun lokon, kie ŝi trakuŝis, tiel tempeste, lastan sian nokto kun la edzo. La ĉerkon kun ŝia korpo oni elmetis en portiko, kalkumita blanke, desur kies traboj pendis sennombraj florkronoj, ajlobulboj kaj maizspikoj. En akompano de terura ĝemplendado kaj vekriado, grimpis, per nudaj piedoj, homoj kiuj deziris vidi la ĉerkon, sur grandajn sakojn, plenajn da fazeolo, kiuj kuŝis ĉirkaŭe.

Alsvarmis maljunuloj, kiuj, elĉerpitaj, tujtuje, ebriiĝis brandodrinke, kaj eksjunulinoj, kiuj el la ĉerko eltiris unu manon de la mortintino, vekriante kaj ŝrikante, kisante ĝin.

Dum kelkaj momentoj, dum la popo estis kantanta, malantaŭ la ĉerko staris, nudkapa, ankaŭ Aranĝelo Isakoviĉo, sub tegmento plena da kolomboj, kaj altiris atenton al si. Li estis nesatdorminta, elĉerpita kaj ŝrumpiĝinta. Li rigardis ĉirkaŭ si per rigida rigardo, enpensiginta, strabe. Li kredis, ke estas honeste la edzinon de sia frato entombigi en proksimo de la frata, anstataŭ de sia, domo.

Dum oni plorante kaj kisocele estis proksimiĝantaj al lia mano, li staris preskaŭ rigide, vidante nenion, kaj aŭdante nenion. Kredanta, ke li surpriziĝos, se lia bofratino estos mortinta, Aranĝelo Isakoviĉo estis nun, ankoraŭ, terure surprizita, kiam ŝi vere estis morta. Kurbiĝinta, li fiksrigardis siajn malplenajn manojn, antaŭ tiu larmara homamaso, kvazaŭ el ĝi estus elfluginta kaptita turto. Rankora kaj verda, li staris apud la morta korpo, ĝis kiam li komencis skuiĝi kaj larmi.

Abrupte en la domo de lia frato, al li ekŝajnis, ke pri ĉio ĉi nur li kulpas, nur lia aĉa seksdeziro je la korpo de la bofratino, lia perfida plano loki ŝin en sian domon, kaj ekhavi ŝin, dum lia frato estos en fremdlando militanta. Ŝajnis al li, ke lia frato Vuko devis foriri, ke ŝi devis malsaniĝi kaj pereji, nur por ke li povu, mallongtempe, satĝuegi. Al li ŝajnis, ke ĉiujn okazaĵojn, kiuj okazis, ĉiujn ĉi tiujn multajn komplikajn kaj vanajn suferojn kaŭzis li, nur por dum momento povi satigi la malsaton de sia internaĵo.

Krom tio, li neniel povis kompreni, ke ŝi nun estas morta, kaj ke nun venis la fino al ĉio. Male, li mense, pripensadis kaj flustradis pri ŝi, precipe

pri ŝia korpo, kvazaŭ li ilin daŭre vidados, rigardados kaj havos. Obstine li rigardis ŝian ĉerkon, kiun tute kovris kandeloj, kaj ripetadis mense, ke tio estas tiu virino, kiu, la nura, estis senfine agrabla ankaŭ post la nokto, kiam li kontentigis sian deziregon.

Ŝiaj okuloj estis ankoraŭ en lia memoro. La granda, blonda rigardo ŝia, eksterordinara ankaŭ dum ŝia forpaso, kiu lumis super li, kaj kiu ne estis perdanta sian bluan brilon en lia animo. Al li venadis, ankoraŭ ĉiam, la ideo, ke krom volupton kaj delicon, bone konatajn, li povis alhazardi ankaŭ ion, kio estas nepasebla, kaj levas onin super la vivo, en ian ĉiaman bluejon. Komercente, pesante sur pesilo arĝenton, vendante brutaron, Aranĝelo Isakoviĉo vidis, ke li estis nur malŝaparanta sian tempon, kaj ke, anstataŭ tio, li povis tuŝi ion belegan, eksterordinaran, kio kiel pinto de arĝenta abio, elkreskinta el la tero, tuŝadis la mezon de lia brusto, en plena mallumo, en kiu al li ŝajnis, ke li de nun vivos.

Kelkajn momentojn post tio, oni forportis la ĉerkon sur la monteton, kaj surŝutis ĝin, kaj servistoj penplene entiris Aranĝelon Isakoviĉon en kaleŝon. Li estis rigidiĝinta, kaj ne povis paŝi.

Post la entombigo de la sinjorino Dafina, kaj foriro de Aranĝelo, la loĝloko sub la arbaro kaj domo de Vuko Isakoviĉo denove dronis en aŭtunon. Humideco ŝoviĝis tra muroj, desur tegmentoj ŝpruce fluis pluvo, kreskaĵoj estis sekiĝintaj, forputrintaj en koto. Dum tagoj neniu absolute neniu kaj nenio estis sur la monteto; nek sur teraj deklivoj de la monteto, nek sub la domoj. Ĝis la ĉielo, super ĉiuj salikejoj, super montetoj, monotonaj profundejoj kaj grizaj plataĵoj, videblis tiu densa, nebula pluvo. Ranoj komencis ensaltadi domojn kaj subterejojn, akvo tralikiĝis, sub ŝtipojn, sur kiujn oni dissternis kuŝejojn.

En la domon de Vuko Isakoviĉo enloĝiĝis la servisto de Aranĝelo, eksjuna Ananio, kun sia maljuna edzino kaj filinoj, altrenante konstante fojnon kaj pajlon, tutajn stakojn da maizo. Ĉiam ĉirkaŭata de hundoj, kun surŝultra palto, nur en ĉemizo, tute surkreskita de barbo kaj brovoj, tiu maljuna hundo daŭre dormis sur la domsojlo, kovrita kaj envolvita en multegajn lankovrilojn, pro kio oni neniam sciis, kie estas lia kapo, kaj kie estas la piedoj, ĝis kiam li komencis malkovradi sin, maltrankviliĝante, kiel porkido en sako, ke subite, el tiuj densaj harojn li levis siajn malgrandajn, sed plene klarajn kaj diafane bluajn okulojn. Tutajn tagojn oni lin povis vidi, sidanta sur la tero serĉante lokon sekan, fiksrigardanta senĉese la pluvecan horizonton, kaj teron, kaj loĝlokon, kiu, pro torentaj akvoj, kun siaj argilmuroj, neprizorgitaj brutoj, nekovrita greno, estis pereanta.

Ananio sian familion loĝigis en antaŭdoman porĉegon, sur tero. Li volis nek malfermi, nek disrompi la pordon de la domo, pensante ke ĉio sendube estos solvita, se Vuko Isakoviĉo ne revenos.

Li sur sia okulfrape pala kaj malsanema vizaĝo portis la hororon pro ĉio, kion li sciis kaj vidis, sed ne kuraĝis diri. Kvankam lia avino kaj filino sciis nenion, li sciis ĉion. Li sciis, tre bone, kial la sinjorino Dafina estis venigita en la domon de lia sinjoro, kaj ĉion, kion kun ŝi, tie, Aranĝelo faris. Ŝian malsanon kaj morton li rigardis elproksime, vidinte ofte ankaŭ tion, kion Aranĝelo kaj lia bofratino eĉ ne konjektis, ke li povis vidi. Vivante dum jaroj ĉe Aranĝelo Isakoviĉo, li ties kromvirinojn memoris kiel Sanktan Bibliion, samkiel li konis ankaŭ liajn komercajn maŝinaciojn. Ananio same ne pretervidis, ke liaj du pli aĝaj filinoj, jam certan tempon, ofte, neatendite, eliradis el la ejoj de Aranĝelo, sed li sciis, ke ili ne estas sufiĉe beletaj, por ke tio daŭru dum jaroj, kaj ke tio, porĉiame, garantiu al li senzorgan vivon. De sia sinjoro li ricevis venenan deziregon havi arĝenton, kaj fadenumis arĝentmonerojn sur ŝnuron, kiun li portis ĉirkaŭ la zono, sur sia nuda korpo. Iam tiom malsovaĝa, ke li ne povis eĉ muŝon mortigi, ne povis gorĝbuĉi ŝafon (parolante, ke estas peko verŝi sangon), li iĝis la plej ruza kaj la plej senindulga rabisto, kiun, en gregejoj kaj sur la ŝipoj de Aranĝelo, oni timis kiel flagran fajron, pro liaj ruzaj kaj malnoblaj intrigoj, per kiuj li scipovis, antaŭ Aranĝelo Isakoviĉo, malbonfamigi ĉiun, kiun nigriĝi li volis. Kvankam sen viraj idoj kaj viraj samfamilianoj, li tamen havis kulturitan teron, kies kvanto konstante pligrandiĝadis. Por li la alveno de la sinjorino Dafina estis forta bato, same kiel por li ŝia morto estis agrabla okazaĵo, kiu denove vekis lian esperon. De sia sinjoro li ellernis atendi kaj antaŭvidi, tial li atendis, ke Aranĝelo Isakoviĉo rimarku lian la plej junan filinon, kiu ĵus atingis konvenan aĝon. Tiu lia filino, grandmama kaj grandkoxa knabinejo, estis ĝuste el tiaj, kiajn Aranĝelo Isakoviĉo altetaksis, ŝi umis, cetere, mem, antaŭ la okuloj de Aranĝelo, flavecaj kaj malklaraj, ĉiam dismalfermitaj, kliniĝante, tuŝante lian manon, sed je granda embaraso de ŝia patro, ŝajne, ĉio ĉi tio estis vana.

Aranĝelo Isakoviĉo iĝis, post la alveno de la sinjorino Dafina en la domon, stranga, kaj dum ŝia malsano ankoraŭ pli stranga. Virinoj por li kvazaŭ ne plu ekzistus, dum lia rigardo, antaŭe hela kaj flava, kiel la rigardo de kato, iĝis malklara kaj levita, ien, super la kapon de Ananio. Post la morto de sinjorino Dafina, kiam Ananio ofte iris al la sinjoro, ĉiufoje venigante kun si ankaŭ sian la plej junan filinon, li kun konsterno vidis, ke ĉiuj liaj esperoj estas vanaj, kaj ke Aranĝelo Isakoviĉo jam havas nek la ruĝan, malsekan buŝon, ĉiam plenan da turkaj dolĉaĵoj, nek la sindetenan rideton de malĉastulo, nek la brilon de pupiloj, per kiuj li, antaŭe, rigardmezuris ĉiun inan estaĵon, de la kruroj kaj de la dorso.

Li vidis sian sinjoron nigriĝinta, dormomanka, silentema, tiom, ke dum multaj tagoj li elparolas nur kelke da vortoj. Tra fendoj, sur la pordo, Ananio rigardis lin ofte plurajn horojn sidanta, kurbiĝinta, kaj rigardanta siajn malplenajn manojn.

Tamen, ĉar li kuraĝis paroli pri siaj sekretoj al neniu, li parolis, pri strangaj okazaĵoj, kiuj antaŭis la morton de la sinjorino Dafina. Tion Ananio tre ege volonte rakontis, detalante, kiel ŝi ŝrikis kaj vidis, en mallumo, sur akvo, sian edzon, en la formo de rano, el kiu gutfluis sango, kaj poste, en kuŝejo, disduonigitan, post tio kompletan, en blanka forno, kun elfluantaj okuloj. Precipe bele li menciadis mirigajn okazaĵojn, kiuj sinsekvis post ŝia alveno en la domon, pro kio la aŭskultantoj sentis formikotikladon en la haŭto.

Li rakontis: kiel ĉevaloj estis dronigontaj Aranĝelon Isakoviĉon, puŝiĝante ĉirkaŭ li, kaj plenigante lian buŝon per siaj kolharoj dum li estis dronanta; kiel iaj skaraboj kaj formikoj formanĝis la manon de servistino, kiu, ordinare, la sinjorinon Dafina kombis, kaj kiel, en la domo, multiĝis serpentoj, kiuj volontege elmetadis ovojn sub ŝia kuŝejo. Cetere, Ananio firme kredis, ke ŝi elirados el sia tombo kaj hantos tra la vilaĝo.

Sub malklara kaj pluvoporta, nuba ĉielo, kiu fumiĝis, kvazaŭ pro ia fumo, en kotaj kaj malsekaj tagoj, en kiuj kanoj kaj salikoj, ĉiam pli profunde staris en akvo, en mallumaj noktoj, en kiuj, pro malvarmo, oni dormis amase, sur tutaj montoj da ŝafpeltoj kaj ŝaflanaĵoj kovriloj, kiu odoris je ŝafoj kaj ŝafidoj, apud la lumo de meĉo, tiel do la sinjorino Dafina iĝis, laŭ la volo de Ananio, iaspeca timigilo por la tuta vilaĝanaro. Ŝi komencis malbonigadi akvon, pereigadi brutojn, sorĉi, je brustoj kaj ventroj, malsanojn, kiujn oni ne povis klarigi.

Komenciĝis amasmortado de ŝafoj, amasmortado de dikaj porkoj, virinoj komencis suferi mammalsanojn, ekis teruraĵoj kaj pereado en la ĉirkaŭejo. Ĉiuj kvazaŭfreneziiĝis. Diskoniĝis, ke ŝi gekuŝis kun la frato de sia edzo, kaj la tuta naŭza sekreto de ŝia vivo en la domo de Aranĝelo, kaj ĉiuj detaloj de ŝia malsano. Voĵmeze, ĉe la enirejo en la vilaĝon, oni trovis sufokitan infanon, kies devenon oni neniam eksciis.

Kiam la pluvo iomete ĉesis, kiam komenciĝis belaj aŭtunaj tagoj, super malplenaj, flavaj kampoj, super salikejoj, en kiuj aperis senfinaj, verdaj konfervoj, nokte, kiam lunlumo estis venanta de arbaro, kiu vastiĝis montosupren, ŝi aperis, rajdante sur bastonoj, rajdante sur jugo, grimpante sur morusujojn. Iu vidis ŝin kaŭranta sur gruo, malantaŭ la domo de Isakoviĉo, blanka kaj granda.

Ŝafoj malaperadis dum tiuj tagoj, kiel neniam antaŭe. Eĉ el aliaj loĝlokoj ŝafoj perdiĝadis, kaj bienestroj trovadis ilin ĉirkaŭ la domo de Isakoviĉo. Pro tio komenciĝis tumultado, pli kaj pli granda, en la ĉirkaŭaĵo, pro kio okazadis eĉ batkvereloj, kiujn partoprenis ankaŭ virinoj. Sed la Sinjorino Dafina sufokadis ilin kaj mortigadis nokte, sidiĝante sur iliajn dikajn, kamparanajn ventrojn, genupremante iliajn gorĝojn, postlasante kolikojn, variolon kaj ho-reon. Foje, en nevarma nokto, kiam komencis faletadi la unua neĝo, ŝin vidis iu gravedulino, antaŭ stalo sia, en la formo de blanka bovino, kaj falis morta.

Nur Aranĝelo Isakoviĉo, kiu dum tiuj tagoj preterveturis sur sia kaleŝo kaj trakontrolis la tombon, kaj ordonis, ke super ĝi estu farita ligna tegmento kaj estu dismetitaj ikonoj, kiujn li estis alportinta, portis ankoraŭ en la okulo eksterordinaran bildon de sinjorino Dafina, de ĉiuj ŝiaj glataj artikoj, dolĉa karno kaj helaj ŝultroj. Por ĉiuj aliaj, ŝi iĝis granda, blanka ŝajnaĵo.

La apero de vampiro, kiun preskaŭ ĉiuj jam renkontis, nur kompletigis la malfeliĉon, kiu trafis la loĝlokon, kiam Vuko Isakoviĉo jam estis, kun la plej bonaj homoj, foririnta en militon. Ĉirkaŭ la sonorilturoj oni ne plu ariĝadis preĝocele. En domoj bofilinoj komencis suferi. La bopatroj perdis la kapon pro la sufero, dum puŝetado kaj baraktado, nokte, en garbejoj. Eksjunulinoj, elirante matene super la vilaĝon, sur monton, ĝis putoj, teruriĝis, rakontante siajn miraĵojn unu al la alia, krucsignante, samtempe, ĉiam pli rapide. Fulmo devis frapi la vilaĝon, por cindrigi ĝin.

La edzino de Arkadio, la servisto de Isakoviĉo, kiu nomiĝis Stana, famiĝis. Ŝi lokiĝis kun malgranda infano en la kabanon, en kiu la sinjorino Dafina pasigis lastan nokton sian, kun la edzo. Tiun dometon, kiun surkreskis herboj apud brutejoj de Isakoviĉo, Stana speciale ordigis. Ĝia kanaro ne plu likis, ranoj ne plu ensaltadis, fendojn sur la pordo ŝi ŝtopis per arbustoj. Ene, sur granda, argila stablo troviĝis larĝa kuŝejo, kiu povis multon elteni.

Vivante plurajn monatojn sola, plorante pro sia edzo, ŝi longe defendis sin kontraŭ porkistoj kaj paŝtistoj de Isakoviĉo, kiuj antaŭ ŝia pordo melkis ŝafinojn, sed finfine, iun nokton, kiam ŝi estis trinkinta varman lakton, pro kio ŝi malbonfartis, ŝi al unu el ili permesis tranokti, ravinte lin per sia ĉarmo, post kio la malfeliĉulo komencis babili antaŭ siaj kamaradoj, kiuj post li alsturmis la kabanon de Stana.

Samkiel fojfoje ekzistas belega bluo en la fundo de la ĉielo, en angulo de horizonto, eĉ tiam, kiam la tuta tero kaj la tuta videjo dronas en koto kaj malsevena vakeco de aŭtuno, tiel en tiu tempo, en la kotaĵo de la loĝloko de Isakoviĉo, en unu angulo de tiu regiono, plena da marĉaĵoj kaj kanoj, arbostumpoj, truoj kaj klusoj, troviĝis tiu kabano en kiun oni, kvazaŭ en paradizon, eniradis.

En alta, densa herbaĉo, ĉirkaŭ ŝi, estis leo, antaŭ ŝia pordo kukurboj flavis. Super tegmento ŝia altstaris juna morusujo. De la sojlo de tiu dometo, laŭlonge de monta deklivo, malproksimejo videblis, super la rivero, ĉiam. El la tero tuta eliĝadis, detie, varmo.

Infana ploro ne nur ne repuŝadis de tiu kabano ŝiajn amorantoj, sed ilin, ŝajne, allogis. Ili iris al ŝi, kvazaŭ al procesio.

Tiu Stana, timema ankaŭ antaŭe, ŝrikis pro ajna bagatelaĵo, sed kiam ankaŭ ŝi falis, ekvidinte, aŭrore, vampiron sur sia sojlo, Ananio, kun kies filinoj ŝi estis en intima amikeco, devis promesi, ke, nokte, propramane, malproksime, li enbatos kratagan palison en la tombon de la sinjorino Dafina.

Atendante, do, kvietan, helan nokton, ili komencis pasigadi vesperojn septembrajn, ne sciante, ke en fremdlando, iliaj karuloj kaj amatoj, forlasinte la mortintojn, revenas por pasigi la vintron.

Por ke finfine kvietiĝu kaj hundoj kaj homoj en la loĝloko, ekiris, do, Ananio, por enbati en la tombon de la sinjorino Dafina kratagan palison.

Starante nudkapa, en antaŭpordo, li flaris la nokton, kiu estis malleviĝanta, kiel hundo snufanta iun, kiu proksimiĝas elfore. En la fundo de la horizonto fumis violaj plataĵoj kaj agititaj kanejoj, sub malfermita, flava, lumigita ĉielo. La rivero estis preterfluanta, malhela, sub holmejo, super kiu estis nube kaj mallume, pro kio al li ŝajnis kvazaŭ li jam estus en kompleta mallumo. Elrigardante por vidi, kia nokto estis malleviĝanta, li vidis venton sur velkintaj herboj, kaj malvarmon en la okuloj de hundoj, kiuj estis ariĝintaj ĉirkaŭ li. Blekado de brutaroj kaj interkriado de paŝtistoj kvietiĝis.

Kion li decidis fari, tion li diris nur al sia edzino kaj filinoj, kaj al la edzino de Arkadio, kiu estis ĉiutaga gasto en ilia hejmo, kaŭrante kun la virinoj ĉirkaŭ fajro, ĝis malfrua nokta horo, fritante fazeolon kaj kukurbojn, rakontante amorajn travivaĵojn, ne siajn, sed laŭŝajne de aliaj virinoj el la vilaĝo.

Kun hakilo kaj paliso, Ananio ŝoviĝis tra barilo, tuj kiam lunlumo aperis.

Tuŝinte per la peltkitelo barilon, li preskaŭ revenis, tiom li ektimis pro la neordinara aspekto de la kampo, arbaro kaj monto, kiuj leviĝis antaŭ li. Virinoj, kiuj fab-aŭguris, atendis, ke li iomete malproksimiĝu, antaŭ ol ekiri post li, nur kiam li jam komencis ŝoviĝi tra barilo. Ili ekstridis timoplene, vidinte ke li ekbaraktis, kaj nur tiam ili sentis senŝarĝiĝon, kiam li mallaŭte alkriis, ke tie troviĝas nenio.

Dum li rapidegis deklivosupren, ili iris post li, je certa distanco, flustrante zorgoplene, kaj krucsignante ofte, irante nur en lunlumo, ne enpaŝante ombrojn de arboj kaj arbustoj.

Ananio estis paŝanta kuraĝe, portante sur la ŝultro hakilon kaj palison, irante, kvazaŭ kun prikaŝita timo, nur tra grandaj ombroj de arbustoj kaj kverkarboj.

La hela lunlumo sur la kampo kaj deklivo de monto estis lin kvietiganta, kaj li, per siaj palpebrumantaj okuloj, kontente sorbadis la noktan ĉielon kaj kvieton de la ĉirkaŭaĵo, en kiun li ĉiam pli profunden eniradis, sentante diversajn ventojn kaj ventetojn, kiuj blovis ĉirkaŭ lia vizaĝo, kiun kovris akraj haroj.

Tamen al li estis agrable, ĉar li ne estis sola, ĉar lin sekvis la virinoj, kiujn li vidis malrapide irantaj post li, piedpremante herbaĉojn.

Alveninte sur la monteton, kie la velkinta herbo estis precipe densa, pro kio ŝajnis al li ke li tretas la supron de ia fojnostako, li komencis, malbonhumore, murmuri, ĉirkaŭirante la tombon, ĉar la rando de la ligna tegmento, super la tombo, ne permesis al li fari svingojn kaj batojn.

Elektante konvenan lokon de ĉiuj flankoj, diskurante dekstre aŭ maldekstre, li ĉiam per la kapo aŭ dorso frapiĝis kontraŭ la tegmento, kaj preskaŭ faladis nazaltere, konsterniĝante, tiam, ĉiufoje, pro la tuŝo de la tombo. Rigardmezurinte finfine la lokon, li metis sur la teron la pintan palison kaj turniĝis ĉirkaŭe, ankoraŭfoje.

Povis esti eble ĉirkaŭ noktomezo, kiam li estis pretiĝanta por enbatado, kaj kiam la brutejoj kaj domoj kaj subterejoj estis dronintaj en kompletan mallumon kaj kvieton.

Ega, aŭtuna malvarmo de herbaĉoj, akvo kaj valoj, kiuj vastiĝis senfine, sterniĝinta estis, sub li, kiel senfundejo, pro kio al li ekŝajnis, ke la stela, malluma ĉielo estas proksime al li. Kelkajn paŝojn antaŭ la arbaro, antaŭ arbusto, li rimarkis virinojn, kiuj timoplene kaŭris flanke, atendante, ke li sian taskon plenumu.

Apogita al kolono, sur kiu estis staranta tegmento, super tombo, Ananio estis frostiĝanta kaj ŝvitanta, lasita tiel al si mem, en la nokto, sur la supro de la monteto, apud la tombo de tiu virino, kiu alvenis subitege en lian domon. Li la domon de Aranĝelo konsideris ankaŭ sia domo.

Ŝi kvietiĝu jam, diradis li mense, tiam ankaŭ ili ĉiuj kvietiĝos. Aranĝelo rimarkos lian la plej junan filinon, kaj li, Ananio, restos kvieta en ĉi tiu domo, ĝis kiam Vuko Isakoviĉo revenos el la milito, kaj ankaŭ tiam, se Vuko tute ne revenos. Kvietiĝos ankaŭ la tuta vilaĝo. Post tiomaj sendormaj noktoj, li povos denove dormi.

Li rektiĝis tial kaj, en plena nokto, frapegis la palison, tiom forte, kiom povis. La paliso renversiĝis, kaj li saltis super ĝin, rektigis ĝin denove, batante ĝin kiel freneza. Al li ŝajnis, ke li aŭdas, ke ĝi traigas tertavolon, mortotukon kaj la mortinton.

Virinoj, tamen, kiuj kaŭris ĉe arbusto, timiĝinte pro lia subita batado kaj ŝvingado, aŭ pro ia lunlumo, ŝajne, ekŝrikis kaj komencis fuĝi montosuben.

Pro tio ankaŭ Ananio ektimis, frapis per la kapo la tegmenton, kaj, maltrafinte la palison, kiu jam estis profunde enbatita en la teron, bategis per la hakilo sian piedon.

Falinte sur la tombon, li havis, tamen, sufiĉe da forto por hurlante ekkuri post la virinoj, kaj ŝanceliri ĝis la barilo de sia domo, timiĝinte hundojn kaj ŝafojn kiuj diskuris. Tie, dum li estis ŝoviĝante tra la barilo, kun li denove okazis diablaĵo, lia peltkitelo kroĉiĝis al la barilo, ĝuste ĉe la kolo, tiel ke li pendis kiel strangolito, ĝemante, kun la okuloj malfermegitaj, terure griziĝinta, ĝis kiam lin hundoj, antaŭ mateniĝo, trovis kaj de kroĉis de la dornaĵoj kaj rondligoj, ululante terure.

Dume ankaŭ la virinoj suferis terure, ĉar, en la ombroj de la nokto, kaj en lunlumo brila, ili perdiĝis kaj disfuĝis, pro kio ili, ŝrikante, vane alkriadis

unu la alian en la mallumo, falante en fosaĵojn, kaj kovrante per la manoj kaj jupoj la vizaĝon, por almenaŭ ne vidi la diablon, kiu ilin sendube forportos.

Stana, la edzino de Arkadio, kiu ekiris post Ananio, pro scivolemo kaj timo, kiu ŝin jam plurajn tagojn turmentis, ĉar ŝi tutnokte pensis nur pri lupfantomoj kaj vampiroj, timigante per sia demandado pri la subteraj kaj supernaturaj estaĵoj siajn litamikojn, paŝtistojn kaj porkistojn, pro kio ili tute ne kuraĝis eliri el la domo, suferis plej multe, kurante oblikve, montosuben, apud dornoplana arbusto, ĉar ŝi trafis, en mallumo, tuj ĉe la unuaj enfositejoj, grandan kavon, plenan da koto kaj grenventumaĵo por domkonstruado, kaj enfalis, ĝis la brusto, en ĝin, ŝrikante pro teruro. Eliĝinte detie, tute kotumita, ŝi enfalis ian ŝlimkavon, el kiu ŝi, nek dekstre, nek maldekstre, povis trovi eliron, kvankam ŝi estis svenanta, aŭdinte ranojn ĉirkaŭ si. Plorante, ŝrikante, elĉerpita, kvazaŭfreneza, ŝi ekvidis tiam, antaŭ si, blankan, larĝan vojjon, kiu gvidis al vilaĝo, sed kiun ŝi ne povis atingi. Tiu vojo, kiun, ordinare, tage, ŝi multegajn fojojn vidis, kiu gvidis antaŭ ŝian dometon, ŝajnis al ŝi nun blanka, terura, en lunlumo, plene nekonata. Mortotime, preskaŭ sufokiĝante, ŝi ŝajnsentis, ke akvo kaj koto penetras ŝian obezan junan korpon, plenan da rondaĵoj, kaj ke ili atingos ŝian gorĝon, kaj sufokos ŝin. Kun tiu koto kaj akvo, kiu saturis ŝian bruston, ŝi rememoris sian malĉastadon kaj siajn litamikojn, kaj kune kun ili ankaŭ sian edzon. Ĝuste tiel, kiel ŝi aŭdis, ke al la sinjorino Dafina venis ŝia edzo, ŝi ekpensis, ke nun ankaŭ al ŝi venos ŝia Arkadio, kiu eble jam estas entombigita.

Gapokule, dronante en la ŝlimkavo, tiam, tiu ronda, ordinare ĉiam pura, ridetanta, malgrandeta vilaĝanino, kun nigraj harbukloj, sentis la tutan teruron antaŭ la morto, kaj, vere, ŝi vidis Arkadion, en akvo, antaŭ si, kuŝanta diskurra, kun larĝe disetenditaj brakoj, mortinta, sub plantoj kaj ŝlimo, tia, kia li estis tiun vesperon, tie, en malproksimo, apud Ŝtokŝtato, entombigita, kiam lin du kamparanoj trovis kaj, kaptite je la kruroj kaj brakoj, ĵetis en Rejnnon. Ŝi eksentis, samtempe, ke inter ŝi, ankoraŭ viva kaj varma, kaj li, morta, ekzistas tuta netrapasebla profundego. Vere, tio, kion Stana vidis, estis nur ŝia freneza miraĝo kaj rebrilo de vegetaĵoj kaj lunlumo tiunokte, sur akvo, en kiu ŝi kaŭris, enfalinta profunde, kriaĉante kaj laŭtante al Arkadio, kiu pereis la unua, dum la milito, kaj jam delonge ne kuŝis ĵetita en riveron, kiu lin forportis sub salikojn, kiuj estis samaj, kiel en lia lando.

Mizera kaj kvazaŭ tuta en nebulo, en elvaporko de liaj ĉarmaj ĉevaloj, la servisto de Isakoviĉo moviĝis, jam du monatojn, la unua, inter ĉiuj kiuj estis foririntaj hejmen. Li estis leviĝinta el akvo kaj el morto kaj blanka, kiel juna akacio, li baraktis, en fremdlando, aperante super ŝoseoj, kien li, viva, kun la soldataro jam pasis, kie oni lin trovadis drinkintan, postrestintan malantaŭ la armeo, vestitan en inajn jupejn.

Malbonodora, same kiel staloj kaj brutejoj en kiuj li estis kreskinta, la servisto de Isakoviĉo estis konservinta, en sia esto, tiom da delikataj fadenoj, blankaj kiel lunlumo, kiuj lin estis ligantaj al la vivo, ke la edzino vere povis senti lin revenanta tiun aŭtunan nokton. Ŝi lin serĉis perokule sur la loko, kie li ne estis, kaj al ŝi ŝajnis, ke ŝi lin vidas tie, kie li tiam ne estis.

Maldiligenta, maldiligentega tiom, ke li dormis paŝante, Arkadio, tiun nokton, vere, estis eniranta la vilaĝon, en la alia flanko, parolante, tra la nazo, kelkfoje, kelkiam, al sia porkino, kiun li komencis peli jam el Peĉao. Diafana, tralumata de lunlumo, li estis tiel for de ĉio ĉi tio, kio, tiun nokton, en lia vilaĝo estis okazanta, ke lin ankaŭ lia edzino, en sia mortotimo kaj pensoj, nur konjektis, kvazaŭe ian praan odoron, kaj nur kiel la nuran ŝajnaĵon ekvidis, kiel delonge pasintan ombron.

Aperinte, desur monteto, super la vilaĝo, dum ili estis fuĝantaj, timpe-lataj, de la tombo de la sinjorino Dafina, Arkadio kviete pelis la porkinon al sia kabaneto, sub morusujo.

Neniu povis lin ekvidi, neniu ja lin ekvidis, de vojo lia estis fuĝantaj, ululante, eĉ la hundoj.

Kiam lia porkino haltis, ĉe la enirejo en la vilaĝon, li, tiel dormetanta, renversiĝis super ĝi, tutlonge. Leviĝinte, maldiligenta, tiom maldiligenta, ke li baldaŭ denove ekdormis irante, murmurante tra la nazo, la morta Arkadio iris rekte al sia hejmo. Li haltetadis nur apud staloj, kaj kun ĝuo enspiradis odoron de ĉevaloj, fiksaŭskultante hufobatojn.

Finfine, kiam li, tiel blanka kaj diafana, atingis sian kabaneton, li tute ne koleris kontraŭ la litamikoj de sia edzino, inter kiuj unu, duonnuda, dormis sur stablo, kiu estis, antaŭe, lia kuŝejo.

Male, neniom malĝoja, aŭdinte infanan ploron, li komencis saltetadi malantaŭ sia porkino, gaja.

La vilaĝanoj dormis, malgraŭ la kriĉado kaj ŝrikoj, tiun nokton, kaj neniu vidis Arkadion, neniu aŭdis tiujn lupfantomojn, pri kiuj Ananio, la sekvan tagon, tiom parolis.

Ananion oni trovis, duonmortan, sur barilo de la domo de Isakoviĉo. Li parolis ion, kvazaŭdelire, pri Arkadio, kiu antaŭ li aperis morta, kaj diris, ke Arkadio ne plu revenos.

La sekvan tagon, dum Stana, la edzino de Arkadio, estis transportita, tute perpleksita pro teruro kaj miraĝoj de tiu freneza punkto en sian domon, Arkadio jam paŝis malproksimen, ĉirkaŭ la brutejoj kaj staloj de Isakoviĉo, kverante kaj tenervortante dolĉajn frazojn, kiujn li elparoladis tra la nazo, al ĉevaloj, sur plugejoj, nevidebla kaj nekonata, diafana kaj facila, kiel fumo post bataloj.

Post iomo da tagoj, kiam la vilaĝo estis kvietiĝinta post ĉiuj ĉi malordinaraj eventoj, kiuj okazis tiun nokton, revenis el milito, vere, homo, viva kaj videbla, la unua, kiu vere revenis.

Sekulo, la sonorilisto de Isakoviĉo, kun monstrigita vizaĝo kaj duone senhăutigita kapo, sen unu okulo, plorante.

En la vilaĝo ĉiuj perpleksiĝis pro liaj rakontoj. Ploris kaj junuloj kaj maljunuloj, ĉiuj vekriadis de mateno ĝis mallumiĝo. Ananio estis la unua, kiu ekkompatis lin, kaj, je konsterno de ĉiuj aliaj, donacis al li ŝafon. „Mi ĝin ŝtelis de vi, diris li, je la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Spirito Sankta, kaj mi redonas ĝin al vi.“ Kaj ne nur tion. Li ankaŭ diris, ke oni devas ne ŝteli, kaj ke oni maldevas mortigadi.

La piedo de Ananio, kiun frapis la hakilo, ŝvelegis, kaj li iris, tra la vilaĝo, redonante jen ŝafon, jen ĉevalon, jen grenventumaĵon, ĉion, kion li estis ŝtelinta printempe kaj somere.

Kiam la novaĵo, ke Isakoviĉo restis viva, kaj ke ankaŭ multaj aliaj estas vivaj en Germanlando, kiuj travintros en fremdujo, sed kiuj revenos printempe, la venontan jaron, oni ektamburis, ekmuzikis kaj ekdancis, en akompano de ŝalmoj kaj flutmuzikiloj, kaj la tuta vilaĝanaro ebriiĝis drinkante morusbrandon, kruccsignante kaj interkisante, super larĝaj inundejoj kaj marĉegoj, kiuj kreskis de tago al tago, ĉiam pli.

Unu-du tagojn, post tio, komenciĝis neĝado kaj kirlovento.



X.

SENFINA BLUA CIRKLO. EN ĜI, STELO

La vintro en la 1744-a jaro estis longa kaj frosta. Slavonia-Danubregiona batalionaro, dissemita en urbetojn kaj malriĉajn vilaĝojn de Oberfalco, multe suferis, pro kirloventoj kaj frosta vintro.

Homoj estis mortantaj pro koliko, en staloj kaj brutejoj, kaj sub sennuba, glacia ĉielo, sur malmola tero, sur kiu formiĝis neĝa krusto. Ili ebriiĝadis, saltetante pro malvarmo, ariĝintaj ĉirkaŭ fajro, lamentante en la akompano de guzloj pri la caro Lazaro.

Poste la tutan regimenton kaptis ia dormemo, ia nesana dormo, malfacila kaj senracia. Oni dormis kaj ronkis en pajlo kaj en domoj, en subtegmentoj kaj fosaĵoj, kaj eĉ sur sterkejoj. Nokte ili iris rabocele, kaj en mateniĝo, revenadis, ĉagrene kaj malgaje.

Iuj el la soldatoj de Isakoviĉo, kvazaŭsorĉitaj pro beleco de la neĝvualitaj arbaroj kaj montoj, foriris ankoraŭ pli malproksimen, vagocele. Kelkajn tutajn tagojn ili pasumis en ĉirkaŭaĵo, ĝis kiam ili perdis la forton. Tiam ili faladis en neĝon, frostiĝante. Iuj atingis eĉ neproksimajn loĝlokojn, pro kio ili forestis plurajn semajnojn. Tiuj intermiksiĝis kun la lokanoj. La gardantaroj devis perforte revenigi ilin, en la kampadejon, kie ili ĉiun tagon estis bastonataj.

Kutimiĝinte havi la samajn pensojn kaj sentojn, la tuta regimentarano antaŭsentis jam, ke tutcerte ne okazos la milito, granda, terura milito dum kiu ili gloriĝos, elstariĝos, pli ol iam ajn, iĝos vaste famaj. Same kiel neĝo kovris spurojn de radoj kaj hufoj malantaŭ la regimento, tiel ankaŭ la silentado de la estro kaj germanaj oficiroj pri la regimento, silentigis ĉiujn interparolojn pri la bataloj kaj venkoj de la regimento. El Vieno estis venantaj neniam novaĵoj, kaj la regimento sentis sin neinvitita gasto, en tiu fremdlando.

Al la ĉirkaŭantaro, la regimento ekŝajnis dum ĝia alveno, malrida pro bataloj, odoranta pulve, kun disvolvigitaj flagoj kaj sangaj vunditoj, stranga kaj terura. Baldaŭ post tio falis neĝo, kaj amaso da tiuj fremdaj kaj senbridaj soldatoj dronis en silenton kaj neĝvualitan teritorion, pro kio ilin la homoj

eĉ forgesi komencis. Ili famiĝis pro sia neelĉerpebla vireco, pri kiu, en apudaj vilaĝoj, disaŭdiĝis mirrakontoj.

Sen regula ekzercado, dividita kaj kaŝita en siaj subterejoj, sub stakoj de pajlo, sub hurdoj, neĝkovrita, la regimentanaro iĝis, tiel, nevidebla kaj preskaŭ neaŭdebla. Se ne estus iliaj hurlado kaj lamentado en la akompano de guzloj, kiuj estis tiel monstraj kaj malĝojigaj, ke virinojn eklarmis.

La barono Berenklaŭo estis foririnta ien, plej multaj germanaj oficiroj estis disirintaj, kaj la regimento iĝis amaso da senhejmuloj kaj mizeruloj. Kelkloke, en neĝo, staris ankoraŭ certan tempon gardistoj, apud ĉaroj, sed poste malaperis ankaŭ ili.

Neĝo jam estis ĝisgenua, ĝi kovris la nudajn branĉojn kaj arbajn trunkojn. En griza horizonto grakis korvaroj. Sub lunlumo, aperadis lupaj gregoj.

La tuta sanga gloro de la regimento estis plene forgesita, kaj la fakto ke multegaj regimentanoj pereis, iĝis tute malgrava. Ĉio ĉi finiĝis en senlima mizero. Ĉiuj frostis kaj tremis pro intensaj frostoj, dum tagoj estis pasantaj malrapide.

Isakoviĉo vivis en la regimento, pli ol en domoj, kun oficiroj, kvazaŭ mal-sanulo. Peza kiel fostego, li kuŝis, tutajn tagojn en ĉaro kaj sub ĉaro, volvita en ŝafajn felojn, sur pajlo kaj neĝo. Li kvazaŭ estus surdiĝinta kaj mutiĝinta, li silentis, treniĝante ĉe la ĉaro, transportante felojn kaj lankovrilojn desur la ĉaro al la radoj, kaj de la radoj denove sur la ĉaron. Li dormis, tiel, senorde, en luma tago, vekigante kaj kuŝigante oftofte, enpuŝinte la kapon sub felojn. Ŝanĝojn en tiun vivon enportadis nur ĉas-tagoj, kiam li persekuitis vulpojn, rajdante dum neĝaj postnoktoj, aŭ dum vesperkrepuskoj, kun senfine morna esprimo sur la vizaĝo. Gardantarojn li ne plu vizitadis, kaj tute ne eniradis la subterejojn kaj kabanojn de soldatoj. Al la raportoj kaj ordonoj de Berenklaŭo li preskaŭ ne reagis. Malgraŭ sia sovaĝa severeco, li neglektis la regimenton, kaj, dum multaj semajnoj, eĉ armilojn ne plu kontrolis. Li nur pensis kiel trovi iun, kiu lin anstataŭos dum li dormas.

Liaj botoj pro akvo kaj koto tute senkoloriĝis, kaj pendis sub liaj genuoj. Li staris en ili oblikve, kvazaŭ ĉiam estus duonebria. Lia pantalono, kiu estis pendanta kiel sako sur la ventro, estis ruĝa, sed kun longaj strioj, kiuj paliĝis pro akvo kaj suno. Rimenoj pendis sur li, kaj deantaŭe, kaj de malantaŭe. Peltvestoj kaj kamizoloj, haromankaj kaj senhariĝintaj, malvastaj, kun interplektitaj arĝentaj puftufoj, malebligis al li vidigi ian ajn soldatan sintenon. Per la manoj li tenis, plej ofte, sian dolorantan ventron, starante, kvazaŭ paralizita, malantaŭ sia ĉaro. Kun la brakoj mallevitaj, kun la kapo mallevita, li aspektis kiel senenergia, agonie kadukiĝinta ulo. Pendas ankaŭ lia submentona grasaĵo, pendis ankaŭ liaj palpebroj kaj brovoj kaj oreloj. Lia hararo estas falanta sur lian dikan, platan nazon, kaj tia, sen

alta bulĉapelo, nudkapa li ne nur jam ne aspektis kiel bravulo, sed aspektis kiel mortipreta homo.

Fiksrigardante per siaj pufiĝintaj okuloj longan vicon de vilaĝaj domoj kaj neĝvualitaj arboj, apogita dorse sur la radon de sia ĉaro, Isakoviĉo ne estis kvieta kiel urso en sia vintrodormo, sed, sub ŝajna kvieto de sia korpo, kaj de siaj movoj, li kaŝis la plej hororan malesperon kaj maltrankvilecon de sia animo. Oftofte li sentis, ke li eksaltos, ekhurlos, kaj komencos malracie, mordi per la dentoj sin mem, kaj ĉion, kio aperos sur lia vojo. Ĉio en li ploris kaj skuiĝis. Ripoj lin trapikadis kiel ponardoj, paralizante lian spiron.

La informon, ke lia edzino, la sinjorino Dafina, mortis, li akceptis plene kviete. Ŝajnis al li, kvazaŭ tiu informo estas venanta el alia mondo. Elĉerpita pro zorgo pri la regimento, li eĉ ne havis forton ekplori pri la edzino. Li staris kelkan tempon, apud malklara akvo, apud barko, konsternita, sed poste li kviete revenis en la kampadejon, kaj neniu lin vidis, ankaŭ la sekvajn tagojn, tre ekscitita, aŭ maltrankvila, pro sia mafeliĉo.

Mense, tamen, de tiu tago, Isakoviĉo sentis, kvazaŭ fendiĝus lia galujo, aŭ koro, aŭ stomako, ian frenezecan maltrankvilon, spasmon, korpajn dolorojn kaj spasmojn kaj animan frenezecon. Ke ankaŭ liaj infanoj nun restis sen patrino, tio lin ne tre korofrapis. Pri la frato li ja sentis kelkan malĝojon; li estis certa, ke lia frato Aranĝelo multon trasuferis pro la morto de la sinjorino Dafina. Ke lia frato eraris kun lia edzino, pri tio li neniam eĉ konjektis.

Vukon Isakoviĉon tiom konsternis dum tiuj unuaj tagoj, post la morto de la edzino, la horora sento, ke tio okazis subitege, ke ŝi mortis sen ia ajn kontakto kun li, ke ŝi malaperis ien, ke nun ŝi estas nenie, kaj kiam li revenos hejmen, se li entute revenos, li ŝin neniam plu vidos. Ke ili du, jen, disiĝis, malkuniĝis, sen ia ajn povo kaj volo, kaj sen sono. Ŝi estis tie, li ĉi tie. Same kiel hufoj estis deĵetantaj koton, kiel ĉaroj kaj radoj estis deĵetantaj gutojn, li ja tion estis rigardanta dum tagoj, sekvante la regimenton, sur ŝlimiĝintaj, neĝvualitaj vojoj, samtiel la tagoj, kiuj estis pasantaj unu post la alia, forskuadis kaj forĵetadis estaĵojn kaj objektojn, kiujn li amis, vivon lian, la vivojn de liaj soldatoj, alportante al li ĉiujn malagrablaĵojn, zorgojn, ofendojn kaj hororaĵojn. Lin faris furioza, senespera, senracia la prokrasto de lia rangaltiĝo al subkolonelo. Li pensis, ke li certe freneziĝos, vidinte kiel stulte, kiel facillanime ili militas, ordonante al li jen tion, jen alion, pelante lin jen tien, jen alien. Vuko Isakoviĉo jam antaŭsentis, kio ilin atendas, sub la nova imperiestro, kaj, kiel homo, songinta teruran songon, li fiksrigardis, terurplena, siajn soldatojn, ĉevalojn, ĉarojn, kampadejojn. Kun nuboj kaj matenaj steloj, Isakoviĉo portis en sia memoro, alte super si, ankaŭ la turmentojn de sia regimento, kriojn iliajn mizerajn, lamentkantojn en akompano de guzloj, iliajn terurajn kurpaŝojn, agonion de mortantoj, kriegadojn de bastonatoj,

vizaĝojn de pendumitoj, skurĝadon de lia soldato Sekulo, kaj la morton de la kara al li Arkadio. Senvortiĝinta kaj dormema, kvazaŭ surdiĝinta, li mense aŭdis, klarege, ploradojn kaj frustradojn. Flustris al li ne nur liaj soldatoj, kiuj hantis lin sonĝe, sed ankaŭ radoj, lankovriloj, sur kiuj restis spuroj de sango, skarpoj disŝiritaj, peltkitoj kaj piedvestoj demetitaj desur pereintoj. Finfine, tamen, estis nur malplenaĵo. En neĝo, ĝis arbaro, li vidis vilaĝojn kaj kampadejojn. Arbojn, horizonte, kaj malklaran panoramon. La lokoj, kie ili estis, la lokoj, kiujn ili preteriris, kvazaŭ jam ne ekzistus. De la batalo, dum la transiro de Rejno, li memoris nur la alsabliĝon de boatoj; de la batalo apud Caberno – nur unu straton.

La aresto kaj juĝproceso kontraŭ lia la plej altranga oficiro, Pisĉeviĉo, kapitano Ŝida, furiozigis lin tiom, ke sango ekfluis el lia nazo, kaj li komencis sufokiĝi. Plej multe lin, tamen, maltrankviligis la fino de tiu milito. Ili retiriĝis; oni irigis ilin en koton kaj neĝon. Oni lasis ilin malsati, kaj frosti pro malvarmo. Eĉ ne unu laŭdon serbaj regimentojn aŭdis. Oni forlasis ilin ĉi tiel, en peltkitoj kaj ŝafpeltoj, sen mono, sen manĝaĵo, kiel surneĝajn timigilojn. Li ne povis dormi pro grakado de korvoj. Ĉevaloj liaj krevadis pro frostoj.

Kaj eĉ pli? Li aŭdis, ke en la kampadejo de la estro oni parolis, ke printempe, ili revenos hejmen. Revenos do, same sence, samkiel ankaŭ antaŭe ili revenadis, lasinte mortintojn en tero, kaj disrompitajn ĉarojn sur kotaj vojoj. La subkolonelo Arsenio Vuiĉo informis lin, ke ili estos alvokitaj en Vienon, sed tio poste montriĝis nur veromanka onidiro. Tagoj estis pasantaj en senĉesaj nebuloj kaj neĝoŝtormoj. Ŝajnis, ke oni forgesis tute la Slavonian-Danubregionan batalionaron. La soldatoj de Isakoviĉo, en siaj enfositejoj, eĉ ne sciis en kiu parto de la mondo ili troviĝas.

En la komenco de marto alvenis la ordono, ke la regimentoj, laŭ difinita vojo, revenu hejmen. Slavonia-Danubregiona batalionaro estis ironta preskaŭ laŭ la sama vojo, laŭ kiu ĝi alvenis. La ordono konsistis el nur kelkaj germanaj vortoj.

Ili svarmis, tiel, tuj post la unuaj tagoj de printempo, tra Bavarujo kaj Aŭstrujo, hurlante pro ĝojo, kaj rompante doganejojn survoje. Ili iris malantaŭ la oficiroj kantante, malpaciencaj en ripozejoj, neelteneblaj en nokthaltejoj. Kiam pluvegis, ili iris nudpiedaj, bonhumoraj kaj gajaj, postulante iri ankaŭ nokte, sed ilia vojo estas precize difinita, kaj ili devis multe tempoperdi en urbetoj Stiriaj, kaj placoj Kranjaj. Ili toleris dum la reveno, volonte, kaj malsaton kaj soifon, ilin ne malĝojigis ankaŭ la fakto, ke oni ilin ne bonvenigas kaj ne gastigas, kiel oni tion faris kiam ili estis preterpasantaj, irante al batalkampo.

Komence de junio, kiu, tiujare, estis tre pluveca, la unuaj grupiĝoj de la regimentoj de Vuiĉo, revenis el la milito kontraŭ Francujo. Tiam oni jam certe sciis pri ĉiuj, kiuj pereis, tial oni vekris kaj ploris en ĉiuj vilaĝoj laŭlonge de

Savao kaj Danubo. En tiuj tagoj Isakoviĉo, kun siaj soldatoj, estis transiranta Dravon apud Oseko, trenante post si ĉiujn ĉarojn, kaj ankaŭ boatojn, por ilin vidigi kaj transdoni. La regimento aspektis, al li, amaso da malsanuloj.

Foje, vespere, li tranoktis, finfine, apud Oseka pramo, post tuta tago da irado, kun malsanuloj kaj vunditoj, kiuj ne volis resti en fremdlando.

Verŝiĝis abunda pluvo. Sur la bordo, en densa kaj alta herbo, homoj estis dislokiĝintaj tute senorde, sterniĝintaj en koton. Malsekaj salikejoj, kavegoj kun akvo, kaj ŝlimejoj ĉirkaŭ ili, la rivero, kun surfaco tremetanta pro pluvego, ĉio ĉi memorigis ilin, ke ili troviĝas proksime de siaj domoj, kaj ili provis ekdormi.

En la duonhelo akvomuelilo turniĝis.

Isakoviĉo estis lokiĝinta sur pramo, sub ĉaro, surĵetinte sur sin pajlon, pro kio akvon li tute ne vidis, kvankam la humidecon li sentis ankaŭ poste, kiam iĝis mallumo. Inter du radoj, kies kluĉnaboj estis disfalintaj, desur kiuj fluetis koto, li estis mallevinta la kapon por tradormi la lastan militnokton. La grafo Askanio Gvadano estis la sekvan tagon, ankoraŭfoje, kontrolonta la regimenton, antaŭ ol la homoj disiros al siaj hejmoj.

Ĝis Petrovaradino oni devis iri ankoraŭ tri tagojn, kaj malantaŭ ĝi troviĝis la mondo, kiu lamentis kiam ili ekiris, kaj kiu nun denove lamentos, kiam ili estos alvenintaj. Ŝrikado kaj veoj al li ŝajnis jam aŭdataj, krome, ankaŭ plorkantado kaj ĉantado pri mortintoj.

Maldekstre de la pramo, laŭflue, li vidis grandajn salikojn, kaj dekstre, altan, densan herbon, en la mallumo, kiu jam ankaŭ sur la akvo estis densa kaj peza.

Sen dormo, volvita en felojn, pajlokovrita, Isakoviĉo tiun vesperon, nur dio scias kiun fojon, komencis pensi pri tio, kion li faros plue? Li sentis, ke post du-tri tagoj, kiam li liberlasos la soldatojn, kaj restos sola, li troviĝos tuj ĉe la bordo de senracio; ĉe la limo de frenezeco, same neeviteble, kiel li alvenis sur la bordon de ĉi tiu rivero.

Pri la armeo li jam eĉ aŭdi ne plu volis. Iuj liaj oficiroj parolis senkaŝe, ke ili ekiros en Turkujon, el kiu iliaj patroj alvenis, kaj multaj soldatoj, aŭdinte tion, parolis, ke ili tien ekiros kun tuta sia familio kaj sia ŝafgrego. Pri Rusujo jam flustris ne nur li, sed ankaŭ la aliaj. Unu el unuaj kiuj foriris en Rusujon, la generalo Stefano Vitkoviĉo, entuziasmigis ilin per siaj leteroj.

Tiam, ankoraŭfoje, ankaŭ dum tiu lasta nokto, Isakoviĉo, batalante kontraŭ sia animo, decidis: ke lia ĝistiam viva estis malbono, kaj ke indas foriri ien, kie devas esti pli bone. Trapasinte, pense, la tutan Aŭstrujan armeon, li vidis sin kaj siajn soldatojn sur muregoj, en tendaroj, en bataloj, kompreninte, ke ili ĉion ĉi tio faris vane. Rememorinte restadejon sian, kaj restadejon de sia frato, kiun, post tri tagoj, denove, li estis vidonta, en la akvo kaj marĉegoj, li enmiksitis ankaŭ ilin en tiun sian senton de vaneco.

Kvankam li ne pensis, ke li devos ilin denove transloki, retro, en Turkujon, en siaj pensoj li ilin vidis mizeraj kaj povraj, en kotejo kaj marĉoj. Li ekĝojis rememorinte, ke li povos daŭrigi la konstruadon de la preĝejo, meze de la vilaĝo, kaj decidis, post la reveno hejmen, ordoni, ke oni por li faru ikonon de la sankta Ŝtilanoviĉo, restontan ankaŭ post lia morto.

La reveno el la milito, pasigo de la tuta vintro en Oberfalco, la veturo tra Aŭstrujo dum pluva printempo, la alveno sub Osekon, ĉio ĉi, tamen, kvankam estis malplezuriga kaj malfacila, al Vuko Isakoviĉo ŝajnis kvazaŭ forpasinta sonĝo. Maljuniĝinte, kadukiĝinte plene dum ĉi tiu milito, li estis kutimiĝinta paŝi malakurate kaj distrasente, kvazaŭ duondorma, en fremdlando.

Nur matene, vekiginte sur pramo Oseka, por ekipi la regimenton antaŭ la kontrolo en la urbo, al li ekŝajnis terura la realaĵo, kun la malklara rivero, malsekaj herbaĉoj kaj arboj, akvomueliloj, ponto kaj muregoj kaj remparoj urbaj kaj griza ĉielo.

La pluvo jam ĉesis, kaj, pretiĝante, li, apud siaj ĉevaloj, desur la pramo, vidis, ke sur la bordo pretiĝas la tuta regimento.

Tiam, lin impete alsvarmis impresoj kaj pensoj. Li komprenis, ke li revenis post vana laboro. Ke li batalis nur Dio scias kie, kaj por nenio. Li rememoris, ke la edzino forlasis lin kun la senfortaj, malsanaj infanoj. Fiksrigardante la soldatojn, li komprenis, ke pri ili neniu zorgas, ke oni ilin trompas, pelas tra la mondo kiel brutojn, kaj buĉigas ilin. Ke oni al ili donas flagojn, ke oni ilin ornamas per plumoj, kaj elnombras ilin, vivajn kaj mortajn, kiel ĉevalojn kaj kartoĉojn. Ke inter ilia vagado sur militkampoj, kaj la vivo de tiuj, kiuj estas hejme, en marĉegoj, ekzistas nenia kontakto, nenia rilato. Ke lin, Vukon Isakoviĉon, tuta tiu germana imperio, fakte, nur mokas. Ke pri li Karlo la Lotaringuja nur ridis, ke Berenklaŭo lin ĉiam primokis, ke Komisararo, en Peĉao, ankaŭ nun, kiam li estis revenanta, forte vangofrapis, kaj ke lin ankaŭ hodiaŭ la markizo Gvadano maltrankviligos, ridante plengorĝe pri ĉiu paŝo kaj viciĝo, turniĝo kaj kuro de lia Slavonia-Danubregiona regimento.

Jam preskaŭ hejme, sur Oseka ponto, Isakoviĉo, tiel, estis kolerigita ankoraŭfoje aĉe. Atakita de nigraj pensoj, li provis ilin dispeli, samkiel li estis dispelanta siajn ekscititajn hundojn, skoldante la soldataron plengorĝe. Saltinte senespera, diskurre sur la ĉevalon, li ektondris sur la pramo, kriante al la regimentanaro.

La soldatoj ekkuris, tamburoj ektondris, la oficiroj viciĝis. Post kelkaj momentoj jam, sur la ponto, konsistanta el ligitaj barkoj, aperis Slavonia-Danubregiona batalionaro, en ordomankaj vicoj, kiuj, kiel du longaj serpentoj, vane penis rektiĝi.

Ankoraŭ ĉi-okaze! Ankoraŭ la lastan fojon, mense diris Isakoviĉo, kaj, ke li ilin venigu, ilin vidigu! Sufiĉis, ke, sur la ĉevalo, li sukcesis ekhavi soldatan

sintenon, por ke li forgesu ĉiujn malagrablajojn kaj penegojn de sia profesio, ekdezirinte denove elstarigi sin. Ili forrapidis kun la servistoj malproksimen antaŭ la regimento, li ŝanceligis la tutan ponton per la saltoj de sia ĉevalon, pro kio li devis halti.

Estis frue ankoraŭ. En la kvietaj kaj griza tago li vidis fortikaĵojn sur la alia bordo, fenestrojn de kazemato, kanonojn, sablan bordon kun maljunaj arboj kaj krutajn tegmentojn de urbaj domoj. La rivero, desur la malalta ponto, ŝajnis multe pli larĝa, verdete flava, plena da sablo. Insuloj en malproksimo, salikejoj, kanejoj, ĉio estis senbrua, senmova, profunde verda. Pretiĝante forĵeti, laŭ la kutimo, ingon, kiun la servistoj devis tuj kapti, Isakoviĉo komencis, malrapide, eligi la sabron, kaptinte spasme la sabrotenilon, turniĝinte vizaĝe al la soldatoj. Frostotremo, glacia frostotremo traflugis lian dorson.

Tio estis la momento de nemezurebla eŭforio, kiun li ege ŝatis.

Jam sekvamomente, meze de la rivero, kiu estis fluanta sub la fostoj, ege proksime, li sentis sian malĝojan solecon, kaj suprenvolvinte la lipharojn, retropuŝinte la bulĉapelon, li ekpelis la ĉevalon, kaj provis ne skuiĝi kiel barelo.

La regimentanaro avancis post li, tondrante per la paŝoj, kiel kavalerio, sur la ponto, al la muregoj de la urbo.

Ankaŭ la soldatoj sciis, ke tio estas la lasta kontrolo, tial ili hastis, taŭzaj, nelavitaj, kun trokreskintaj barboj, lipharoj, harplektaĵoj. Inter ili pluraj estis ankaŭ lamantaj, kaj nudkapaj, kaj eĉ nudpiedaj. Tiuj kun speciala ĝuo enpaŝadis flakojn. Ili estis kantantaj, plenvoĉe.

Oficiroj, ariĝintaj ĉirkaŭ flago, estis ordigintaj sin iele-iome, sed la soldatoj, ne nur ne estis kovrintaj siajn ĉifonajn peltkiletojn kaj disŝirintajn fundojn, sed male, ili, intence, elmontradis la ĝisgenuan koton, disrompitajn kolbojn kaj siajn kruojn, envolvitajn en ĉifonojn.

Piedpremante malsekan sablon, ili venis ĉe la pordegon de la urbo, sub densan akaciaron, irante laŭlonge de altaj muregoj, invaditaj de herbo el kiu elstaris kanontuboj. Vadante en koto, ili vidis, ke la ĉielo, malantaŭ la arboj, sereniĝas.

Fiksaŭskultante iliajn paŝojn, kaj komandojn de la oficiroj, skuiĝante sur la ĉevalo, denove plena da plumoj kaj silkaj bendoj, ligitaj sur la kamizolon el ŝafa felo, Isakoviĉo, sterniĝinte preskaŭ sur la kolon de la ĉevalo, rapidegis, trans la defendmuron, al la ĉefa placo de la urbo. Tie lin atendis, sur granda balkono, plena da oficiroj, la markizo Askanio Gvadano, al kiu li estis vidi-gonta ĉiujn vivajn knabojn, kaj kiu mencios la mortintajn, kaj esprimi grandan estimon kaj respekton, antaŭ ol la soldatojn liberlasos, ke ili iru hejmen.

La lastan fojon, mense diris li, jam estas sufiĉe, en Rusujo li sendube fartos pli bone! Lin jam tedis tiu umado ĉe Rejno, tiu persekutado ĉe Danubo, tiuj interbatiĝoj en Italujo, jam venis la lasta momento kompreni, ke

la regimentestran rangon oni al li neniam donos! En la mondon li ne venis por komerci! Prefere li tamen vivu kun la komercistoj, ol ĉi tiel, cigane kaj vane! Se li ne estus soldato, delonge li finlokiĝus ie kun la edzino kaj infanoj, kaj edzino lia eble eĉ ne mortus! Sed nur tiu laboro por li estas agrabla, la laboro soldata!

Cetere, kian sencon havas tiu ĉiama deziro finlokiĝi, tiu ĉiama insisto de lia frato Aranĝelo, kiun post tri tagoj li estis denove renkontonta en Petrovaradino? Ĉu en la hejmo lin atendas io pli bona? La infanoj, kun kiuj li sciis nek kion fari, nek kien iri! La vilaĝo, kiun li estis firme decidinta fondi supre, sur la deklivo de la monto, ĝis kiam estos pretaj translokiĝi en Rusujon, kien li ankoraŭ estis certa ke ili foriros! La ŝlimejoj, vintraj ekzercadoj en Petrovaradino, eble invito veni Vienon, kiun li timis, kaj la malsano de la patriarko, pri kiu li estis aŭdinta, kaj pro kiu li estis tre maltrankviliĝinta!

Rajdante inter defendmuroj, fiksaŭskultante la akrajn resonojn de la hufoj de sia ĉevalo kaj de la ĉevalo de l' servistoj, Isakoviĉo aperis sur la urba placo subite, kaj skuiĝis, kiam li ekvidis antaŭ si longan vicon de kanonoj, kiuj estis interligitaj per ĉenoj, soldatojn kaj oficirojn.

Meze de la placo, sur balkono, sub grandegaj fenestroj de la generala konstruaĵo, buntis tuta monto de flagoj, plumoj, silkaj bendoj, kirasoj, bulĉapeloj, ĉapoj.

La generalo Gvadano svingis al li kolere per siaj gantoj, dezirante, ke Isakoviĉo komencu la pasadon je solena honorvico, jam de tiu stratangulo.

Konfuzita, tujtuje forgesinte ĉiujn siajn pensojn, intencojn kaj afliktojn, Isakoviĉo, laŭkutime konfuzegiĝis antaŭ la estroj, kaj bridis la ĉevalon tiel forte, ke la besto ekbaŭmis kiel freneza, kaj komencis karakoli. Al la regimentanaro li elhurlis la ordonon ekkuri. Rapidante bonigi la unuan impreson, Isakoviĉo jam nek aŭdis kaj vidis ion ajn. Ne atendante, ke la generalo, kaj la armeo, lin jam atendas, sur la placo, forgesinte la ordonojn de la hieraŭa vespero, kiuj al li estis klare kaj racie diritaj, li konfuziĝis kiel ia maljunulino, kaj komencis, kiel ebriulo komandadi kaj dekstren kaj maldekstren, kaj antaŭen kaj malantaŭen, elmontrante la regimenton kiu kurpaŝis, tie kaj ĉi tie, sur la placo, en du vicoj, kaj en ses vicoj, montrante ĝin deantaŭe kaj demalantaŭe, kun mallevitaj kaj kun alte levitaj pafiloj, kun ponardoj kaj pistoloj, genufleksan kaj saltantan, eĉ kuŝantan sur la tero, dum kio li mem trotis sur ĉevalo laŭlonge de la vicoj, svingante sabron kaj skuante la ĉevalon, baŭmigante ĝin antaŭ la balkono de la generalo, haltante humile, salutante kaj kriegante: „Vivat por la grafo Gvadano; vivat por la grafo Gvadano.“

Dume la markizo Gvadano, tutkovrita de plumoj kaj silko, tordis la fingrojn malespere, vidante kiel Isakoviĉo fuŝumas, ne respektas distancon kaj eĉ ne scias la komandojn.

Cetere, kial rakonti, kiel la Slavonia-Danubregiona batalionaro, tiun matenon, senhonorigis?

Se oni konsideras, ke la kurantaj oficiroj sukcesis ordigi kaj kvietigi la regimentanojn, kiuj kuratakis, tute spiregantaj, eĉ kanonojn; se oni konsideras, ke, cetere, la oficiroj de Isakoviĉo vidigis perfektan sintenon, ke la soldatoj frapadis perpiede la teron kvazaŭ per pioĉoj, tiam oni povas diri, ke ĉio bonorde finiĝis. Eĉ la generalo Gvadano multe ŝanĝiĝis, aŭdinte, kiom da regimentanoj sur la militkampoj pereis.

Cetere, Isakoviĉo sentus sin bone, eĉ se oni lin enkatenuis. Al la kriego de la generalo li ne reagis. Kiam oni lin alkondukis supren, sur la balkonon, li ne multe pardonpetis. Dum la tagmanĝo, en la solena ĉambrego de la komandejo, inter kirasuloj, li pli ol iom ebrietigis, kaj antaŭ vespero, en la privata salono de la generalo, li frue ekdormis.

Longa vico da fortikaĵoj, defendmuroj, sonorilturoj, altaj domtegmentoj, flavaj grandega balkono, figuro de la generalo, ĉio ĉi tio estis trafluganta la cerbon de Isakoviĉo, kvazaŭfebre.

Tutan tiun tagon, plenan da paradoj, ekzercadoj, en Oseko, li tremis pro la proksimeco de sia lando kaj de tiu dometo, en kiu kun la edzino li estis pasiginta la lastan nokton. Ke li viva revenas tien, kien li opiniis neniam plu reveni, tio lin ekscitegis. Ĉiu tereno, ĉiu borda deklivo, ĉiu taluso, pasadis tra lia memoro, ĉiuj zorgoj, ĉiuj agoj. Liajn pensojn, kvazaŭ antaŭ fulmoj, nun hantis fantomecaj personoj, ĉarmaj kaj karaj, kaj fremdaj kaj neelteneblaj. Lin turmentis des pli, ju pli li estis proksimiĝanta al sia lando, la zorgo pri la dolĉa ortodokseco. Samkiel ankaŭ la penso pri la atendanta lin tombo de la edzino. Li deziris, eviti ĉion ĉi tion, kio lin hejme atendas, tiun kriegadon kaj vekriadon, li deziris simple viva hejmen ne reveni. Reveni, tio ŝajnis al li tre freneza.

Elirante post la adiaŭa bankedo, el la domo de la markizo Gvadano, ĉirkaŭ noktomezo, li, laŭkutime, pro doloroj en la ventro, malĝojiĝis.

La nokto, malseka, la malplena placo, lanternoj, ombroj de la defendmuro, fortikaĵoj, lin maltrankviligis plene. Penplene li sukcesis ne glitfali ŝtuparsuben, kaj pro tiu fortostreĉo de la korpo doloroj lin plene venkis.

La kapitano Antonoviĉo lin helpis, retenis, kaj li ne falis. Dezirante diri al li ion agrablan, li menciis la ordonon de la generalo, per porsoldata mono fari sian pentraĵon en Vieno, kiel memoron pri la milito, sub Berenklaŭ. Tiam Isakoviĉo lin kviete alrigardis kaj diris, ke nur sanktpersonoj devas daŭri, sed ke lia figuro devas malaperi. Per propra mono li mendos, samkiel li jam diris, se lin io ne malhelpos, en Vieno, portreton de la sankta regnestro Ŝtilanoviĉo. Ĝi ja restu post li, kiam li ne plu ekzistos.

Kaj Isakoviĉo sentis sin plene maljuna kaj senpova, dum eliro el Oseko, la sekvan tagon, revenante hejmen, sen ia ajn deziro plue vivi.

Malgraŭ tio, la homoj kiuj alkuris la ponton por vidi la armeon, rigardis lin kun profunda respekto, kiun en la homamaso estigas bravula maljuneco.

Rajdante, peza, grandan ĉevalon, kvietan malgraŭ la terura frapado de tamburoj, li povis, unuafoje, post longa tempo, indiferente etendi grandegajn siajn femurojn kaj tibiojn. Fiksaŭskultante la frapadon de la piedoj de siaj soldatoj kiuj kriante kantis kantojn pri la konkero de Beogrado, portante dispecigitajn ŝafidojn sur la dorsoj, fiksaŭskultante ridadon de siaj oficiroj, kiuj, zorgomanke, krucmetis la krurojn sur la seloj kaj rajdis fumante, kun elingitaj sabroj kaj transturnitaj bulĉapeloj, alkriante junaspektajn virinojn en homamaso, Isakoviĉo rajdis, denove tutkovrita per arĝento, kvieta kaj pura, kun grandaj, serenaj okuloj, fiksrigardantaj foren, kun nedifinita rideto sur la buŝo, kaŝante malesperon.

Li estis lastafoje bela en sia vivo.

Dum li estis pasanta inter muregoj, sub grandegaj volboj de pordegoj, rajdante sur la ponton, super la akvon larĝan, antaŭ verdajn salikejojn kaj verdajn astrejojn, lia mano pendis, tenante sabron, sen forto.

Ankaŭ tion li estis fininta. La tuta laco pro la lastaj, febre pasigitaj noktoj, pro la pretigado kaj rajdado, sidiĝis kvazaŭ sur lian kolon je ĉevalo. La malsekaodoro de bordoj kaj salikejoj, la sufoka varmo de malaltaj kaj sunumitaj nuboj, la nebulo el profundejoj, densa kiel fumo, ĉio ĉi tio lin estis sufokanta kaj dormiganta. La malfeliĉo kvazaŭ restus malantaŭ li, antaŭ li ankaŭ nun troviĝis, same kiel dum la ekiro, ia malproksimo. Li estis kvieta. Li esperis, ke postmorgaŭ, antaŭe mallumiĝo, li atingos Varadinon, kie li devis hejmenigi plurajn partojn de la regimento, antaŭ ol foriri kaj disponigi sin al la barono Engelshofeno, komandanto de Temeŝvaro, kio al li estis ordonita.

Kun melankolio, kiu estis transformiĝinta en kompletan silenton, persistan kaj maljunecan, ankaŭ li, same kiel lia patro, kiun li, dum ĉiu grava diraĵo menciadis, estis revenanta el milito. La transloĝiĝoj lin jam tedis, kaj la maltrankvilo, kiu nek en li, nek en ĉiuj liaj homoj, kiujn li gvidis, ne estis kalmiĝanta. Li antaŭvidis, ke li denove, se forlasos la armeon, kun la infanoj kaj frato, traveturos preskaŭ ĉiujn nemalgrandajn lokojn komercante. Kaj eĉ se li restos armeano, oni lin oft ofte translokigados, por ke li kvietigadu homamasojn kiuj estis transloĝiganta.

Li sciis, ke ankaŭ hejme, de nun, li travivados nur malagrablajojn. Kvietaj kaj memfida, li antaŭvidis ĉiujn tiujn jarojn. kiujn li ankoraŭ travivos, ĉiujn okazaĵojn, kiuj ankoraŭ povas esti, ankaŭ ĉiujn tiuj homojn – kiel ili kondutos.

Duondormanta kaj peza, li rajdis kun la kapo klinita, sur fostoj kaj tabulo de la ponto, al herbaĉoj. Ju pli estis varme en la ĉielo, des pli malfacile estis al li. La ĉevalo lin modere lulis, kaj tio lin komplete senenergiigis. Tio, kion li estis lasinta post si, ŝajnis kvazaŭ neniam ekzistus, kaj la morto de lia edzino

kaj la baldaŭa renkontiĝo kun la frato, kaj la ploro de la infanetoj, fandiĝis antaŭ li, ankoraŭfoje, kun nebulo. La servistoj kaj oficiroj, la regimento kaj kriado estis restintaj malantaŭ li, kaj li sentis solecon.

Rajdante sur la vojo, laŭlonge de la sabla bordo, meditante pri la dispozicio de la estroj, pri ebla translokigo en aliajn regimentojn, kiujn iuj oficiroj deziris, kaj kiujn li devis, de la generalo, elpeti, li komplete endormiĝis.

Jen, mense diris li, sufiĉe estis transloĝiĝi, kaj ĉio, kion oni forlasas, kvazaŭ neniam okazus. Fiksrigardante forajn montojn, malantaŭ kiuj denove estis aperanta Suno, li sentis, ke sur li ekbrilis arĝento. Laca kaj malplena, li estis malpeza, kvazaŭ tute na havanta korpon. Sunumita poste, trabilata, li sentis sin varma, sed ne peza, kvazaŭ tute ne rajdanta, kvazaŭ tute ne ekzistanta, en tiu nevidebla vento, kiu lin sekvis dedorse.

Tuj poste li trotigis la ĉevalon, tra malpleno.

Ankoraŭfoje, kaj kvazaŭ hastante, antaŭ ol li denove alvenos en la proksimecon de Arangelo, en sian loĝlokon, en siajn zorgojn, Vuko Isakoviĉo komencis pensi pri Rusujo. Ankoraŭ certa, ke li transloĝiĝos kun la infanoj kaj siaj servistoj tien, li hastis por ĉi tiel, neĝenata, ankoraŭfoje pripensi, ĉar nur tio lin povas savi de ĉio ĉi tio, de la senfine mizera, malestiminda kaj penega, kio lin hejme, kaj dum la sekvaj jaroj, atendas. Foriri ien, kaj vivi senzorge, forkonduki ankaŭ ĉi tiujn homojn, ke ili vivu ie facile kaj agrable, al Vuko Isakoviĉo ŝajnis tre eble. Ie devis esti io hela, grava, do, tien oni devas foriri.

Rusujo al li ŝajnis iaspeca transmonda imperio. Li aŭdis, ke iuj, kiuj tien el malproksima mondo alvenis, iĝis riĉaj kaj potencaj. Ke ili tuj ricevis pli altan rangon. Ke tie oni vivas kaj militas nobele. Ke la preĝejoj estas belegaj, ke tie dolĉas ortodokseco. Ĉi tie lin atendis nur mizero kaj senĉesa malĝojo, kio lin igis malprudenta, malespera, stranga. Ĉi tie lin atendis nur senfunda nenieco kaj malpleno, kion li vidis, finfine, tiel proksime, antaŭ si, kaj antaŭ sia maljunaĝo.

El la tuta vivo, meditante, li vidis en la pasinteco, ke helaj estis nur la puraj steloj kaj arĝentaj, arbaraj irejoj kaj herboj, super kiuj estis malleviĝanta aprila nebulo, desur deklivoj montaj, al kiuj li ankaŭ nun estis proksimiĝanta. Kie li iam vivis, en la unuaj tagoj de sia edzeco, kun la edzino, al kies tombo, kaj al al kies infanoj li estis nun revenanta, kaj en la estonteco, nur tiun senliman, neĝvualitan Rusujon, kien li estis intencanta transloĝiĝi, por finfine pli facile vivi, kaj por finfine ripozi kaj kvietiĝi.

Malplena estis antaŭ li ĉio, kaj vana porĉiame malantaŭ li, ĉio kio estis pasinta. Nenion li atingis, ankaŭ en ĉi tiu milito, same kiel la aliaj, kaj tiu tuta lia irado kaj vaga transloĝigado nur daŭris senĉese. Ĝis la fundo tamen, en si, li sentis, ke estas neeble, ke ĉio ĉi finiĝu tiel, kaj ke lin tiras voĉo iu, en li, promesanta al li ion eksterordinaran, je la fino.

Antaŭ la malplena profundego, freneza abismo, en kiu li vidis vivon sian kaj la infanojn, la morton de la edzino, la sorton de la frato, la revenon de siaj soldatoj, la vekriadon kaj lamentadon, kiuj lin estis atendantaj, li ekkonsciis, ke lia vivo pasis, kaj li ĝin rebonigi ne povas, same kiel rebonigine povas la malhonoran sorton de ĉiuj, kiuj estis ekirintaj kun li, kaj kiuj nun revenas en siajn ŝlimejojn kaj kotkampojn.

Malgraŭ tio li sentis, ke li ne estas naskita por ĉi tiu neesprimeble forpuŝa enuo kaj malpleno, en kiu li troviĝas, kaj kiu lin pelis havi la samajn pensojn, kiujn li havis en la splenejo sub Strasburgo.

Ie devas ekzisti vivo pli facila, serenaj okazaĵoj, kiuj kunfluas kiel puraj kaj malvarmaj, agrablaj, ŝaŭmaj kaskadoj. Transloĝiĝi oni devas tial, foriri oni devas ien, kvietiĝi ie sur io pura, klara, glata kiel surfaco de profundaj, montaraj lagoj. Vivi laŭ propra volo, sen ĉi tiu terura konfuzo, sekvante sian vivon, por kiu li estis naskiĝinta, sekvante ion eksterordinaran, kion li, same kiel la ĉielon, sentis ĉion kovranta.

En Petrovaradino renkontis Isakoviĉon denove pluvo. Ĝi torentis sur muregojn, sur akvon, sur ponton, sur arbojn, pro kio la tuta batalionaro alvenis tramalseka kaj tute kotumita.

Tie estis kaj virinoj kaj maljunuloj, kiuj ĝis tie eliris antaŭ la regimenton, portante panojn, brandon kaj novvestojn, ŝrikante kaj lamentante pri mortintoj. Dismetante pajlon kaj starigante tendojn stratomeze, inter muregoj, soldatoj, malsobraj, kantis, ĉiuj kisadis kaj brakumadis unu la alian. En la urbo oni parolis, ke la regimento, same kiel la aliaj serbaj regimentoj, estos eksigita, kaj ke ili ĉiuj estis anigitaj al aliaj regimentoj imperiestraj, same kiel la aliaj ordinaraj kamparanoj, senhejmuloj kaj servistoj. Ĉiu, kiu ne estis kontenta pri tio, povis kolekti sian havaĵon. kaj forloĝiĝi en aliajn regionojn.

Esperante, ke en Petrovaradino lin atendas la frato, Isakoviĉo kolere agitiĝis sur la ĉevalo, kiam li aŭdis, ke lia frato forestas, kaj ke nur servistoj de lia frato atendas lin sub la urbo, sur la akvo, apud la ponto. Kun ŝalupo, per kiu ili venigos lin hejmen.

Laca pro la lamentado de virinoj, pro elnombrado, kontrolado kaj registrado de armiloj, li descendis antaŭ vespero al la rivero, konjektante nenion bonan, rememorante kiel, sur akvo, tie en fremdlando, same, foje vespere, li aŭdis, ke lia edzino mortis.

Apud la ponto li trovis siajn servistojn, kolektiĝintajn ĉirkaŭ homo, kiu, malsekega, volvita en peltkitelojn, kuŝiĝis sur malsekan trunkon, en akvo. Sub la muregoj de la fortikaĵo, inter mallumaj kolonoj, en malhelo, li penplene distingis homojn, kiuj estis alpaŝantaj lin.

Mallumo estis falanta en ŝlimon, antaŭ li, dum pluvo gutkovris la tutan vidatingon. Homo ia, tute kurbiginta kaj ŝultrokovrita, leviĝis tiam en la mal-

lumo, kaj proksimiĝis al li lamante. Tio estis Ananio, la servisto de Aranĝelo. La servisto devis sciigi lin, ke Aranĝelo ne povis veni por lin salutatendi, ke li tute ne povos veni, ĉar li transloĝiĝis en sian domon, en Budaon.

Cetere, ili povas intervidiĝi ankaŭ poste, la tempo sufiĉas. Infanoj liaj fartas bone, hejme ili estas, krom tio Aranĝelo lasis al li ankaŭ monon. Super la tombo de la sinjorino Dafina estas starigita tegmento.

La preĝejo jam estas konstruata.

Krome, la forpasinta Arkadio reaperas nokte, en la vilaĝo. Jam kelkaj homoj vidis lin iranta anserpaŝe, kaj aŭdis lin, kantetanta, tranaze. La edzinon li atakas.

Brutoj amasmortas, kaj muro de lia domo, la almonta, fendiĝis kaj estas ruiniĝonta.

Kiam, la sekvan tagon, antaŭ vespero, vizitinte unue la tombon de la sinjorino Dafina, Isakoviĉo alvenis antaŭ sian domon, kun siaj servistoj, virinoj ŝrikis kaj lamentis tiom multe pri la mortintoj, ke li devis fuĝi en la domon, por kaŝiĝi.

Pluvis ankaŭ tiun vesperon.

Ĉio estis sama, kiel dum lia foriro. Nebulaj salikejoj vaporis, nuboj estis malleviĝantaj ĉiam pli suben. La tero estis malhela humido, nevidebla kaj pluvoplena.

Malkontinua bojado de hundoj, kiun li konis, kaj kiu ĉiam estis la sama, aŭdiĝis denove, ankaŭ obtuza hufobatado, en proksimeco, kvazaŭ sub tero.

Laca senfine, silentema, kvazaŭmuta, kun la okuloj dismalfermitaj, kuŝante komforte, Isakoviĉo terurplene rigardis, kiel lin en duonlumo vizi-tas Ananio kaj ties maljunulino, liaj filinoj, alportante pajlon, kaj enportante tinojn kun varma akvo.

Finfine, kiam ili eliris, li vidis, ke ĉirkaŭ li turniĝas kaj kliniĝas la plej juna filino de Ananio. Grandkoksa kaj grandmama knabineto.

Sinkinta, ankoraŭ vestita, en ian preman duonsongon, ĉar tiun tutan tagon, ĝis la alveno en la domon, li drinkis, Vuko Isakoviĉo sentis, ke li estas denove tie, hejme, en la kotejo, super la rivero, susuranta sub altaĵo, pleniginte tutan nokton. Inter disfluintaj akvoj, kavoj kaj ravinoj. Super senfinaj suproj de salikejoj, plenaj da arbustoj.

Kiam li ordonis, ke lia kuŝejo estu pretigita, Ananio kaj tuta lia familio malsuprenkuris por ordigi plumkovrilojn, amasigitajn ŝafajn felojn kaj sil-kajn litaĵojn. Denove plej longe restis la plej juna knabino, grandkoksa kaj grandmama.

Sub la febla lumo de meĉo tiam, Isakoviĉo vidis ŝiajn nudaj krurojn kaj blankan karnon sub la genuoj, kaj li sentis, tiel maljuna, senenergia, kvankam al li ŝajnis, ke li jam estas mortinta, ke li tuta ŝveliĝas kaj pufiĝas.

Konsternita pro tio, jam nudigita, li alpaŝis la pordon, kaj detiris ĝin, aŭdinte, ke gruo ekknaris.

Pluvis, silente, antaŭ la domo, en mallumo, sur paŝtejo, sub morusujoj, ĉe brutejo, en la alia rando de la kampo. Denove li sentis la senliman mal-sekecon de la ŝlimegejoj, marĉaĵoj kaj kano.

Tiam, terninte brue, kelkajn fojojn, ekdancinte sur la tero, tiel, ke ĉio ekskuiĝis, li revenis en la malluman varmejon ĉe la fajrujo, kaj renversiĝis sur la kuŝejon, tutkorpe.

Kaj kiam ŝi denove alpaŝis, kliniĝante, ĉirkaŭirante la kuŝejon, kun siaj rondaj femuroj kaj mamoj, li obtuze ektusis kaj konsterniĝis.

Agitiĝinte, li ordonis al ŝi foriri. Li sentis, ke, simile kiel pluvo, sur semon en profundo de la tero, kiu ĝermas, sango fluas en lia kapo sur brilegan, stelan punkton de lia menso, la lastan kiu restis pura en liaj pensoj, senmova kaj malefemera, en estonteco.

Konfuziĝinte, mallevinte la kapon, bruetante, laŭŝajne tre gravmove, per la sabro, arĝentaj puftuoj, pistoloj, kiuj kuŝis ĉe lia kapo, por ne postrigardi ŝin, tre fortikan, Isakoviĉo, mense embarasita, ripetadis, ke la sekvan tagon li devas frue leviĝi, iri al la patriarko, ekscii novaĵojn, pretiĝi por veturo al Vieno, savi la soldatojn de nova transloĝiĝo, kaj senarmigo, pensi pri la infanoj, iri al la frato en Budaon, al la generalo en Temeŝvaro, aĉeti ĉevalojn, ĉarojn, konstruigi forĝejon en la vilaĝo, translokigi la kapitanon Antonoviĉon, skribi detalegan raporton pri la reveno de Slavonia-Danubregiona regimento, kaj precipe, precipe fari planon, esplori detale la eblecon foriri en Rusujon, kien li ankoraŭ esperis foriri.

Ekstere, tamen, la pluvo ne ĉesis, la homoj ankoraŭ staris vekriante kaj lamentante pri pereintoj, ĉirkaŭ brutejoj, sub morusujoj.

Tiel, en la 1745-a jaro, en la komenco de somero, Vuko Isakoviĉo revenis el la milito.

Kaj dum, en lia animo, kvazaŭ en senfina cirklo, konstante ripetiĝadis pensoj pri foriro, pri foriro ien, en Rusujon, super kiun, en malespero, sene-nergia, post tiom multaj monatoj da erarvado, kaj sufero li estis leviĝinta, samtempe tra lia, ekdorminta unuafoje denove hejme, korpo tremis, kiel ia stelo, la lasta ero de lia iama juneco. Ĝi estias retenanta lin, malesperan, silentiĝintan, frenezetan jam pro sufero kaj malĝojo, inter tiuj ŝlimejoj kaj akvoj, kiu vaporiĝis super la lando, kiun li proame nomis Novserbujo. La ero, kiu ankaŭ en lia maljunaĝo konservis en si la povon ekĝermi kaj levi novajn estaĵojn super la tempon kaj astrejon, kiu respuguliĝos en akvoj kiuj kunfluas kaj renkontiĝas, tie, apud Turkujo kaj Germanujo, respuguliĝos kaj leviĝos kiel pontoj.

Ĉi tiu esperantigo de la romano *Transloĝiĝoj*, origine „*Seobe*“ de Miloŝo Cernansko, estas ne nur traduko en la kutima senco de tiu vorto, sed ankaŭ poezia transpono, kiu kuraĝe sekvas la spiriton de la originalo kaj de la internacia lingvo Esperanto.

Cernansko estas verkisto kun unika lingva muziko, sintaksa flueco kaj emocia malligiteco de reguloj – karakterizaĵoj, kiuj faras lian stilon samtempe mistera kaj profunde homa. La tradukintoj, anstataŭ ĝustigi aŭ glatigi tiujn trajtojn, elektis konservi tiun specialan ritmon, dislokon de vortoj, kaj ofte abruptan movadon inter bildoj. Oni trovos ĉi tie neformalan interpunkcion, nekutimajn turnojn de frazoj, kaj celohavan malstabilecon – ĉio por konservi la originan senson de senlima serĉado, perdita identeco kaj ekzila movo, kiuj estas la esenco de la verkoj de Cernansko.

Tiu ĉi verko, en sia esperanta versio, invitas la leganton ne al simpla rakonto, sed al vojaĝo tra la lingvo mem: lingvo kiel vivo, dispecigita sed ne detruita, migranta, sed ne celosena. En la mondo kie normoj ofte superregas esprimon, ĉi tiu traduko memorigas nin, ke Esperanto estas vere fleksebla, esprimriĉa, kaj viveca, ke ĝi povas kapti eĉ la plej subtilajn tonojn de unu el la plej elstaraj stilistoj de serba literaturo.

Ĉi tiu *Transloĝiĝoj* ne estas nur libro – ĝi estas spirita mapo, voĉo el fremda tero, kiu sonas rekoneble en la universala lingvo Esperanto.

Zlatoje Martinov

CIP – Каталогизација у публикацији
Народна библиотека Србије, Београд

821.163.41-31

CRNJANSKI, Miloš, 1893–1977
Transloĝiĝoj / Milošo Cernansko ; [tradukis
Jovano Zarkoviĉo, Ĵivanko Novakovo]. – Beogrado :
Удружење научних и стручних преводаца Србије,
2025 ([Београд] : Службени гласник). – 183 str. :
ilustr. ; 24 cm. – (Serio de serba literaturo)

Prevod dela: Сеобе / Милош Црњански. – Тираж 300. –
Str. 5–7: Antaŭparolo / Zlatoje Martinov.

ISBN 978-86-917873-7-0

COBISS.SR-ID 172740617



**Удружење научних и стручних преводилаца Србије
Репрезентативно удружење у култури**

www.prevodi.rs

ISBN 978-86-917873-4-9



9 788691 787349